

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

Albana proverbo: Orgojleco estas malbono de ties posedanto

Nr 57 Februaro 2005

Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio
Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758
(Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)

Rete: pistolia@yahoo.com , apistoli@aol.com (Vasil Pistoli); selimib@albmail.com (Bardhyl Selimi); adoci@gmx.de (Artur Doçi) ; shhasani@albmail.com (Shaban Hasani); motto@bwc.org (Martha Otto) ; fiorialbtours@yahoo.com (Fjoralba Sadiku); asokoli@bkursimeve.com.al Nehat Sokoli; beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ; matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi); sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti); mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri); dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com ; egli_b@wp.pl (Egli Brati) ; eltonzaimi78@yahoo.com (Elton Zaimi); agimperaj@yahoo.it ; tcobani@yahoo.com (Tonin Çobani)

Retpag'o : <http://www.esperantio.tk>

You can access the group's web features using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/>

You can access the group's Management page using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage>

Enhavo

Kursoj

Nova kurso en gimnazio "Sami Frashëri"

Ekzamensesio en la blindulejo

ILEI kaj Ni

Internacia infansemajno

UEA kaj Ni

AIS kaj Ni

Letero de s-ro Quednau

Invito al Studumo

Zamenhofaj tagoj

Informoj de Henri Masson

Urg'a agado pro katastrofo kaj aliaj

Informoj de “Suda Stelo” de Belgrado

Informoj de Manfred Westermayer

Propagando por kaj pri Esperanto

Materialoj provizitaj de Henri Massn

Humoro

Esperanto Turismo

Esperanto turisma kalendaro ka.

Alvokoj

Solidareca mesag'o el kaj al japanaj virinoj

Diversaj

Skandalo-grekoj ne akceptas albanan preleganton

Vojag'impresoj el Makedonio

Leteroj

Letero de Artur

Libroj

Balkana antologi kaj albanaj poetoj

Kritiko pri nova lernolibro de Esperanto por albanoj

El diplomlaboraj'oj de nia studentoj

Ereid Dhimitri: Turisma areo en suda marbordo de Albanio

Kursoj

Nova kurso en gimnazio “Sami Frashëri” Tiranë

Ekde fino de decembro 2004 nova kurso aperis c'e gimnazio “sami Frashëri” Tiranë. Ĝin partoprenas gelernantoj 17 jarag'aj sin pretigantaj al la matematikaj olimpiadoj. La kurso okazas tij post la lecionhoroj de matematiko, c'iun sabaton matene. Jen la nomlisto:

Aldi Arkaxhiu	Erta Muça
Arnel Mici	Evinda Shyti
Blerta Lipo	Florian Alimadhi
Desara Gjini	Gledi Kutralli
Doloresa Doka	Herion Limaj
Dorian Kajtazi	Ina Dhima
Enkeleda Kërtalli	Orion Lasku
Erik Shytermeja	Sandri Xhumari

Ekzamensesio en la blindulejo

27-01-2005

Lau'plane, je 27an de januaro 2005, okazis en la blindulejo Tirane la ekzamensesio pri la elementa kurso de Esperanto. C'eestis la sesion entute 7 gelernantoj de la sepa klaso. Tri aliaj ne sukcesis c'eesti. C'iuuj kandidatoj transpasis la ekzamenon kiel jene:

Plarentina Dervishi naskita je 08.12.1990 je noto 7 (sep)

Denisa Onjeji, naskita je 10.07.1991 je noto 10 (dek)

Ada Hajrullahu, naskita je 23.02.1990 je noto 10 (dek)

Drenica Masha, naskita je 10.10.1990 je noto 7 (sep)

Klodiana Minja, naskita je 29.05.1990 je noto 7 (sep)
Blerian Proda, naskita je 07.05.1992 je noto 9 (nau')

Qazim Kumria, naskita je 28.02.1990 je noto 8 (ok).

Por E-kursoj

Kia vi sentas vin hodiaŭ' ?Jen kelkaj respondoj:

elc'erpita	felic'a
konfuzita	petolema
ekstaza	nau'zigita
kulpa	timigita
suspekta	furioza
kolera	honta
histeria	zorga
frustita	fimemkontenta
trista	deprimita
memfida	subigita
embarasita	esperplena
soleca	surprizita
enamig'inta	anksia
j'aluza	s'okita
enua	timida

(Ricevita de pos'tkarto kun teksto enesperantigita el la Angla)

Ekzamenkomisio

Prezidanto,- s-ro Ing. Shaban Hasani Instruisto,- Bardhyl Selimi Re prezentanto de la lernejo,- s-ro Timo Bushi, viclernejestro Al c'iuuj ekzaminig'intoj la komisiono donacis po au'diokasedo, ekzemplero de la enesperantigita libro pri la albana nacia heroo Skanderbeg, kaj po du esperantaj revuoj. Oni planas dau'rigi la lernokurson kun tiuj gelernantoj venontjare je dua nivelo.

Informis **Matilda Sokoli**

ILEI kaj Ni

INTERNACIA INFAN-SEMAJNO EN KASTELO GREZIJONO (Maine-et Loire, FRANCIO) de la 23a gxis la 30a de aprilo 2005

Tiu arangxo celas infanojn 7/17-jarajn, kiuj parolas aux eklernas esperanton. Ni sxatus ke partoprenu grupetoj el diversaj landoj, cxu lernogrupoj, cxu familioj. Do, respondeculo de grupo povas esti Eo-kursgvidanto, aux gepatroj, parenco, amiko... Per okazigo de tia evento, ni volas ke gejunuloj spertu uzadon de esperanto en veraj, internaciaj kondicxoj. Versxajne, tio povos nur firmigi en ili, konvinkon pri efikeco de la lingvo kaj deziron plu

lerni gxin. Por viziti virtuale la kastelon Grezijono kaj konsulti la stagxo-programon : <http://gresillon.org>

ANTAUPENSITA PROGRAMO :

Matene : en grupetoj **internaciaj** de 5/7 infanoj (samagxaj aux/kaj samnivelaj), lingvo-perfektigxo per diversaj aktivajxo en esperanto (kurseto, lernado de kantoj, ludoj, konversacio,...) laux elekto de cxiu grup-gvidanto.

Gvidantoj, bonvolu anonci viajn kompetentecojn kaj proponojn.

Posttagmeze : promenadoj, turismaj vizitoj, skipaj ludoj...

Antaux-vespermangxe : arto-farado aux man-laboroj, spektaklo-preparado, verkado de la stagxo-gazeto (cxiu grupo ricevos minimume 1 ekzempleron).

Vespere : ludoj, prezento de kantoj, teatrajxetoj, poezioj, dancoj, diapozitivoj, filmoj...

kiujn cxiu grupo estos preparinta antaux la renkonto aux surloke.

PREZO : Normala prezo (infano aux plenkreskulo) = po 130 euxrojn.

Antauxpago = po 50 euxrojn/partoprenonto, kiom ajn agxa.

Laux la deven-lando aux por pluraj samfamilianoj, ni povos interkonsenti pri rabato. Pri tiaj demandoj, bonvolu turni vin al Elisabeth Barbay, rete au telefone (vidu cxi-sube).

ANTAUX-ENSKRIBAJ KONSILAJ : La nombro de dormolokoj estas limigita. Enskribigxo estas traktataj laux ordo de ricevo. En kazo de samtempa ricevo, preferon havos grupo el lando ankoraux neniam partopreninta. Escepte de familioj, ideala proporcio estas :

1 plenkreskulo/gxis 6 infanoj, 2 plenkreskuloj/gxis 10 infanoj (por grupo pli multnombra, antauxkonsento necesos).

ENSKRIBIGXO : Eksterlanda respondeculo de grupo, sendos la tutan antauxpagon al **UEA konto** : **gres-y**,

kaj ateston de gxiro kun donitajxo de sia konto al la kasisto de kastelo Grezijono, pierre.jagueneau@wanadoo.fr

Franca respondeculo sendos la antauxpagon rekte al :

Pierre Jagueneau, Trésorier M.C.E., 41, rue Pierre Melgrani, 49000 ANGERS

per cxeko al Maison Culturelle de l'Espéranto. **Paralele**, bonvolu anonci al

eliz.barbay@wanadoo.fr , viajn kompletajn donitajxojn kaj kontakt-eblecojn.

Pri cxiu ano de via grupo, indiku laux jena ordo, **personan kaj familian nomojn,**

naskigx-daton, sekson. Se oficiala invitilo estos bezonata, tiam indiku la posxt-adreson

apud cxiu nomo. **Cxi partoprenonto havu propran individuan asekuron.**

Post ricevo de la antauxpago kaj informoj pri la grupo, mi sendos rete konfirmon de via

enskrribigxo, kaj prepara dialogo povos komencigxi inter ni.

Por dezirantoj (nur malgrandaj grupoj), ni provos arangxi turisman gastigadon en la

pariza regiono, cxu antaux, cxu post la grezijona semajno.

Gxis la gxajo legi pri vi kaj kunlabori, salutas vin amike,

Elizabet' Elisabeth Barbay 25, allée Gabriel Fauré 93140 BONDY (Francio)

eliz.barbay@wanadoo.fr Telefono : 33 (0)1 48 47 23 87. Kastelo Gresillon - Esperanto

Kulturdomo 49150 BAUGE (Francio) <http://gresillon.org> Telefono : 33 (0)2 41 89 10 34

Diversaj

Stranga konduto de grekaj esperantistoj

-----Original

Message-----

From: Gazeto@aol.com [mailto:Gazeto@aol.com]

Sent: Tuesday, January 18, 2005 2:53 AM

To: selimib@albmil.com; ed.borsboom@planet.nl; mantha@otenet.gr;

eric@laubacher.info;

amb@osiek.org

Subject: iek

17jan04

Kara

Bardhyl

Post preskau dumonata diskutado la situacio estas jena: La loka organiza komitato ne sukcesis enigi vian prelegon ALBANOJ KAJ BIZANCO en la prelegan programon. Malgrau chiuj klopodoj de s-ino Mantha Christou kaj ni mem, la grekaj prelegontoj rezignus kaj ne partoprenus se vi prelegus. Aldone, neniu povas, au volas, klare elmeti al ni, kial ili tiel koleras kontrau vi. La solan eksplikon kiun ni havis estas ke vi, aliloke, ni ne scias kie, grave ofendis iliajn patriotajn sentojn. Tio chi evidente multe disrevigas nin. Sed kion fari? Ni havas nenian eblon devigi la grekojn sendi al vi invitleteron. Pro la loko kaj la temo de la konferenco ni ne povas perdi la apogon de la du grekaj grupoj kiuj patronas la konferencon. Venontfoje ni estos pli singardaj. IEK 2006 okazos en Rumanio; la temo estas KIO ESTAS ORIENTO? Ni esperas ke vi povos adapti vian prelegon al tiu chi temo.

Bedaurinde, sed amike Lena
Kopio al Mantha Christou, Ed Borsboom, Eric Laubacher, Bruno kaj Anne Masala
Madeleine de Zilah

La Gazeto,

kunredaktisto

re: gazeto@aol.com

Reago

Tre karaj, tre kara Lena,

mi dankas vin elkore pro sincera kaj diskreta mesag'o j'us ricevita. Certe, estas tute stranga la konduto de kelkaj grekaj samideanoj, ec' mi povus diri "senprecedenta" en interrilatoj de esperantistoj. Tio nur pruvus ke nuntempuloj en Grekio estas parte tute malsimilaj al iliaj pratempuloj fondintaj demokration kaj liberan kunfrontig'on de homaj opinioj.

Lau' mi, en neniu mia pasinta verkaj'o, oni ne ofendis "la patriotajn sentojn" de grekoj. Se mi parolis pri albanoj, mi simple prezentis kaj priskribis ties pasinton, g'enerale suferplenan pro dumiljara jugo sub diversaj imperioj. Mi respektas kaj alte aprezas grekojn g'enerale, des pli ke tie, ekde 14 jaroj, laboras kaj vivas familie du el miaj fratoj enpace kaj honeste.

Danke al mia legado, ec' mi ekscis pri intimaj etnaj rilatoj de albanoj kaj grekoj, g'is tiu skalo ke oni diras ke "grekoj estas iasence civilizitaj albanoj", c'ar la prau'loj de ambau' popoloj estis ja preskau' identaj. Homero kaj aliaj grekaj klasikuloj verkis en lingvaj'o tre proksima al pratempa albana. Same la kulturo, folkloro, etnografio, moroj kaj kutimoj popolaj estas tre similaj. Pro tio mi ege aprezas grekojn kaj ties tradiciojn.

Mi ne povas imagi ke ekzistas ankorau' inter ili , ec' esperantistoj, tiaj, kiuj sin kondutas kiel inkvizitoroj, cenzuristoj kaj sektuloj. Bedau'rinde, mi konstatas ke ankau' kelkajn jarojn antau'e, la redakcio de La Gazeto rezignis publikigi iun mian replikon, timante la perdon de kelkaj abonantoj de la revuo en Grekio.

Estas ja la rajto de grekoj malakcepti min kiel preleganton , anstatau' disputi pri la koncerna temo kaj aliaj temoj kun mi en ilia tero. Sed tio neniel honorigas ilin, nek la c'ijaran organizan lokan komitaton de IEK.

Ankorau'foje, mi dankas s-inon Mantha, Lena kaj aliajn pro ilia bonkomprenemo.

Via altestime

Bardhyl

SURPRIZO EN LA RENOVIGO DE LA AKADEMIA ESTRARO

Prof. Geraldo Mattos estis elektita kiel prezidanto de la Akademio de Esperanto por la tria fojo.

En 1998, kiam li havis antagoniston, li ricevis 27 vochojn kontrau 10. En 2001, kiam li estis unusola kandidato, li ricevis 30 vochojn el 35 (5 kontrauaj/sindetenaj). En 2004, denove kiel unusola kandidato, li ricevis nur 22 vochojn el 33 (11 kontrauaj/sindetenaj). Chi-foje mankis al prof. Mattos la absoluta plimulto de la Akademio, kaj li estis reelektita nur per la relativa; entute la Akademianoj estas 45. La falo de la populareco de la brazila prezidanto montras internan

malkontenton diversmaniere interpreteblan. Chiuj postenoj en la Akademio (estraranoj kaj sekciestroj) estas okupitaj de viroj. Tamen chiuj kvin akademianinoj partoprenis en la baloto, dum unu viro el tri neglektis ghin.

C'erpita el HeKo 259

Vojag' impresoj el Makedonio-Skopje antaŭ la jarfino 2004

Antaŭ nelonge, mi partoprenis interesan renkontig'on internacian en Skopje (Makedonio). Temis pri balkanaj porpacaj kluboj fonditaj antaŭ nelonge en c'iuaj landoj de la duoninsulo. La albana teamo el 40 personoj atingis la makedonian c'efurbon je 17an de decembro 2004 kaj posttagmeze c'eestis la kunvenon kaj koncerton akompanantan g'in. Estis en la kunveno reprezentantoj ankau' el Grekio, Bulgario, Serbio kaj Montenegro, Rumanio, Bosnio kaj Hercegovino, Turkio, Kroatio, kaj kompreneble el Makedonio. La celo de tiuj kluboj estis plifortig'o de amikeco interregiona per reciproka kultura interkonatig'o, inters'ang'o, por ke neniam plu okazu tiuj tragikaj eventoj de la lasta jardeko de XX jc. Tiun tagon oni disdonis al la partoprenantoj ankau' na unuan numeron de nova revuo je angla titolo "Balkan's Review" (nur la titolo estis en la angla, c'ar la tuta enhavo estis en la makedona!). La revuo entenis informaj'o, pri c'iuaj landoj de duoninsulo, verkitaj de diversaj ties etnuloj. Oni kantis ankau' la Balkanan Himnon sed ..en la Angla. C'iuaj aliaj salutparoloj estis en la makedona. Certe ne estis facile traduki ilin en alian komune kompreneblan lingvon! Nur fine tri geknaboj legis komunan saluton de infanoj respektive en makedona, angla kaj albana. Mankis alilandaj infanoj (grekaj, rumanaj kc) por ke la saluton oni legu ankau' en alies lingvojn.

Jen problemo: Balkanio, ne tro granda duoninsulo log'atas de popoloj parolantaj tiom multe da lingvoj kaj dialektoj! C'u la Angla tau'gus kiel interregiona komprenilo? Ec' por tiu malgranda respubliko, kies c'efaj popoloj estas makedonaj kaj albanaj etnuloj. Kial ne Esperanto?

Dum tiuj du tagoj mi promenis tra la centraj stratoj de la urbo. C'ikaze, mi vizitis la novan memorigilon dedic'ita al la granda Albanino, Patrino Tereza, la muzeon de la urbo kaj la novan promenejon. Enirinte librovendejon, mi serc'is pri albana eldonaj'o sed envane. C'iuaj libroj estis en la makedona. Kiam mi petis le vendiston, kial oni en vendas albanlingvajn librojn, li tuj ekmiris pro la demando, kvazau' mi petus lin pri eldonaj'o en la su'ahila au' alia forlanda lingvo. Ni memoru ke en Skopje vivas ne malpli ol 200 000 albanaj etnuloj! –Oni en ac'etus tiajn librojn–estis la respondo al mi. Pli bone serc'u tiaj'ojn en la turka kvartalo...–Do, oni konsideras albanojn turkaj...Kia miskompreno kaj ignoreco! Same c'iuaj butik's'ildoj estis nur en la makedona, kvankam la tiel nomata Interkonsento de Ohrid eksplicite postulas ke ili devas esti ambau'ingve c'ar la albana estas jam oficiala c'ie en Makedonio kie log'as almenau' 20 % da albanoj. Bons'ance c'e la ambau' landlimaj punktoj de Qafe Thana kaj Tushemisht krom la makedonoj estis ankau' albanoj dej'orantaj doganistoj kaj policistoj.

Ni esperu ke la situacio plibonig'u estonte.

Bardhyl Selimi

Libroj

Kritiko pri nova lernolibro de E. por albanoj

Ionel Onet-libroservo de UEA

Kia bedauro ke neniu provlegis la libron! Tiam oni ne instruus per "lesionoj", sed per lecionoj. Tiam oni ne instruus "nomojn", sed substantivojn. One ne instruus "literojn"

anstataŭ konsonantoj. Oni ne parolus pri "konjukcioj" sed pri konjunkcioj. Krome, kio estas "licaj pronomoj"? Malgraŭ ĉio ĉi (kaj aliaj fushoj en la libroj), mi mendas kvin ekzemplerojn por la libroservo. Bonvolu sendi ilin EN KARTONA SKATOLO, kun fakturo, al la adreso: Libroservo de UEA
Sincere, Ionel Onet Libroservo de UEA

Gjergji Gusho-Pogradec-Albanio

..Kiom mi rimarkis, la lernolibro estas konceptita sufiĉe bone je scienca kaj metodika vidpunkto kaj estas tre praktika. Kiu ajn povas utiligi ĝin, se li deziras, uzante ankaŭ helpliteraturon. La enkonduko reklamas bonege tiun lingvon montrante ankaŭ ties praktikan utilecon por la ĉiutaga vivo. Kiel rimarkojn, unue mi dirus la jenajn: estus pli bone ke je la fino de ĉiu leciono oni aldonu la novajn vortojn, kies sencon oni ne jam klarigis en la lernolibro. Tiuj vortoj povus envicigi ĝin ne nepre laŭ alfabeto, sed laŭ la ordo de ilia prezento en la teksto mem. Tiamaniere, la leganto pli facile ekkaptus la enhavon de la teksto ene de la leciono kaj ne sin turnante al la vortareto ĉe la fino de la lernolibro. Tiu lasta, kompreneble, estas tre necesa. En la lecionoj 2 kaj 6 oni klarigas diversajn prepoziciojn, sed por ili oni donas nur po unu ekzemplon, kio ne sufiĉas, laŭ mi. Devus esti pli da tiaj. Oni povus agi samtiel kiel oni ja agis kun la sufiksoj kaj prefiksoj ilustrataj en la aliaj lecionoj per pli da ilustrajtoj. Envere, por kelkaj prepozicioj, ekz. por "de" kaj "al" oni estas doninta pli da ekzemploj sed en la aliaj lecionoj. Mi opinias ke la lecionoj ne devas troargui ĝin per scioj, kiel tio okazis en la leciono 2 kie aperas 18 prepozicioj..., sed sufiĉis ĉi 5-6 da tiaj. Samtempe oni povus aldoni tekston, ĉi kurtan, per kiu oni montrus ties uzadon.

En la leciono 11, kie oni parolas pri "la kompleksaj formoj de la verbo" mi pensas ke estus pli bone ke la esprimoj tradukig'u ankaŭ en la albanan, por ke oni komprenu ilin pli bone. Certe, tion povus rekompenci la instruisto mem dum la lecionhoru, sed mi prikonsideras ankaŭ tiujn kiuj volas ellerni la lingvon memstare.

Estas bone, ke komencante ekde la leciono 11, oni aldonis krom la bazan serialan tekston, ankaŭ pliajn legotekstojn por ke la legantoj ekkonu la historion de Esperanto, de nia lando kaj de beletro.

Kiel ajn mi gratulas la aŭtoron pro lia laŭdinda laboro.

Alvokoj

From: osioka@mail.goo.ne.jp

Sent: Saturday, January 22, 2005 10:54 AM

To: shhasani@albmail.com; selimib@albmail.com

Subject: la Virina Tago 2005-a

Estimata, OSIOKA Taeko en Hirosima skribas. Mi sendas al vi la mesagxon por la Internacia Virina Tago 2005, kaj petas vin plu sendi al viaj amikinoj, por ke alilandaj virinaj organizoj aux unuopoj, respondu ĝis la 20a, feb. al la Kunveno de milo da virinoj por la Tago en Hirosima, pere de mi, s-ino OSIOKA Taeko, respondeca komitatano por la intersxangxo, per retposxto: osioka@mail.goo.ne.jp En 2005, nur ni esp-istoj laboras por la intersxangxo de mesagxoj, kaj okupos tutan lokon de la Ekspozicio de Mesagxoj peritaj de variaj kanaloj de Esp-o, ne per la angla. Jam mi estas

preta sendi la mesagxon por intersxangxo nome de la Kunveno, ankaux al unuopaj interesitoj. Bv. responda mesagxo estu maksimume en tridek linioj, unuopulo notu viajn nomon, agxon, okupon kaj posxtan adreson, per kiu poste ni sendos bildkarton.

Solidareca Mesagxo el Hirosima por la Internacia Virina Tago 2005

Estimataj, Karaj Sinjorinoj en la Mondo

Nome de Kunveno en Hirosima por la Internacia Virina Tago, 2005, ni sendas al vi elkore amikan saluton. Cxijare Hirosima-Nagasaki havas sesdek-jaran datrevenon de la atombombado. Sur diversaj lokoj en la mondo ankoraux nun multaj homoj vivas sub minaco de nukleaj armiloj. Kaj, ne nur pro la atombombado, sed ankaux pro eksperimentoj de nuklea armilo, kaj pro urana bombo, dauxre kreskas nombro de hibaksxo. En la kvina de marto ni havos Kunvenon en Hirosima por la Internacia Virina Tago. La kunveno sub la temo Paco kaj Virino havos prezentadon de dokumenta filmo "Hibaksxo, fine de la mondo". La filmo dokumentas infanojn suferantajn de leuxkemio pro urana bombo en Irako, apelon de hibaksxo el Hirosima-Nagasaki, kaj vivon de homoj logxantaj sur tero makulita de nuklea radioaktiveco. Kaj, regxisorino de la filmo prelegos. Ni, virinoj en Hirosima elkore alvokas al vi karaj, por ke ni cxiuj homoj en la mondo vivu en paco surbaze de nia racio kaj interkomprenigxo, deziras labori por paco.

Ni, virinoj en la mondo manen mane konstruu pacon trans muroj de religioj, nacioj kaj kulturoj en la 21a jarcento. En la Kunveno kun milo da virinoj ni havos ekspozicion de mesagxo, de viaj kordeziroj pri paco. Ni alvokas al vi, petas vin skribi al ni, kaj kore atendas vian mesagxon.

Prezidanto NOBUMASA Tiekō

Reago

Saluton el albanaj virinoj

Tre estimataj japanaj fratinoj, ni bone ricebis vian mesag'on kaj elkore salutas vin c'iujn okaze de via Kunveno en Hiros'ima je kvinan de marto 2005. Pasis jam 60 jaroj ekde la mondo s'okig'is pro absurda tragika pereco de du tutaj urboj de Japanio, Hiros'ima kaj nagasaki pro atomeksplodo. Ni bone konas ankau' la sekvaj'ojn de tia evento por la sano de centmiloj de japanoj. Tia teruraj'o estas abomeninda kaj tute neakceptebla por la homaro kiu strebas al kosmo, alta teknologio kaj progreso en c'iu kampoj. La inventaj'oj kaj produktoj de homa mano kaj menso devas servi al paco, al prospero al amikeco. Ni apogas vian batalon sur tiu kampo. Bonvolu akcepti niajn plej korajn au'gurojn Grupo de instruistinoj de Tirana Tutnacia Hotelumada kaj Turisma mezlernejo

Rr Kavaja 50 Tirana Albanio Tel/fakso ++355 4 22 50 53 e-mail shhttir@icc-al.org

Laureta Omeri-viclernejestro

Albana Beqiri

Zarina Bellalla viclernejestro

Etleva Buka

Elizabeta Budo

Natasha Puka

Lidra Frasheri,

Tanci Thereska

Mirela Katundi

Flutra Vaqarri ka.

AIS kaj Ni

Magistra ekzameno c^e AIS

Estimataj bakalauroj,

Se vi intencas fari magistran ekzamenon c^e AIS, mi memorigas, ke ekde la jaro 2005 validas pli striktaj kondic^oj.

Por studentoj, kiuj anoncis au anoncos sin al magistra studado antau 2004-12-31 (pagante la famajn 32.50 EUR) validos g^is fino de 2008 la nunaj kondic^oj, t.e. 60 administraj kaj 90 resumaj studunuoj (inkl. 2 SUSajn studunuojn)

Por studentoj, kiuj anoncos sin post tiu limdato, estos bezonataj 90 administraj studunuoj.

Afable salutas
Dieter Quednau
(direktoro de la ekzamenofico de AIS)

AIS kaj Ni

INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO EN BYDGOSZCZ

KLERIGEJO DE LA INTERNACIA AKADEMIO DE LA SCIENCIOJ

STR.M.SKŁODOWSKIEJ-CURIE 10, PL 85-094 BYDGOSZCZ – POLLANDO

tel./fax: (48-52) 346-11-51 e-mail: stud@esperanto-turismo.com , www.esperanto-turismo.com

NI INVITAS AL STUDADO DE turISMO, kulturO KAJ LINGVOJ en 2005/2006

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo estas trijara nepublika post-maturecekzamena lernejo funkcia ekde 1991, laulegxe registrita ĉe Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz (n-ro 232/94) kaj ĉe la Urbestro de Bydgoszcz (n-ro 51/99). En 1996 la studumo akiris la statuson de klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. En la studumo instruadas lekciistoj de AIS, Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Akademio de Bydgoszcz, Kujavia-Pomerelia Centro por Edukado de Instruistoj, Vojevodio Kulturcentro en Bydgoszcz, krom tio ĵurnalistoj kaj spertuloj de Pola Turisma-Landkona Societo, Societo de Amikoj de la Urbo Bydgoszcz, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo “Kujavio kaj Pomerelio”, Pola Esperanto-Asocio kaj vojaĝoficejo “Flugo”.

En la studumo povas studi ĉiu persono, kiu finis 18-an vivjaron kaj havas almenaŭ meznivelan edukitecon (maturec-ekzamenon) kaj bonan sanstaton. Plena eduk-ciklo daŭras tri jarojn kaj permesas akiri sciojn necesajn por labori en nau profesioj (simboloj de Europa Unio):

post la 1-a studjaro — akireblaj kvalifikoj: lektoro de Esperanto por komencantoj kaj gvidanto de porinfanaj aranĝoj; profesioj/postenoj: oficisto pri turisma informado (422104), oficisto en vojaĝagentejo (422103) kaj internacia vojaĝgvidanto (511301);

post la 2-a studjaro — kvalifikoj: lektoro de mez-nivelaj kursoj de Esperanto kaj verkanto de arta keramiko; profesioj/postenoj: organizanto de turisma priservado (341401), regiona turisma ĉiĉerono (511304) kaj animanto de kultura agado (347601);

post la 3-a studjaro — profesioj/postenoj: kursgvidanto de Esperanto (235910), specialisto pri organizado kaj disvolvigo de turismo (241915) kaj specialisto pri organizado de kulturo (241990); ev. titolo de bakalaŭro de AIS pri humanistiko au morfosciencoj.

Lau dekreto de la pola Ministro pri Edukado de la 1-a de aŭgusto 2000 j., kiu estis publikigita en la sxtata legx-ĵurnalo — fin-diplomoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo validas kiel oficialaj polaj dokumentoj rajtigantaj ĉiĉeronojn kaj vojaĝgvidantojn labori en Esperanto. Cxiutage oni instruas en Esperanto.

En la studjaro 2005/2006 kadre de la Studumo oni planas kunlabori kun Vojaĝoficejo “Flugo” gvidadon de specialigitaj kursoj pri turismo, kulturo kaj bizneso kaj ankaŭ konversaciaj lingvokursoj. Cxiuj kursoj kostas semajne 10 eurojn au 10 USD.

Kunlaboro kun AIS San Marino kaj sciencaj institucioj en Pollando permesas akiri sciojn pri diversaj branĉoj de scienco — i.a. pri turismiko, ekologio, eurologio, etnologio, etnografio, kultur- kaj soci-geografio, interlingvistiko, historio, politikaj sciencoj, komerco, merkato, estrado kaj pluraj lingvoj.

La studjaro 2005/2006 daŭros ekde septembro 2005 ĝis majo 2006 kaj ampleksos: lau ĉiutaga sistemo po 30-40 studhoroj semajne (ferioj decembre kaj januare), kaj lau t.n. eksterĉeesta sistemo — tri stud-ekzamenajn sesiojn: fine de septembro 2005, januare/februare 2006 kaj aprile/maje 2006. Necesas partopreni almenaŭ finekzamensesion aprile/maje 2005. Eksterĉeestaj gestudentoj povas ankaŭ partopreni, sen krompago, libere elektiblajn kursojn ekster la sesioj.

La studado cxe ISTK/AKB en la studjaro 2005/2006 komencigxos per Internacia Sesio de Pola AIS-Societo dum 5-24 de septembro 2005 jaro en Lublin. La organizantoj de la Sesio estas Pola AIS-Societo, Teknika Universitato en Lublin kaj Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, kiu akceptas aligxojn kaj kotizojn — 200 Euroj au 200 USD por trisemajna logxado en studentaj domoj de Teknika Universitato en Lublin kaj programo de la Sesio (5-24.09.2005) i.a. kun lernado de Esperanto kaj de pola lingvo por eksterlandanoj kaj ev. BUS-6 de AIS.

En Bydgoszcz la studjaro 2005/2006 komencigxos dum la 30-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kaj dum la 28-a Sesio de AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB) de la 25 septembro – 2 oktobro 2005 , okaze de la Monda Tago de Turismo.

Dum la jaroj 1991–2004 lecionojn en la Studumo gvidis lekciistoj el 50 landoj de Europo, Afriko, Ameriko, Azio kaj Australio por gestudentoj el 65 landoj de la mondo. La plej ofte uzataj lingvoj en la Studumo, apud la pola kaj Esperanto, estis: angla, hispana, franca, litova, albana, itala, mongola, germana kaj rusa. La gestudentoj konatigxis tiel pri kulturo kaj lingvoj de diversaj nacioj, kaj fremdlandanoj ankaŭ pri la polaj. La studadprogramojn eblas legi en: www.esperanto-turismo.com.

La studkotoj por la studjaro 2005/2006 estas samaj por ambaŭ sistemoj – **200 USD** au **200 euroj** (gxis la fino de decembro 2004), poste 250 USD au 250 euroj. Kaze de enpago kaj neeble alveni la kandidato povas prokrasti la studentigon gxis la sekva studjaro (t.e. 2006/2007), studentigi anstataŭe alian personon el la sama au alia lando, au – se eblas – utiligi la pagon por internaciaj vojaĝoj de la Internacia Klubo “Esperantotur”; resendado de la mono ne eblas.

Aligojn akceptas la sekretario de la studumo (adreso komence); la studkotojn oni pagu al bankkonto:

Bank Pocztowy SA O/Bydgoszcz

Konto n-ro **80 13201117 2034 0100 2000 0001**

Miedzynarodowe Centrum Kultury i Turystyki, SWIFT kodo: **POCZPLP4**.

Grave: sen stud-pago ne eblas ricevi invitleteron, se la aliginto gxin bezonas por akiri polan vizon; krom tio konsideru, ke ekde septembro estas tre malfacile aranĝi vizon por la kuranta studjaro — tial indas aligxi kaj pagi frue, prefere gxis aŭgusto.

La viv-kostoj en Bydgoszcz (logxado+mangxado) estas ekde US\$ 100 au 100 euroj ĉiumonate — kaj tiujn oni povas pagadi surloke.

Gestudentoj de la studumo povas ankaŭ studentigxi ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj (krom-kosto 32,50 €), kio rajtigas al 80% rabato de kromaj kurset- kaj ekzamen-kotoj de AIS en Bydgoszcz au aliloke en centra/orienta Europo — kaj al ĉiuj finstudintoj permesas akiri la titolon de bakalaŭro, kaj post pliaj du stud-jaroj ankaŭ magistro de AIS pri humanistiko au morfosciencoj. Bonvenon al nia internacia studumo kaj AIS-Klerigejo Bydgoszcz(AKB)!

Sekretario de la Program-Konsilio Prezidanto de la Program-Konsilio
(—) mag. Wojciech Rumiński (—) ASci.mag. Andrzej Grzębowski

ALIĜILO

por Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo 2005/2006

aŭ

por kursoj dum en ISTK 2005/2006

FAMILINOMO:

Nomoj:

Naskiĝdato kaj loko:

Plena poŝta adreso:

.....

Tel./ fakso/ e-mail:

Finita lernejo:

Dato:

Subskribo:

Zamenhofaj Tagoj kaj Internacia Pedagoĝa Kurso

En Bydgoszcz (Pollando) dum 3-10 de decembro 2004 dauris sukcesaj Zamenhofaj Tagoj kadre de kiuj okazis Internacia Sesio pri Lingvoj kaj turismo.

Prelegis i.a. Wang Chung-yi kaj Joachim Werdin pri Azio, Andrzej Grzebowski pri Esperanto-vojaĝoj, dr Antoni Tabacki pri sano kaj pri lingvoj: , Augusto Casquero de la Cruz, Regina Grzebowska, Bold Chinzorig, Muia Kenedy Mutonga, Moliere Nangu Nduantoni. La Sesion arangxis Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo – Klerigejo de AIS en Bydgoszcz.

Klubo „Esperanto” cxe Pola Asocio de Nevidantoj, Filio de PEA kaj Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo kune arnagxis Zamenhofan Vesperon kun E-gestudentoj el Europo, Azio kaj Afriko. Dum la vespero oni apogis ideojn nomumi bulvardon „Esperanto” cxe rivero Brda en Bydgoszcz okaze de 30-aj E-Tagoj de Bydgoszcz dum 23.04-3.05.2005, doni la nomon de Ludoviko Zamenhof al. Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, kie jam dum 15 jaroj oni cxiutage instruas en Esperanto. Inauguro de la tabulo okazos la 24-an de aprilo 2005 dum Gxenerala Kunveno de Internacia Klubo „Esperantotur” en Bydgoszcz – partopreno senpaga.

Eblas jam ekde januaro partopreni semajnajn kursojn de Esperanto, turismo kaj kulturo en ISTK – kosto 10 euroj semajne au Internacian Pedagoĝian Kurson kun kurso pri fotado kaj filmado ekde 100 EUR/USD.

Sube vi povas legi la programojn por januaro-februaro 2005 kaj de la Internacia Pedagoĝa E-Kurso en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz.

BONVENON!

NOVJARA SESIO en ISTK/AKB BYDGOSZCZ 15-16.01.2005

15.01.2005 - (SABATO)

08:00-11:00	ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz	„Eŭropa Unio”
11:00-16:00	Enmanigo de novaj membrokartoj al. membroj de la Internacia Centro de Kulturo kaj Turismo kaj Internacia Klubo “Esperantotur”, renkonto de vojaĝgxvidantoj de „Esperantotur”:	
11.00-12.00	Vjetnamio, Nepalo – 4 Azia E-Kongreso, Irano, Cxinio – 21 ISET, Mongolio	
12.00-13.00	Ukraino – "Aroma Jalto-2005", Bulgario – Turkio – Balkana Esperanto Kongreso	
13.00-14.00	"Boulogne 2005" kaj 15 EEF en Benelukso kun Parizo	
14:00-15:00	Blankaj Noktoj 2005 – 15 IEK – 41 BET en Riga kaj 90 UK en Vilno	
15:00-16:00	Hispanio- Europo-Afriko, DR Kongo, Karaiboj, Azio, Australio, USA kaj cx. la mondo.	
15:00-18:00	ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz	„Eŭropa Unio” (1 STU)
18.30-21.30	ASci. Andrzej Grzebowski	”Planado kaj transporto en turismo”

16.01.2005 - (DIMANCXO)

08.00-14.00	AProf. dr hab. Aleksandra Kowalczyk	Seminario bakalaŭra-magistra de AIS(1 STU)
11.00-14.00	ASci. Andrzej Grzebowski	„Planado kaj transporto en turismo” (1 STU)
14.00-15.00	Andrzej Korniluk	Borso de Esperanto-eldonaĵoj
15.00-18.00	Video Cseh kurso de Esperanto -	„Mazi en Gondolando”

STUDADPROGRAMO POR 17.01-10.02.2005

(LUNDOJ – VENDREDOJ)

09:00-10:30	ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz	„Hispana lingvo”
10:45-12:15	ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz	„Turismo en Esperanto” :
17.01-21.01.2005	Geografio de Eŭropo	(1STU)
24.01-28.01.2005	Geografio de Hispanio	(1STU)
31.01-11.02.2005	Pilgrima turismo	(1STU)
07.02-11.02.2005	Monda heredaĵo de Unesco	(1STU)

(LUNDOJ – JXAUDOJ)

12:30-13:15	ASci. Regina Grzebowska	Pola lingvo por eksterlandanoj
-------------	-------------------------	--------------------------------

(VENDREDOJ)

12:30-14:00 mgr Bogdan Zapalski „Lexicon of tourism in English” (1 STU)

(LUNDOJ-VENDREDOJ)

12.15-15.00 Uzado de INTERNET por la gestudentoj de ISTK/AKB

(LUNDOJ-JAŬDOJ)

15.00-16.30 Kursoj pri turismo .:

17.01-20.01.2005 mgr Wojciech Rumiński Historio de Pollando (1 STU)

24.01-27.01.2005 mgr Henryk Nahorski Turisma informado (1 STU)

31.01-03.02.2005 mgr Kazimierz Ludwicki UNESCO – Historio de kulturo (1 STU)

)

07.02-10.02 2005 mgr Jerzy Kuligowski Turisma industrio en PL kaj en la mondo (1 STU)

16:30-18:00 Audrey C.E. Childs-Mee – Video Cseh kurso de Esperanto (17.01-03.02.2005) (3 STU)

Krome lunde – jxaude :

07.02-10.02.2005 14:00-14:45 Bradius V. Maurus III "Angla lingvo kaj filozofio"

07.02-10.02.2005 16:30-18:00 Bradius V. Maurus III "Angla lingvo kaj filozofio"

FAKULTATIVE:

18.00-19:30 Aŭgusto Casquero de la Cruz:

lunde- merkredo – Internacia kurso de hispana lingvo por komencantoj

marde-jaude - Internacia kurso de hispana lingvo por progresantoj

VENDREDE fakultative :

14:00-17:00 Muia Kenedy Mutonga Paroliga kurso de la angla lingvo

17:00-20:00 Moliere Ngangu Nduantoni Paroliga kurso de la franca lingvo

INTERNACIA PEDAGOGIA ESPERANTO-KURSO kun kursoj pri fotado kaj filmado

11.02.2005 - (VENDREDO)

09:00-10:30 ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz „Hispana lingvo”

10:45-12:15 ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz “ Monda heredaĵo de UNESCO” (1 STU)

)

12:30-15:30 Bradius V. Maurus III "Angla lingvo kaj filozofio" (2 STU)

)

16:00-22:00 Adriana Witucka Ceramiko kaj animado de kulturo (1 STU)

)

12.02.2005 - (SABATO)

08:00-11:00 ASci Ewa Bondar Baza Cseh kurso de Esperanto – resumo

11:00-21:00 Tutpolanda renkontigxo de la Klubo de Vojaĝxgvidantoj de "Esperantotur"

11:00-14:00 mgr Kazimierz Ludwicki Historio de la arto kaj kulturo, naturmonumentoj

14:00-15:00 Informoj pri Esperanto turismo en 2005

15:00-21:00 Red. Roman Dobrzyński „Videofilmado de arkitekturo”; „Zamenhof-strato” (1STU)

13.02.2005 - (DIMANCXO)

08.00-14.00 AProf. dr hab. Aleksandra Kowalczyk Seminario bakalaŭra-magistra de AIS (1 STU)

11.00-14.00 mgr Kazimierz Ludwicki Historio de kulturo kaj arto (1 STU)

14.00-15.00 Andrzej Korniluk Borso de Esperanto-eldonaĵoj

15.00-18.00 ASci Ewa Bondar Baza Cseh kurso de Esperanto – resumo (1 STU)

)

18:00-19:00 Moliere Ngangu Nduantoni Esperanto-instruado en Afriko

19:00-22:00 mgr Zdzisław Błażejczyk Fotado en turismo

14.02.2005 - (LUNDO)

08:00-09:30 ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz „Hispana lingvo

09:45-11:15 ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz Lingvoj de Eŭropo

11:30-14:30 ASci Ewa Bondar Instruado de Esperanto

15:00-21:00 dr Halina Barcikowska Glottodidaktiko

19:00-22:00	mgr Zdzisław Błażejczyk	Fotado en turismo
<u>15-16.02.2005 - (MARDO-MERKREDO)</u>		
08:00-09:30	ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz	„Hispana lingvo
09:45-11:15	ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz	Lingvoj de Eŭropo
11:30-14:30	ASci Ewa Bondar	Instruado de Esperanto
15:00-18:00	mgr Jerzy Kuligowski	Tourleader and the groupe (1 STU)
18:15-19:30	Marcel Delforge	Esperanto – fakaj terminoj kaj sinonimoj
19:00-22:00	mgr Zdzisław Błażejczyk	Fotado en turismo (2 STU)
<u>17-18.02.2005 - (JXAUDO- VENDREDO)</u>		
08:00-09:30	ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz	„ Hispana lingvo ” (1 STU)
09:45-11:15	ASci. Aŭgusto Casquero de la Cruz	Lingvoj de Eŭropo (1 STU)
11:30-14:30	ASci Ewa Bondar	Instruado de Esperanto
15:00-18:00	dr Zofia Waniek-Kucharska	Skribado de diplomverkoj (1STU)
18:15-19:30	Marcel Delforge	Esperanto – fakaj terminoj kaj sinonimoj
19:00-22:00	mgr Romuald Puciul	Videofilmado, „Vojagxoj kun „Esperantotur”(1 STU)
<u>19.02.2005 - (SABATO)</u>		
08:15-11:15	Marcel Delforge	Esperanto – fakaj terminoj kaj sinonimoj(1 STU)
11:30-14:30	ASci Ewa Bondar	Instruado de Esperanto
15:00-22:00	Red. Barbara Pietrzak	„Esperanto en radio”;konkurso de E-Redakcio (1STU)
<u>20.02.2005 - (DIMANCXO)</u>		
08:00-11:00	ASci Ewa Bondar	Instruado de Esperanto (3 STU)
11:00-17:00	Reprezentanto de Pola ILEI Sekcio	Agado de ILEI
14:00-18:00	Internacia Ekzamenkomisiono	Internaciaj ekzamenoj pri instruado de Esperanto

E-Movado en la regiono

50 JAROJ DE VOJVODINA ESPERANTO-LIGO

La internacia lingvo Esperanto estis konata en tiu cxi nia plurnacia kaj plurlingva medio multe pli frue. Jam en la jaro 1903 aperis unuaj esperantistoj en Reala gimnazio en Vrsxac. Poste trovigxis aliaj en Novi Sad kaj en kelkaj aliaj lokoj de Vojvodino. Escepte de militotempoj, Esperanto cxeestas cxi tie pli-malpli gxuste gxis nuntempo. Dum tiu nemallonga tempoperiodo estis okazigitaj: -Tri kongresoj de jugoslaviaj esperantistoj (en 1938 kaj 1958, en Novi Sad, kaj en 1991 en Subotica), kaj -Unu internacia kongreso de laboristoj esperantistoj (en 1969, en Novi Sad). Cxar ekzistis Esperanto-societoj en kelkaj lokoj de Vojvodino, en februaro 1954 estis fondita Vojvodina Esperanto-Ligo (VEL) por pli efike kunordigadi la laboron de tiuj societoj. Post la II-a mondmilito, niaj esperantistoj estis tre aktivaj per Esperanto-propagando, prelegoj, ekspozicioj, kursoj, kaj aparte per endonado de libroj (originalaj kaj tradukitaj) pri kaj en Esperanto, kio contribuís al diskonigado de niaj kulturo kaj literaturo tra la mondo, precipe tie kie tio ne atingeblis pere de lingvoj de naciaj minoritatoj. Sankcioj kaj manko de financaj rimedoj malantauxigis la laboron de niaj esperantistoj dum kelkaj lastaj jaroj. Nun ni reprogresa iom-post-iom kaj klopodas atingi la nivelon de aktivado almenaux proksiman al tiu kiun havis Jugoslavio kiel unu el la plej malfermaj landoj rilate al Esperanto. Endas emfazi ke Esperantomovado en la mondo estas pli kaj pli amasa kaj ke Esperanto largxskale disvastigxas. Ekzistas du Rezolucioj de UNESKO favore al Esperanto (en 1954, en Montevideo kaj en 1985, en Sofio). Ekde de kelkaj jaroj, realigxadas la internacia projekto Interkulturo Inter. la junaj. Temas pri intersxangxo de prikulturaj informoj pere de la internacia lingvo Esperanto. Ankaux cxe ni, tio kutimigxas kaj efektividigxas lauxeble. Nun oni agantas je tre grava entreprenajo: preparoj kaj enkonduko de la dujara eksperimenta instruado de Esperanto kadre de la eduksisistemo de Euxropa Unio. Esperanto-ekzameno estos oficiale agnoskata en Europo ekde 2005. Ni esperas ke la materia stato de VEL kaj Esperanto-societoj plibonigxos kaj ke ni future reakiros rimarkindajn rezultojn, por ke ni ne postiru la atingajxojn en la mondo. Ci-jare (2004) okazis du

Esperantaj arangxoj: Verdaj Amikaj Tagoj , en junio, en Senta, kaj Internacia Renkontigxo de Esperantistaj Familioj, en Mali Idjos', en julio/augusto 2004. [Festivalo de junaj esperantistoj, en julio, en Novi Sad](#). Interesigo pri Esperanto ekzistas, sed ni ne havas suface da instruistoj/antoj, kaj Vojvodina Kulturinstituto povus helpi ke la instruistaj/antoj personoj estu preparataj kaj kapabligataj. Estas inde turni sin pli al eldonado de libroj pri kaj en Esperanto, kio estas pli kaj pli videbla ekde la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento. Aŭtoroj kaj redaktantoj de la eldonaĵoj estis la membroj de Vojvodina Esperanto-Ligo kaj ĝiaj societoj, aŭ ili helpis al aliaj eldonistoj aperigi librojn pri kaj en Esperanto-lingvo. PS. La artikolo estas presita per korektaj E-literoj.

Boris'a Milic'evic'

La artikolo estas publikita en "MOST" (E-e: Ponto), Bulteno de Kunordiga Komitato de societoj (unuigxoj, Ligoj) pri lingvoj, literaturo kaj kulturo de Vojvodino (kadre de Serbio) en Vojvodina Kulturinstituto, Novi Sad. La Bulteno aperis en decembro kuranta (2004) okaze de la 30-jara datreveno de Kunordiga Komitato kiu havas 18 societojn-membrojn. Ĝia enhavo estas en 12 lingvoj - serba, hungara, slovaka, rumana, rutena, rouxma (cigana), ukraina, bulgara, germana, chehxa, makedona kaj Esperanto. Ĉiu societo (unuigxo, Ligo) prezentis sin en sia lingvo kaj paralele en la serba. Nia Ligo estas prezentita sub sia nomo - Vojvodina Esperanto-Ligo kaj subtitolo - 50 jaroj de Vojvodina Esperanto-Ligo. La tekston akompanas la ilustraĵo - titolo de la libro Poeziaj donacoj. Originaloj kaj tradukoj. La Bultenon eniris ankaŭ la materialo rilata al la cxi-jare ekinta Multlingva Traduk-laborejo kadre de la Kunordiga Komitato. Peskaŭx unupagxa seblingva beletra teksto ("Kiu estas miaj najbaro?") estas traduke prezentita ankaŭ en Esperanto. La aŭtoro de la supra artikolo kaj traduko estas membro de Bultenredakcio kaj ankaŭ reviziinto/korektinto de serblingvaj kaj Esperantaj tekstoj. Boris'a Milic'evic'

Esperanto floras en Kabulo

Vidu mem ĉe :

<http://www2u.biglobe.ne.jp/~fukuto/aaadem/aaadem.htm> pri Kabulo kaj Afganio, kie la afganaj esperantistoj modele aktivas. Vidu ankaŭ ĉi poste la raporton pri freshdata kunveno de AAAdEM : AAAdEM-kunsido de Novembro (24.Nov.2004) Ni kunsidis kaj decidis jenajn aferojn. Unue ni tre dankas al la mondaj esperantistoj kiuj donis multe da materialojn esperantajn al ni AAAdEM., " koran dankon ".
1. Ni elektis vicprezidanton. S-ro Esmat ullah Wijdani kiu estas eksprezidanto de ASSCF. (Afghanistan Students Scientific and Culture Foundation)
Post AEFIA (Afgana Esperanto-Festivalo de Internacia Amikeco) li estos prezidanto de AAAdEM

2. Ni bonvenigos virinajn studentojn en nia organizo AAAdEM kaj ni kontaktos kaj amikiĝos al japanuniversitataj esperantistoj kaj ankaŭ eksterlandaj gejunuloj.

3. Venonta Junio ni okazigos esperanto-festivalon kiu nomas AEFIA en kabul universitato. (Afgana Esperanto-Festivalo de Internacia Amikeco)
4. Ni petos helpi nian movadon al AFESPO kiu estas antauxiranto de afgana esperanto-movado .

* AFESPO (AFgana ESPeranto Organizo) estis fondita en Masxhado Irano per la subteno de IEC(Irana Esperanto Centro) en la lasta jaro 2003.
5. Post AEFIA ni diskutos pri la nomo de nia organizo, kaj kiam AFESPOanoj sukcese

revenos Kabulon tiam ni harmonios ilin.
6. AAAdEM fratigxas kun organizo ASSCF(Afghanistan Students Scientific and Culture Foundation).

7. Ni AAAdEM kune kun ASSCF disvastigos esperanton al jenaj universitatoj kiuj ligitaj de Kabul universitato (1) Herat univesitato, (2) Qunadahar universitato, (3) Mazar universitato, (4) Jalalabad universitato, (5) Kundus univesitato .Ni celas fari esperantan klubon en cxiuj universitatoj. 11. AAAdEM celas amikecon kaj pacon kune kun ASSCF. Informo de festivalo A E F I A (Afgana Esperanto-Festivalo de Internacia Amikeco)
1. Dato : La Junio de la jaro 2005 2. Loko : Kabul Universitato Afganio
3. Celo : Amikeco 4. S^anco : Vi povas doni kurag^on kaj energion al afganoj per viaj talentoj , _____kiel ekzemple , kanto, koruso, piano, gitaro, fluto, tamburo, danco, magio, j^onglado, babilado 5. ekskurso : Pagman , Bamijan ktp(ankourau^ ne decidias)
Koran dankon kun amike via Afgana Amika Asocio de Esperanto-Movado

E-arangxoj en Bydgoszcz

En la urbodomo de Bydgoszcz okazis estrarkunsido de la Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo , kies prezidanto Konstanty Dombrowicz estas samtempe Prezidento de la urbo Bydgoszcz (400 mil da loxantoj). Krom la estraranoj de la Centro cxeestis invititaj:

- Augusto Casquero de la Cruz el Hispanio – Vicprezidanto de la Internacia Klubo “Esperantotur”(IKE), kiu jam trian jaron instruas Esperanton kaj hispanan lingvon en la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) en Bydgoszcz,
- Moliere Ngangu Nduantoni el DR Kongo, estrarano de la IKE, kiu ankaŭ la trian jaron instruas en ISTK afrikajn kaj francan lingvojn,
- Liu Jianguo el Cxinio, Vicprezidanto de IKE, kiu jam de kelkaj jaroj kunlaboras kun Bydgoszcz, kiel Estro de E-Instituto pri Turismo en Hefei kaj
- S-ino Ruan Liping – la Dekanino pri Turisma Fakoj de la Universitato pri Administrado en Pekino, kiu decidis regulan sendadon de cxinaj gestudentoj por studado cxe ISTK/AKB en Bydgoszcz.

La Prezidento de la Urbo enmanigis al cxiuj gastoj kiel dank’esprimo pro la kunlaboro – albumon pri Bydgoszcz kun aldona presita teksto en Esperanto (kiun ni kunsendas kiel aldonajxo).

Sekve oni pridiskutis la promociadon de la urbo Bydgoszcz pere de Esperanto. Estis akceptita plano de la plej proksimaj arangxoj, en kiu la cxefaj promociaj E-arangxoj estas:

- **Zamenhofaj Tagoj** en Bydgoszcz dum 3-10 de decembro 2004 j. kun ISTK/AKB Sesio pri “Lingvoj, sano, amo en turismo”. La partopreno dum 3-10 decembro kun ok tranoktoj en studenta domo en Bydgoszcz kostas 100 Euroj au 100 USD. La detalan programon de ZT en Bydgoszcz ni sendas sube.
- **Internacia Pedagogia E-Kurso** dum 11-20 de februaro 2005, kiun gvidos Asci. Ewa Bondar de IEI en Hago, Asci Augusto Casquero de la Cruz, red. Barbara Pietrzak el Pola Radio, Marcel Delforge el Belgio, kelkaj polaj fakuloj pri glottodidaktiko kaj pedagogio el la Centro pri Edukado por Instruistoj kaj reprezentantoj de IEI. Samtempe okazos kursoj de fotado kaj video-filmado gvidataj de Zdzislaw Blazejczyk,

red. Roman Dobrzynski kaj Romuald Puciul. Cxiuj kursoj dum 11-20 de februaro kun nau tranoktoj, asekuro kaj parta mangxado kostos 200 Euroj au 200 USD.

- **30 Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz** kun 27 Internacia AKB-Sesio kaj Internacia Kurso por Esperantovojagxgvidantoj dum 23 aprilo – 3 majo 2005 sub Honora Protektado de la Prezidento de la Urbo Bydgoszcz – Konstanty Dombrowicz. La arangxo same kostos 200 Euroj au 200 USD.

Eblas ankaŭ aligxi por Vintra-Printempa Semestro de ISTK/AKB en Bydgoszcz dum 15 de januaro gxis 3 de majo 2005. La studadkosto estas 200 Euroj au 200 USD + logxado, mangxado kaj asekuro (cx. 100 Euroj au 100 USD monate).

Eblas jam aligxi por la studado cxe ISTK/AKB en Bydgoszcz por la studjaro 2005/2006. La studadkotizo gxis la 31-a de decembro 2004 estas sama 200 Euroj au 200 USD, informojn ni sendos lau peto.

La estrarkunsido finigxis per komunaj fotoj en la belega historia prezidenta salono de la urbodomo en Bydgoszcz. Poste oni vizitis urbon Bydgoszcz kaj ankaŭ Instituton pri Geografio de Bydgoszcz-Akademio, kie instruas AProf. dr.hab. Aleksandra Kowalczyk, sub kies scienca patroneco jam pli ol 50 gestudentoj de ISTK bakalaurigxis kaj magistrigxis cxe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).

Oktobre en Bydgoszcz-Akademio komencis instrui la hispanan lingvon Augusto Casquero de la Cruz, kiu eble tie instruos ankaŭ Esperanton.

Venu al Bydgoszcz por kune kun gestudentoj el 15 landoj de Afriko, Azio kaj Europano studi turismon, kulturon kaj lingvojn en la sola en la mondo klerigejo, kie oni cxiutage instruas en Esperanto.

Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo

str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando
tel/fakso: (48-52) 346-11-51, info@esperanto-turismo.com
<http://www.esperanto-turismo.com>

-

BYDGOSZCZ – TAGOJ DE L.ZAMENHOF 2004

Sesio de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo – Klerigejo de la Internacia Akademio de la Sciencoj

“Lingvoj, sano, amo kaj turismo”

3-10 de decembro 2004

3 decembro 2004 – VENDREDO

09:00-10:30 Asci Augusto Casquero de la Cruz “Hispana lingvo”

10:45-12:15 Asci Augusto Casquero de la Cruz “Esperanto lingvo”

12:30-15:45 Joachim M.Werdin “Nutrado kaj memkuracado en turismo” (1-4)

15:45-18:45 Red. Roman Dobrzynski "Video-filmado en turismo" (1-4)

19:00-22:00 Wang Chung-yi kaj Joachim Werdin "Tajvano-Nepalo-Barato" (1-4)

4 decembro 2004 – SABATO

08:00-11:00 Joachim M. Werdin "Nutrado kaj memkuracado en turismo" (5-8)

11:00-11:30 Inauguro de la kurso por E-vojaĝgvidantoj kaj renkonto de E-vojaĝgvidantoj de la Klubo "Esperantotur"

11:30-14:30 Red. Roman Dobrzynski "Video-filmado en turismo" (5-8)

14:30-16:30 Borso de E-libroj okaze de Internacia Tago de E-Libro

15:00-16:30 Asci. Andrzej Grzebowski kaj mag. Daniela Emler "Kiel organizi E-grupvojaĝojn" (1-2)

17:00-18:30 Zamenhof-Vespero okaze de la 145 datreveno de la naskiĝo de la aŭtoro de Esperanto

en kafejo "Ewa", cxe Pola Asocio de Nevidantoj, str. Powstancow Wielkopolskich 33, laŭ invito de la Klubo "Esperanta Amiko", Filio de PEA kaj Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo

19:00-22:00 Wang Chung-yi kaj Joachim Werdin "Tajvano – Nepalo - Barato" (3-4)

5 decembro 2004 – DIMANĈO

08:00-14:00 AProf. dr hab. Aleksandra Kowalczyk "Seminario bakalaŭro-magistra de AIS"

11:00-14:00 dr Antoni Tabacki "Amo, kiel la plej grava kondiĉo de sano" (1-4)

14:30-17:30 dr Antoni Tabacki "Amo, kiel la plej grava kondiĉo de sano" (5-8)

18:00-21:00 Asci Regina Grzebowska - "Litovio kaj litova lingvo" (1-4)

6 – 10 de decembro 2004 (lundo –vendredo)

09:00-10:30 Asci. Augusto Casquero de la Cruz "Hispana lingvo"

10:45-12:15 Asci. Augusto Casquero de la Cruz "Esperanto lingvo"

12:30-13:15 Asc. Regina Grzębowska - "Pola lingvo por eksterlandanoj"

13:15-14:00 Asc. Regina Grzębowska - "Litovio kaj litova lingvo" (5-8)

14:00-15:00 Uzado de Internet por gestudentoj de ISTK/AIS

15:00-16:30 Bold Czinzorig "Mongolio kaj mongola lingvo" (1-8)

16:45-18:15 Chaterera Tapera "Zimbabvo kaj angla lingvo" (1-8)

18:30-20:00 Moliere Nduantoni Ngangu "DR Kongo kaj franca lingvo" (1-8)

Vendrede la 10-an de decembro 2004 j. lecionoj finigxos je la 12.15 horo por ebligi vojaĝxon al Zamenhofaj Tagoj en **Bjalistoko** (10-12.12) au **Kaunas**(Litovio) 11-12.12 kaj en **Riga** (Latvio) – 13-14.12.2004.

Bonvenon !

Humoro

- **La ruza kelnero**

En restoracio iu gasto plendis, c'ar li opiniis ke la peco de viando estas tro malgranda. Li vokis la kelneron. Tiu kontrolis la viandon, kaj diras: "Jes sinjoro, vi pravas. Mi tuj donos alian al vi".

Tiel okazis, kaj la gasto estis kontenta.

En la kuirejo alia kelnero demandas : "Kiel vi povis fari tion? C'iuĵ pecoj ja estas precize la samaj!"

"Jes, mi scias. Sed mi simple uzis pli malgrandan teleron por meti la viandon."

- Sinjoro Bernard (Ŝou'), mi pagus unu dolarpn al vi se vi dirus kion vi penas nun!- Oh, tio kion mi pensas nun kostas malpli ol unu dolaron..-Kion vi do pensas nun?- Mi pensas pri vi!..

Propagando por au' pri esperanto

La angla reaperas

Sub la titolo "Kiam la interpretistoj mutas, la angla reaperas", la brita informagentejo Reuters anoncis la 17an de decembro ke, pro paneo de la sistemo de interpretado, la shtataj au registaraj estroj de la 25 landoj membroj de EU farighis unuafoje sen vocho dum la debato pri la aligo de Turkio al EU. Parto el ili tamen strebis esprimighi en la angla. La Germano Gerhard Schröder kaj la Hispano José Luis ne havis alian eblecon ol silenti. Aliaj elturnighis diversmaniere au ech petis de interpretistoj mallaute interpreti la debatojn de busho al oreloj. Tiel aperas, ke seriozaj homoj (almenau supozeble) kun tre altaj respondecoj havas tre

hazardan ideon pri la lingva komunikado. Kiu scias chu ili ne estas sur la bona vojo por malkovri sistemon de lingva komunikado kiu ne paneas kaj kiu ne pushas 24 shtatojn en la trompan ludon de la 25a ? Kiu scias chu ne ekzistas ie, profitcele, intereso saboti la nunan sistemon Simredo. (Simredo 3 estas senpaga programeto kiu ebligas transiri lauvole de unu skribsistemo de Esperanto al alia : "x", "h", cirkumflekso antaŭ litero (ekz. "h^c"), Unikodo kun restarigo de la normalaj supersignitaj E-literoj. Jen eta mirindajho tre utila atendante la ghegeneraligon de Unikodo ! Plie, la lingvo de ghia interfaco estas elektebla ghis nun en la franca, angla kaj Esperanto (dankon kaj gratulojn al Thomas Cordonnier ! daurigu por aliaj programoj ! ;-). Ghi estas akau uzebla por aliaj alfabetoj (hebrea, rusa, persa, vjetnama, k.a.). Interesa mencio Interesa mencio pri Esperanto aperas en dupagha artikolo de Mélanie Vast titolita "Le syndrome de Babel" (la sindromo de Babelo) en la numero de la 10a de decembro de la semajnmagazino "Valeurs actuelles" (chefe dedichita al ekonomio, eldonkvanto : 85 000 ekz) :Esperanto forte revenis. Kreita en 1887 fare de la Polo Ludoviko-Lazaro Zamenhof, ghi estas miksaĵo [tiel !] de deko da europaj lingvoj. Ghi havus la avantaĝon domaghi la ofendighemojn. *"Esperanto estas facile lernebla, multe pli simpla ol la angla, entuziasme diras Yves Bachimont, de la asocio JEFO-Esperanto Jeunes. Chiu povas għin paroli en dekkvin tagoj de intensiva stagħo* Cifero menciita pri la kosto de la tradukado en EU-institucioj en Bruselo : 800 milionoj da euroj. Ech se la lasta frazo estas iom troiga, per tia sumo kaj per Esperanto, ne multe da tempo estus necesa por igi chiun Europeanon perfekte dulingva. Ech multe malpli sufichus por tio kaj por starigi principon de justeco, de egaleco en digno kaj rajto en la rilatoj inter la Eurocivitanoj. Kontakteblecoj :Valeurs actuelles 10 place du général Catroux 75858 Paris cedex 17 <http://www.valeursactuelles.com/contact/index.php>

Malgrau esperantistoj

Antau mi gejunuloj el Mongolio, Albanio, Cxinio, DR Kongo, Kenio, Pollando. Mi lekcias en Esperanto pri turismaj valoroj de Latinameriko, helpante min per miaj filmoj pri tiu regiono. Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) en Bydgoszcz estas unika en la mondo altlernejo, en kiu oni lernas cxiutage Esperanton kaj lernas cxiutage per Esperanto diversajn studobjektojn.

Post tri studjaroj eblas ricevi polan diplomon de la ISTK en Bydgoszcz, kiu ekde 1-a de agosto 2000j. estas rekonata de Pola Ministro de Edukado kiel dokumento lau kiu oni povas labori en Esperanto kiel vojaĝxgvidanto kaj cxixerono, sen apartaj sxtataj lingvaj ekzamenoj. La Studumo ekde la 1996 jaro estas Klerigejo de Internacia Akademio de al Sciencoj /AIS/ en San Marino, kaj oni povas post tri jaroj ricevi la titolon "bakalauro" kaj post du pliaj – "magistro". Sekve jam ĉe AIS oni povas doktorigxi.

Antau kelka tempo mi faris por la Pola TV filmon pri la Respubliko Sanmarino, en kiu estas enplektita studsesio de AIS en Bydgoszcz. Gxuste tiam lekciis prof. Renato Corsetti. En la intervjuo por la filmo li diris: "La afero estas tre interesa. Oni vidas cxi tie amason da studentoj kun siaj postuloj, kun siaj problemoj, ekzamenoj ktp. Jen bildo de Esperanto en la estonteco, kiam gxi estos normale uzata lingvo."

Simile opinias Augusto Casquero, kiu forlasis sian belanValencion por "misii" en Bydgoszcz, instruante Esperanton kaj hispanan lingvon – jam la trian jaron. Augusto Casquero alvokis en nia E-movadon trovi pliajn profesorojn por instrui en Bydgoszcz, cxar pro diverseco de la Studumo (aktuale gestudentoj el 15 landoj) ne sufichas jam polaj fakuloj pri turismo kaj la honorarioj ne estas tro altaj (la samaj kiel por magistroj en polaj altlernejoj) kaj temas pri fakuloj, kiuj bone konas almenau Esperanton. Mankas mono por pagi vojaĝxkostojn de

diverslandaj fakuloj, cxar la studokostoj estas tre malaltaj – 200-400 USD au Euroj por la studjaro, anstataŭ 2000 Euroj, kiujn postulas polaj altlernejoj.

Tamen plialtigo de la kostoj malebligis alvenadon de studentoj el Azio kaj Afriko, kiuj nun estas pli multnombraj ol la polaj. Aperis aliaj problemoj. Jen la aligxo de Pollando al Europa Unio kaŭzis malfaciligon de la viza proceduro. Ankaŭ tiujn problemojn la Studumo plej parte solvas kontraŭagante vizan diskriminacion, por ebligi studadon en unika internacia Esperanto-etoso. Tion ne multaj volas fari.

Fondinto de la Studumo Andrzej Grzebowski estas klasika ekzemplo de la proverbo: "Esperanto evoluas malgrau esperantistoj." Anstataŭ la helpo li ne unufoje devis defendi sin kontraŭ esperantistoj. Ne cxiam sukcese. El tio rezultas unu el la plej gravaj problemoj de la Studumo: la manko de pligranda sidejo. La Internacia Studumo de Turismo kaj Kulturo kun siaj 200 studentoj el 15 landoj funkcias nun en privata domo.

Najbare situas hotelo, kiu antaŭ nelonge estis unu el la plej grandaj Esperantaj nmoveblajxoj en la mondo. Fine de la 80-aj jaroj konstruis gxin la familio Grzebowski sur la propra placo. Tiam funkciis ankoraŭ la komunista ekonomio kaj privata persono ne povis starigi hotelon. Tial la estraro de Pola Esperanto Asocio, kiun mi tiam prezidis, acxetis la grundon de familio Grzebowski kontraŭ simbola sumo kaj decidis konstrui domon por Esperantaj celoj. La tiamaniere starigita (1987-1990) hotelo "ESPERANTO" apartenis al PEA.

Mi tute ne povis imagi, ke la sekva estraro de PEA, malrespektos la decidojn kaj atingojn de PEA kaj en 1993 j. vendos la placon kune kun la hotelo al iu kapitalisto - neesperantisto, kiu promesis financi agadon de PEA. Tio ne okazis.

Tiun sxtelan negocon faris nome de la Cxefa Estraro de PEA Wieslaw Tomaszewski kaj Lech Kosieniak. Ili vendis la tuton kontraŭ ridinde malalta prezo de malpli ol 2000 USD (du mil usonaj dolaroj, do, 6500 de nunaj polaj zlotoj). La fieco de tiu ago konsistis ankaŭ en tio, ke la negoco estis farita kasxe. Se oni anoncus la vendon, versxajne kelkaj polaj esperantistoj povus acxeti la hotelon kontraŭ ecx pli alta sumo.

Kiel helpi kaj plibonigi la unikan en la mondo Esperanto altlernejon, la solan kie oni cxiutage instruas Esperanton?

Mi proponas: **ni sercxu Esperantiston au Esperanto-Asocion, kiu reaxetu la hotelon cxe la strato Marii Skłodowskiej-Curie en Bydgoszcz!** Lau la esploroj surloke mi konstatis, ke ekzistas momente favoraj kondicxoj por tion fari.

ROMAN DOBRZYNSKI

rodob@poczta.onet.pl

Rimarkinda analizo pri la vivo, la personeco kaj la verko de Jules Verne

En interesa artikolo, kiun publikigis "Le Figaro" la 24an de decembro sub la titolo "Jules Verne, une histoire d'amour avec la science" (~ , historio de amo kun la scienco) *, Jean-Paul Dekiss substrekas la soifon je malkovroj de la patro de la scienc-fikcio, aŭtoro de 62 romanoj kaj 18 noveloj inter kiuj "La eksterordinaraj vojagoj", "De la Tero al la Luno", "20 000 leugoj sub la maroj", ktp, t.e. entute 22 000 paghoj, 5 000 ilustrajhoj. Jules Verne sekvis efektive kun granda, sed ankaŭ kritika atento, la evoluon de la scienco kaj tekniko. Li informighis pri la malkovroj kaj inventajhoj, frekventis sciencajn mediojn, legis multajn revuojn. Sagaca observanto li estis ankaŭ pri la evoluo de la homa mensostato, pri la transformigho de la homa sinteno, pri la evoluo de la ideoj. Kun mondcivitana sento, li jam antaŭsentis ke la mondo iam farighus "vilagho" en kiu stompighus la nocio de landlimoj, en kiu kreskus la sento de reciproka dependeco, de interdependeco. Se estas vere ke scienco flankenpushis superstichon, li tamen antaŭsentis

ankau la dangheron de misekspluatado de la malkovroj, kaj ankaŭ de la nihilismo. Estas sufiĉe interese ke Jean-Paul Dekiss priskribas jene la manieron laŭ kiu Jules Verne, jam siatempe, vidis la artileriistojn de la usonaj konkerintoj de la Luno : "Ili havas nenian rimorson (t.e. konscienciproĉon) vidi landojn entute detruitaj, popolojn neniigitaj, ekde kiam tio estigas kreskon de ilia potenco kaj riĉeco". Tion oni povas nun kompari kun la negativa sinteno de Bush rilate al la protokolo de Kyoto : "La usona vivmamiere ne estas negocebbla !", do en la sama spiritostato kiel la markizo de Pompadour diris al la reĝo Ludoviko la 15a, kun malestimo por la sorto, laŭ ŝi negrava, de la estontaj generacioj : "Post ni la diluvo !"...

La usona kinarto multege ĉerpis el la verkaro de Jules Verne sed perfide flankenlasis la kritikajn, moralajn kaj homecajn konsiderojn el ĝi. Humuro, mokado, ironio kaj kritika spirito ne forestas en lia verkaro, li ne falas en la idealigon de la scienco malgraŭ pasia rilato kun ĝi. Jules Verne estas la homo de pozitiva scivolemo, de scienco kun konscienco, la homo kiu sendube ne forgesis tion kion diris Rabelezo : "Scienco sen konscienco estas nur ruino de la animo". "[La aspektoj de] liaj verkoj atakas la morojn de la usona socio, skribas J.-P. Dekiss, kiuj estas la ekzemplo de la estonta mondo kaj la lernejo de la novaj mitologioj, same kiel la sciencistojn, distriĝemaj aŭ ekscesaj, kaj la heroojn mem foje ridindigitaj en la senmezureco kaj absurdeco de ilia absolutemo".

Kiam oni scias ke Jean-Paul Dekiss estas surscenigisto kaj produktoro, aŭtoro de interesa libro abunde ilustrita aperinta ĉe La Découverte Gallimard en 1991 sub la titolo "Jules Verne - Le rêve du progrès"

(Jules Verne - La revo de la progreso), kaj ankaŭ administranto de la Centro Jules Verne de Amiens, oni pli bone komprenas ke li estas kvalifikita por verki tian artikolon. Li tre bone reliefigas la genion de Jules Verne kiu kapablis interesege por popularigi la sciencon, pritrakti nekutimajn temojn kun granda pedagogia sento kaj talento. Uzantoj de Esperanto povus bedaŭri ke ne aperas mencio pri la favora sinteno de Jules Verne al la Internacia Lingvo, pri la fakto ke li akceptis la honorprezidantecon de la Esperanto-Klubo de Amiens (kiu daŭre ekzistas), kaj ankaŭ ke la lasta romano, kiun li estis verkanta sub la titolo "Studvojaĝo" ** antaŭ ol la morto forprenis lin, celis popularigon de Esperanto. Cent jarojn post lia malapero, la impeta uzado de Esperanto sur la Interreto aperigas ke ankaŭ en tio li havis eksterordinaran antaŭsenton. En sia romano, Jules Verne esprimis sian propran penson tra unu el la herooj, Nicolas Vanof : "Esperanto, tio estas la plej certa, la plej rapida vehiklo de la civilizado". Li ankaŭ diris, al sia ĉirkauantaro :

"La ŝlosilo de komuna lingvo perdita en la Babelturo povas esti refarita nur per la uzado de Esperanto". La morto kaptis Jules Verne la 24an de marto 1905, tro frue por ebligi al li fini sian verkon, kelkajn monatojn tro frue ankaŭ por ebligi al li observadon de la plej eksterordinara evento en la historio de la lingvoj : la unua Universala Kongreso de Esperanto kiu okazis en Bulonjo sur Maro de la 7a ĝis la 12a de aŭgusto kun 688 partoprenantoj el 22 landoj. Unu tagon post la centa datreveno de lia morto, la 25a de marto 2005 markos la komencon de 5-taga kongreso de Esperanto en la sama urbo. Ĝi prezentas okazon por observi la staton de la lingvo cent jarojn poste kaj 118 jarojn post la apero, en 1887, en Varsovio, de la Unua Lernolibro de la Internacia Lingvo.

Umberto Eco/Esperanto

Dankon al Christian Pinard pro sendo de la jena eltirajho el artikolo aperinta en LE FIGARO (20041224)

Eco plue vagas tra chiuj kampoj de la scio, chiam mildigante per granda dozo da humuro tion timigan kion povus havi lia enciklopedia erudicio. Humuro, kiu kongruas kun lia silueto jam fama. La barbo rabeneca. La kalveco (senhareco) kiu, plivastighante, aperigas gigantan fronton. La malica rigardo malantau skvamaj okulvitroj. La rideto vigla [petolema, brila, shercema, kiu vekas simpatation... iom el chio tio, au eble pli tauga vorto por "craquant" ;-)] Krom tio entuziasma, kiam li parolas pri Gérard de Nerval, pri Zamenhof, la fondinto de Esperanto, pri Borges au pri la stranga lingvo de la "textos" (mallongaj mesaghoj legeblaj sur porteblaj telefonoj). Estas sekreto malantau tiom da talento. Konfidenco de la professore : "La patronimo Eco estis donita al mia avo, kiu estis trovita infano. Pli poste, mi sciis ke tio venis de la latina esprimo "ex coelis oblatum", kiu signifas "donita fare de la chielo". Chio estas dirita.

Pri Umberto Eco : Erudiciulo, Italo, Umberto Eco estas unu el la plej famaj fakuloj el la tuta mondo pri semiotiko (scienco pri la signoj), aŭtoro de pluraj romanoj (Le Nom de la Rose -- aperinta ankaŭ kiel sukcesa filmo --, Le Pendule de Foucault...), profesoro en Collège de France, la plej supera el la superaj lernejoj de Francio. En 1993 aperis lia libro "La recherche de la langue parfaite" (La serchado de la perfekta lingvo) kies esperantlingvan tradukon publikigis Edistudio (Italio). En ĝi, li pritraktis Esperanton kun scienca objektiveco same kiel li faris okaze de kurso pri la sama temo, en 1992, en Collège de France. Ĝuste pro tiu scienca studo de Esperanto li venis al pozitiva sinteno rilate al la Internacia Lingvo pri kiu li antaŭe, laŭ liaj propraj diroj, fajfis, t.e. primoketis ĝin. Post apero de tiu verko, li diris al ĵurnalisto de la semajngazeto "L'événement du Jeudi" : "Mi studis la gramatikon de Esperanto -- tio ne signifas ke mi lernis ĝin paroli -- kaj mi konstatis ke ĝi estas lingvo konstruita kun inteligenteco, kaj ke ĝi havas tre belan historion". Alifoj, che la TV-kanalo "Paris Première" (27an de februaro 1996), li kontestis aserton de la ĵurnalisto Paul Amar, kiu parolis pri fiasko de Esperanto, kaj li aldonis : "Laŭ lingvistika vidpunkto, ĝi vere sekvas kriteriojn de shparemo kaj efikeco kiuj estas mirindaj". Pri la biografio "L'homme qui a défié Babel" (La homo, kiu defiis Babelon), li skribis al la aŭtoroj : "La plej bona biografio de Zamenhof... Mi rekomendas ĝin al miaj studentoj. Mi esperas ke tiu libro havos la disvastigon, kiun ĝi meritas." Estas interese scii ke li nun plue rilatas favore al Esperanto pli ol 12 jarojn post kiam li studis ĝin. La priskribo de la aŭtoro de tiu ĉi artikolo de Le Figaro estas sufiche interesa, amuza kaj simpatia. Certe valorus, kiam ni havas kontaktojn kun laamasinformiloj, sugesti ke ili intervjuu la profesoron Umberto Eco pri la lingva problemo kaj eventuale ankaŭ pri Esperanto.

Kontakto : contact@lefigaro.fr. <http://www.lefigaro.fr/>

"Le syndrome de Babel", Valeurs actuelles, 10.12.2004

Chi poste mia reago al la ekonomia semanjmaganizno "Valeurs actuelles"

Bonan tagon,

Paragrafo el la artikolo de Mélanie Vast titolita "Le syndrome de Babel" [La sindromo de Babelo] estas dedichita al la forta reapero de Esperanto. Estas fakto ke tiu lingvo, pli ofte malhelpata ol subtenata fare de la regpovoj, kaj ankaŭ de iuj amasinformiloj kiuj rezervas tre grandan spacon de la cerbo al la angla, estas atinganta belan sukceson en mondo

mense manipulata por religie kredi ke ne estas savebleco ekster la lingvo de Wall Street kaj de Davos. Estas tamen verŝajne utile precizigi ke Esperanto ne estas "miksajho de lingvoj". La vorto "miksajho" donas la ideon preni ion ajn por tion miksi iel ajn. Pli ghusta estus la vorto sintezo, por ne diri kvintesenco, t.e. la esenco de ekzistantaj lingvoj. Efektive, malgrau forta europeca aspekto, Esperanto havas tamen similajhojn kun lingvoj de Ekstrem-Oriento tiaj, kiaj estas la nevariebleco de la bazaj elementoj kiuj karakterizas la chinan lingvon, kaj la fakulto de aglutinado, kiun oni trovas en la japana kaj la korea, sed ankaŭ en la finna, la hungara kaj la turka... Chio tio certe ne estas fremda al la antaŭeniĝoj, kiujn ghi konas en certaj landoj de Azio, kiaj Chinio, Japanio, Koreio, Irano, Afganio... Estas sendube ekscese diri ke "Iu ajn povas ghin paroli en dekkvin tagoj", sed estas certe, ke personoj naturdotitaj por la lingvoj, same kiel tiuj kiuj tute ne estas tiaj, miras mem atingi, kun sama strebo, en daŭro multe malpli longa, esprimnivelon ege supera al tio kion ili penige atingis en aliaj lingvoj. Chio tio devas esti prikonsiderata en la momento kiam, pro la forto de la faktoj, ni havos pli kaj pli da intershanghoj kun Azio : la lingva vojo la plej mallonga, la plej rapida kaj la plej efika al la azia kontinento pasas tra Esperanto. Kio estas vera por Chinio estas ankaŭ tia por Hindio kie, malgrau pli ol du jarcentoj kaj duono de brita restado, eĉ ne 3% el la loĝantaro regas la anglan. Estas ankaŭ demando pri kosto. Chu ni povas scii kiom kostis kaj plue kostas la submetiĝo al la angla ? Kiom chiu lando elspezas por lokigi siajn civitanojn en situacio de dependeco kaj malsupereco rilate al tiuj, kiuj regas la mondon ? Mondskale, tio estas miliardoj da horoj jare (la tempo, en si mem, jam estas mono) kaj konsiderinda budgheta mondepreno dedichita al plifortigo de la potenco de tiuj, kiuj jam troige uzas ghin. Jen temoj, pri kiuj jhurnalistoj povus tre serioze priesplori.

Plej kore. Henri Kunautor, kun René Centassi, eksa chefredaktoro de AFP, de "L'homme qui a défié Babel", apernita samtempe en dua eldono kun la traduko en Esperanto che L'Harmattan, Parizo, 2001. Aperonta en 2005 en la hispana kaj la korea. Ekzistas sur audkasedo por la vid-handikapitoj. <espero.hm@club-internet.fr> Tel & Faksilo : + 33 02 51 31 48 50 <www.esperanto-sat.info>

La Babelturo estas europa

La informoj de tiu artikolo fontas el [The Wall Street Journal](#) "Por eviti ofendi iun ajn, EU uzas chiun el la dudek lingvoj parolataj en la landoj membroj : tiu praktiko kostos proksime de 1,2 miliardo da euroj, t.e. 1/3 pli ol en 2003". "La tekstoj de la europaj leghoj kaj reglamentoj estis malfruigitaj je pluraj monatoj depost la lasta plilarghigo de majo 2004. La Unuigho gajnis dek pliajn landojn sed ankaŭ 9 novajn lingvojn. Se nuntempe 60 000 paghoj da europaj dokumentoj estas kutime atendantaj tradukon, tiu cifero devus altighi je 300 000 en 2006. En reago, la Komisiono antaŭvidas kreskigi la produktivecon de siaj tradukistoj, sed ankaŭ redukti la longecon de siaj tekstoj." [Shajnas ke neniu imagas ke tradukistoj tro premataj povas striki. H.M.) Pri la problemo de Malto (450 000 loĝantoj) : "Ekzistas nur sep personoj en la mondo kapablaj traduki la europajn debatojn malten. Por plifortigi la maltan tradukistaron, "la londona universitato de Westminster lanchis programon de intensivaj kursoj kiu povus havigi ses novajn maltajn interpretistojn al Bruselo la venontan jaron, dum EU taksas siajn bezonojn je sesdek personoj." [Tiel, videble, almenaŭ komence, kaj eble dum longa tempo, ekzistos tradukistoj nur por la malta al la angla kaj inverse, sed, ekzemple, de la malta al la estona ?... H.M.] "Kun 192 landoj, UN formas unuighon multe pli diversan ol tiu de Europo de la

Dudek-kvin. Sed, se en UN, chiu povas esprimi sin en sia lingvo, la paroladoj estas tradukitaj nur en ses idiomojn, rememorigas la usona ĵurnalo. Multe pli ambicia estas Europa Unio : ghi prezentas samtempan dudirektan interpretadon por chiu el la dudek oficialaj lingvoj de la Unuigo. Entute, tio estas, momente, 380 eblaj kombinaĵoj."

Eble vi ne komprenas la finnan.

La francaj amasinformiloj eble malkovros, longtempe post la aliaj, ke Esperanto starigas al si lokon en la kanzonarto... La unuaj kiuj malkovras tion estas tiuj de Finnlando. La grupo Dolchamar tie furoras. Unu el la plej grandaj gazetoj de la lando, "Turunsanommat", dedichis al ghi belan artikolon en kiu Vinilkosmo estas menciita : <http://www.turunsanommat.fi/verkkolehti/?ts=1.4:7:0:0.4:7:1:1:2005-01-10.4:276096.1:0:0:0>

Dolchamar festas la aperon de KD kun gazetara konferenco kaj koncerto en prestiĝa Helsinka rok-klubo "Semifinal". Tio aldone al minimume kvar intervenoj che radiostacioj. Ghi estis chi matene la ĉefa invitito de la programo "YleX" de la plej granda nacia radio pri roko.

Esperanto en praktiko

Iniciate de Joan, estas nun eble kontribui libere al plirichigo de la dokumentaro kaj de la informoj pri la liberaj programoj Debian, Linux kaj ceteraj uzeblaj ankaŭ en Esperanto che <www.debian-kaj-esperanto.net>. Chiu kompetentulo povas libere redakti paghojn, korekti kaj pligrandigi artikolojn, ktp. Aperas ligiloj al paghoj en diversaj lingvoj : català, english français, italiano, español, deutch. Esperanto pli bezonas kapablulojn, kiuj plivastigas la kampon de ĝhia praktika aplikado ol da propagandistoj. La publiko atendas de lingvo ĉefe utilecon, praktikecon, efikecon, ne teoriumadon. Salono pri "Solvoj Linux" okazos en Parizo (Porte de Versailles) la 1, 2 kaj 3an de februaro 2005. Eblas konsulti la programon (FR + EN) kaj enskribighi por ricevi senpagan enirinsignon che <http://www.solutionslinux.fr/fr/index.php>. Estas konsilinde (cetere en ĉiuj salonoj au aranĝoj por kiuj oni ricevas enirinsignon !) aldoni la vorton ESPERANTO al siaj nomoj persona kaj familia por ke oni ne dirus ke Esperanto ne ekzistas au ke neniu ĝhin parolas ! ;-)

La januara numero de La SAGO, kiu aperos kun la katalogo de la Libroservo de SAT-Amikaro, enhavas artikolojn pri liberaj programoj "Open Office" kaj "Simredo" kaj unu pri la libera enciklopedio "Vikipedio" en Esperanto.

Jen mia reago al Europe 1 (perposhte kun dokumentoj).

Bv atenti ke estos malfacile al Esperanto pluteni sian rangon (12an lokon -- vd la statistikojn) en la libera enciklopedio Vikipedio se esperantistoj el diversaj landoj, kompetentaj en diversaj fakoj, ne redaktos artikolojn. Bv senkulpigigi min pro tempomanko por traduki mian reagon. Tamen, cele konsoli vin, vi povas noti interesajn kaj menciindajn ttt-adresojn ;-)

Mi aldonas tamen cxhi poste tion, kion diris s-roj Charbonneau kaj Louis-Jean Calvet (dankon al Maurice Sujet pro la traduko/resumo) :

" *La prezentisto bagateligis Esperanton kun kutimaj asertoj de ĵurnalisto kiu volas kredi ke li iom studis kio estas Esperanto : "artefarita lingvo totale kreita" ("de toutes pièces"), "relative konfidenca" tamen "la sola el 200 kreitaj post la milito en la komenco de la jarcento kiu postvivis ĝis nun" kontraŭe al Volapük kiu "neniam estis parolata" (!) Tamen li raportas pri inter 3 kaj 6 milionoj da parolantoj "regantaj la lingvon" , "nombro ne kontrolebla", kaj pri ĝia prezenco sur Internet kun diskutoj, kun libroj kaj ec' muziko. Sed ,li konkludas, "la realeco estas senkompata": Esperanto ne sukcesas enradikigi" kaj ekzemple lastan aŭguston okazis "kunveno de c'inaj esperantistoj en Pekino kun nur 1 000 c'inaj esperanroparolantoj" " el unu miliardo da C'inaj". Li tiam cedas la parolon al la lingvisto Calvet "kiu studis la fenomenon*

Esperanto" kaj "kies konkludo estas kruela" . Calvet parolas pri sia lasta restado en Hong Kong : "ne eblas uzi Esperanton en la hoteloj de Hong Kong". "Kvankam estas multaj esperantistoj" kiuj konsistigas "retan kun simpatia intenco" kaj posedas adresojn de personoj kun kiuj paroli , ekzemple en Pekino, Ili similas al " iu speco de framasona komunumo" aŭ " pli g'uste al la korporacia asocio 'les Compagnons du Devoir' ('la metikompanoj del Devo') kun siaj metikompanoj efektividantaj sian "Tour de France" por ellerni sian metion. Li tamen rekonas ke la esperantistoj estas multaj kaj ke ilia intenco estas simpatia. Li ne ridindigas la lingvon, sed li akcentas ke g'i estas limigita al siaj parolantoj, dum la prezentisto s'ajnis pli agresema. La j'urnalista prezentisto akcentas sian stultecon menciante Eŭropanton kreitan de Mariani. (mi ec' ne certas ke li g'uste prononcis "eŭropanto"). Laŭ li " tiu j'argono, miksaĵo de eŭropaj lingvoj" funkcias inter la 20 000 eŭropaj funkciuloj de Bruselo kiuj komprenas g'in". Oni povas kredi ke laŭ li Eŭropanto estas pli sukcesa ol Esperanto. Multaj el liaj asertoj estas refutendaj. Mi provis resumi la c'efajj ideojn esprimitajn dum tiu elsendaĵo de Europe1 sed vi certe sukcesos aŭdi g'in c'e <http://www.europe1.fr/antenne/reecoutez.jsp?hr=6alklakante> reaŭskultadon de la elsendo de la 19an de januaro en la "programero" 6-8h je 6h47 "Affaires à suivre" . PS- La rikanemuloj aŭ ridac'antuloj kiuj akompanis per siaj stultaj ridac'oj la pasintajn eldiraĵojn pri Eo sur France-Inter kaj Europe1 meritis specialan premion de stulteco. C'u la supra prezentisto estis inter ili?/"Estus bone se chinaj esperantistoj reagus mem.

15 EUROPA ESPERANTO FORUMO

Benelukso kun Parizo 24.06-1.07.2005 Germanio – Luksemburgo – Belgio – Francio - Nederlando

24.06. Forveturo el Bydgoszcz al Berlino, vizitado (9 horoj), nokta vojaĝo al Luksemburgo

6. Vizitado de Luksemburgo, vojaĝo al Belgio, al Huizingen, 13 km de Bruselo por tranokto,

vizito de la belega parko kun botanika ĝardeno en Huizingen

6. Tuttaga ekskurso al kurorto Ostenda cxe la Nordmaro kaj antikva urbo Brugio ankau al Gent,

vizitado kaj reveno por dormi en Huizingen

6. Tuttaga busekskurso al Parizo: vizitado: La Defense, Trocadero, Eiffel Turo, Baziliko Notre Dame,

Centro de Pompidou, Elizeaj Kampoj, Placo Pigalle, Sacre Coeur, reveno por tranokto en Huizingen

6. Koncertoj en Valonio en lernejo kaj en Charleroi – vizitado de la urbo de la Regxo Karlo, ekskurso

al Waterloo – vizitado de la loko de lasta batalo de Napoleono, reveno por tranokto en Huizingen

29.06 Brukselo – vizito en Komisiono kaj en Parlamento de Europa Unio, vizitado de Brukselo, Malnova urbo, Granda Palaco, Meneken Pis, Janeken Pis, Atomium, tranokto en Huzingen

6. Vojaĝo al Antverpeno (vizitado), vojaĝo al Nederlando al Roterdamo (vizitado), poste al

Amsterdamo - vizitado de "Venezio de Nordo" kun sxipekskurso tra kanaloj, malnova urbo kaj ev. promeno tra "rugxa kvartalo", nokta veturo al Hamburgo kaj tra Szczecin al Bydgoszcz

7. Vizitado de Hamburgo kaj vojaĝo al Bydgoszcz

Prezo: 300 EUR

Antaŭ ol vojaĝi al 15 EEF en Benelukso vi povas veni pli frue al Pollando kaj partopreni la 27 Cxebaltan Esperanto-Printempon en Mielno apud Koszalin dum 15-23 de junio 2005. Tiu-cxi tradicia tre valora E-arangxo kun logxado, mangxado kaj interesa programo kostas 200 EUR, do kune kun Benelukso - 500 EUR.

Reveninte el Benelukso al Pollando la 2-an de julio vi povas starti al unu el kvar vojaĝxvariantoj tra Skandinavio por partopreni la 15-an Internacian Esperanto-Kongreson (15 IEK), 41 BET en Riga (15-23.07.05) kaj poste al 90 UK en Vilno (23-30.07.2005). La vojaĝxprogramoj riceveblaj laŭ peto.

Se vi aligxos gxis la 31-a de decembro vi rajtas pagi 90% de la prezoj – vi ricevos 10% rabaton.

Se vi estas membro de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz (kotizo 20 EUR au 20 USD por 2004-2006 jaroj), vi rajtas al 25% rabato, sufixas pagi nur 75% de la prezoj – vi gajnos Novjaran Promocion!

Aligxojn sendu rete, fakse au posxte al:

INTERNACIA KLUBO "ESPERANTOTUR"

Str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando

Tel./fax: +48,52,3461151, info@esperanto-turismo.com

Banka konto: 80 1320 1117 2034 0100 2000 0001 SWIFT kodo: "POCZPLP4"

La eventualajn vizojn kaj asekon necesas arangxi en via lando.

Interesajn Esperanto vojaĝojn deziras

Internacia Klubo "Esperantotur"

Balkana Esperanto Kongreso

PL –SLOVAKIO –HUNGARIO–SERBIO–BULGARIO –ev. TURKIO–RUMANIO–HUNGARIO–SK-PL

BALKANA ESPERANTO KONGRESO

Festivalo de Rozoj kaj Folkloro en Karlovo (Bulgario)

29.05 -12.06.2005

29/30.05 Bydgoszcz – Toruń- Varsovio – Katowice – Bielsko Biała - Żywiec – Bańska Bystrzyca-

-Zwoleń- **Budapest** (vizitado dum 9 h.) Buda: Gelert-Monto, Kastelo kaj Fisxista Bastiono, ev. Margaret-Insulo, kaj Pesxt: Katedralo de S-ta Stefano, Parlamento, Danubo - rivero

30/31.05 Budapest – Szeged – Subotica – Novi Sad – Beogrado – Nisx - Dimitrovgrad– **Sofio**

(vizitado- 9h): Ortodoksa Katedralo de Aleksandro Nevski, Baziliko de S-ta Zofia, Muzeoj, parkoj, daurigo de la vojaĝo al Karlovo – cxefurbo de Roza Valo

1-3.06 Restado en Karlovo – partopreno en la Balkana E-Kongreso kaj Roza – Folkloro Festivalo

1.06.2005 Promenado tra la urbo, Kongresaj debatoj, Interkona Vespero, tranokto

6. Vizito en roza gxardeno, partopreno en solenajxoj, koncertoj okaze de Nacia Roza Festo,

posttagmeze partopreno en Festivalo de Slava kaj Balkana Folkloro, Junulara kaj Internacia Vesperoj –

koncertoj de la ensembloj, diskoteko, tranokto

3.06 **Sopot**, partopreno en solenajxoj kaj koncertoj en Urba Placo, Adiaua Vespero, tranokto

4.06 Karlovo – Roza Valo – Kazanlik – Burgas – Sarafovo, logxigo en privataj domoj

6. Ripozo cxe Nigra Maro, plagxo , vizitado de Burgas, ev. fakultativa ekskurso al Istanbul (Turkio),

vizitado de la urbo, tranokto, reveno al Sarafovo.

9.06 Sarafovo - Neseber- Suna Bordo – Varna – Ruse,

6. Nokta vojaĝo al Rumanio – Giurgiu - Bukuresxto – Ploesti – Predeal – Brasxov, vizitado de la urbo

kaj belaj Karpato-Montoj

11/12.06 Vojaĝo tra Rumanio: Brasxov – Sibiu - Cluj Napoca - Oradea – tra Hungario: Debrecen- Misxkolc kaj tra Slovakio: Kosxice– Dukla Gorgxo kaj tra Pollando: Tarnów-Kielce-Varsovio-Toruń- Bydgoszcz

PREZO: 400 USD + 30 USD (por Turkio)

La prezo ne inkluzivas la mangxadon, ev. vizojn kaj asekuron.

Aligxojn sendu rete, fakse au posxte al:

Intervuo al posedanto de video Lu-butiko.
Demando al la butikisto:
Kiu estas la plej stranga demando de kliento?

Butikisto:

"Estas filmo ludita de William Shatner."
Ni havas la filmon. Gxi nomigxas "Incubus"
Ridigas min la fakto ke tio interesas al li.

Kiu pensas pri Esperanto nun? Alameda Times-Star, December 17, 2004

Eble vi povas vekci scivolemenon de Monique Beeler mbeeler@angnewspapers.com.

Sufichas skribi al shi nelonge, afable, simple, ankau humure, lau amuza maniero (virinoj shatas ridi ;-), ke ankau VI pensas ankoraŭ nun pri Esperanto, eventuale kun mallonga informo montranta ke estas personoj el la tuta mondo, kiuj ne nur "pensas" pri Esperanto sed ankau pensas en ghi kaj ankau tre efike uzas ghin; ke ghia kampo de aplikado estas jam vastega. Entreprenistoj kiuj profesie uzas Esperanton povas ankau montri tion. Ricevo de interesa kaj diversa materialo nepre tre konciza kaj entenanta nur esencajn informojn, eventuale ankau tt-ligilon kun mallonga prezento, povus evoluigi shian opinion (se ne tiun de la butikisto ! ;-). Eble tio povus inspiri artikolon al shi.

Vi povas ankau inviti shin vochdoni por mondlingvo che <http://www.freewebs.com/international-languages/> kaj same fari se ne jam farita ! ;-)

Tio estas des pli amuza ke, tute apud la granda 10-metra montrofenestro de la sidejo de SAT-Amikaro, troviĝas ankau video-lubutiko !

Festivaloj en Cxinio

CXINIO - 21 INTERNACIA SIMPOZIO PRI ESPERANTO TURISMO (21 ISET)

7 majo – 3 junio 2005

FESTIVALOJ DE SALIKOKOJ, KANKIOJ, BIERO KAJ TEO

VARIANTO "A" 7.05 - 3.06.2005

2005.05.08. -- 06.02 en Cxinio
Beijing -- Xi'an -- Chengdu -- Chongqing -- Tri Grandaj Gorghoj/Tri Malgrandaj Gorghoj/Tri Mini Gorghoj -- Wuhan -- Hefei -- Suzhou -- Hangzhou -- Shanghai -- Shenzhen -- Guangzhou -- Guilin -- Liuzhou -- Zhanjiang -- Haikou -- Sanya/Haikou -- Shenzhen -- Hongkongo/Aomen

05/08: antaŭtagmeze aviadile atingi Pekinon -- centro de kulturo kaj politiko en Chinio kaj enhoteligo; posttagmeze viziti Malpermesatan Urbon; tranokto en Beijing

09: vizito de Granda Muro, muzeo pri Granda Muro, panoramo pri Granda Muro kaj Mauzoleo de Ming-dinastio; tranokto en Pekino

10: antaŭtagmeze vizito de Cxiela Altaro; posttagmeze au vespere per trajno veturo al Xi'an -- cxefurbo de Shaanxi provinco; ripozo en trajno

11: matene au tagmeze atingo de Xi'an; vizito de muzeo de Terakota Armeo, eksponejo kaj panoramo pri Terakota Armeo, Turoj de Sonorilo kaj Tamburo, Granda Moskeo, tranokto en Xi'an

12: antaŭtagmeze vizitado de pagodo de Granda Ansero; posttagmeze per trajno veturo al Chengdu

-- cxefurbo de Sichuan provinco; ripozo en trajno
13: antaŭtagmeze alveno al Chengdu kaj vizitado de Wenshu templo kaj Pando-instituto; gustumado de Sichuan-stilaj mangxajxoj, buse au trajne veturo al Chongqing

14: vizitado de Luohan templo, promena strato kun simbola monumento kaj kabloveturilo trans Jialing

- 15: en sxipo spektado de ambaubordaj pejzaghoj de Tri Grandaj Gorgxoj; tranokto en sxipo
 16: vizitado de Tri Malgrandaj Gorgxoj kaj Tri Mini Gorgxoj per sxipeto; tranokto en sxipo
 17: matene vizitado de Sanxia akvobariilo - la plej granda en la mondo; per buso veturo al **Wuhan** --
 cxefurbo de Hubei provinco kaj tie vizitado de Pagodo de Flava Gruo ; vespere en Hankou
 stacidomo de Wuhan per trajno veturo al Hefei -- cxefurbo de Anhui provinco; ripozo en trajno
 18: matene alveno al **Hefei**; cxeesti en la arangxo de "2005 Hefei Salikoko-Festivalo";
 posttagmeze vizitado de Baogong templo; vespere - teogustumado, tranokto en Hefei
 19: vizitado de Universitato, renkonto kun esperantistoj kaj cheesto en la arangxo de "2005 Anhui Biero-Festivalo";

vojaĝo al **Wuhu** (130km), vizitoj en fabrikoj de mangxado kaj vestaĵoj , tranokto

- 20: antaŭtagmeze buse au trajne veturo al **Suzhou - Orienta Venecio**; vespere spektado de prezentado
 de modeloj en silka fabriko; tranokto en **Suzhou**
 21: antaŭtagmeze vizitado de Wangshi Gxardeno -- Monda heredajxo de Kulturo kaj krosado lau
 Granda Kanalo; post tagmangho busveturo al fama **Hangzhou**, cxefurbo de Zhejiang provinco;
 krosado en Okcidenta Lago; tranokto en Hangzhou
 22: busveturo al **Shanghajo** -- la plej granda centro de ekonomio en Cxinio;
 vizitado de Chenghuangmiao bazaro kaj Yuyuan butikaro; vespere spektado de vesperaj pejzagxoj
 cxe Huangpu rivero (kvartalo BUND); tranokto en Shanghajo
 23/24: trajno-vojaĝo kun kusxliitoj al **Guangzhou - Kantono**
 24: alveno al Guangzhou kaj vizitado de Liurong Templo kaj Shiamian insuleto; vespere
 krosado sur Perla rivero; tranokto en Guangzhou
 25: busveturo al Guilin -- fama turisma urbo de Chinio; tranokto en **Guilin**
 26: krosado lau Lijiang rivero; tranokto en Guilin
 27: antaŭtagmeze vizitado de Ludiyang groto; poste busveturo al Liuzhou urbo kaj de tie busa
 vojaĝo al **Zhanjiang** urbo; tranokto en Zhanjiang
 28: busa veturo al **Haikou** -- chefurbo de Hainan provinco sur la insulo **Hajnan**; tranokto en Haikou
 29: veturo al **Sanya** -- fama turisma urbo de Cxinio; vizito en Luhuitou parko, cxemara (Tianyahajiao)
 parko kaj Dadonghai plagxo por nagxi; tranokto en Sanya
 30: reveno al Haikou kaj posttagmeze sxipo veturo al **Shenzhen**; tranokto en sxipo
 31 alveno al haveno Shenzen, speciala ekonomia zono, vizitado, tranokto

1.06 – trajna vojaĝo el Shenzen al **Hongkongo**, logxigo en **Kowloon**

ekskurso per katamarano al **AOMEN - MAKAU** (estinta portugala kolonio),vizitado de Fort Monte (Fortaleza de Monte),
 kun

panoramo de Makau kaj de Katedralo de S-ta Paulo, Pregxejo de S-ta Dominiko kaj centro, reveno al Kowloon –

promenado i.a. en Parko de Kowloon, surbordaj bulvaroj kaj bazaroj, acetado, tranokto en **Kowloon**

2.06- pramekskurso al la insulo **Hongkong**, veturo per sola en la mondo etagxa tramo kaj ev. per
 kabloveturilo al pinto Victoria

(552 m smn.) reveno al Kowloon, vespera promenado, transfero al. flughaveno en Hongkong kaj reflugo al
 Pollando.

2/3.06 -alflugo al Varsovio.

VARIANTO "B" 7.05 - 13.05.2005

La programo de la 7 de majo gxis la 14 de majo 2005 la sama kiel en varianto "A" gxis la 12 de majo 2005, kaj 12/13 de majo
 vojaĝo per trajno kun la kusxlotoj al Pekino, 13/14 de majo reflugo al Varsovio..

VARIANTO "C" 7.05 - 24.05.2005

La programo de la 7 de majo gxis la 22 de majo 2005 la sama kiel en varianto "A", sekve la 23/24 de majo 2005 flugo el Shanghajo
 al Varsovio.

VARIANTO "D" 19.05 – 3.06.2005

Flugo el Varsovio al Shanghajo la 19/20 de majo 2005, sekve komuna vojaĝo kun la grupo lau varianto "A" kaj reveno el
 Hongkongo la 2/3 de junio 2005 al Varsovio..

Itineroj kaj prezoj de la variantoj de la vojaĝoj al 21 ISET en Cxinio dum 7 de majo-3 junio 2005:

Varianto A) 7.05-3.06.2005 PEKINO - Granda Muro - XI'AN - CHENGDU -CHONGQING-RIVERO JANGCY- krozado - WUHAN - HEFEI - SUZHOU - HANGZHOU - SHANGHAI - GUANGZHOU (KANTONO) – Guilin – Liuzhou – Zhanjiang – Haikou – Sanya/Haikou – ShenZen – HONGKONG/ Aomen - MAKAU ✈ ☹ TP 700 USD + 1000 USD + (flugbiletoj) 700 USD

Varianto B) 7.05-14.05.2005 PEKINO - Granda Muro - XI'AN - PEKIN ✈ ☹ TP 300 USD + 200 USD + (flugbiletoj) 700 USD

Varianto C) 7.05-24.05.2005 PEKINO-Granda Muro-XI'AN-CHENGDU- CHONGQING- RIVERO JANGCY- krozado - WUHAN - HEFEI - SUZHOU -HANGZHOU - SHANGHAI ✈ ☹ TP 500 USD + 530 USD + (flugbiletoj) 700 USD

Varianto D) 19.05-3.06.2005 SHANGHAI - SUZHOU - HANGZHOU - SHANGHAI- SHENZHEN – GUANGZHOU

(KANTONO) – Guilin – Liuzhou – Zhanjiang – Haikou – Sanya/Haikou – ShenZen – HONGKONG/Aomen - MAKAU ✈ ☹ TP 600 USD + 700 USD + (flugbiletoj) 700 USD

T – trajno, P – pramo, sxipo

La prezoj inkluzivas logxadon en la hoteloj(2-3 personaj cxambroj), transferojn kaj transporton, enirbiletojn, trajnbiletojn kun kusxlitoj, biletojn por krozado laŭ la rivero Jangcy en kajutoj de dua klaso (4 personaj), busvojaĝojn, organizajn kostojn kaj laboron de Esperanto-gvidantoj-cxixxeronoj, ne inkluzivas: mangxadon kaj ev. aldonajn servojn. Personoj kiuj alixgas pli frue havos sxancon profiti je pli malmultekostaj flugbiletoj.

NI INVITAS CXIUJN ESPERANTISTOJN POR VIZITI CXINION

- La plej multnombran landon de la mondo (1,3 mld da logxantoj)

ESPERANTO-FERIOJ CXE MEDITERANEA MARO

VALENCIO (HISPANIO) 6 – 15.08.2005

Vojaĝplano por 30.07– 1.08.2005

Litovio- Pollando-Germanio-Luksemburgo-Francio-Andoro-Hispanio-Francio-Monako-Italio-Austrio-Germanio-Pollando

30.07 Forveturo post fermo de la 90 UK el Vilno al Kaunas (vizitado) nokte al Bialistoko (matene vizitado)

31.07 Alveno al Varsovio – vizitado de pola cxefurbo kaj vojaĝo tra Torun al Bydgoszcz.

01.08 Vizitado de la urbo Bydgoszcz kun Esperanto-cxixxerono kaj ripozo, tranokto.

02.08 Forveturo el Bydgoszcz al Berlin, vizitado (9 horoj). Dum la nokto vojaĝo al Luksemburgo.

03.08 Vizitado de Luksemburgo kaj plua veturo al Francio, al Nancy por vizitado kaj tranokto.

04.08 Vojaĝo el Nancy tra Lyon, vizitado de: Katedralo, Baziliko Notre Dam, Roma Amfiteatro, malnova urbo, Urbodomo, Fontano de Neptuno kaj poste plua vojaĝo al Perpignan por tranokto.

05/06.08 Perpignan, vojaĝo al Andoro – vizitado, eventualaj acetoj, vojaĝo al. Montserato, vizitado de Katolika Sanktejo de Nigra Madonno, kaj nokta busvojaĝo al Valencio cxe Mediteraneo.

06-15.08 **Restado en Valencio, vizitado i.a. de: malnova urbo: Torres de Quart, Lonja, antikva bazaro,**

Katedralo, Plaza de la Reina, Plaza de Ayuntamiento, ripozo sur la plagxoj de Valencio, sur marbordo de orangxoj, banado en Mediteranea Maro. Tranoktoj.

16/17.08 Busvojaĝo el Valencio al Barcelono, vizitado i.a. de: Parko Güell, Katedralo Sagrada Familia, Barrio

Gotico, Katedralo, Hispana Placo, Las Ramblas kaj poste vojaĝo al Marsilio kaj al Cannes, vizitado i.a. de: Filma Palaco, apudmara bulvarado, plua vojaĝo al Niceo, tranokto.

18/19.08 Niceo, busveturo al Monako, vizitado de: Katedralo, Princa Palaco, promenado tra Monte Carlo,

poste vojaĝo al San Remo, Genuo, Padova kaj poste al Venecio, tranokto.
20/21.08 Vizitado de Venecio: sxipvojaĝo per vaporetto al Placo de Sankta Marko, Baziliko de Sankta Marko, Ponto de Sapiro, All' Rialto, plua vojaĝo al Verono – vizitado de urbo de Romeo kaj Julio, busvojaĝo al Insbruck – Garmisch Parten Kirschen – Munkeno – Norimbergo, vizitado de Dresdno (9 horoj), alveno al Bydgoszcz(21/22.08.2005) kaj poste al Varsovio.

PREZO: 500 Euroj enhavas: busvojaĝon, tranoktojn, prizorgon de Esperanto-vojaĝgvidantoj

EUROPO - AFRIKO

30.07 – 21.08.2005

Litovio – Pollando - Germanio – Luksemburgo – Francio – Andora – Hispanio – Maroko - Hispanio-Portugaliao – Hispanio – Francio – Monako - Italio – Austrio – Germanio - Pollando

30.07 Forveturo post fermo de la 90 UK el Vilno al Kaunas (vizitado) nokte al Bialistoko (matene vizitado)

31.07 Alveno al Varsovio – vizitado de pola cxefurbo kaj vojaĝo tra Torun al Bydgoszcz.

01.08 Vizitado de la urbo Bydgoszcz kun Esperanto-cxixxerono kaj ripozo, tranokto.

02.08 Forveturo el Bydgoszcz al Berlin, vizitado (9 horoj). Dum la nokto vojaĝo al Luksemburgo.

03.08 Vizitado de Luksemburgo kaj plua veturo al Francio, al Nancy por vizitado kaj tranokto.

04.08 Vojaĝo el Nancy tra Lyon, vizitado de: Katedralo, Baziliko Notre Dam, Roma Amfiteatro, malnova urbo, Urbodomo, Fontano de Neptuno kaj poste plua vojaĝo al Perpignan por tranokto.

05/06.08 Perpignan, vojaĝo al Andoro – vizitado, eventualaj acxetoj, vojaĝo al Montserato, vizitado de Katolika Sanktejo de Nigra Madonno, kaj nokta busvojaĝo al Valencio cxe Mediteraneo.

06.08 Valencio, vizitado, i.a.: Torres de Quart, Lonja, Katedra, Plaza de la Reine, Plaza de Ayuntamiento, plagxo, marbanado, ripozo, tranokto

07.08 Vojaĝo al Benidorm, plagxo cxe la bordo Costa Blanca, Alicante, promenado tra ripozurbo, vojaĝo al Elche, vizitado de botanika gxardeno, katedralo, nokta vojaĝo al Granada

08.08 Granada, vizitado: Alhambra, Palaco de Carlos, Katedralo, Malaga – Katedralo, vojaĝo tra Costa del Sol (Bordo de Suno), Torremolinos al Algeciras, tranokto

09.08 Algeciras – vojaĝo al Gibraltaro, vizitado: Groto de S-ta Mikaelo, rezervejo de sovagxaj simioj, Vojaĝo per parmo al Ceuto kaj plua vojaĝo al Maroko, vojaĝo al Rabato, tranokto

10.08 Rabat: Regxa Palaco, Mauzoleo de Mahomet kaj Hassan V, Casablanka, vizitado:

Granda Moskeo, Meknes: Mauzoleo de Ismail, Bab El Mansur, vojaĝo al Fez, tranokto

11.08 Fez: Regxa Palaco, bazaroj, vojaĝo al Ceuta kaj prame al Algeciras, vojaĝo al Sevilla, tranokto

12.08 Sevilla- vizitado: Katedralo kun Giralda, Alkazar, Ora Turo, Plaza de España, nokte al Lizbona

13.08 Lizbono: Regxa Palaco, Katedralo, St.Hieronimo, Monumento de Henriko Velisto, turo, tranokto

14.08 Lizbono, vojaĝo al Cascais „Gorgxo de Infero” - Cabo da Roca (okcidenta kabo de Europo), Sintra, Somera Regxa Palaco, vojaĝo al Fatima, nokta vojaĝo al Salamanka

15.08 Salamanka - vizitado: katedralo, Universitato, Avilla: malnova urbo, mezepokaj defendo-turoj, vojaĝo al la Valo de Mortintoj , vizitado: El Escorial, vizitado:, Madrido, tranokto

16.08 Madrido - vizitado: Regxa Palaco, Katedralo, Plaza del Sol, Plaza Mayor, vojaĝo al Valencio.

16/17.08 Busvojaĝo el Valencio al Barcelono, vizitado i.a. de: Parko Güell, Katedralo Sagrada Familia, Barrio Gotico, Katedralo, Hispana Placo, Las Ramblas kaj poste vojaĝo al Marsilio kaj al Cannes, vizitado i.a. de: Filma Palaco, apudmara bulvarado, plua vojaĝo al Niceo, tranokto.

18/19.08 Niceo, busveturo al Monako, vizitado de: Katedralo, Princa Palaco, promenado tra Monte Carlo, poste vojaĝo al San Remo, Genuo, Padova kaj poste al Venecio, tranokto.

20/21.08 Vizitado de Venecio: sxipvojaĝo per vaporetto al Placo de Sankta Marko, Baziliko de Sankta Marko, Ponto de Sapiro, All' Rialto, plua vojaĝo al Verono – vizitado de urbo de Romeo kaj Julio, busvojaĝo al Insbruck – Garmisch Parten Kirschen – Munkeno – Norimbergo, vizitado de Dresdno (9 horoj), alveno al Bydgoszcz(21/22.08.2005) kaj poste al Varsovio.

PREZO: 600 Euroj + 200 Euroj por Afriko

- enhavas: busvojaĝon, tranoktojn, prizorgon de Esperanto-vojaĝgvidantoj

Informo pri Migjeni- kaj Kadare-poemtradukoj

Mi dankas al vi pro sendo de Bulteno n-ro 56, en kiu troviĝas ankaux mia informteksto pri la 6a Balkanlanda Esperanto-Konferenco okazinta cxi-jare en la urbo Nisx. La enhavo de Bulteno estas ricxa kaj divreseca. Mi trovis tie la informon pri kolektado de bibliografiajxoj pri tradukoj de

Kadare-verk(ajx)oj. Mi sciigas vin ke mi elektis po du poetojn el cxiu Balkana lando kaj redaktis la manuskripton EL BALKANA MODERNA POEZIO. La XX-a jarcento. Pro manko de monrimedoj, gxi ankoraux ne aperis. Tie enestas ankaux du albanaj verkistoj: Migjeni (Milosh Gjergj Nikola, 1911-1938) kun la de mi esperantigita ANTAUXPAROLO DE ANTAUXPAROLOJ (aperinta en Koko, Djurdjevac (Kroatio, n-ro 2(8), 1990, kaj Ismail Kadare (1936) kun la de Nikola Rasxic' esperantigita poemo POEZIO. Bedauxrinde, momente mi ne scias en kiu E-gazeto gxi aperis. Estime,
Boris'a Milic'evic'

Mi kunsendas cxi tie ambaux poemtradukojn:

**Migjeni
Nikola)**

(Milosh

Gjergj

(Albanio, Shkodra 1911 - Italio 1938).

Migjeni (Miĝeni) estas la plej elstara albana poeto en la periodo inter la du mondmilitoj.

Li postlasis la poemkolekton "Liberaj versoj" kaj kelkajn prozaĵojn, kiuj signifis turnoverkojn en la tiutempa albana literaturo, laŭ la poeteca alvokiĝo kaj la socialaj temoj, kaj inspiris plurajn verkistojn en la tridekaj jaroj.

ANTAŬPAROLO DE ANTAŬPAROLOJ

Tagon post tag' la dioj subiraskaj iliaj formoj glitas laŭ jaroj kaj jarcentoj. Kiu estas dio kaj kiu - homo, neniu nun scias, en menso de l'homaro dio kaŭras ĉiam. Tempiojn siajn li perfingre premas en signo de pentado, kaj en kolero tondrolaŭte krias: Ho, kion, kion, mi kreis? - Kaj homo ne scias ĉu dio estas lia ido aŭ li estas parenc' de dio. Sed li vidas ke estas vane imagi idolon kiu ne vokrespondas. Kiu estas dio kaj kiu - homo, neniu nun scias. Alvenis tempo kiam homoj interkonsentis konstrui la Babelturon – kaj al turpinto, al pinto de tronpintoj supreniros la homo kaj de tie ekkrios: Dio: Kieas vi?

Esperantigis: Boriša Milićević

Ismail Kadare (Albanio, Elbasan 1936).

Unu el la plej konataj kaj la plej aprecataj aŭtoroj de Albanio. Poemkolektoj: "Junecaj inspiroj" (1954); "Kial pensas ĉi-montaroj?"; "Motivoj kun la suno". Rakontoj kaj raportaĵoj: "La suda urbo" (1967) Romanoj: "Generalo de la morta armeo" (1963); "Nupto" (1968); "Fortikaĵo" (1970); "Vintro de ega soleco" (1973); "Novembro de unu ĉefurbo" (1975); "Kroniko sur ŝtono". Liaj romanoj estis tradukitaj en plurajn lingvojn.

POEZIO

Poezio, La vojon al mi kiel vi trovis?

Patrino mia albanan bone ne konas,
Leterojn, kiel Aragono, skribas senpunkte kaj senkome,

La patro al aliaj maroj forvadis juna,

Sed venis vi

Paŝante stratojn de mia urbo ŝtonoza,

Frapetis timeme ĉe la pordo de la trietaĝa Numero 16.

Multajn aferojn en la vivo mi ekamis kaj foramis

Por multaj aspiroj mi estis malfermita urb',

Sed denove,

Kiel la knabo malfrue revenanta hejmen,

Laca kaj skuita de vagado tra la nokt',

Tiel ankaŭ mi, laca konstante,

Post ĉiu amo revenas al vi.

Kaj vi, Sen ajna malamemo kontraŭ perfidanto

Buklas mian hararon karese,

Haltejo mia lasta, Poezio.

Esperantigis Nikola Rašić'

Aliaj informoj de Henri Masson

Pacs'ipo

Laux iniciato de s-ino Penny Vos, en novembro 2004 kreighis agadgrupo por enkonduki Esperanton je la servo de la neregistara organizajho "Pacshipo". La ŝipo vojaghas ĉirkau la tero 2-3 foje jare kun la celo helpi lokajn aktivulojn en la agado porpaca kaj disvastigi sciendajhojn pri nuntempaj problemoj sociaj, homaj, naturmediaj. Surshipe, konferencoj, prelegoj kaj lingvostudoj pretigas la vojaghantojn al la havenaj renkontoj. Nia laborgrupo sukcese progresas en la rilatoj kun la respondeculoj de la Pacshipo. Bezonatas agemuloj en la havenoj vizitotaj. Por Francio, la esperantistoj de Marsejlo kaj suda Francio bv esti aparte atentemaj pri la 48a vojagho; tiuj de Le Havre kaj okcidenta

Francio ghis Parizo pri la 49a !). La vojaĝoj estas jam tiel planitaj por 2005 : la 48a vojaĝo de Pacŝipo foriros el Tokio la 2an de februaro kaj revenos la 1an de majo 2005. la 49a vojaĝo de Pacŝipo foriros el Tokio la 21an de majo kaj revenos la 31an de aŭgusto 2005. la 51a vojaĝo de Pacŝipo foriros el Yokohamo la 3an de septembro kaj revenos la 16an de decembro 2005. (Tiu estos la 1a vojaĝo kiun partoprenos esperantistoj! Ne estas klarigo kial ne aperas 50a, eble temas pri divenaĵo ;-)
Mapoj pri la vojiro kaj detaloj en la japana, la angla kaj Esperanto che :
<<http://www.kontakto.info/pacŝipo.html>>. de Stefano :

La futuro skribig'as ankaŭ' en la franca!

En partnereco kun la semajngazeto "Marianne", la eldonejo Corlet ĵhus publikigis verkon en sia kolekto PANORAMIQUES dedichitaj al la franca lingvo kaj aparte al ĝhia defendo kaj disvastigo. Sub la titolo *L'avenir s'écrit aussi en français*, tiu libro, por kiu kontribuis multaj respondeculoj de asocioj, prezentas la nunan situacion kaj ilustras la perspektivojn por la estonteco de la franca. En la kolektiva redaktado de tiu libro partoprenis ankaŭ simpatiantoj de Esperanto.

Verko havebla che FNAC. Prezo : 14 €. Referenco ISBN : 2-84706-117-7

Ttt-ejo de la eldonejo Corlet : <http://www.corlet-editions.fr>

Turismo kaj Esperanto

En Havro la 13-a Decembro 2004

Kara samideano,

Ferii kaj paroli esperante dumvojaĝe, jen la deziro de cxiuj esperantistoj. Tial "Havra Esperantista Grupo" prilaboras la eldonadon de reta gvidlibro "Turismo kaj Esperanto" en kiu aperos cxiuj lokoj (hoteloj, kampadejoj, feriejoj, komercejoj, muzeoj, bibliotekoj, pregxejoj, monumentoj, turismoficejoj, TTT-ejoj, ktp ...) kie Esperanto estas parolata, aux kie informoj estas en Esperanto. Post ricevo de la permeso de Nacia Komisiono « Informatiko kaj Liberecoj », tiu gvidilo estos rete legebla de tutmondaj esperantistoj.

Ni alvokas cxiujn por helpo. **Bonvolu komuniki al ni informojn** (pere de la Slipo de Informoj):

Bonvolu printigi tiun pagxon kaj diskonigi kiel eble plej multe.

Amike. En la nomo de Havra Esperantista Grupo

<http://esperanto-lehavre.org> La Prezidantino : Sylvie Caron

Retgvidilo "**Turismo kaj Esperanto**" - Slipo de Informoj

—

<u>Turismo</u>oficejo (kun Esperanto-prospektoj) - Adreso :

_____ Urbo : _____ Lando

<u>Muzeo/Biblioteko</u> :	Nomo	
_____	_____	
Adreso _____	Urbo _____	
_____	_____	
Lando _____	Telefono _____	Fakso _____
_____	_____	_____
TTT-ejo _____	Retposxtadreso _____	
_____	_____	
Tagoj kaj horoj de _____	malfermo _____	
_____	_____	

<u>Komerco</u> :	Nomo	kaj	tipo	de	komerco
_____	_____	_____	_____	_____	_____
Adreso _____	_____	_____	_____	_____	Urbo _____
_____	_____	_____	_____	_____	_____
Lando _____	Telefono _____	Fakso _____			
_____	_____	_____			
TTT-ejo _____	Retpostxadreso _____				
_____	_____				
Pliaj _____	informoj _____				
_____	_____				
—	_____				

<u>Pliaj lokoj kaj monumentoj</u> :	(ekzemple : pregxejo, sxildo, steleo, sonorilo, vidpunkta tablo, ktp ...)
Nomo _____	Adreso _____
_____	_____
Urbo _____	Lando _____
_____	_____

<u>Esperanto-Domo</u> / <u>Esperanto Kultura-Domo</u> :	Nomo
_____	_____

Adreso _____	Urbo _____
Lando _____	Telefono _____ Fakso _____
TTT-ejo _____	Retposxtadreso _____
Tagoj/horoj _____	kunvenoj _____
Pliaj _____	informoj _____
_____	_____
_____	_____

<u>Loka-grupo</u> _____	:	Nomo _____
Telefono _____		Fakso _____
TTT-ejo _____		Retposxtadreso _____
Loko/tagoj/horoj _____	de _____	kunvenoj _____
_____		_____
_____		_____
_____		_____
_____		_____
_____		_____
_____		_____
_____		_____

Viaj _____	kontaktindikoj _____	:	Nomo _____
Adreso _____			Urbo _____
Lando _____			Telefono _____
Fakso _____			Retposxtadreso _____
_____			_____

Ekzemploj :

- Vitokulturisto – Domaine Henry Carbonnel –11220 LAGRASSE – Francio - Telefono (33) (0)4.68.43.13.99 -Fakso : (33) (0)4.68.43.13.06 – (esperanto parolata)

- Posxkartoj de kolekto kaj brokando - Rémy kaj Nicole Lebrun – (Proksime VERNON) -58 rue des Andelys - 27510 PRESSAGNY L'ORGUEILLEUX – Francio - Telefono (33) (0)2.32.51.30.16 – www.pressagny-brocante.com – remy.le-brun@wanadoo.fr - (esperanto parolata)

- Naturisma restadocentro "Suno klubo de la Ocean-Pordo – YPORT – Francio - Inter FECAMP kaj HAVRO TTT-ejo, pagxo Esperanto : <http://perso.net-up.com/scpo>

- Cxambroj – S-ino Vauquelin – 110 rue de l'Etang – 76190 YVETOT – Francio - (2 cxambroj/4personoj)

- Gîte de France 2 spikoj – Telefono (33) (0)2.35.95.33.71 – Inter ROUEN kaj HAVRO – (esperanto parolata)

- Tourismoficejo – 14 Place Stanislas – 54000 NANCY – Francio - Prospektoj en Esperanto

- Pregxejoj de FARAMOUTIER kaj POMMEUSE - Seine et Marne – Francio - cxeesto de Esperanto

- Zamenhof-Monumento – LINZ, Aŭstrio – (apud lago inter Kärtnerstrasse./Bahnhofstrasse.)

- Kultura-Centro de Esperanto – kunvenas cxiusabate 15h00– 18h00 – 105 rua Felipe Santos – CAMPINAS - (São Paulo) - Brazilo

URGHA AGADO INTERNACIA

Saluton !Internacia Urĝa Agado estas organizaĵo fondita de kelkaj mondcivitanoj en 1977, kaj aprobita de la Kongreso de la Popoloj. I.U.A/AUI ĵus sendis teamon el 7 volontuloj en Srilankon. Tial vi trovos ĉi-alligite :- alvokon por donacoj- gazetaran komunikaĵon. Informoj de Daniel Durand / Registrolibro de la Mondcivitanoj : Notinde, ke tiuj dokumentoj estas ankaŭ gastigataj de la TTT-ejo de la Mondcivitanoj : <http://www.recim.org/auj> kaj ke tiu asocio estas kapabla respondi al vi en Esperanto, ĉar la prezidanto Kristiano Herbette estas esperantisto. Vi bonvolu publikigi kaj disvastigi tion. Oni bezonas ĉies helpon ! Daniel Durand

Registrolibro de la Mondcivitanoj <http://www.recim.org>

INTERNACIA URĜA AGADO denove aktiva

Interveno de teamo de INTERNACIA URĜA AGADO - IUA/AUI en Srilanko por provi retrovi la malaperintajn homojn, flegi kaj akompani la trafitajn familiojn, helpo por la reinstalado de trinkakva duktaro .. Kelkajn monatojn post ĝia interveno en Maroko, INTERNACIA URĜA AGADO denove aktivas. Teamo el 7 volontulaj sukuristoj malobstrukcistoj el tuta Francio kaj 14 kofroj da savmaterialoj (500 kg) ekflugis merkrede la 29an de decembro al Kolombo en Srilanko por alporti helpon al la viktimoj de la mortiga sismo, kiu plagis Sudorientan Azion. INTERNACIA URĜA AGADO (IUA/AUI) estas internacia solidareca organizaĵo bazita en Montpeliero, fakiĝinta en la regado post katastrofoj kaj la urĝaj intervenoj okaze de ruiniĝo en ĉiuj ajn landoj ekde 1977. Tiu teamo el sep sukuristoj fakaj por partopreni en traserĉaj kaj malobstrukcaj agadoj ekflugis al Srilanko dank'al la financa subteno de siaj multaj donacantoj, interalie la Montpeliera asocio "Pain de l'Espoir" (pano de espero). Krom la serĉado de malaperintaj homoj, la plurfakeco de la sukuristoj ebligas ilin engaĝiĝi en plurajn agadkampojn tiajn kiaj la flegado de la homoj, la psikologia subteno, la loĝistiko, la purigado de akvo, aŭ la rekonstruadoInformoj pri la laboro de nia teamo estos disponeblaj en nia ttt-ejo : www.aui-ong.org.

Se vi deziras subteni niajn agadojn profite al la viktimoj de naturaj katastrofoj, bonvolu formuli viajn ĉekojn aŭ ĝirilojn : CCP Montpellier 3000-70J kun la noto "sismo en Azio". Fiska atesto estos liverita al vi. Se vi deziras fariĝi aktiva membro aŭ sekvi niajn klerigojn, bonvolu kontakti : AUI. Les terrasses de Montcalm - 1401 , rue de Fontcouverte - 34070 Montpellier – France - Tel : 04 67 27 06 09 / Courriel : aui-ong@tiscal.fr

MALLONGA ĜENERALA PREZENTO DE LA ASOCIO
Fondita en marto 1977, Internacia Urĝa Agado estas neregistara organizaĵo (konsistanta nur el klerigitaj volontuloj aŭ profesiuloj fakiĝintaj pri naturaj katastrofoj), kiu intervenas laŭ tri ĉefaj aksoj : Ø la prevento de la naturaj katastrofoj por malpliigi la riskojn kaj vundeblecojn de la koncernata loĝantaro (kontraŭsismaj kaj kontraŭciklonaj

konstruaĵoj el lokaj materialoj, Klerigadoj de la lernejoj infanoj pri la "tujaj savgestoj",) sed ankaŭ serĉante plifortigi la organizajn kaj sukurajn kapablacojn de la lokaj agentoj, interalie la asocioj en regulaj kontaktoj kun la loĝantaro.

Ø la urĝeca interveno en ĉiuj ajn landoj por respondi al specifaj bezonoj pri sukurado kaj helpado, rektaj konsekvencoj de tertremo, de ciklono, de inundo aŭ de terŝoviĝo. (traserĉo de superŝutitaj viktimoj, utiligado de tiaj specifaj materialoj kaj iloj, kiaj vibroskopo, orbifono, .. . retrovo de personaj aferoj en la ruinoj, pumpado kaj purigado de la domoj, aŭskultado kaj psikologia helpo al la viktimoj, ludoj kun la infanoj por ke ili retrovu la rideton kaj la senzorgecon propran al infaneco ...). Ø la rekonstruado kaj la rearanĝo, vulgarigante la informadon kaj la realigaĵojn de la kontraŭciklonaj kaj kontraŭsismaj konstruaĵoj en kampara medio, kompletigita, sub kondiĉo de ricevo de financaj rimedoj (donacoj el unuopoloj aŭ mecenateco al la asocio IUA/AUI per klerigado pri konstruteknikoj adaptitaj al la loĝejoj en riskohavaj lokoj, per surloke disponeblaj homaj rimedoj (klerigado de lokaj masonistoj) kaj lokaj materioj (tero, bambuo, ŝtono, .. .). Tiu asocio, kun sidejo en Montpeliero, konsistas el reto de pli ol 150 regulaj membroj kaj 115 volontuloj pretaj por ekiri, ĉeestintaj sesiojn de teknika klerigado ebligintajn ilin akiri kompetentecojn pri savado, malobstrukcado, sukurismo, regado de loka evoluprojekto aŭ rekonstruado, preventaj agadoj .. .

Kontaktoj Se vi deziras subteni la agadojn de Internacia Urĝa Agado, fariĝi aktiva membro aŭ ĉeesti niajn klerigojn, bonvolu kontakti nin aŭ sendi viajn donacojn je :

A.U.I Les terrasses de Montcalm 1401 , rue de Fontcouverte 34070 MONTPELLIER
Francio Tel : 04 67 27 06 09 Fax : 04 67 27 03 59
Bonvolu formuli viajn ĉekojn aŭ ĝirilojn al PĈK CCP 3000 70J Montpellier
E-p : aui-ong@tiscali.fr
TTT-ejo : www.aui-ong.org

URGHA AGADO INTERNACIA

KIAM okazas katastrofo, tiam malaperas miloj da homaj vivoj post kelkaj momentoj. Tiuj momentoj signas nur la komencon de la katastrofo, ĉar la venontaj horoj kaj tagoj trudos al la viktimoj persistegan lukton, por postvivi. Ghuste tiam oni liveru al la trafitaĵoj la rimedojn por alfronti tiun baton per vera internacia helpo, en kiu volontuloj el multaj landoj unuighas kaj laboras kun la trafitoj laŭ interhelpa kaj solidara spirito. Tiu helpo estas preskaŭ ĉiam misproportia rilate al la bezonoj. Kaj ankoraŭ pli misproportia rilate al la rimedoj, kiujn disponas la ĉefaj regnoj. Post ĉiu katastrofo, aperas la samaj obstakloj: la timo pri "fremdaj enmiksigoj", la malfacileco de la komuniqueblecoj kaj de la helpendo, la disigo de la strebadoj, la manko de kunordigo kaj organizado. Tion atestas ĉiu katastrofo. Tial oni laboru, por starigi veran internacian helporganizon, konvencie ligitan kun Unuighintaj Nacioj, kies supernacia strukturo ebligu rapidan kaj efikan agadon post katastrofoj. I.U.A. estas grupigo de asocioj kaj volontuloj, kiuj - konsciaj pri la problemoj levitaj okaze de naturaj katastrofoj - volas progresigi per konkreta laboro la starigon de supernacia strukturo por helpo - helpo, kiu trovighu trans la teritoriaj kaj politikaj rivalecoj. Ni volas elmontri per konkreta laboro, ke, post naturaj katastrofoj, internaciaj skipoj povas alporti realan kaj efikan helpon. Tiucele ni starigis plenuman strukturon, kiu laboras sur pluraj terenoj: - Intervenado - mildigi la malfelichon de la viktimoj de katastrofoj per rapida interveno; - garantiigi homan cheeston; la sperto montris, ke tiu cheesto ebligis al la trafitoj lukti

kontraŭ la senkuragigo kaj la preskaŭ kompleta dependo de ekstera helpo, kaj tiel organizighi, por denove regi sian propran estontecon; - Rekonstruado - partopreni en la unuaj klopodoj de rekonstruado kaj esplorado de alternativoj, kaj iniciati longdaŭrajn agadojn kunlabore kun surloke aktivaj homoj; - Preventado - koni "el la Interno" la kauzojn de la katastrofoj, por pli bone antaŭ- vidi kaj preventi ilin. La mobilizado de volontuloj kaj de rimedoj okaze de katastrofoj, ie kaj iam ajn, postulas bone elpensitan organizon. Tial, dank'al efika slipara sistemo, skipo da spertaj volontuloj estas disponebla kelkajn horojn post la katastrofo. Tiuj skipoj konsistas el gevolontuloj, kiuj promesas sin meti sub la disponon de Internacia Urgha Agado post urgha alvoko. Chiuĵare okazas staghoj, por interesi gevolontulojn pri la problemoj de la naturaj katastrofoj, kaj alporti al ili la minimume necesajn teknikajn elementojn por urghaj intervenoj. Tiaj skipoj intervenis okaze de multaj katastrofoj : tertremoj, uraganoj, inundoj, interalie en Jugoslavio, Italio, Sicilio, Tunizio, Gvatemalo, Belgio, k.t.p.. Por chiuj informoj kaj donacoj: Action d'Urgence Internationale (A.U.I.) Terrasses Montcalm 1401 rue Fontcouverte 34070 MONTPELLIER Tél : 04 67 27 06 09 Fax : 04 67 27 03 59 aui-ong@tiscali.fr

Notoj. La chi supra teksto fontas el flugfolio, kiun publikigis Internacia Urgha Agado. Ghi aperis en Esperanto-traduko en la revuo "SAT-Amikaro" de oktobro 1980. Ghin tradukis anonima kamarado kiu aktivis en AUI/IUA. Iom antaŭ la publikigo de tiu artikolo, AUI/IUA intervenis en Haitio post la paso de ciklono "Allen". La 16-an de Augusto 1980, ghi sendis de Parizo skipon konsistantan el 1 diplomita kuracisto, 1 diplomita flegistino kaj 2 specialistoj pri savado kaj rekonstruado, kun materialo kaj medikamentoj (proksimuma valoro: 25.000-30.000 F.F. [t.e.nun 3800-4600 E]). Dua skipo, konsistanta el 7 volontuloj, ne povis foriri pro manko de dezirataj transport faciligoj, tio estas senpageco en tia kazo. La 23-an de Augusto, I.U.A. ricevis vokon pri helpo rilate sendon de pliaj volontuloj, sed gi povis sendi nur 2 aliajn personojn, anstataŭ 4 petitajn, ĉar la financaj rimedoj de la organizo trudis limigon de la helpo. La gekamaradoj bonvolu diskonigi la agadon de I.U.A. en kaj ekster la Esperantista medio. Aldono de la 3a de januaro 2005 La internacia helpo ghis nun kolektita : 2 miliardoj da dolaroj. En 2003, la militistaj elspezoj atingis 900 miliardojn da dolaroj. Elspezoj de la ŝtatoj por armado : "Si les grandes puissances ont diminué leurs dépenses militaires, les pays à revenus faibles ou moyens les ont globalement augmentées. L'Asie a doublé ses achats d'armes en quatre ans." (Courrier de l'Unesco : http://www.unesco.org/courier/1999_04/fr/ethique/txt1.htm) Traduko : Se la grandaj potencoj malkreskigis siajn militelspezojn, la landoj kun malalta au meza enspezo ilin ĝenerale kreskigis. Azio duobligis la acheton de armiloj en kvar jaroj). Pripensinde !

15 INTERNACIA ESPERANTO KONGRESO EN RIGA (LATVIO) 15 - 22 JULIO 2005

KAJ 90 UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN VILNO (LITOVIO) 23-30.07.2005

Varianto "A": 2.07 – 31.07.2005 11 VOJAĜVARIANTOJ

POLLANDO – GERMANIO – DANIO – SVEDIO – NORVEGIO – FINNLANDO – ESTONIO – LATVIO – LITOVIO – POLLANDO

7. Forveturo el Bydgoszcz tra Szczecin al Rostock kaj nokta pramo al Gedser
7. Vojaĝo el Gedser al **Kopenhago**, vizitado: kastelo *Amalienborg, Christianborg, malnova urbo, Tivoli, parko kun Sireno, fontano Gefion, vojaĝo al Helsingo*: *renesanca kastelo de Hamlet –Kronborg Slot*, pramo al Helsingborg, nokta veturo al Göteborg

04.07 **Göteborg**, vizitado, veturo al Oslo, promonado tra la cxefurbo de Norvegio, tranokto

05.07 **Oslo**, vizitado, i.a.: *Urbodomo, Katedralo, Regxa Palaco, Parko de Vigeland, duoninsulo Bydgoj, skanseno, Muzeo de Vikingaj Boatoj, "Fram", "Kontiki"*, veturo al Hamar

5/6.07 Vojaĝo el **Hamar** tra **Lillehamar** al **Bergen**, vizitado : Pregxejo de Sta Maria, malnova urbo, Torget, Bryggen, nokta vojaĝo tra la plej longa **fiordo Sogne** al Trondheim

07.07 **Trondheim**: *Katedralo, Regxa Palaco, Stifstgarden, Fisxa bazaro, HavenoBrygen*, tranokto

8-9.07 Vojaĝo tra Mo i Rana – transiro de la arkta cirklo - al **Narvik**, vizitado: polaj tombarejoj, *marista monumento Grom, promonado tra la urbo*, tranokto

10-11.07 Vojaĝo el Narvik al **Nordkapp** – *blanknokta restado sur la Norda Kapo*, veturo tra Karasjok (cxefurbo de norvega Laponio) - Inari – por tranokto cxe Rovaniemi

12-13.07 **Rovaniemi**, vizitado *de la vilagxo de Sankta Nikolao cxe la arkta cirklo*, veturo tra **Kemi - Oulu – Vaasa – Pori - Rauma** al Kimito por ripozo kaj tranokto

14.07 Kimito, ekskurso al pracxefurbo de Finnlando - **Turku**, vizitado: Katedralo, kastelo, Foirplaco de malnova urbo, prezentado de artaj ensembloj, tranokto

7. Vojaĝo al **Helsinki**, vizitado: *Uspiena Koncilio, Senata placo, Katedralo*, pramo al **Tallinn**, vizitado i.a.: *Malsupra kaj Supra urbo*, veturo tra Parnu al Riga, tranokto

7. **Restado en Riga dum 41 Baltaj Esperanto Tagoj kaj 15 Internacia Esperanto Kongreso:** *Interkona Vespero, Inauguro de 15 IEK kaj 41 BET, partopreno en folkloro festivalo en Tukmus kaj Jurmala*, vizitado de malnova Riga, partopreno

en la koncertoj en la centro de la urbo por logxantoj de Riga, ekskurso al duoninsulo **Kolka**, Kulturcentro de Livoj, al Kurlando, **Nacia Parko Slitere** kaj al **Ventspils**, sxipekskurso sur la rivero **Daugava**, ekskurso al **Cesis** kaj **Sigulda, Parko – Muzeo Turaida, Groto Gutmana, Nacia Parko Gauja**, partopreno en la diskutoj pri turismaj temoj, tranoktoj en Riga

22.07 Vojaĝo el Riga tra **Kruca Monto, Šiauliai** al Vilno, vespera promonado, tranokto

7. **Restado en Vilno kaj partopreno en 90 UK**, vizitado de la urbo: *Katedralo, Turo de Gediminas, Mickiewicz-domo, Universitato, Urbodomo, Aurora Pordego, ortodoksa pregxejo de S-ta Triono, Pregxejoj de St. Petro kaj Paulo, de S-ta Anna kaj de Sta Johano, tombarejoj Rasos kaj Paneriai*, kaj tuttaga busekskurso laŭ itinero de Ludoviko Zamenhof: Vilno–Druskininkai-**Veisiejai**-Alytus-Birštonas - **Trakai** - kastelo sur la lago Galve, karaimaj domoj, muzeo kaj Kienesa(sanktejo), tranoktoj en **Vilno**

30/31.07 Vojaĝo al **Kaunas**, vespera promonado tra la urbo, *Kastelo, Katedralo, Urbodomo, Avenuo de Libereco, Domo de Perkunas kaj Esperanto Domo cxe la strato L.Zamenhofo* 5 nokta vojaĝo al Pollando, tra Bialistoko, Varsovio, Toruń al Bydgoszcz

PREZO: 700 Euroj + 200 Euro (kostoj survoje)

Varianto "B": 2.07 – 23.07.2005 sen Rusio - Itinero kaj programo kiel en varianto "A", sen la restado dum 90 UK en Vilno

PREZO: 500 Euroj + 200 Euro(kostoj survoje)

Varianto "C": 2.07 – 31.07.2005

PL –DANIO -SVEDIO -NORVEGIO-FINNLANDO-RUSIO-ESTONIO-LATVIO-LITOVIO-POLLANDO

7. Forveturo el Bydgoszcz tra Szczecin al Świnoujście kaj nokta pramo al Kopenhago
7. **Kopenhaga**, vizitado: malnova urbo, kastelo *Amalienborg, Christianborg, Tivoli, parko kun Sireno, fontano Gefion, vojaĝo al Helsingor: renesanca kastelo de Hamlet –Kronborg Slot*, pramo al Helsingborg, nokta veturo al Göteborg

04.07 **Göteborg**, vizitado, veturo al Oslo, promenado tra la cxefurbo de Norvegio, tranokto

05.07 **Oslo**, vizitado, i.a.: *Urbodomo, Katedralo, Regxa Palaco, Parko de Vigeland, duoninsulo Bydgoy, skanseno, Muzeo de Vikingaj Boatoj, "Fram", "Kontiki"*, veturo al Hamar

5/6.07 Vojaĝo el **Hamar** tra **Lillehamar** al **Bergen**, vizitado : Pregxejo de Sta Maria, malnova urbo, Torget, Bryggen, nokta vojaĝo tra la plej longa **fiordo Sogne** al Trondheim

07.07 **Trondheim**: *Katedralo, Regxa Palaco, Stifstgarden, Fisxa bazaro, Haveno Brygen*, tranokto

8-9.07 Vojaĝo tra Mo i Rana – transiro de la arkta cirklo - al **Narvik**, vizitado: polaj tombarejoj, *marista monumento Grom, promenado tra la urbo*, tranokto

10-11.07 Vojaĝo el Narvik al **Nordkapp** – *blanknokta restado sur la Norda Kapo*, veturo tra Karasjok (cxefurbo de norvega Laponio) - Inari – por tranokto cxe Rovaniemi

12-13.07 **Rovaniemi**, vizitado *de la vilagxo de Sankta Nikolao cxe la arkta cirklo*, veturo tra **Kemi - Oulu – Vaasa – Pori - Rauma** al Kimito por ripozo kaj tranokto

14.07 Kimito, ekskurso al praxefurbo de Finnlando - **Turku**, vizitado: Katedralo, kastelo, Foirplaco de malnova urbo, prezentado de artaj ensembloj, tranokto

7. Vojaĝo al **Helsinki**, vizitado: *Uspiena Koncilio, Senata placo, Katedralo*, vojaĝo al Rusio al Sankt Petersburgo

18. Restado en **Sankt Petersburgo**, partopreno en Internacia Popolarta Renkontigxo,

prezentado de la ensembloj kaj vizito en Junulara Forumo "Kitež +", vizitado de la urbo: *Ermitajxo, Aurora, Koncilio je la Sango, Fortikajxo Pietropavlovskaja, Isakijeva Koncilio, Kazana Koncilio, Neva Prospekto*, Monahejo de *Aleksandro Nevsko, ev. sxipekskurso sur Neva kaj kanaloj de Sankt Petersburg, nomata Venecio de Nordo*, tranoktoj

7. Vojaĝo al **Petrodvorec**: Somera Cara Palaco kun famaj fontanoj, daurigo de la vojaĝo al Tartu – lau itinero de infantaj kasteloj: **Valmiera – Cesis – Sigulda**, al Riga, tranokto

7. **Restado en Riga dum 15 IEK**, vizitado: *Kastelo, Katedralo, pregxejoj, Gildio*, tranoktoj

22.07 Vojaĝo el Riga tra **Kruca Monto, Šiauliai** al Vilno, vespera promenado, tranokto

23-30.07 Restado en Vilno kaj partopreno en 90 UK, vizitado de la urbo: *Katedralo, Turo de Gediminas, Mickiewicz-domo, Universitato, Urbodomo, Aurora Pordego, ortodoksa pregxejo de S-ta Triono, Pregxejoj de St. Petro kaj Paulo, de S-ta Anna kaj de Sta Johano, tombarejoj Rasos kaj Paneriai*, kaj tuttaga busekskurso lau itinero de Ludoviko Zamenhof: Vilno–Druskininkai-**Veisiejai**-Alytus-Birštonas - **Trakai** - kastelo sur la lago Galve, karaimaj domoj, muzeo kaj Kienesas(sanktejo), tranoktoj en **Vilno**

30/31.07 Vojaĝo al **Kaunas**, vespera promenado tra la urbo, *Kastelo, Katedralo, Urbodomo, Avenuo de Libereco, Domo de Perkunas kaj Esperanto Domo cxe la strato L.Zamenhofo 5*, nokta vojaĝo al Pollando, tra Bialistoko, Varsovio, Toruń al Bydgoszcz

PREZO: 700 Euroj + 200 Euro (kostoj survoje)

Varianto "D": 2.07 – 23.07.2005 Itinero kaj programo kiel en varianto "C", sen la restado dum 90 UK en Vilno

PREZO: 500 Euroj + 200 Euro (kostoj survoje)

Varianto "E": 13.07 – 31.07.2005

POLLANDO -LITOVIO –LATVIO –ESTONIO –FINNLANDO –RUSIO –ESTONIO-LATVIO-LITOVIO-POLLANDO

13/14.07 Bydgoszcz, Varsovio, Kaunas, Šiauliai, Kruca Monto, Riga, Tallinn, tranokto

7. Vizitado de **Tallinn**: Supra kaj Malsupra urbo, pramekskurso al **Helsinki**, vizitado: Uspiena Koncilio, *Senata Palco, Katedralo*, nokta vojaĝo al Sankt Petersburgo
7. Restado en **Sankt Petersburgo**, partopreno en Internacia Popolarta Renkontiĝo, prezentado de la ensembloj kaj vizito en Junulara Forumo “Kitež +”, vizitado de la urbo: *Ermitaĵo, Aurora, Koncilio je la Sango, Fortikajxo Pietropavlovska, Isakijevo Koncilio, Kazana Koncilio, Neva Prospekto*, Monaĥejo de *Aleksandro Nevsko*, *ev. sxipekskurso sur Neva kaj kanaloj de Sankt Petersburg*, *nomata Venecio de Nordo*, tranoktoj
7. Vojaĝo al **Petrodvorec**: vizitado: Somera Cara Palaco kun famaj fontanoj, daurigo de la vojaĝo al Narva kaj nokta vojaĝo al Tartu en Estonio

20.07 Vizitado de **Tartu** kaj daurigo laŭ itinero de infantaj kasteloj: **Valmiera – Cesis – Sigulda** kaj **Parko Turaida, Groto Gutmana, Nacia Parko Gauja** al Riga, tranokto

7. **Riga**- vizitado: *Malnova urbo, Riga kastelo, Dometo de 3 fratinoj, Katedralo, Pregxejo de Sta Jakobo kaj Sta Johano, Gildioj, Pulva Turo, Sveda Pordego, partopreno en la Fermo de la 41 Baltaj Esperanto-Tagoj* kaj la 15 Internacia Esperanto Kongreso, tranokto en Riga

22.07 Vojaĝo el Riga tra Latgalio – Aglone – Daugavpilis al Vilno, vespera promeno, tranokto

23-30.07 Restado en Vilno kaj partopreno en 90 UK, vizitado de la urbo: *Katedralo, Turo de Gediminas, Mickiewicz-domo, Universitato, Urbodomo, Aurora Pordego, ortodoksa pregxejo de S-ta Triono, Pregxejoj de St. Petro kaj Paulo, de S-ta Anna kaj de Sta Johano, tombarejoj Rasos kaj Paneriai*, kaj tuttaga busekskurso laŭ itinero de Ludoviko Zamenhof: Vilno–Druskininkai–**Veisiejai**-Alytus-Birštonas - **Trakai** - kastelo sur la lago Galve, karaimaj domoj, muzeo kaj Kienesas(sanktejo), tranoktoj en **Vilno**

30/31.07 Vojaĝo al **Kaunas**, vespera promenado tra la urbo, *Kastelo, Katedralo, Urbodomo, Avenuo de Libereco, Domo de Perkunas kaj Esperanto Domo cxe la strato L.Zamenhofo 5*, nokta vojaĝo al Pollando, tra Bialistoko, Varsovio, Toruń al Bydgoszcz

PREZO: 600 Euroj

Varianto “F”: **13.07 – 23.07.2005** - Itinero kaj programo kiel en varianto “E”, sen la restado dum 90 UK en Vilno

PREZO: 400 Euroj

Varianto “G”: **13.07 – 31.07.2005**

POLLANDO-LITOVIO-LATVIO-ESTONIO- fakultative FINNLANDO-LATVIO-LITOVIO-POLLANDO

13/14.07 Bydgoszcz, Varsovio, Kaunas, Šiauliai, Kruca Monto, Riga, **Tallinn**, vizitado, tranokto

7. Fakultativa ekskurso per flugsxipo (cx.30 Euro) al **Helsinki**, vizitado: *Katedralo, Senata Placo, Uspiena Koncilio*, reveno al Tallinn, vojaĝo tra markurorto Parnu al Riga, tranokto
7. **Partopreno en la 15 Internacia Esperanto Kongreso kaj la 41 Baltaj Esperanto Tagoj en Riga (Latvio): Interkona Vespero de la 15 IEK kaj 41 BET**
7. Inauguro de la 41 BET i 15 IEK, komuna vojaĝo al **Jurmala** kaj **Tukmus** kaj partopreno en la Folkloro Festivalo, vizitado, reveno por tranokto al Riga
7. Vizitado de **Riga**, koncerto de la ensembloj en la centro de la urbo por la logxantoj, tranokto
7. Ekskurso al Kurlando al duoninsulo **Kolka**, vizito en Kulturcentro de Livoj, **Nacia Parko Slitere, Ventspils**, reveno tra historiaj regionoj de Kurlando kaj Livonio por tranokto en Riga
7. Partopreno en la programo de 41 BET kaj 15 IEK en Riga, sxipekskurso sur rivero Daugava – Diskutoj pri la turismaj temoj reveno por la tranokto en Riga

20.07 Ekskurso laŭ itinero de infanraj kasteloj: **Cesis – Sigulda kaj Parko Muzeo Turaida, Groto Gutmana, Nacia Parko Gauja** reveno al Riga, tranokto

7. Fermo de la 41 BET kaj 15 IEK, libera tago, tranokto en Riga
7. Vojaĝo el Riga tra Latgalio –Aglone – Daugavpilis al Vilno, vespera promenado, tranokto

23-30.07 Restado en Vilno kaj partopreno en 90 UK, vizitado de la urbo: *Katedralo, Turo de Gediminas, Mickiewicz-domo, Universitato, Urbodomo, Aurora Pordego, ortodoksa preĝejo de S-ta Triono, Preĝejoj de St. Petro kaj Paulo, de S-ta Anna kaj de Sta Johano, tombarejoj Rasos kaj Paneriai*, kaj tuttaga busekskurso laŭ itinero de Ludoviko Zamenhof: Vilno–Druskininkai-**Veisiejai**-Alytus-Birštonas - **Trakai** - kastelo sur la lago Galve, karaimaj domoj, muzeo kaj Kienesa(sanktejo), tranoktoj en **Vilno**

30/31.07 Vojaĝo al **Kaunas**, vespera promenado tra la urbo, *Kastelo, Katedralo, Urbodomo, Avenuo de Libereco, Domo de Perkunas kaj Esperanto Domo cxe la strato L.Zamenhofo 5*, nokta vojaĝo al Pollando, tra Bialistoko, Varsovio, Toruń al Bydgoszcz

PREZO: 550 Euroj

Varianto “H”: 13.07 – 23.07.2005

Itinero kaj programo kiel en varianto “G”, sen restado en Vilno dum 90 UK **PREZO: 350 Euroj**

Varianto “ I ”: 14.07 – 31.07.2005

POLLANDO- LITOVIO -LATVIO-LITOVIO-POLLANDO

14/15.07 Forveturo el Bydgoszcz tra Varsovio, Bialistoko, Kaunas al Riga

7. **Partopreno en la 15 Internacia Esperanto Kongreso (15 IEK) kaj en 41 Baltaj Esperanto Tagoj en Riga (41 BET)**: Interkona Vespero dum 15 IEK kaj 41 BET
7. Inauguro de 41 BET kaj 15 IEK, komuna vojaĝo al **Jurmala** (ripozo cxe Balta Maro)
Kaj al **Tukums** kaj partopreno en Folkloro Festivalo, vizitado, reveno por tranokto al Riga
7. Vizitado de **Riga**, koncerto de la ensembloj en la centro de la urbo por logxantoj de Riga, tranokto
7. Ekskurso al duoninsulo **Kolka**, Kulturdomo de Livoj, **Nacia Parko Slitere, Ventspils**, tranokto en Riga
7. Partopreno en la programo de la **41 BET** kaj **15 IEK** en Riga, sxipekskurso sur la rivero Daugava – diskuto pri turismaj temoj, reveno por tranokto en Riga
7. Ekskurso laŭ itinero de infanraj kasteloj: **Cesis – Sigulda kaj Parko – muzeo Turaida, Grotoj Gutmana, Nacia Parko Gauja**, reveno al. Riga, tranokto
7. Fermo de la 41 Baltaj E-Tagoj kaj de la 15 Internacia E-Kongreso, libera tago, tranokto en Riga
7. Vojaĝo el Riga tra **Kruca Monto, Šiauliai** al Vilno, vespera promenado, tranokto

23-30.07 Restado en Vilno kaj partopreno en 90 UK, vizitado de la urbo: *Katedralo, Turo de Gediminas, Mickiewicz-domo, Universitato, Urbodomo, Aurora Pordego, ortodoksa preĝejo de S-ta Triono, Preĝejoj de St. Petro kaj Paulo, de S-ta Anna kaj de Sta Johano, tombarejoj Rasos kaj Paneriai*, kaj tuttaga busekskurso laŭ itinero de Ludoviko Zamenhof: Vilno–Druskininkai-**Veisiejai**-Alytus-Birštonas - **Trakai** - kastelo sur la lago Galve, karaimaj domoj, muzeo kaj Kienesa(sanktejo), tranoktoj en Vilno

30/31.07 Vojaĝo al **Kaunas**, vespera promenado tra la urbo, *Kastelo, Katedralo, Urbodomo, Avenuo de Libereco, Domo de Perkunas, kaj Esperanto Domo cxe la strato L.Zamenhofo 5*, nokta vojaĝo al Pollando, tra Bialistoko, Varsovio, Toruń al Bydgoszcz

PREZO: 500 Euroj

Varianto “ J ”: 14.07 – 23.07.2005 POLLANDO- LITOVIO -LATVIO-LITOVIO-POLLANDO

Itinero kaj programo kiel en varianto "I", sen restado dum 90 UK en Vilno **PREZO: 300 Euroj**

Varianto " K ": 23.07 – 31.07.2005

POLLANDO- LITOVIO -POLLANDO

7. Forveturo el Bydgoszcz, vojaĝo tra Varsovio, Bialistoko al Vilno

23-30.07 Restado en Vilno kaj partopreno en 90 UK, vizitado de la urbo: *Katedralo, Turo de Gediminas, Mickiewicz-domo, Universitato, Urbodomo, Aurora Pordego, ortodoksa preĝejo de S-ta Triono, Preĝejoj de St. Petro kaj Paulo, de S-ta Anna kaj de Sta Johano, tombarejoj Rasos kaj Paneriai*, kaj tuttaga busekskurso laŭ itinero de Ludoviko Zamenhof: Vilno–Druskininkai-**Veisiejai**-Alytus-Birštonas - **Trakai** - kastelo sur la lago Galve, karaimaj domoj, muzeo kaj Kienesa(sanktejo), tranoktoj en **Vilno**

30/31.07 Vojaĝo al **Kaunas**, vespera promenado tra la urbo, *Kastelo, Katedralo, Urbodomo, Avenuo de Libereco, Domo de Perkunas kaj Esperanto Domo cxe la strato L.Zamenhofo 5*, nokta vojaĝo al Pollando, tra Bialistoko, Varsovio, Toruń al Bydgoszcz

PREZO: 200 Euroj

La cxi-supraj prezoj de laŭvicaj vojaĝvariantoj inkluzivas vojaĝojn per busoj kaj pramoj, logxadon, kostojn de organizado kaj de Esperanto-gvidantoj kaj Esperanto-cxixeronojn; ne inkluzivas mangxadon kaj enirbiletojn por muzeoj kaj aliaj vidindaĵoj, ankaŭ vizokostojn (cxefe al Rusio – variantoj C-D-E-F), kiujn necesas arangxi en siaj landoj. Kadre de la prezoj estas kalkulita aligxkotizo por la 15-a Internacia Esperanto-Kongreso en Riga (15-22.07.2005), sed aparte estas pagataj aligxkotizoj por 41 BET en Riga kaj 90 UK de Esperanto en Vilno (23-30.07.2005), kiuj estas pageblaj rekte cxe CO de UEA.

Kun diversaj vojaĝxvariabtoj eblas ekveturi survoje laŭ la programoj.

La ses vojaĝxvariantoj (A,C,E,G,I,K) estas por tiuj, kiuj volas partopreni la vojaĝojn inkluzive de nautaga (22-30.07.2005) logxado en Vilno kun turisma programo kaj ceteraj kvin vojaĝxvariantoj (B,D,F,H,J) estas por tiuj, kiuj post alveno al Vilno (la 22.07.2005) havos mem arangxitajn kongreskotizon kaj logxadon dum la 90 UK de Esperanto en Vilno (22-30.07.2005).

La aligxojn kaj kotizojn por la nau variantoj (A-K) akceptas:

INTERNACIA KLUBO "ESPERANTOTUR"

Str. M.Skłodowskiej-Curie 10

PL-85-094 Bydgoszcz, POLLANDO

Tel./fax: (48,52) 346-11-51

Rete: info@esperanto-turismo.com

Banka konto: 80 1320 1117 2034 0100 2000 0001 Kodo SWIFT POCZPLP4

- Se Vi aligxos kaj pagos gxis la 5-a de decembro 2004, Vi gajnos "**Novjaran Promocion 2005**" – 10% - tiam suficxos pagi ceterajn 90% de la prezoj (survojaĵ kostoj estas sen rabatoj en variantoj A,B,C,D)

- se vi estas membro de Internacia Klubo "Esperantotur" vi gajnas promocion de 25%, do, tiam suficxas pagi 75% de la prezoj.

Ni bondeziras sukcesajn vojaĝojn por Blankaj Noktoj 2005 kun 15 Internacia Esperanto-Kongreso kaj 41 Baltaj Esperanto-Tagoj en Riga (Latvio) kaj 90 Universala Kongreso de Esperanto en Vilno (Litovio)

INTERNACIA KLUBO "ESPERANTOTUR"

Str. M.Skłodowskiej-Curie 10

PL-85-094 Bydgoszcz, POLLANDO

Tel./fax: (48,52) 346-11-51

Rete: info@esperanto-turismo.com

Retpagxo: www.esperanto-turismo.com

Boris'a Milic'evic' informas:

OMAGXE AL D-RO L. L. ZAMENHOF,
KAJ AL LITERATURO, EN **SERBIO**

Esperanto-societo "Marko Nes'ic' ", Novi Sad 8. decembro 2004

Granda arangxo en la gimnazio "Svetozar Markovic' ", Novi Sad: Dank' interkonsento de ES-prezidanto kun la direktorino, ni okazigis merkredon – la 8an de decembro rimarkindan E-arangxon kiun cxeestis pli ol cent (100) lernantoj de cxi-gimnazio kaj atenteme sekvis la prelegojn. Boris'a Milic'evic', prezidanto de Vojvodina Esperanto-Ligo (VEL) kaj direktoro de Esperanto-Instituto de SEL prezentis cxeefprelegon "Primena i s'irenje medjunarodnog jezika i svetu" (Aplikado kaj disvastigado de la internacia lingvo Esperanto en la mondo". Kromprelegojn faris s-roj Ivan Opac"ak, nuna prezidanto de ES kaj Pane Djukic', aktivulo de ES. S-ro Opačak montris, klarigante, plurajn librojn, inkl. antologiojn, gazetojn kaj parolis pri ES-intencoj en Novi Sad kaj du-tri aliaj lokoj en Vojvodino, Serbio – aperigo de la lernolibro Medjunarodni jezik ESPERANTO, udžbenik za ekspresne kurseve (Internacia lingvo Esperanto, lernolibro por ekspresaj kursoj, de Boris'a Milic'evic') kun la aldonita vortaro (enhavanta cxiujn E-vortojn kiuj trovigxas en la lernolibro), kaj de la Vortaro Esperanto-serbokroata verkita de Ivan Opac"ak kaj Pane Djukic'. S-ro Pane Djukic' parolis pri la antauxa kaj aktuala aktivado de fervojistoj en la mondo kaj cxe ni kaj pri IFEF-kongresoj, emfazante la gravecon de Esperanto en tiu sfero. Post la prelegoj estis kelkaj demandoj kaj, kompreneble, respondoj. La interese al Esperanto ekzistas tie kaj ni firme esperas tre baldaux organizi E-kurson por la gelernantoj.

Esperanto-societo "Radomir Klajic' ", Beograd

13. decembro 2004

En tiu cxi societo la gemebroj omagxis al D-ro L. L. Zamenhof la 13a de

decembro 2004 per kuna recito de lia unua parolado fare de pluraj personoj kaj turnis la atenton al la nuna stato de Esperanto.

Esperanto-societo, Senta

14 decembro 2004 Lauxpromese el oktobro, la gemebroj de tiu cxi societo omagxis al D-ro L. L. Zamenhof la 14an de decembro 2004 per recito de pluraj poemoj de li mem, F. Siladxi, R. Sxvarc kaj W. Auld en tri lingvoj (Esperanto, serba kaj hungara).

15. decembro 2004

Tutlanda [taggazeto POLITIKA](#) aperigis, dank' s-ro Dimitrije-Diso Janic'ic', la dukolonan artikolon pri Esperanto la 15an de decembro 2004. La jxurnalisto Slobodan Kljakic' donis al gxi la antauxtitolon "Hodiaux estas la monda tago de esperantistoj" kaj la titolon "Esperanto kiel gepatra lingvo" (cxar antaux kelkaj tagoj naskigxis la ina bebo de Sonja Petrović kaj Hokan Lundberg en Beograd). Li menciis ene plurajn agemajn esperantistojn. S-ro S-o Janic'ic' jam sendis la artikolon al Komunikad-centro en Bruselo.

Unuigxo de esperantistoj "La Suda Stelo", Beograd

16. decembro 2004

La geblinduloj, precipe ties prezidantino, klopodis kaj organizis la 15an de decembro 2004 placxan arangxon dedixitan al D-ro L. L. Zamenhof kaj Esperanto. Cxeestis ankaux kelkaj esperantistoj kiel gastoj. La programo konsistis el prelego kaj pluraj kantprogrameroj.

La prelegon pri Zamenhof, E-literaturo, precipe antologioj – internaciaj

kaj enlandaj, nuna stato de E-o kaj pluaj taskoj por disvastigado [prezentis Boris'a Milic'evic'](#). (Rimarkigo: *tion cxi bluan mi nun aldonis, cxar mi hazarde ne indikis gxin en la jam sendita informo*). S-ino Saveta Djordjevic' kantis la epikan poemon "Cara vespermagxo" (el la Antologio de la serba parola literaturo Beograd, 1991), la gebuboj recitis kaj kantis du porinfanajn tekstojn dank' al s-ino Tereza Kapista. Tri membroj (Nedeljka Loz'ajic', Vesna Radulovic' kaj Branko Buric') kantis Esperante unu tre placxan serban kanton. Fine Borisxa Milic'evic' donacis al la Unuigxo 5 ekz. de la libro "Poeziaj Donacoj" (nome de ES el Novi Sad) kaj (persone) 5 ekz. de la serblingva libreto Esperanto u sluz'bi svetske kulture i medjunarodnog sporazumevanja (Esperanto en servo al la monda kulturo kaj internacia interkomprenigxo). La etoso estis vere amikeca.

Aldono: Esperanto-societo "C'ele Kula", Nis'

17. decembro 2004 Ankaux en cxi tiu societo okazis bona arangxo dedixita al D-ro L. L. Zamenhof kaj Esperanto. Estis prezentitaj du prelegoj kaj kultur-amuza programo. Cxeestis pluraj dekoj da esperantistoj kaj amikoj de Esperanto.

From: Borisa Milicevic [esp@EUnet.yu]

Sent: Saturday, January 08, 2005 1:05 AM

To: Aurora Bute

Cc: Renato Corsetti; Viktor Galeski; Grozdenka Filipova; Samir Ribic; Bandhyl Selimi
Subject: Re: Informo pri publika prezento de la Bulteno "MOST" (Ponto)

Estimataj,
Cxar la subaj retadreso ne akceptis la mesagxon,
mi sendas gxin al vi cxi-maniere.
Plenestime,
Boris'a Milic'evic'

----- Original Message -----

From: [Borisa Milicevic](mailto:Borisa.Milicevic)

To: serbaj-kaj-montenegraj-esperantistoj@yahogroups.com

Cc: balkana-komisiono-de-uea@yahogroups.com

Sent: Friday, January 07, 2005 10:06 AM

Subject: Re: Informo pri publika prezento de la Bulteno "MOST" (Ponto)

Informoj de Manfred Westermayer

AVE - Mozaikeroj 29c

Tutmonda Mozaiko Aveno 29c

Palestino: Pli ol 60% vocxdonis por Mahmud Abbas, nova cxefministro. Li pretas kunsidi kun Israelo, kaj sekvi la vojon de la t.n. Voj-Mapo (en: Road Map (1999) kaj Oslo(1993)).

22a de Januaro okazos la unua kunsido. Oni deziras sukceson al t.n. Ronda Tablo kie kunsidos Israelo kaj Palestino, Usono kaj EU. Bona komenco venis ankaux de Israelo, kiu re-tiras la setlantojn en la t.n. Gaza-Strio. Palestino bezonas la perspektivon al auxtonoma sxtateco, ekonomia evoluigxo kaj plena homa digno al siaj civitanoj, kiuj nun mankas pro la mutuala pliakrigo de la situacio (forpreno de la tereno flanke de setlantoj, terorismo, mortigado, barado per la israela muro, kiu ofte trovigxas sur la palestina tereno).

(Deutschlandfunk, Intervjo kun Jean Apfelborn - ministro pri eksteraj aferoj de Luksemburgo, kiu nuntempe okupigxas pri la EU-prezidenteco 2005-01-11)

Sirio - Aktham Naisse ricevas Homrajto-Premion:

Li estas advokato kiu jam delonge batalas por respekto de la Homaj Rajtoj en Sirio, kie regxas sama ne-demokrata Baath-Partio kiel en la iama Irako. 1989 li kunfondis la Komitaton por la Defendo de Demokrataj Liberecoj kaj Homaj Rajtoj (CDDLHR). Ili postulas la abolicion de la Legxoj sub Kriza Stato (de 1963); kaj organizis segxan blokadon antaux la parlamento favore al la liberigo de politikaj arestitoj. La premion de la Martin-Ennals- Fonduso el Svisio (20 mil da SFR) subtenas 9 internaciaj NRO-oj, inter ili Amnestio Internacia.

(Die Tageszeitung (taz), Beate Seel 2005-01-12)

Irano: Unu jaro post la katastrofa tertremo/sismo en Bam oni vidas sukcesojn; aparte rilate la infrastrukturo, belajn lumigitajn stratojn. AD (Anadoli Development) konstruis domojn, sed ili ne rajtas finkonstrui ilin, pro kompetenteco-problemoj; dume homoj devos resti la duan vintron en tendoj. La profesia eduko de infanoj, inter ili multaj orfoj, jam komencigxis. Aparta problemo estas, ke Bam situas je la t.n. drogo-vojo, al la okcidento - homoj al kiuj mankas bona perspektivo pli facile inklinas la drog-uzado.

(Deutschlandfunk, Chr. Breuer 2005-01-10)

Belarusio: Post la Orangxa Revolucio en najbara Ukrainio ankaux tie diskutas la homoj pri politiko. La belarusa ambasadoro en Latvio, Marinicx, estis malliberigita por 5 jaroj, cxar li montris intereson kandidatigxi kiel prezidento. Simile al centraziaj sxtatoj ankaux Lukashenko regxas kiel diktatoro, kiu malsxatas kritikon. Krom la prezidento riprocxis la Goethe- Instituton k.a. ke ili "eksportas virinojn al okcidento por prostitucio". tio certe estas problemo, sed certe aliaj strukturoj okupigxas pri tia homo-sxakrado. Kaj li ankaux volas malpermesi, ke infanoj, suferantaj pro la radiada malsano (pro Cxernobil (1986-04-26!)), ne plu rajtas kuraci sin eksterlande.

(Deutschlandfunk, Jan Kallukat 2005-01-11)

Sismo-Cunama Katastrofo cxirkaux la Hinda Oceano: Por longdauxra helpo al la sxtatoj necesas rimedoj specifaj laux la lando. Rekta abolicio de sxuldoj (plej facile) aux eble pli efike kondicxi, ke tiu mono estu investita por katastrofo-protektado. La landoj timas, ke sxuld-abolicio eble reduktos ilian financan bonecon. Aliaj tauxgaj rimedoj estus: malaltigi la doganajn merkato-barojn, ekz-e rilate tekstilaj produktoj. Kunlaboro ne funkcias kun Somalia, cxar tie mankas sxtata auxtoritato (registaro) kaj kun Myanmar/Birmo, kie regxas militara regximo; sole la Rugxa Kruco povas aliri tien.

(Deutschlandfunk, Intervjuo kun Uschi Eid (Verda Partio) -
sxtatsekretario pri ekonomia kunlaboro 2005-01-11)

Tutmonda Mara Malpurigo per Plastikajxoj: Plej multaj maraj birdoj kaj fisxoj nevole kolektas plastikajxojn en siaj stomakoj, kiu endangxerigas ilin. Gxi venas el la rubajxo de sxipoj kaj el riveroj. Do, bonvolu ne simple forjxeti kia ajn plastikajxojn, sed kie ne jam funkcias, kunlaboru por kolektado kaj aux reciklado aux kontrolita forbrulado - kun lavado de la fumo kaj uzo de la energio.

(Deutschlandfunk, 2004-12; red.)

Gripo-Pandemio kiam ? Epidemiologoj timas ke iam okazos nova severa gripo-epidemio; elvenante el la t.n. birdo-gripo en sud- orienta Azio. Se gxi okazos oni timas gxis milionojn da mortoj kaj multe pli da malsanuloj. Ili postulas, ke la sxtatoj mendu la vakcinon jam nun, cxar sen mendo la firmaoj ne volas riski la produktadon; temas pri 100 milionoj da EUR.

(Deutschlandfunk, 2005-01-12)

DISKUTLISTOJ PLI KAJ PLI AKTIVAS

Krom la civitana diskutlisto "portiko", kiu funkcias kiel libera kaj sencenzura kafejo pri kulturo kaj politiko, lastatempe du novaj diskutlistoj pli kaj pli aktivas, lige kun du partioj. La unua estas blanka@esperantio, por la personoj proksimaj al la idealoj de la Blanka grupo en la Civita Senato. La dua estas verda@esperantio, kiu traktas la temaron karakterizan por la platforma Alvoko de la 13a de agosto 2004. La diskutlisto ne estas rezervita al personoj kun la esperanta civitaneco. Jen la teksto de la menciita Alvoko:

ALVOKO POR NOVA MALDEKSTRO EN ESPERANTIO

La historio de la maldekstro en Esperantio kunfandighas kun tiu de la t.n. "laborista movado" kiu, dum UK en Prago 1921, secesiis de la gherala movado sub la Lanti-devizo "For la neutralismon!". Tiam fondighis SAT, kies statuto registris la klasbatalon kiel esencon kaj estontecon de la laboristaro. Tiu koincidigo shajnis normala, en mondo kie la maldekstro sinonimis al socialismo, komunismo, anarkiismo: ili chiu analizis la historion tra la klasbatala metodo. Verdire, ne chiu maldekstre akceptis tiun metodon. Apud Bakunin kaj Marx, la tria kunfondinto de la unua Internacio, en Londono 1864, nome Mazzini, rifuzis kaj ateismon kaj klasbatalon. Pro sia verdeco, la historia flago de la laborista E-societo el Ghenovo 1922 agacis profesoron Duc Goninaz dum la 76a SAT-Kongreso en Chaudefono; ni bonvole proponas al li politikan, anstatau polikromian motivadon -tiu societo inspirighis al Giuseppe Mazzini. Ne tre surpriza, en la panoramo de la tiama maldekstro, estas la manko de tria, efektive ne proleta komponanto (kvankam trovighis vegetaranoj ech inter proletoj): la t.n. "Lebensreform", kiu per la serchado de alternativa vivostilo (kun korolario de vegetarismo, abstemio, nudismo) iom aspektas kvazau praekologiisma movado. Aldonighas la feminismo, kiun SAT ghis nun konsideras malgrava, char ghia demando solvighus ene de la klasbatala dialektiko. Oni komprenas do kial Edmond Privat, kiu kredis en Dio, akceptis la Gandhi-metodon kaj ne la klasbatalan, aktivis kiel feministo kaj partoprenis en Lebensreform (estante vegetarano kaj nudisto), neniam alighis al SAT, kvankam maldekstrulo, membro de la Svisa Socialista Partio. Pluraj el ni alighis al SAT unuavice pro respekto al ghia kultura tradicio, kiu entenas la persekutojn suferatajn en orienta Europo (ekde Stalino ghis la Pollando de Jaruzelski), la glorajn paghojn de la kontraufashisma rezistado (en Germanio, Iberio, Nederlando, Francio ktp), la valoran eldonan aktivecon, kun kulmino en Plena Vortaro kaj Plena Ilustrita Vortaro. Tiun respekton ni daure havas, sed samtempe ni opinias ke la Asocio, kun sia statuto pri klasbatalo, kiu spegulas anakronisman analizon pri la socio, ne kapablas interpreti la novan maldekstron, turnitan al la lukto por civilaj kaj civitaj rajtoj, en kunteksto kie la unua kaj dua ekonomiaj sektoroj, rezervuoj por la klasbatalo, farighis marghenaj kompare kun la tria. Venis la momento krei novan opinimovadon kiu, aksita sur la maldekstra majoritato en la Civita Senato, estu malfermita al chiu forto de la nova maldekstro en Esperantio: ekologiisma, feminisma, pacifisma, lingvorajta, esprimlibera, mondcivitana, sociforuma, federisma kaj malcentralisma... Unuaj subskribintoj de la supra alvoko: David Buhlmann, Marie-France Conde Rey, Leen Deij, Jarl Hammarberg, Ivanichka Magharova, Perla Martinelli, Walter Zelazny (SAT-anoj), Anatolo Goncharov, Oleg Izjumenko, Liraz Jogev, Bertil Nilsson, Marco Picasso, Giorgio Silfer, Ljubomir Trifonchovski. (por pliaj subskriboj: <pakto £ freesurf.ch>)

Radiostacio Europe 1

Pro tio [ke la Francoj ne konsentas], dum atendo, iuj prezentas la ideon paroli en Esperanto en Europo, lingvo kiu apartenas al neniuj kaj kiun cetere neniuj parolas (tie kushas la problemoj). Por reagi (prefere el la tuta mondo, ech angle kun kelkaj vortoj en Esperanto : valoras montri al Europe 1 ke ni estas ne malmultaj kaj ke la nura problemoj kushas en la manko de informado kaj misinformado) : <http://www.europeinfos.com/participez/courriel.jsp> Oni ekscias ke la tradukkkostoj voras 1 miliardon 200 milionojn da euroj (plialtighos je 35%). Valoras ne nur montri ke homoj praktikas la lingvon sed ankaŭ ke ghi estas uzata en multaj sferoj de la homa vivo. Eblas ankaŭ memori ke por Suda Azio oni malfacile

kolektos 3-4 miliardojn da euroj dum la tutmonda jara budgeto de armado (onidire de "defendo" sed plejofte de prirabado) estas 900 miliardoj da euroj...Ek al novaj aventuroj !
La jaro jhus komencighis ;-))))

Henri Masson

Leteroj

Artur farig'is patron

Pershendetje, shume i dashur dhe i nderuar z. Bardhyl! Faleminderit per mesazhet dhe informacionet tuaja. Me 2 tetor jam bere baba. Gruaja ime ka linduar vajzen tone, Florinen. Me 5.tetor dorezova punen per diplomen, nje veper me rreth 120 faqe. Me 12 tetor kolloquium-i - provimi me goje. Perfundimisht e mora graden inxhinier. Per 1-2 muaj jam njehere ketu tek firma ku kam bere semestrin e praktikes dhe projektin e diplomes dhe po implikoj ca zgjerime. Me paguajne mire, por eshte vetem per nje kohe te shkurter. Shpresoj te me oforjne nje kontrate per nje vit, qe te marr leje pune edhe pas studimit. Kjo do te ishte idealja. Po edhe pak fat duhet. Prandaj me uroni fat ;-) E di qe nuk ju kam ndihmuar fare per shume kohe. Shpresoj te ma falni. Kur te vijne dite me te mira per mua, shpresoj te jete me mire edhe per Esperanton. Ne fakt kam menduar shpesh per ju. Ju uroj gjitha te mirat dhe nje fundvit te mbare familjarisht!

Arturi

TURISMA ESPERANTO-KALENDARO 2005

PLANATAJ VOJAĜOJ DE INTERNACIA KLUBO "ESPERANTOTUR"

POR INTERNACIAJ ESPERANTO-ARANĜOJ EN 2005

1/ AŬSTRALIO 07.01-30.01.2005 Flugo por la 20-a AŬstralia Esperanto-kursaro

en Adelajdo kun
Melbourne kaj
Sydney

2/ POLLANDO 11.01-20.02.2005 Internacia Pedagogia E-Kurso en BYDGOSZCZ

kun kursoj pri
fotado kaj
filmado

3/ DR KONGO 22.02-10.03.2005 E-vizito en DR Kongo kun preparo de E-filmo,

kion aranĝas
AFRIKA
TURISMO

4/ NEPALO 27.02-15.03.2005 Internacia E-Flugo por la 4-a Azia Kongreso de Esperanto

en Katmando kun
Antaŭ- kaj
Postkongreso

5/ FRANCIO 25.03-03.04.2005 tra Germanio-Luksemburgo-Belgio-Britio- Nederlando

- o vizito en 6 eŭropaj ĉefurboj kaj en la Kongreso en

BOULOGNE sur Mer, okaze de 100-jariĝo de la unua E-Kongreso

6/ IRANO 30.03-13.04.2005 Esperanto-vizito en IRANO kun ĉirkaŭvojaĝo

7/ POLLANDO 23.04-03.05.2005 30 Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kun Ĝenerala Kunveno

de Internacia Klubo "Esperanto tur" (24.04.2005), Internacia

kurso por Esperanto-vojaĝgvidantoj kaj 27-a AKB-Sesio de AIS

8-9/ UKRAINIO 25.04-11.05.2005 Du busvojaĝoj por partopreni "AROMA JALTO 2005"

tra Ukrainio aŭ tra Ukrainio, Rumanio, Moldavio kaj Dniestra Respubliko

10-14/ ĈINIO 07.05-03.06.2005 Kvin vojaĝvariantoj por partopreni la 21-an Internacian

Simpozion pri Esperanto Turismo en Ĉinio

15/ BULGARIO-TURKIO 29.05-12.06.2005 tra Slovakio, Hungario, Serbio, Rumanio. Busvojaĝo

por partopreni Balkanan Esperanto-Kongreson en KARLOVO – Valo de Rozoj kaj viziti Istanbulon

16/ POLLANDO 15.06-23.06.2005 La 27-a Ĉebalta Esperanto Printempo en MIELNO apud Koszalin

17/ BELGIO 24.06-01.07.2005 tra Germanio, Luksemburgo, Francio, Nederlando por la 15-a

Eŭropa Esperanto-Forumo en Bruselo kun intersaj vizitoj i.a. en Parizo

18-28/ LATVIO-LITOVIO 02.07-31.07.2005 tra Pollando, Germanio, Danlando, Svedio, Norvegio,

Finnlando, Rusio, Estonio, LATVIO, LITOVIO– 11 Vojaĝvariantoj tra Skandinavio kaj Baltaj Landoj por partopreni:

- 15 Internacian Esperanto-Kongreson en RIGA (14-22.07) – Latvio (15 IEK)
- 41 Baltajn Esperanto-Tagojn en RIGA (15-21.07) – Latvio (41 BET)
- 90 Universalan Kongreson de Esperanto en VILNO (23-30.07) – Litovio (90 UK)

29/ HISPANIO 30.07-22.08.2005 tra Litovio, Pollando, Germanio, Luksemburgo, Francio,

Andoro, Italio, Aŭstrio–Busvojaĝo tra Eŭropo por ripozi ĉe Mediteraneo en Valencio post la 90 UK en Vilno.

30/ MAROKO 30.07-22.08.2005 Eŭropo-Afriko tra Litovio, Pollando, Germanio, Luksemburgo, Francio, Andoro, Hispanio, Maroko, Portugalio, Monako, Italio, Aŭstrio – vizitoj post la 90 UK en Vilno.

31/ POLLANDO 31.07-07.08.2005 61-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en ZAKOPANE

32/ BULGARIO 19.08-31.08.2005 tra Slovakio, Hungario, Serbio, Rumanio – Busvojaĝo por

partopreni la SUS-28 de AIS en KARLOVO aŭ ripozo ĉe Nigra Maro kaj vizito en Istanbulo (Turkio)

33/ MONGOLIO 23.08-01.09.2005 Vizito en Mongolio laŭ spuroj de Ĝingis Ĥan

34/ POLLANDO 05.09-24.09.2005 Sesio de Pola Societo de AIS kun instruado de Esperanto,

pola lingvo kaj kultur-turisma
programo kun ev. BUS-6 en
LUBLIN

35/ POLLANDO 24.09-30.09.2005 30-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo

en Bydgoszcz kune kun la 28-a AKB Studadsesio de AIS okaze de Monda Tago de Turismo

36/ POLLANDO 30.09-02.10.2005 ARKONES 2005 – Artaj Konfrontoj Esperantistaj en POZNAŬ

37-41/ USONO 06.10-30.10.2005 5 vojaĝoj al Usono por viziti Kalifornion, Alaskon kaj Havajon.

42-45/ USONO-GUAMO-JAPANIO-KOREUJO-TAJLANDO-LAOSO-KAMBOĜO 06.10-25.11.2005

Kvar vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo kun E-vizitado de San Francisco, Alasko, ripozo en Havajo kaj vizitado de Guamo, Tokio, Seulo, Bangkoko kaj ev. Laoso kaj Kamboĝo

46-50/ TAJLANDO-LAOSO-KAMBOĜO-VJETNAMIO 05.11-11.12.2005

- Kvin vojaĝoj kun mondvojaĝanto Remigiusz Mielcarek tra Tajlando, Laoso, Kamboĝo kaj fine Vjetnamio por viziti kaj partopreni Zamenhofajn Tagojn en Vjetnamio.

Programoj de la E-vojaĝoj riceveblaj de Internacia Klubo "Esperantotur" kaj ĉe la organizantoj de la E-aranĝoj.

El diplomlaboraj'oj de niaj studentoj

La turismaj areoj en Suda Marbordo de Albanio

La urbo de Vlora

Vlora estas antikva urbo etendig'anta sudokcidente de Albanio, c'erande de Adriatika maro en la golfo samnoma. En pratempo g'i konatis per la nomo Aulona. La komencig'oj de la urbo apartenas al VI jarcento antaŭ Kristo kaj g'i havas jarcentan kontinuecon kio alportas g'in g'is nuntempo. Tiu kontinueco estas plena je militaj historioj, okupacioj, sed ankaŭ briloj kaj venkoj. Vlora estas la urbo kie oni proklamis la sendependecon de Albanio. Ekde pratempo, g'i konatis kiel gravan marhavenon, hodiaŭ Vlora estas la dua marhaveno laŭ grandeco en Albanio. G'i troviĝas en favorebla pozicio kie interkruĉig'as la marvojoj kun tiuj surteraj. G'i estas nur 135 km for de la c'efurbo de la lando, 72 km de Kanalo de Otranto dividas g'in disde Italio kaj 77 mejloj for de la insulo Korfu de Grekio. Tia pozicio garantias al tiu areo amasan movig'adon de turistoj. Vlora konatas de g'iaj plag'oj atingantaj longecon je 7 km (3.5 km sablaj plag'oj, strandoj, kaj 3.5 km s'tonetaj plag'oj), favoreblan klimaton, arkeologiaj kaj historiaj ric'ajoj, kiuj garantias stabilan turismon. Tial la marborda linio de Vlora estas proklamita de Konsilio de Ministroj areo je antaŭeco por la disvolvig'o de turismo.

Kuzbaba

G'i troviĝas je 200 m sude de la Placo de Nacia Flago. Por atingi g'in oni devas ascendi 234 s'tonajn s'tupojn ellaboritaj artisme. Subite vi troviĝos sur s'tona placo kiu impresigas vin kvazau' vi estas sur balkono super la urbo de Vlora. G'uste tiu c'i estas Kuzbaba, la plej alta punkto de la urbo. De tie vi povas admiri la urbon de Vlora en g'ia tuteco kun Monumento de Sendependeco, tombon de Ismail Qemali, monumenton de Avni Rustemi, moskeon de Muradie, Tombejon de Martiroj ka.

Monumento de Sendependeco

G'i starig'as sur la centro de Placo de Nacia Flago. G'i estas skulptaj'a komplekso el bronzo 17 m alta, verko de Skulptistoj de Popolo Kristaq Rama, Mumtaz Dhrami, Shaban Haderi. G'i estas starigita je 28 an de novembro 1972, okaze de 60 - datreveno de Proklamig'o de Sendependeco. La monumento havas du kulminajn simbolojn, patrioton Ismail Qemali kaj la "Flagportanton". G'i starig'as sur mults'tupara platformo centre Ismail Qemali-n, malantaŭ li la ideologojn de renesanco kiel Naim Frasheri-n, batalantojn el c'iu regionoj de Albanio kaj super c'iu ilin staras "Flagportanto". Tie estas personigita la milito de albanaj patriotoj por la libereco kaj sendependeco de Albanio.

La strato Justin Godard

G'i estas la strato tra kiu estas mars'intaj la albanaj patriotoj por starigi la nacian flagon kaj proklami la sendependecon de Albanio en la jaro 1912. Tiu strato portas la nomon de advokato, senatano kaj konata diplomato franca, granda amiko de Albanio. G'i kaj la komplekso de log'ejoj laŭlonge de g'i estas restau'rigita de Instituto de Monumentoj de Kulturo kaj estas proklamita Kultura Monumento.

Monumento de la Milito de Vlora

G'i estas dedic'ita al la milito de Vlora en la jaro 1920. G'i troviĝas en la Kolo de Koc'iu, sur monteto je olivarboj; tie okazis unu el la plej sangumaj bataloj kontraŭ la italajn kupantojn. G'i estas verko de Skulptistoj de Popolo Kristaq Rama, Mumtaz Dhrami, Shaban Haderi kaj Hektor Dule. La basoreliefo muldita en bronzon eternigas la amasan popolan heroismon. La figuroj de albanoj prezentig'as per tradiciaj vestoj, fustaneloj kaj mokasenoj kun kvasto.

Monumento "Dras'ovice 1920-1943"

Estas g'i monumenteca memorigilo je arka formo je alteco 17 m kaj larg'eco 34 m, verko de skulptisto Mumtaz Dhrami kaj arkitektoj Klement Kolaneci kaj Petrit Hazbiu. G'i entenas basoreliefojn ellaboritajn per fajna artisma gusto dedic'itaj al du bataloj samloke sed diverstempe, al la batalo de la jaro 1920 kaj al tiu de la jaro 1943. En g'i prezentig'as batalanto kun fustanelo el la jaro 1920 kaj partizano el la jaro 1943 kiuj transdonas mesag'ojn de braveco kaj militemo por libereco.

Marbordo de Vlora

Narte-Zvernec-Triport

Tiu areo troviĝas je 3 km nordokcidente de la urbo de Vlora kaj komencig'as kun la pitoreska vilag'o de Narta kaj finig'as kun la montetoj de Triport kiuj iamtempe estis ja malgrandaj insuloj. En tiu loko kreig'as sabla strio 5-6 km longa kaj 80-120 m larg'a. Sude etendig'as la vitejoj, olivarbaroj kaj arbaraj zonoj je pino de Kume.

Triport konatas ankau' kiel pratempan log'lokon. La duoninsulo de Zvernec kaj la insulo de la monah'ejo en Zvernec, vestitaj per pinarbaro, cipresoj estas ja turismaj perloj. Interne de la insulo kie regas la silento troviĝas la preg'ejo kaj la monah'ejo de Shen Meri apartenantaj al la bizanca epoko. La insulo estis grava loko por pilgrimado tial oni estas konstruinta ponton liganta g'in kun la tero. Narta, lokita apud la laguno samnoma estas vestita per vitejoj, olivarboj kaj fruktoarboj. Apud g'i troviĝas la akvofonto je nomo Puto de Kavalone kie en pratempo la virinoj kaj junulinoj el Narta c'erpis akvon. C'iuj c' i tiuj naturaj belecoj konsistigas veran turisman potencialon.

Malvarma Akvo

Sude de la urbo, c'e marbordo, tute proksime al la kastelo de Kanina kaj rokaj deklivoj de Shashica troviĝas la klimatea stacio de malvarma Akvo. G'i estas lokita inter la blua maro kaj rokeca deklivo apud plantacioj de agrumoj kaj olivarboj. Tie estas starigitaj ripozdomoj, vilaoj kaj komercejoj sankiel hoteloj. C'erande de rokoj elfontas fres'aj kaj malvarmaj akvoj de kiuj oni nomumis mem la lokon. De Malvarma Akvo g'is Jonufer elfluas 37-40 akvofontoj, kelkaj el kiuj c'erande de la maro au' sub g'in donante al la maro apartan fres'econ. Je apudeco de Malvarma Akvo troviĝas la Nova Plag'o je 80 m longa kaj 30-50 m larg'a, kie oni starigis ripozejojn kaj distrejojn.

Jonufro

G'i komencig'as sude de Malvarma Akvo, tie kie elfluas potence la karstaj akvoj. C'i tie kreig'as unu el la plej belaj klimatecaj, pitoreskaj kaj sanigaj anguloj de la marbordo de Vlora. C'i tie ni trovas ankau' malgrandajn golfojn kaj apud ili pinojn kaj agrumojn. C'i tie estas konstruitaj multaj luksaj ejoj komencig'antaj de plag'o kaj suprenirantaj al la

deklinvo de Shashica g'is la pitoreska vilag'o de Radhima. Tiu c'i estas ideala loko por disvolvig'o de turismo.

Karaburuno

Estas ja plej granda duoninsulo de Albanio, je longeco 16 km kaj larg'eco 3-5 km kaj surfaco 62 km². G'i enig'as g'is 15 km en la maron kreante la golfon de Vlora. En ambau' flankoj de Karaburun, aparte en g'ia okcidenta parto akvig'anta de Jonia maro, kreig'as multaj belaj pejzag'oj pro interplektig'o de malgrandaj golfoj, kapoj, grotoj, abismoj kaj rokaj faldoj. Hodiau' en la duoninsulo de Karaburun estas rezervejo por la c'asado de sovag'a porko. La interplektig'o de kimatecaj, historiaj ric'aj'oj kun belaj kaj pitoreskaj pejzag'oj kaj virgaj plag'oj estus formulo por efika kaj sukcesplena turismo en tiu areo.

Sazano

Estas plej granda insulo de Albanio kaj samtempe plej okcidenta punkto de g'i. G'i trovig'as 17 km for de la marhaveno de Skela kaj 9 km for de Triport. La insulo ampleksas surfacon je 5.7 km² kaj marbordan linion je 12 km longa. G'i dividig'as disde la duoninsulo de Karaburun per la malvastejo de Mezokalan je 4.8 km longa. La plej alta pinto de sazano estas 342 m super la marnivelo. G'ia marborda linio estas rokeca rompig'inta tial ankau' lau'longe de g'i estas formitaj grotoj kaj kavaj'oj. Plej menciinda estas la groto de Xhehnem (Infero). Sur la orienta parto de la insulo estas konstruita la marhaveno liganta g'in kun la tero.

La urbo de Himara

Tiu urbo etendig'as sude de Vlora, c'erande de Jonia maro. La marbordo de Himara ampleksas kelkaj vilag'ojn kiel : Dhermi, Vuno, Qeparo kiuj konsistigas perlojn de la albana marbordo. Himara konatas kiel pratempnan log'lokon ka kiel unu el la marbordaj urboj de Kaonio. Tiu loko konatas per la nomo Himara ekde la V jarcento antau' Kristo konservante tiun c'i nomon g'is hodiau' En Himara trovig'as la groto de Spile kie lau'pensite estis renkontig'inta Ciklopo kun Ulikso. Himara havas ankau' g'ian marhavenon kiu ebligas la alvenon de turistoj ne nur surtere sed ankau' surmare. La kimatecaj kondic'oj, la allogaj plag'oj kaj la filtrita akvo de la maro igas Himara-n unu el la plej s'atataj lokoj por turistoj.

Marbordo de Himara

Dhermi

G'i estas unu el la vilag'oj de Jonia marbordo de Himara. G'i menciitas kiel log'lokon ekde la jaro 46 antau' Kristo. C'erande de la maro estas starigitaj ripozdomoj kaj hoteloj por ripozantaj turistoj. En la c'i tieaj bordoj trovig'as ankau' la groto de Marrabistoj, loko je intereso por vizitig'i. Por interesig'antoj pri arkitekturo Dhermi ofertas tri preg'ejojn, preg'ejon de Shen Stefan kaj Shen Mitri kie konservig'as afreskoj el XII-XIV jarcentoj kaj preg'ejo de monah'ejo de Shen Meri kies deveno estimig'as el XIII-XIV jarcentoj.

Vuno

Estas vilag'o-muzeo sur la marbordo de Himara. G'i konatas kiel pratempnan log'lokon ekde II jarcento antau' Kristo. C'irkau' g'i trovig'as ankau' la fortifikaj'oj de ilira kastelo el IV jarcento antau' Kristo. Prave Vuno nomig'as "s'ona kastelo" c'ar c'io estas

konstruita el s'tono, komencig'ante de stratoj, domoj, muroj, potoj ka. Malsupre de la vilag'o, c'erande de la maro, kus'as la plantacioj de agrumoj kaj olivarboj dum super la vilag'o, c'epinte de la roko, etendig'as la verda arbaro de Mjegullosh. En Vuno hodiau' oni praktikas sukcese la balnearan maran turismon samkiel tiun montaran. En la alteco 1300 m etendig'as la karsta kampo de Ondoj de Vuno je surfaco 60-70 km² servanta kiel pas'tejon kun oportunaj kondic'oj por montara turismo kaj tendaroj.

Jal

G'i estas golfo en la marbordo de Jonio , 2 km for de la vilag'o Vuno, sude de g'i. G'i konsistigas unu el la plej pitoreskaj golfoj de la Albana Riviero. La golfo havas formon de rektangulo enig'anta je 500 m internen de la tero. La norda kaj suda ekstremoj de la golfo estas rokecaj, altaj kaj krutig'intaj dum sur la orienta flanko etendig'as s'toneta plag'o tre bela.

Qeparo

Estas vilag'o plej suda apartenanta al la distrikto de Vlora c'erande de Jonio. G'i etendig'as en la valo de Qeparo kaj c'irkau'atas de eterna verdeco. Qeparo estas konata kiel fruan log'okon el IV jarcento antaŭ Kristo , kion atestas plej bone la ilira kastelo de Karos kiu estas kultura monumento. Komencig'e g'i konatis per la nomoj Klerparo kaj Keparesh. Per la hodiau' nomo g'i konatas ekde XV jarcento. Dum XVIII-XIX jarcentoj la vilag'o estis c'irkau'ita per muroj. Qeparo hodiau' konsistas el du partoj; Supra Qeparo kiu estas pli malnova kaj simila al la kastelo starig'inta sur roko, kun g'iaj karakterizaj domoj adaptitaj sufic'e bone al la tereno kreante tiel mirindan panoramon por kiu ajn g'in vizitanta; Malsupra Qeparo kiu ampleksas la longan kaj larg'an plag'on kun raraj belecoj. Tie c'i estas starigitaj domoj modernaj samkiel hoteloj je nuntempaj standardoj. En Qeparo oni ekspluatas sukcese turismon.

La urbo de Saranda

Estas urbo sudokcidente de Albanio, c'erande de Jonia maro. G'i menciitas ekde pratempo en I jarcento antaŭ Kristo kiel marhavenon per la nomo Onhezmi. La malgranda log'loko komencis ricevi civitanajn karakterizaj'ojn c'irkau' la mezo de i jarcento kaj atingis g'ian plej grandan disvolvig'on c'irkau' II-III jarcentoj. En IV jarcento la urbo detirig'is enen de la kastelo je surfaco 5 km² kaj cirkau'ig'is per muroj dikaj je 2 m. Ene de la kastelo je formo duoncirkla kaj plifortigita per defendturoj , oni estas trovintaj ankau' paleokristanan bazilikon ornamentita me multkolora mozaikaj'o. Poste, en la jaroj 1415-516, Saranda menciitas kiel sidejo de episkopejo. Kvankam en mezepoko g'i ne menciitas en la skribitaj fontoj, la cirkau'iga muro el la bizanca epoko okcidente de la hodiau'a urbo , la ruinaj'oj de paleokristana mezepoka monah'ejo je nomo Ajii Saranda (kvardek sanktuloj) starig'anta sur la deklivo de la monto super Saranda kaj konstruig'o de la kastelo de Lekuras en XVI-XVII jarcentoj sudoriente de la urbo, montras pri kontinueco de praa Onhezmo. La nomo Saranda ekuzatis je la komencig'o de XX jarcento. Hodiau' Saranda estas la tria marhaveno lau'grandeco en Albanio. La lokig'o de stratoj kaj domoj lau'skale konforme al la descendeco de la tereno, la promenejo c'eborde , la blua kaj pura maro elvolvas fabelan pejzag'on. Tiu c'i antikva kaj moderna urbo samtempe estas unu el la plej prefereblaj turismaj destinacioj

en la Jonia marbordo. Dum la turisma sezono g'i vizitatas de c'irkau' 60 000- 70 --- turistoj. Granda parto de turistoj, alvenantaj el Grekio estas unutagaj turistoj.

La marbordo de Saranda

Borsh

Estas vilag'o nordokcidente de la distrikto de Saranda. G'i etendig'as sur la centra parto de la Jonia marbordo. G'i c'irkau'atas de nordo, oriento kaj sudo de montetoj kaj montoj atingantaj g'is 1500 da alteco super la marnivelo , donante al g'i formon de giganta amfiteatro, kies planko estas la kampo de Borsh c'irkau' 150 km². La Jonia maro en Borsh enig'as internen de la tero kreante tiel la golfon de Borsh. Lau'longe de la golfo je longeco 3 km kaj larg'eco varianta de 10-15 m g'is 20-25 m , etendig'as la plag'o de Borsh, la plej granda en Jonia marbordo. La plag'o estas kreita danke al la inertaj alportaj'oj de la rivero de Borsh. Tiu c'i plag'o konsistas el s'tonetaro kaj en malmulte da sektoroj oni renkontas sablon kiu estas tre dika. En la bordo de Borsh trovig'as ankaŭ malgranda rokeca sektoro c'elime kun Qeparo. Rare oni renkontas en naturo lokojn kiel Borsh kie la maro, la kampo, la valo , la montetoj kaj la montoj estas lokitaj harmonie formante ekosistemon preskau' neripeteblan.

Borsh kun siaj pejzag'oj karakterizaj, milda mediteranea klimato, rokeca kaj s'toneca marbordo kaj vegetacio tre ric'a konsistigas turisman punkton kiom gravan tiom originalan. La antaŭ'kondic'oj por la disvolvig'o de turismo en Borsh estas tre konvenaj. Aktuale c'i tie oni ekzercas sukcese la balnearan turismon kaj tiucele estas realigitaj vico de konstruaj'oj por akomodig'o de turistoj.

Lukova

Estas vilag'o nordokcidente de la distrikto de Saranda c'erande de Jonia maro. Apud Lukova, en la loko konata Kolo de Bazaro, konservig'as la spuroj de malnova kastelo apartenanta al II-III jarcentoj antaŭ Kristo. Sur la malarbarigitaj montetoj disde mediteraneaj arbustaj'oj estas starigitaj zonumoj plantitaj per olivarboj kaj agrumoj. La interplektig'o de maro kun montetoj kun zonumoj kreas karakterizan pejzag'on por tiu areo, kiu donacas veran rilaksigan senton.

Ksamilo

G'i estas urbeto sude de Saranda en la duoninsulo samnoma. La marborda linio estas rompig'inta, alta kaj rokeca. La naturo c'irkau' la urbo estas transformita tute dum la tempo de komunismo. Centoj da kvadrataj kilometroj da tero estis malarbarigitaj disde la mediteraneaj arbustaj'oj kaj , malfermite la zonumojn, oni plantis agrumojn kaj olivarbojn. Kontraŭ la urbeton trovig'as 4 malgrandaj rokecaj insuloj je surfavo 8.9 km² . La bordoj de la insuloj estas krutig'intaj kaj vestitaj per densa makio. En tiuj insuloj kreskig'as sovag'aj bestoj. La plej granda insulo havas surfacon je 5 km² kaj trovig'as 60 m for de la bordo, la alia insulo trovig'as 500 m for de la bordo kaj havas surfacon 1.3 km². Du aliaj insuloj ampleksas surfacon respektive 1.1 km² kaj 0.8 km². Ksamilo kun la montetoj vestitaj per agrumoj kaj olivarboj, kun marbordo kaj ties insuloj kreas unu el la perloj de la Jonia marbordo kie c'iu volas ripozi.

Turisma bazo

Hoteloj kaj moteloj

C'ar la areo Vlore-Sarande estas konsiderata kiel unu el la plej belaj turismaj areoj de la tuta albana marbordo, grandan gravecon oni dedic'is al la akomodiga infrastrukturo por turistoj. Tiucele estas starigitaj vico de hoteloj kaj moteloj ofertante al la turistoj variecon de servoj el kiuj li povas elekti plej taug'an por si mem. Tiu infrastrukturo ofertas c'irkau' 4000 litoj, nombro c'iam pliig'anta. La prezoj de c'ambroj por unu tranokto varias de 20-50 eu'roj, depende de hotelo kaj ofertataj servoj de g'i. C'i sube estas listo de hoteloj kaj moteloj ricevita de Gvidlibro de hoteloj, eldono de Ministrejo pri Regulig'o de teritorio kaj Turismo de Albanio.

Restoracioj

La areo Vlore-Sarande konatig'as kiel unu el la areoj je granda turisma potencialo, tial aparta graveco estas dedic'ita ankau' al la mang'o- servo. La plimulto de hoteloj agantaj en tiu areo krom la akomodig'on, ofertas al siaj klientoj ankau' la mang'o- servon per la restoracio de la hotelo mem. Krom ilin, granda nombro da restoracioj aliaj ofertas en la tuta areo, kiel en la urbo. Je proksimeco de turismejoj au' lau'longe de la c'efaj au'tovojaj aksoj, iliajn servojn ne nur por la turistoj sed ankau' por la log'antoj de la areo. En tiuj restoracioj oni rimarkeblas la dominantecon de la albana kuirejo kun siaj tradiciaj pladoj, sed sendube ne mankas ankau' la fremda kuirejo, kiel tiu itala, greka, turka ka estante tiel pli apude al la demandoj de kliento kaj ofertante al li multvariecon de elektebloj. La restoracioj servas al siaj klientoj pladojn el plej diversaj komencante de diversaj specoj de viando, kiel tiu de bovidaj'o, safidaj'o, porkaj'o, maraj produktaj'oj ks (diversaj specoj de fis'oj, omaroj ,ostroj , polpoj au' lagfis'ojn, riverfis'ojn), divesspecajn saladojn samkiel tradiciajn dolc'aj'ojn, lokajn kaj fremdajn. Same la restoracioj ofertas ankau' servon per kafeterioj kie la kliento povas elekti inter la fres'igaj trinkaj'oj, apetitiloj kaj alkoholaj'oj plej diversaj. La plej karakteriza alkohola trinkaj'o loka estas rakio (brando). Krom la restoraciojn estas granda nombro de "fast-fud"-oj (Rapid mang'o) ofertantaj rapidan, kvalitan kaj pli malkaran servon ol la restoracioj.

Samkiel la akomodig'aj strukturoj, tiel ankau' tiuj mang'igaj estas en ia evoluig'o de ilia oferto konforme al la nuntempaj postuloj kaj tiuj de turistoj plialtigante notinde la kvaliton de tiaj servoj.

Komunikado

La urboj de tiu areo interligig'as per vojreto kiu de tago al tago s'ang'ig'as kaj plibonig'as konsiderite kiel grava elemento de infrastrukturo rekte influanta en la disvolvig'o de turismo. La vojtransporto ebligas la konjektig'on de la areo kun la tuta Albanio, samkiel de la urboj, vilag'oj kaj turismejoj de la areo unu kun la alia. La interurba transporto estig'as per busoj kaj busetoj, je direkto al la c'efaj urboj de Albanio, kiel Tirana, Durres, Fier, Berat, Gjirokaster ka. Tre bela vojo ligas lau'longe de la marbordo la urbon de Vlora kun tiu de Saranda trapasante la Kolon de Llogara kaj en la interajn urbojn Dhermi, Himare, Qeparo, Borsh. Por pli rapida kaj pli komforta servo oni povas peti la servojn de taksioj.

En tiu areo, pro mem la geografia etendig'o estas tre grava ankau' la mara transporto. La marhaveno de Vlora , noda punkto en la tuta mediteranea baseno, samtiel la marhaveno

de Saranda kaj aliaj pli malgrandaj marhavenoj, kiel tiu de Himara eksploatig'as aparte por enirigo de fremdaj turistoj en tiun areon. Tia speco de transporto estig'as de kelkaj agentejoj kaj vojag'linioj kiel tiuj Vlore-Bari (c'iutage), Vlore- Brindisi (c'iutage), Korfuz-Himare (trifoje semajne dum la turisma sezono kaj dufoje semajne dum la cetera parto de la jaro), Korfuz-Sarande (c'iutage).

Sube estas prezentitaj kelkaj donitaj'oj rilate al komunikadeblecoj:

Distancoj

Vlore-Tirane	147km
Vlore-Durrws	118 km
Vlore-Gjirokaster	152 km
Vlore- Fier	34 km
Vlore-Himare	74 km
Vlore-Sarande	133 km
Vlore- Malvarma Akvo	6 km
Vlore- Zvernec	12 km
Vlore- Orikum	19 km
Vlore- Selenice	35 km
Sarande-Butrint	15 km
Butrint-Xarre	8 km
Jale-Vuno	2 km

El magistrecia diplomo de Ereid Dhimitri

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

Albana proverbo: Plenplena maizspiko tenas sian kapon malsupren

Nr 58 aprilo 2005

Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio

Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758
(Bardhyl, sekretario); +355 4 363360 (Rita, kasistino)

Rete: pistolia@yahoo.com, apistoli@aol.com (Vasil Pistoli);
selimibardhyl@yahoo.com, bardhylselimi79@hotmail.com (Bardhyl Selimi);
adoci@gmx.de (Artur Doçi); shhasani@albmail.com (Shaban Hasani);
motto@bwc.org (Martha Otto); fiorialbtours@yahoo.com (Fjoralba Sadiku);
asokoli@bkursimeve.com.al Nehat Sokoli; beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj);
matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi);
sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti);
mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri);
dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com; ;
egli_b@wp.pl (Egli Brati); eltonzaimi78@yahoo.com (Elton Zaimi);
agimperaj@yahoo.it; tcobani@yahoo.com (Tonin Çobani)

Retpag'o : <http://www.esperantio.tk>

You can access the group's web features using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/>

You can access the group's Management page using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage>

Enhavo

AIS kaj NI

SUS-Karlovo

UEA kaj Ni

Prononcig'o de Renato Corsetti

ILEI kaj NI

Studado en Esperanto
Novaj kursoj
La venonta ekzamensesio

Avizoj

Internaciaj aktivecoj
Heroldo Komunikas

Informoj de Henri Masson

Organizaj aferoj

Kio malhelpas nin organizig'i

Politikaj aferoj

Dang'era decido de Hago

Verdaj partioj

Alvokoj

La Amazonia Arbarego en dang'ero

El diplomlaboraj'oj de niaj gestudentoj

Ni Dankas

Humoraj'oj

AIS kaj Ni

SUS-Karlovo 2005

From: Leonov [leonov@rozabg.com]

Estimataj Kolegoj,

Mi pardonpetas, ke dum la lastaj monatoj pro la travivita tragedio en mia familio-la malsano kaj moro de mia edzino-mi ne povis regule respondi al la ricevitaj leteroj. Sed mi deziras informi Vin, ke malgrau^ mia okupateco kunligita kun la malsano de mia edzino, mi ne c^esis agi pri la preparo de sukcesa SUS /22-28.08/ en Karlovo. Mi, kiel Prezidanto de la Komisiono pri la edukado, kulturo kaj ekologio c^e nia regiona Parlamento siatempe informigis la s^tatan registraron pri la preparagoj por estonta SUS en Karlovo. Kun g^ojo mi deziras informi Vin, ke mem la urbestro de Karlovo, D-ro E. Kabaivanov, akceptis esti honora protetktanto de la okazonta SUS ! Ni jam preskau^ finis la reparon de la konstruaj^o de nia Universitato kaj konstruado de propra komuna log^ejo, kie povus log^i la Profesoroj kaj la studentoj. Mi dezirus esprimi miajn kaj de la Akademia estraro de nia Universitato dankojn al nia koleginino E Prof Alicja Lewanderska-Quednau, Vicrektorino de nia Universitato, kiu tre helpis al mi transprenante dum la lastaj tragediaj por mia familio tagoj, taskojn kunlige kun la organizado de SUS en Karlovo. Ni estas tre dankemaj al O Profesoroj Frank, Quednau, Lobin, Fossmeier, Sachs, Maitzen kiuj esprimis sian pretecon partopreni SUS-on en Karlovo. Ni g^ojas, ke ni jam ricevis alig^petojn de bulgaraj kaj eksterlandaj studentoj partopreni SUS-on.

Mi certigas, ke ni faros c^ion eblan por garantii sukcesan laboron dum la SUS-tagoj en Karlovo. Ni povus proponi al Vi la jenajn log^eblecojn kaj aldonajn programerojn :

Tranoktado en komuna log^ejo, privataj domoj kaj turisma domo-6 euroj por unu tranokto

Tranoktado en hoteloj -20-40 euroj por unu tranokto/depende de la kategorio de la hotelo/

Nutrado- malmultekoste en la bufedo de la Universitato kaj en najbaraj restoracioj

Ekskursoj al Sopot kaj aliaj historiaj kaj kulturaj lokoj
Amuzvesperoj

Ripozo en la mara bazo de nia Universitato – post fino de SUS -/en 2-3 litaj c^ambroj
en privataj log^ejoj en Sarafovo-kvartalo de Burgas- po 7 euroj por unu tranokto

Ni petas pro la neceso de antaŭmendo de hoteloj kaj privataj domoj, se eblas g^is
30.06 sciigu nin sendante alig^leterojn.

Ni atendas Vin en Karlovo kaj ni esperas ,ke Vi restos kontetntaj . Kun estimo
Tutkore Via **B. Leonov**

UEA kaj Ni

Prononcig'o de s-ro Renato Corsetti

INTERNACIA TAGO DE LA GEPATRA LINGVO: DU KOMPARINDAJ DEKLAROJ

Okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, 21 februaro 2005, (fakte nur Patrino, lau la UN-lingvoj), Universala Esperanto-Asocio diskonigos deklaron de sia prezidanto, prof. Renato Corsetti. La deklaro, jam legebla en esperanto, vekis fortajn kritikojn che tiu SAT-franĝo kiu lastatempe intensigis sian akuzon pri novdekstrismo kontraŭ la lingvopolitiko de la Tirese-generacio, plej influa en UEA, sed ankaŭ en SAT. Ekzemple Ed Robertson, marksisto, tiel formulis sian publikan kritikon (resume): "Oni povas bedaŭri la malaperon de lingva diverseco en la mondo. Sed oni povas fari tion sen proponi anstataŭe internenrigardantan, efektive naciisman, sintenon rilate 'fremdajn' influojn. / Sen almenaŭ provi lerni 'fremdajn' lingvojn simple ne eblas internacieca etoso. / Lerni alian studobjekton pere de 'fremda' lingvo estas vere efika metodo lerni tiun lingvon. / La vera problemo estas la usona registaro kaj la 'transnaciaj' korporacioj, ne la angla lingvo. / La vera etoso de esperanto estas internaciismo, ne tiu speco de lingva naciismo kiu evidentighas en tiu frazo de la UEA-deklaro. "La tuta deklaro de UEA-Corsetti tekstas jene: La Esperanto-movado partoprenas ankaŭ ĉi-jare la festadon de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, gvidatan de Unesko, kiu ĉi-jare aparte altiras la atenton de ĉiuj je la brajla skribo kaj je la signolingvoj. Tiuj formoj de komunikado ankaŭ estas esprimoj de apartaj grupoj, kiuj ghis nun estis multe ignorataj. Same ignorataj estas multaj lingvoj, ne apartenataj al ekonomie aŭ politike fortaj grupoj. Ni reasertas per la tuta forto, pri kiu ni disponas, ke politiko de komunikado kaj evoluigo, kiu estas indiferenta kaj ofte rekte malamika al la lokaj lingvoj, kondamnas al perforta kaj antaŭtempa formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo kaj la kulturojn kunligitajn al ili. Ni alvokas al ĉiuj registaroj de ĉiuj landoj kaj al ĉiuj homoj sekvi la rekomendojn de Unuighintaj Nacioj, de Unesko kaj de la plej elstaraj pensuloj, kiuj agnoskis, ke neniu reala edukado eblas per fremda lingvo, kiel laŭvorte diris Gandhi. [tiele!] La internacia lingvo Esperanto estas lingvo por uzado nur en intenaciaj rilatoj kiel neutrala maniero komuniki sen altrudo de la propra mond-rigardo al la aliaj homoj. Tial ghi protektas la pluekziston de la gepatraj lingvoj, kies funkcion ghi ne celas transpreni, kiel daŭre faris tra la tuta historio kaj ankoraŭ nun faras naciaj lingvoj, kiam ili estas uzataj por internaciaj rilatoj. Pro tio la Esperanto-movado festas kune kun Unesko la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo, kiu estu ankaŭ okazo por festi la samvalorecon de ĉiuj lingvoj kaj de ĉiuj kulturoj kaj la internacian komunikadon surbaze de

egaleco kaj reciproka respekto.

Renato Corsetti

ILEI kaj Ni

Studado en Esperanto

From: pej@esperanto-turismo.com

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo estas trijara nepublika post matureceksamina lernejo funkcianta ekde 1991, laulegxe registrita ĉe Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz (n-ro 232/94) kaj ĉe la Urbestro de Bydgoszcz (n-ro 51/99). En 1996 la studumo akiris la statuson de klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. En la studumo instruadas lekciistoj de AIS, Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Akademio de Bydgoszcz, Kujavia-Pomerelia Centro por Edukado de Instruistoj, Vojevodio Kulturcentro en Bydgoszcz, krom tio ĵurnalistoj kaj spertuloj de Pola Turisma-Landkono Societo, Societo de Amikoj de la Urbo Bydgoszcz, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo "Kujavio kaj Pomerelio", Pola Esperanto-Asocio kaj vojaĝoficejo "Flugo". En la studumo povas studi ĉiu persono, kiu finis 18-an vivjaron kaj havas almenaŭ meznivelan edukitecon (maturec-ekzamenon) kaj bonan sanstaton. Plena eduk-ciklo daŭras tri jarojn kaj permesas akiri sciojn necesajn por labori en nau profesioj (simboloj de Europa Unio): post la 1-a studjaro - akireblaj kvalifikoj: lektoro de Esperanto por komencantoj kaj gvidanto de porinfanaj arangxoj; profesioj/postenoj: oficisto pri turisma informado (422104), oficisto en vojaĝagentejo (422103) kaj internacia vojaĝgvidanto (511301); post la 2-a studjaro - kvalifikoj: lektoro de mez-nivelaj kursoj de Esperanto kaj verkanto de arta keramiko; profesioj/postenoj: organizanto de turisma priservado (341401), regiona turisma ĉifrono (511304) kaj animanto de kultura agado (347601); post la 3-a studjaro - profesioj/postenoj: kursgvidanto de Esperanto (235910), specialisto pri organizado kaj disvolvo de turismo (241915) kaj specialisto pri organizado de kulturo (241990); ev. titolo de bakalauro de AIS pri humanistiko au morfosciencoj.

Lau dekreto de la pola Ministro pri Edukado de la 1-a de aŭgusto 2000 j., kiu estis publikigita en la sxtata legx-ĵurnalo - fin-diplomoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo validas kiel oficialaj polaj dokumentoj rajtigantaj ĉifronojn kaj vojaĝgvidantojn labori en Esperanto. Cxiutage oni instruas en Esperanto. En la studjaro 2005/2006 kadre de la Studumo oni planas kunlabore kun Vojaĝoficejo "Flugo" gvidadon de specialigitaj kursoj pri turismo, kulturo kaj bizneso kaj ankaŭ konversaciaj lingvokursoj. Cxiuj kursoj kostas semajne 10 eurojn au 10 USD. Kunlaboro kun AIS San Marino kaj sciencaj institucioj en Pollando permesas akiri sciojn pri diversaj branĉoj de scienco - i.a. pri turismiko, ekologio, eŭrologio, etnologio, etnografio, kultur- kaj sociogeografio, interlingvistiko, historio, politikaj sciencoj, komerco, merkato, estrado kaj pluraj lingvoj. La studjaro 2005/2006 daŭros ekde septembro 2005 ĝis majo 2006 kaj ampleksos: laŭ ĉiutaga sistemo po 30-40 studhoroj semajne (ferioj decembre kaj januare), kaj laŭ t.n. eksterĉeesta sistemo - tri stud-ekzamenajn sesiojn: fine de septembro 2005, januare/februare 2006 kaj aprile/maje 2006. Necesas partopreni almenaŭ

fineksamensieron aprile/maje 2005. Eksterŝtataj gestudentoj povas ankaŭ partopreni, sen krompago, libere elekteblajn kursojn ekster la sesioj. La studado ĉe ISTK/AKB en la studjaro 2005/2006 komenciĝos per Internacia Sesio de Pola AIS-Societo dum 5-24 de septembro 2005 jaro en Lublin. La organizantoj de la Sesio estas Pola AIS-Societo, Teknika Universitato en Lublin kaj Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, kiu akceptas aligxojn kaj kotizojn - 200 Euroj au 200 USD por trisemajna logxado en studentaj domoj de Teknika Universitato en Lublin kaj programo de la Sesio (5-24.09.2005) i.a. kun lernado de Esperanto kaj de pola lingvo por eksterlandanoj kaj ev. BUS-6 de AIS. En Bydgoszcz la studjaro 2005/2006 komenciĝos dum la 30-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kaj dum la 28-a Sesio de AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB) de la 25 septembro - 30 septembro 2005, okaze de la Monda Tago de Turismo. Dum la jaroj 1991-2004 lecionojn en la Studumo gvidis lekciistoj el 50 landoj de Europo, Afriko, Ameriko, Azio kaj Australio por gestudentoj el 65 landoj de la mondo. La plej ofte uzataj lingvoj en la Studumo, apud la pola kaj Esperanto, estis: angla, hispana, franca, litova, albana, itala, mongola, germana kaj rusa. La gestudentoj konatigxis tiel pri kulturo kaj lingvoj de diversaj nacioj, kaj fremdlandanoj ankaŭ pri la polaj. La studadprogramojn eblas legi rete: www.esperanto-turismo.com. La studkotizoj por la studjaro 2005/2006 estas samaj por ambau sistemoj - 250 USD au 250 euroj (gxis la fino de marto 2005), poste 300 USD au 300 euroj. Kaze de enpago kaj neblo alveni la kandidato povas prokrasti la studentigxon gxis la sekva studjaro (t.e. 2006/2007), studentigi anstataŭe alian personon el la sama au alia lando, au - se eblas - utiligi la pagon por internaciaj vojaĝoj de la Internacia Klubo "Esperantotur"; resendo de la mono ne eblas. Aligxojn akceptas la sekretario de la studumo (adreso komence); la studkotizojn oni pagu al bankkonto: Bank Pocztowy SA O/Bydgoszcz Konto n-ro 80 13201117 2034 0100 2000 0001 Miedzynarodowe Centrum Kultury i Turystyki, SWIFT kodo: POCZPLP4. Grave: sen stud-pago ne eblas ricevi invitleteron, se la aligxinto gxin bezonas por akiri polan vizon; krom tio konsideru, ke ekde septembro estas tre malfacile aranĝi vizon por la kuranta studjaro - tial indas aligxi kaj pagi frue, prefere gxis aŭgusto. La viv-kostoj en Bydgoszcz (logxado+mangxado) estas ekde US\$ 100 au 100 euroj ĉiumonate - kaj tiujn oni povas pagadi surloke. Gestudentoj de la studumo povas ankaŭ studentigxi ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj (krom-kosto 32,50 ?), kio rajtigas al 80% rabato de kromaj kurset- kaj ekzamen-kotizoj de AIS en Bydgoszcz au aliloke en centra/orienta Europo - kaj al ĉiuj finstudintoj permesas akiri la titolon de bakalauro, kaj post pliaj du stud-jaroj ankaŭ magistro de AIS pri humanistiko au morfosciencoj. Bonvenon al nia internacia studumo kaj AIS-Klerigejo Bydgoszcz(AKB)!

Sekretario de la Program-Konsilio Prezidanto de la **Program-Konsilio (-) mag. Wojciech Rumiński (-) ASci.mag. Andrzej Grzybowski**

Novaj kursoj

Danke al la helpo de belga samideano, pluraj aliaj albanaj gestudentoj certigis al si senpage la novan lernolibron de Esperanto kaj komencis ekstudi IL, nome:

En la Tutnacia Hotelumada kaj Turisma Lernejo en Tirana – 25 personoj; en la alia privata turisma lernejo HOTURS en Tirana 15 personoj, en la gimnazio "Sami Frasheri" en Tirana 20 personoj; en la fremdlingva mezlernejo de Tirana 10 personoj kaj en

elementa lernejo en Tirana 8 personoj. Krome baldau' la kursoj plivastig'os ankaŭ en aliajn urbojn.

Rita Permeti

Venonta ekzamensesio

Je 7an de majo 2005, je 9an de mateno, en la tutnacia hotelumada kaj turisma lernejo en Tirana, okazos la regula venonta ekzamensesio pri la elementa nivelo de II. C'iuuj interesitoj bv registri sian nomon al sekretario antaŭ' tiu dato.

La ekzamenkomisionon prezidos s-ro Shaban Hasani. Membroj de komisiono estos Matilda Sokoli kaj Bardhyl Selimi

Saimir Beqiraj

Internaciaj aktivecoj

- Internacia Infan-semajno en kastelo Greziljono, Francio Adreso : Elisabeth Barbay, 25 allee Gabriel Faure FR-93140 Bondy Francui Tel 0033 (0) 1 48 47 23 87
- 15a Alp-Adria Esperanto- Konferenco Trieste 21-22 majo 2005. Temo : Adriatika Maro, renkontig'ejo de lingvoj kaj kulturoj diversaj. Adreso: Esperanto-Trieste ĈP. 601 It- 34 100 Italio, via del Coroneo 15- 3a etag'o tel/F 0039 040 76 31 28, rete: noredv@tele2.it , testudo@adriacom.it
- Balkana Esperanto-Kongreso, 29 majo-12 junio. Festivalo de Rozoj kaj Folkloro, Karlovo Bulgario rete info@esperanto.turismo.com
- 78-a SAT Kongreso 2-9 julio Zagreb, Kroatio, adreso Sennacieca Asocio Tutmonda 67 av. Gambetta FR-75020 Paris Francio; rete: satesperanto@free.fr
- Nordamerika Somera kursaro 4-22 julio, Adreso Ellen M. Eddy 11736 Scott Creek Drive SW Olympia WA 98 512 Usono tel 001 360 754 4563 rete eddyellen@aol.com
- Internacia Esperanto-Konferenco 9-15 julio; Ĉeftemo Bizanca Kulturo Adreso Eric Laubacher 1 rue Lousi Antoine de Bungainville Fr-78180 Montigny-Bx Francio tel 0030 167 12 645 Fakso 00 30 132 36 746 rete mantha@otenet.gr
90a Universala Esperanto-Kongreso Vilno Litovio Adreso Litova Esperanto-Asocio Zamenhovo 5, LT-44 287 Kaunas Litovio tel 00370 37 20 85 03 Fakso 00370 37 22 86 16 rete litova.ea@mail.lt

(c'erpita el Esperanto marto 2005)

Korespondu

La interesitoj por korespondo kun akterlandanoj sin turnu al:

Koresponda Servo Mondskala

Retadreso kesperanto@aol.com TTT pag'o : <http://www.multimania.com/kosomo>

Artur Doçi

Internacia Konkurso

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO, enkadre de vasta arangxo realigota en la venonta decembra monato cxijara, kies temo estas "KRIPO, hieraux kaj hodiaux" kaj kiu antauxvidas ekspozicion kaj prelegojn pri kripoj, starigas konkurson por geknaboj - agxo inter 6 kaj 14 jaroj. Ni petas vin, diskonigi gxin kiel eble plej multe inter lernejanoj, nevojn, nepojn, ktp, ne gravas ke la partoprenontoj estu bonaj konantoj de esperanto..., vi ja povos ilin helpi, cxu ne? Plej koran dankon por via kunlaboro kaj multajn salutojn
Elda Doerfler

Triesta Esperanto-Asocio

testudo@adriacom.it

MIA KRIPO

Povas partopreni geknaboj kun agxo de 6 al 14 jaroj el la tuta mondo, al kiuj ni petas sendi - gxis la 15a de oktobro 2005 - al tiu cxi adreso: ESPERANTO TRIESTE - C.P.601 - 34100 TRIESTE CENTRO - ITALIA unu aux pli da faritajxoj pri la supre indikita temo, en la sekvaj formoj:- fotografajxo (ekz. de hejma aux lerneja, aux de pregeja kripo) en la grandeco maksimume de A4-formata folio;- desegnajxo (ekz.: kiel mi vidas hodiaux la kripon, kiel mi sxatus gxin,..)- teksto, skribita sur maksimume unu A4-formata folio (ekz.: malgranda rakonto pri kripo, pri la naskigxo de Jesuo, kristnaska fabelo, ..)- manfaritajxo (gipse, ligne, metale, papere, ktp ktp) La teksto estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la auctoro, kaj cxuij aliaj faritajxoj estu akompanataj de frazo aux komentario en la samaj lingvoj. Krome estu ankaux persona kaj familiaj nomoj, malgranda foto, agxo, lernejo kaj klaso, posxta adreso. Cxiuj faritajxoj prezentigxos al publiko dum la kristnaska periodo 2005. Oni premios la plej trafajn faritajxojn, laux speco kaj agxo (de 6 gxis 8 jaroj, de 9 gxis 11 kaj de 12 gxis 14) okaze de publika ceremonio en Trieste. Korajn dankojn pro Via preteco kunlabori!

Plej amike via Elda Doerfler testudo@adriacom.it

Tradukaj'oj de Henri Masson

Chu la angla farighu la europa lingvo ?

Pro tio [ke la Francoj ne konsentas], dum atendo, iuj prezentas la ideon paroli en Esperanto en Europo, lingvo kiu apartenas al neniuj kaj kiun cetere neniuj parolas (tie kushas la problemoj). Por reagi (prefere el la tuta mondo, ech angle kun kelkaj vortoj en Esperanto : valoras montri al Europe 1 ke ni estas ne malmultaj kaj ke la nura problemoj kushas en la manko de informado kaj misinformado) :

<http://www.europeinfos.com/participez/courriel.jsp> Oni ekscias ke la tradukkostoj voras 1 miliardon 200 milionojn da euroj (plialtighos je 35%). Valoras ne nur montri ke homoj praktikas la lingvon sed ankaux ke ghi estas uzata en multaj sferoj de la homa vivo. Eblas ankaux memori ke por Suda Azio oni malfacile kolektos 3-4 miliardojn da euroj dum la tutmonda jara budgeto de armado (onidire de "defendo" sed plejofte de prirabado) estas 900 miliardoj da euroj.... Ek al novaj aventuroj ! La jaro jhus komencighis ;-)))

Henri Masson

Heroldo Komunikas

From: civito@esperantio.net

NOVA SERVO DE FONDUSO PRO ESPERANTO

Jam de tuta jaro Fonduso Pro Esperanto (PEF) funkcias kiel telematika Civita Banko, do sen fizikaj gichetoj. La komunikado inter PEF kaj la klientoj okazas nur rete, inkluzive de la konteltiroj, chiufoje kiam okazas movo. Manko de retaliro povas malhelpi novajn klientojn; au klientoj kun retaliro foje ne shatas ricevi sian konteltiron che adreso legebla de alia persono. Ekde Novjartago 2005 eblas ricevi senpagan retadreson, individuan kaj konfidencan. La kliento povas desharghi la komunikojn en retkafejo, au che helpema konato. Krome, inter la taskoj atribueblaj al PEF per klienta mandato, ekde la sama dato aperis ankaŭ fideikomiso. Por malfermi konton che PEF necesas havi la Esperantan civitanecon, se individuo, au esti alighinta al la Pakto, se establo. En 2004 PEF administris movojn por sume pli ol 155.000 svisaj frankoj, sur entute 14 kontoj: 6 establoj, 7 individuoj kaj la kvestoro. Kompreneble nur la kvestora konto estas kontrolebla de la Kapitulo, char temas pri la spezoj pro la Civitaj instancoj. La ceteraj kontoj estas privataj, kaj kontroleblaj nur de la respektiva kliento.

LITERATURA KONKURSO "EKRA-2005"

Esperantista domo de kulturo "D-ro Ivan Kirchev", Razgrad (Bulgario), anoncas internacian literaturan konkurson pri poezio kaj humurajhoj, originale verkitaj en esperanto "EKRA-2005", je libera temo. La verkoj ne devas esti jam publikigitaj kaj partoprenintaj en aliaj konkursoj. Verkojn por la konkurso, subskribitajn per pseudonimo, oni sendu en tri ekzempleroj al la organizanto (Esperantista domo de kulturo "D-ro Ivan Kirchev", str. Sv. Kliment 48, BG-7200 Razgrad, Bulgario). La nomo kaj la adreso de la aŭtoro estu en aparta koverto surskribita per la sama pseudonimo. La jhurio kunsidos la 27an de majo 2005. La premioj estos esperantaj libroj kaj diplomoj. Premiitaj verkoj aperos en revuo "Literatura Foiro" kaj "Esperantista tribuno" (Razgrad). La anonco de la rezultoj kaj la premiado okazos kadre de la esperanta kultura festo "Abritus-2005" en Razgrad, la 28-29an de majo 2005, organizota kunlabore kun LF-koop.

LA UNUA NUMERO DE "FEMINA" BALDAU PRESPRETA

La 15an de januaro estis la redaktfino por la unua numero de "Femina", revuo en esperanto ne nur por virinoj, kiu aperos sub la dato Printempo 2005, kaj lauplane devus atingi la abonantojn fine de februaro, chiukaze antaŭ la 8a de marto. La enpaghigo estos finita chi-semajne, kaj la chfredaktoro donos la imprimaturon antaŭ la fino de januaro. La numeron malfermas editoriaĵoj de Kep Enderby, iama justicministro de Aŭstralio, kaj de Marie-France Conde Rey, prezidanto de Feminisma Esperanta Movado. La chfa plado en la menuo estas dosiero pri Islamo kaj virinoj, kiu okupas dek paghojn. La dua numero estos grandparte dedichita al la studmaterialo por la kolokvo "Esti virino kaj verkistino en la nuna mondo", organizata de FEM, PEN kaj KCE en Chaufefono, 24-29 junio 2005. Redaktfino: la 15a de aprilo. La revuo, 28-pagha en formato A4, riche

ilustrita lau grafiko de Perla Martinelli kaj Malvina Monteggia, estas abonebla tra la distribua reto de LF-koop. Kvar numeroj jare kostas 30,- svisajn frankojn.
Informas: <fem £ esperantio.net>.

Noto: En la jam menciita numero de FEMINA, ricevita ankaŭ de ni, aperis ankaŭ artikolo “Albanio –islama insulo de Eŭropo” verkita de B.Selimi kaj Ervin C’anga. Kopion de g’i jam ricevis ankaŭ junulino Enkela Xhamaj

Organizaj Aferoj

Kio malhelpas nin organizig’i

En sia numero de marto, la revuo Esperanto aperigas sur la unua pag’o la atentindan alvokon de s-ro Anatolij Gonc’arov “Klubestroj, organizig’u!”. Tio reflektas g’eneralan nekontentigan staton rilate la organizitivecon de nia movado, inkluzive Albanion.

Ekde jaroj, albanaj esperantistoj ne plu kunvenas regule, ec’ ili ne plu aktivigas organizite! Kial do?

Unue, c’ar mankas c’e ili la spirito de komuna kunagado favore al nia E-idealo. Ĉiu agadas propravole, individue.

Due, mankas c’e ili sidejo kaj subteno fare de la s’tato. Kiam esperantistoj tentas kunvenig’i au’ arang’i kursojn en lernejoj, ekz., la tieaj estroj tuj forpelas ilin, sin pravigante ke oni ne permesas agadi en la s’tataj institucioj, senpage.

Trie, kvankam ni havas nun multaj junajn trejnatajn esperantistojn (bakalau’rig’intoj en internacia Studumo de Bydgoszcz , Pollando, klerigejo de AIS), ni ankoraŭ ne havas inter ili tiajn serioze dezirantaj kontribui volontule al nia movado enlande.

Kion ni faru?

Mi opinias ke c’iu el ni devas s’ang’i sian sintenon al E-movado, do c’iu el ni devas enmiksigi’u en nian komunan aferon kontribuante per propagando, per instruado, per varbado kaj pleje per organizado. Ni devas sekvi la bonajn ekzemplojn de niaj italaj, bulgaraj, kroataj kaj aliaj najbaroj kiuj sukcesis kaj sukcesas ec’ arang’i internaciajn regulajn aktivecojn. Ni devas kompreni ke nia agado favore al Esperanto helpas ankaŭ nin mem por antaŭenpas’i niajn sciojn pri la lingvo, niajn interrilatojn kun eksterlandanoj, nian kulturon g’enerale. Ni devas konvinki la edukajn instancojn en niaj propraj loklog’oj pri la graveco de esperantista movado ankaŭ por la g’enerala edukiteco de la junularo, ankaŭ por ke g’i pli firme kaj pli rapide ekposedu la fremdlingvojn tiel necesaj por ilia klerig’o kaj estonta profesio.

Ni povas peti c’irilate ankaŭ la helpon moralan kaj materian de niaj fremdaj amikoj esperantistoj, kiel tio okazis envere pasintece. Ni memoru c’i tie altestime la kontribuaj’ojn de amikoj Jaques Tuinder (Nederlando) , William R. Harmon (Usono), Marija Belos’evic’ (Kroatio). Renato Corsetti (Italio), Agnes Geelen (Belgio), Andrzej Grzebowski (Pollando), Boj’idar Ivanov (Bulgario), David Kelso (Skotlando), Marcel Cortiade (Francio) kaj multaj aliaj.

Ni povas peti helpon kaj subtenon ankaŭ de la lokaj oficejoj de UNESCO, kun kiu kunlaboras UEA.

Ni devas instigi la junulojn ke ili refondu sur solidaj bazoj ilian organizaj’on, c’u en nivelo de mezlernejoj, c’u en nivelo de gestudentoj universitataj. Tio plej gravas por nia

log'antaro ankoraŭ relative juna. Mi memoru c'ikaze ke en la unuaj jaroj post 1990 junuloj havis sian organizon je du fortaj branc'oj en Tirana kaj Dures.

Ni devas plivigli nian Instruistan Sekcion de ILEI, tre grava institucio por E-instruado. Estus konsilinde ke ni varbu junajn fremdlingvajn instruistojn de elementaj kaj mezgradaj lernejoj, kiuj volonte ekposedus ankau' Esperanton. Tiuj instruistoj, lau'konsentite kun respektivaj edukaj urbaj instancoj ekinstruus en siaj lernejoj ankau' Esperanton.

Nelaste ni devas subteni pli forte nian tutlandan Albanan Esperanto-Ligon.

Nu, ek al la laboro!

Bardhyl Selimi, sekretario de Albana Esperanto-Instituto

Leteroj

Raporto de Aurora Bute

From: aurora bute [a_bute@hotmail.com]

Sent: Friday, February 11, 2005 8:38 AM

Estimata kolego,

Mi konfirmas la ricevon de la Bulteno, pro kio mi tutkore dankas! Mi ege bedaŭras ke ghi ne alvenis kelkajn tagojn antaŭe, kiel respondo al mia instigo por la balkananoj raporti pri la E-agado en siaj landoj, por la jara agadraporto kiun Maritza Guiterez, estrarano pri la Regiona Agado, devis verki por la UEA estraro kaj aperonta en la revuo Esperanto. Mi skribis al Maritza la jenan mesagheton:

"Kara Maritza,

Jen malfrua materialo de Albanio, kie la E-agado estas sufiche vigla. Se la artikolo aperonta en la revuo Esperanto pli Balkano ne plu povas enhavi informojn pri Albanio, eble aperos io en la venontaj numeroj, ĉar niaj albanaj gekolegoj meritas tion."

Amike,

Aurora Bute

From: aurora bute [a_bute@hotmail.com]

Sent: Thursday, February 03, 2005 12:21 PM

Estimataj komisionanoj,

Koran dankon al tiuj, kiuj sendis agadraporton por 2004.

Aurora Bute

>From: "Maritza" <mGGLEZ@enet.cu>

>To: "aurora bute" <a_bute@hotmail.com>

>Subject: Laborplano-landa kaj regiona agado

>Date: Wed, 2 Feb 2005 20:42:20 -0500

>

>Kara Aurora,

>dankon pro via kunlaboro kaj aktivado. Mi jam verkis raporton pri

>Balkanaj landoj pere de la senditaj de vi. Fakte, mi reviziis kaj estos la unua fojo

ke aparta raporto aperos pri via regiono, cxu tio ne estas bona pasxo? Ne cxio povas aperi, sed mi kredas ke estas bona komenco.

>amike, **Maritza**

Politikaj Aferoj

Krizo "Haradinaj"

Antau' nelonge, lau' postulo de Jug'ejo de Hago, la j'us elektita c'efministro de Kosovo, Ramush Haradinaj (Ramus' Haradinaj) rezignis de sia posteno kaj volontule flugis al Hago por respondi al la akuzoj starigitaj kontrau' lin tie. Tio kau'zis veran registaran kaj ne nur registaran krizon en lando kiu ekde ses jaroj administrig'as de UN misio kaj kontrolatas de armitaj fortoj de KFOR (NATO- trupoj).

Ramush Haradinaj estis unu el la elstaraj gvidantoj de UÇK (Naci Liberiga Armeo de Kosovo) kiu aparte dum la jaroj 1998-1999 kontrau'staris la s'tatan terorismon fare de Serbio tie kaj kiu kunlaboris kun NATO-trupoj por liberigi Kosovon.

Post la g'eneralaj balotoj, jarfine 2004 Hardinaj estis elektita de Parlamento de Kosovo kiel c'efministron, sed tio ne plac'is al politikistoj de Eu'ropo g'enerale, same al tiuj de Serbio. Sinjoro Solana ekzemple deklaris siatempe ke la elekto de Hardinaj estis la malplej oportuna solvo.. Jen nun, danke al interveno de Haga- Jug'ejo Haradinaj "falas" kaj kosovanoj devas elekti alian c'efministron. Sed la problemo ne kus'as simple en la anstatau'ig'o de c'efministro. Albanoj en Kosovo nun ekkomprenas ke la internacia komunumo estas alproksimigante la tagon kiam oni devas estigi la tiel nomatan rezolucion de Sekureca Konsilio de UN pri Kosovo, lau' kiu Kosovo plurestos integra parto de Serbio! UNMIK –la fakta registaro en Kosovo faros plejblon por tion realigi, kion montris jam la g'isnunaj ties agoj.

Rilate tiun eminentan dang'eron por la multsuferinta albana popolo de Kosovo, s-ro Adem Demaçi (Demac'i) politika aktivulo, lau'reato de la porpaca premio "Sah'arov" en la jaro 1991, tuttempe avertis siajn samlandanojn kaj kontrau'is la subskribon de la Interkonsento de Ramboujet (Rambuĵe) en Francio kiu antau'postulis la "suverenecon de Serbio pri Kosovo". Dum la aliaj kosovaj politikaj gvidantoj (Rugova, Thaçi, ka)

tuttempe deklarsi ke ili aspiras kaj celas nur la sendependecon de Kosovo disde Serbio, tiel endormigante sian popolon kaj kas'ante la veran dang'eron minacantan g'in.

Nur kelkaj tagoj antaŭ ol Haradinaj rezignus de sia posteno de c'efministro, kau'zante la supremencian politikan krizon, Demaçi estis demandita de j'urnalisto g'uste tiel:

“S-ro Demaçi, vi estas deklarinta ke ‘se falas la registaro Haradinaj, ekfalos certe ankaŭ Kosovo’. Kial do?”

La respondo estis:

“Mi opinias ke rilate la aferon de Kosovo estas interesitaj multnombraj internaciaj faktoroj, kiuj, siaflanke, estas movig'emaj, ne stabilaj kaj interligitaj unu al la alia. Lau'unuj faktoroj, la Jug'ejo de Hago estas jura ilo por kondamni la militkrimulojn. Lau' aliaj faktoroj, tiu Jug'ejo estas jura ilo por atingi certajn politikajn objektivajn. La unuaj prikonsideras nur la paperojn, dum la duaj prikonsideras la vivon en sia komplekseco. Tia estas ja la politiko. Tiu lasta instruas nin ke kiam temas pri Kosovo, la faktoroj kaj la fortoj enmonde estas tre atentemaj. C'ar Kosovo estas fenomeno ege neantaŭvidebla. La mafiulo kaj teroristo Milos'evic' sukcesis supervivi la agresion kontraŭ Slovenion, militon kontraŭ Kroation, murdojn kaj kruelaj'on en Bosnio-Hercegovinio, sed en Kosovo li fiaskis.

Estas tufacile aresti sinjoron Haradinaj, sed kio poste? Neniu scias kio okazus. Evidentas ke sinjoroj de Grupo de Kontakto pri Krizoj, g'uste c'ar ili ne regas, ili ja “knaras” la aferojn pli bone, tial proponas kaj sugestas konforme al la leg'oj de la vivo.

Estas, aliflanke, multaj albanoj kiuj ne audacas militi kaj morti por Kosovo, sed ekzistas multaj tiaj kiuj ne hezitas militi kaj morti por Ramush Haradinaj! Tia estas la spirito de popoloj ankoraŭ nematuraj! Kion fari do? Tia fenomenon ne povis eksplici la scienco nek la religio! La krimulo Milos'evic' ordonis por ke oni nenigu fajre kaj fere la liberaman familion de Jasharaj kaj ribelig'intan kernon de Prekaz. Sed tuj post tio ekbrulig'is la junulaj koroj de Kosovo kaj eksplodis la nekontrolebla liberiga ribelo de Kosovo. Milos'evic' prikonsideris la klasikan formulon: “Oni devas piedpremi la kapon al la serpento c'ar tiel ankaŭ la korpo mortos “. Sed la popolo ne estas serpento kaj oni ne povas ekscii kie estas ties kapo kaj ties hvesto. La popolo estas neniigebla perforte organismo. Se nun, ni supozus ke ekfalus perforte la registaro de Haradinaj, tiamfoje interrompig'us kiel per razilo c'uj jam pene komencig'intaj kaj prokrastig'intaj politikaj procesoj. Tial mi deklarsi ke tiukaze “ekfalus mem Kosovo”. Kaj la neantaŭvidebla lavango de Kosovo superokupus c'ujn tiujn trovig'antaj ene kaj c'irkau'Kosovo!”

Tuj post la sindeteno de Haradinaj alia j'urnalisto intervjuis Demaçi-n kiu respondis kurte per jena deklaro:

“Ekde 8a de marto, koncerne la politikan konscion de civitanoj, Kosovo ne plu estos tiu kiu g'i estis g'is nun. Kaj kiam s'ang'ig'as la politika konscieco, estas necese ke s'ang'ig'i ankaŭ la sekvaj'oj, evoluaj'oj kaj realaj'oj. Per la perforta forigo de Haradinaj, de la iluziaj klopodoj kaj pravaj aspiroj de albanoj kaj nealbanoj por libereco kaj sendependeco, eknaskig'as alia konscio kaj ekestig'as situacio tute fluida kaj rompebla kaj neantaŭvidebla.

Ne temas nur ke oni forigis homon je granda kaj rara energio kiu gvidis insiste antaŭ'en kredante al la eu'ro-usona politiko per multaj nedefinitaj promesoj, sed temas ja pri io multe grava koncernanta tion, ke multaj civitanoj, kredante al tiu senlaca “vojgvidanto” kaj al liaj c'iutagaj promesoj ke la libereco kaj sendependeco estas proksimaj, ili laboris

fidplene kaj energi plene por promovigi kaj finfini la procesojn postulitaj de ili. Ramush Haradinaj estis la "lasta stacio de la promesoj" de civitanoj de Kosovo ke al tiuj lastaj oni agnoskus la rajton je libereco kaj sendependeco. Per la forigo de Haradinaj tiuj promesoj mortantas kaj la energio de la ties kredintoj estas vaporig'anta kiel la neg'o pro la varmegaj sunradioj. Nun estas evidenta ke nenio estas plu el promesoj por libereco kaj sendependeco por la plimulto de log'antaro de Kosovo; Ekde hodiau', ekregos seniluziig'o, kiu malrapide sed senhalte transformig'os en indignon kaj koleron. Tiu indigno kaj kolero, katalizita per malespero kaj timo por sia futuro, ekeksplodos, ni ne scias kiam kaj kie, je kiaj formoj en la spacoj de Kosovo kaj ne nur de Kosovo.

Tiuj pensantaj ke per minacaj'oj je formo de forto povas haltigi ion, malfrue ekvidos ke ili eraris.

Tiuj pensantaj ke per aresto de Haradinaj ili fermos definitive por Kosovo la c'apitron de la formulo "nek au'tonomio, nek sendependeco", tre baldau' konvinkig'os ka la erao de "politikaj alkemioj" estas sunsubirinta unu kaj c'iamfoje. Tio estos envere malfermig'o de nova politika c'apitro tute nekonata por c'iuuj, same por tiuj ene kaj ekster la kosova problemo. Post seniluziig'o kau'zanta la finig'on de tiu "lasta stacio de malveraj esperoj de albanoj", c'iuuj nesolvitaj au' duonsolvitaj problemoj reaktivig'os. Post tio ne plu gravas kion eldiros s-ro Haradinaj sed pli gravas kiel sin sentos kaj kion faros tiuj liberig'ontaj de iluzioj kaj vanaj esperoj por libera Kosovo per "Rezolucio 1244 de SK de UN", per "Konstitucia Portempa Kadro de Kosovo" kaj per la gvidado de formalaj gvidantoj de Kosovo. La leg'oj de la vivo ne plu eltenos la homajn leg'ojn protektantaj antihomajn interesojn.

Bardhyl Selimi

Informoj de Manfred Westemayer

m.westemayer@comlink.org

Sent: Monday, March 14, 2005 2:51 PM

To: AVE-anoj

Subject: Konsilioj de la Euxropa Verda Partio / Kun AVE-Informtablo

Karaj geamikoj,

mi ne havas sufcixe da tempo por raporti pri cxiuj raportindaj aferoj. Tamen, cxiam grava afero estas ke pli multe de ni AVE-anoj membrigxu cxe la sialanda

Verda Partio (kelkfoje sub alia nomo - se vi ne scias, bonvolu demandi min). Konstantan kunlaboron inter Verdaj Partioj kaj esperantistoj okazas en: Francio (+++), Belgio (++) , Germanio (+), Bulgario (+), Aŭstrio (+), Aŭstralio (+), Latvio (+), Ukrainio (?), Hungario (?), (eble mi forgesis kelkajn ??)

Bonvolu mem anonci viajn kontaktojn kun via Verda Partio rilate Esperanto - cxirilate vi ne devas esti membro de Verda Partio, kvankam tio estus pli bone. Mi ne atendas tuj pozitivan reagon - sed gravas, ke ili scias ke ni Verduloj Esperantistaj ekzistas.

Konkrete demando:

Kio pretas partopreni en Riga aux en Kiev por informi pri Esperanto kaj AVE (vidu sube)

- Se jes - bonvolu respondi al AVE.

Kutime eblas partopreni kaj prezenti nian projekton sur inform-tablo.

Aktivado de AVE-anoj en la Verdaj Partioj:

Bonvolu aubteni la verdan partion en via lando, kaj plej eble membrigxu en la Verda Partio.

Bone, se AVE-anoj en Latvio aux Ukrainio povus partopreni la konsiliojn okazontaj en Riga kaj Kiev.

2005-05-6/8 Riga, 2a Konsilio de la Euxropa Verda Partio.

2005-06: Bulgario - Verduloj aktivis surloke kaj kandidatigxos por la Bulgara nacia parlamento. Dank' al s-ano Ivan Michev AVE havas rektan kuntakton kun ili.

2005-10-21/23 Kiev, 3a Konsilio de la Euxropa Verda Partio.

Amike salutas, **Manfred Westermayer** (sekretario)

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) (2005-02) www.comlink.apc.org/ave/

Verdulaj informaj'oj

From: m.westermayer@comlink.org

Karaj geamikoj,

post longa pauxzo malgrandan informon, bedaŭrinde ne pozitiva.

Balotado en Irako montris plurajn problemojn:

Certe estas progreso ke okazis pli-aux-mapli demokrataj balotado. Bedaŭrinde kelkaj grupoj/etnoj ne povis/volis

partopreni:

Multaj sunnitoj ne volis.

Multaj kristanoj ne povis. Kial? Oni simple forprenis la balotokestojn. Cxu tio eblis? Jes. Kiu faris tion? Evidente la Demokrata Partio de Kurdistan (KDP). El 200.000 da siriaj kristanoj kiuj logxas oriente de Mossul, 90% estis malhelpitaj baloti cxar KDP-uloj fortransportis 24 balotohelpantojn kune kun la balotokestoj. Ekz-e la vic-urbestro de Qaraqosh, Louis M. Ayoob plurfoje alvokis kaj demandis - kaj estis neglektita. Je 17a horo li alvokis la usonan konsulon en Mossul. Tiu-cxi sendis 2 helikopterojn kun balotokestoj, kiuj devus alveni je 22a horo (kun permeso plidauxrigi la balotadon ankaux

nokte). La helikoptero venis, sed la vic-urbestro estis kaptita de kurdaĵ soldatoj antaŭ la surterigejo de la helikopteroj. Li estis portita en la oficejon de la kurda partio, severe batita, ekz-e rompita la nazo. Li auxdis la helikopterojn, sed tiuj, cxar neniu venis - forflugis. Post tio li estis ellasita el la torturejo. Episkopo Basilios Georgos Casmoussa plendas pro tio morala

katastrofo: "Nun ni kristanoj estas popolo sen vocxo!"

Li postulas internaciajn kontrolistojn je la sekvaj balotoj, por ke tia ne plu okazos.

Bedauxrinde, ke subpremita popolo, kiel la kurdoj (kiuj certe estis subpremataj) siavice subpremas malpli fortan popolon, la asirojn.

<E. Decker, Badische Zeitung Freiburg 2005-03-03,p.3)

Amike salutas, Manfred Westermayer (sekretario)

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)

(2005-02) www.comlink.apc.org/ave/

Mi preferas "cx...", kaj b-vu ne sendi grandajn fotojn al mi sen interkonsento.

Informoj de Henri Masson

Genia eltrovaĵo

Ni povas demeti la chapelon antaŭ la genia eltrovaĵo de Franko Luin (Svedio), kiu ebligas plene uzi la Esperanto-alfabeton per kiu la Internacia Lingvo estas perfekte fonetika :el NUN:

De c+x al unikodo C'e www.esperanto.se/al-unikodo/ troveblas tre simpla 'filtrilo', kiu ebligas tujan transformon de strange koditaj esperanto-literoj (c+x, c+h kaj aliaj) al unikode supersignitaj literoj. Oni kopias sian tekston en kadron, klakas al tau'ga butono -- kaj preta! Au'toris Janko Luin. Funkcias en operaciumoj kaj programoj, kiuj komprenas unikodon.

Raportis: Franko Luin [<inko@algonet.se>](mailto:inko@algonet.se)

Vi jam povas chi poste kontroli chu tio funkcias per via komputilo (sistemo ') / Vous pouvez déjà contrôler ci-après si cela fonctionne sur votre ordinateur (système ') :

De c+x al unikodo

Ĉe www.esperanto.se/al-unikodo/ troveblas tre simpla 'filtrilo', kiu ebligas tujan transformon de strange koditaj esperanto-literoj (c+x, c+h kaj aliaj) al unikode supersignitaj literoj. Oni kopias sian tekston en kadron, klakas al tau'ga butono -- kaj preta! Aŭtoris Janko Luin. Funkcias en operaciumoj kaj programoj, kiuj komprenas unikodon.

Raportis: Franko Luin [<inko@algonet.se>](mailto:inko@algonet.se)

La krizo de la amasinformiloj

Si vis pacem, para pacem (Se vi volas pacon, preparu pacon) Nevé Shalom / Wahat al-Salam (pri la Pacozao en Israelo) Histoire de virus (historio pri virus[-lingvo]) Muets comme des carpes (Mutaj kiel karpoj -- pri paneo de la sistemo de interpretado dum kunveno de la shtatestroj de la 25 landoj de EU) Alerte au virus linguistique ! (Alarmo pri lingva viruso !) La langue qui surprend (la lingvo kiu mirigas -- divenu kiu ;-)) Ça bouge partout... (Chie estas movigho... : 14 koncizaj informoj pri la antaueniro de Esperanto en diversaj landoj kaj sferoj de la homa vivo) Voyager autrement (Vojaghi alimaniere : bicikla vojaĝo de André Demarque de Bruselo al Romo, kies libro estas elshutebla che : http://satamikarohm.free.fr/article.php3?id_article=615

André, kaj ankaŭ Zef (Brest-Vladivostoko), estos en Bulonjo che Maro.

Komuniko de Christian Lavarenne :

Esperanto-en-Sxalonio kaj la Sxalona Popola Universitato invitas : Claude PIRON prelegos la 16an de marto en Burgonjo pri la temo de sia verko "Le défi des langues : du gâchis au bon sens", franclingve por cxiu publiko. Informilo : <http://christophe.lavarenne.free.fr/050316cp.html>

Rimarko HM : La libro de Claude Piron "Le défi des langues" (La defio de la lingvoj) ekzistas ankaŭ en portugallingva traduko (eldonita en Brazilo). Preparighas plia traduko en la litova. Eltirajhoj (en la franca) el tiu libro aperas che : http://satamikarohm.free.fr/article.php3?id_article=443

(au en la sekcio "Libroj" de www.esperanto-sat.info)

Jules Verne kaj Esperanto

Supozeble ne nur en Francio, pro la centa datrenevo de la morto de Jules Verne, la amasinformiloj nekutime atentis pri li kaj lia verkaro. La jhaŭdon 17an de februaro 2005, la radiostacio Europe 1 dedichis preskau unu horon kaj duonon al li kadre de elsendo de Jacques Pradel plue auskultebla che : http://www.europeinfos.com/antenne/fiche_emission.jsp?id=561#

Horaro : 9a ghis 10a 30. Bedaurinde sen mencio pri Esperanto. Reagebleco sampaghe (klaki sur " Participez, envoyez un courriel " -- partoprenu, sendu retmesaghon)

Char certe estos multaj artikoloj, radio- au TV-elsendoj pri li tra la mondo dum la tuta jaro 2005, valoras disponi je baza informmaterialo por atentigi la amasinformilojn pri la apenau konata fakto ke Jules Verne farighis partizano de Esperanto : Jules Verne kaj Esperanto. Jules Verne naskighis la 8an de februaro 1828 en Nantes, okcidenta Francio. Li vivis ekde 1872 en Amiens, nordokcidenta Francio, kie li mortis la 24an de marto 1905. Pri li ekzistas du gravaj centroj de dokumentado : Musée (Muzeo) Jules Verne en Nantes, kaj "Centre International de Documentation Jules Verne" (Internacia Centro de Dokumentado Jules Verne) en Amiens. Tre scivolema pri chio, pri sciencoj, esploroj kaj malkovroj, li imagis jam tiutempe efektivighon de inventajhoj inter kiuj multaj aspektas nun al ni kiel tute ordinaraj aferoj. La neekzisto mem de tio kiu aspektis tiam neimagebla aspektus hodiaŭ... neimagebla. En unu el la plej famaj el liaj 62 romanoj (sume : 22 000 paghoj, 5 000 ilustrajhoj), "20 000 leugoj sub la maroj", kiun li komencis verki en 1866, li jene priskribis la shipanaron

de la submarŝipo "Nautilus", konsistanta el homoj de diversaj rasoj, kiuj komunikas inter si per "idiomo sonora, harmonia, fleksebla kies vokaloj shajnis submetitaj al tre varia akcentado" kaj "kies devenon oni ne povis diveni". Malpli konata fakto estas ke li ekinteresiĝis pri Esperanto kaj akceptis en 1903 la honorprezidantecon de la Esperanto-Klubo de Amiens (kiu daŭre ekzistas). Lia nepino Marguerite Allotte de la Fuye, kiu verkis pri li biografion sub la titolo "Jules Verne - Sa vie, son oeuvre" (J.V. - Lia vivo, lia verko) skribis ke li ofte ripetis ke "la shlosilo de komuna lingvo perdighinta en la Babelturo povas esti refarita nur per la uzado de Esperanto".

Li intencis popularigi Esperanton per romano, kiun li komencis verki sub la titolo "Voyage d'études" (Studvojaĝo), sed la morto forprenis lin kiam li finis la kvinan paragrafon de la kvina ĉapitro. Ghi aperis nur en 1993, kun aliaj neeldonitaj rakontoj, en libro titolita "San Carlos et autres récits inédits" (Parizo : Le Cherche Midi éditeur. ISBN 2 86274 267 8). En tiu romano, oni povas pensi ke li esprimis sian propran opinion pri la Internacia Lingvo tra unu el la herooj, Nicolas Vanof : "L'espéranto, c'est le plus sûr, le plus rapide véhicule de la civilisation." (p. 244 : Esperanto, tio estas la plej certa, la plej rapida vehiklo de la civilizado).

Granda parto el lia verkaro aperis en kina versio sed, ofte, ĉefe en Usono, en grandparte kripligita formo en kiu ĉio instiganta al pensado estis forigita, en formo perfidanta lian spiriton. Ekzemple la detruo de la submarŝipo "Nautilus" okazis ne pro militŝipa batalo en la romano "20 000 leŭgoj sub la maroj" sed en submara groto pro vulkana erupcio en la pli posta romano "L'île mystérieuse" (1874; La mistera insulo).

Lernu ! # Dankon al/ Merci a ARTE # Raporto kaj alvoko el Japanio

Espéranto-Jeunes produktis en granda kvanto, sub la titolo "Lernu !", kompakdiskon (KD) kiu ebligas al uzantoj de komputiloj, precipe sen aliro al la Interreto, malkovri multajn aspektojn de Esperanto multe pli bone ol tio, kion ebligas paperaj dokumentoj aŭ libroj. Kaj ĝhia kosto estas multege malpli alta : nur 2 eŭroj ! La enhavo konsistas plejparte el materialo jam trovebla en Interreto. Lau informoj de Xavier Godivier : - la tuta ttt-ejo "lernu!" en siaj 22 kompletaj lingvaj versioj <http://lernu.net> - la sofvaro "Kurso de Esperanto" en 26 lingvoj <http://ikurso.net> - PMEG/Plena Manlibra Gramatiko de Esperanto de Bertil Wennergren <http://bertilow.com/pmeg> - la programo EK (esperanto klavaro por facile skribi en Esperanto <http://www.esperanto.mv.ru/Ek/> - la programo Unired : unikodkapabla redaktilo kiu ebligas pli facile trakti multlingvajn dosierojn. <http://www.esperanto.mv.ru/UniRed/UTF8/>

- kelkaj muzikaj MP3-oj.
Priskribo aperas ĉe :
http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=102

La plej granda parto uzeblas per ĉiuj komputiloj. Pli precize, la tuta ttt-ejo "lernu" uzeblas per Windows, Mac kaj Linux. Same pri la muzika parto (mp3 dosieroj) kaj la gramatiko PMEG (html-a ttt-ejo). La sofvaro "Kurso de Esperanto" uzeblas nur per Windows kaj Linux. La du pliaj programoj EK kaj Unired nur per Windows. La KD estas vendita je la prezo de 2 eŭroj al individuoj kaj 1 eŭro al asocioj kiuj mendas plurajn dekojn.

Indas noti ke, ene de la KD, en gxia franclingva prezento, aperas adresoj kaj ttt-ligiloj de la chefaj franclingvaj asocioj kaj do SAT-Amikaro cheestas tie apud JEFO, UFE, ESK (Kebekio) kaj JES (Svisio). Korektantoj estos bonvenaj por helpi en la korektado de la taskoj sur la Interreto. Jam pluraj SAT-Amikaranoj partoprenas en tio.

Hieraa vespera elsendo "Thema" de la franc-germana televido ARTE (15.02.2005) temis pri "Les armes etc. - Les États-Unis et la guerre" (La armiloj, ktp. Usono kaj la milito). Interese! En ghi oni audas kaj vidas Eisenhower prononci sian atentigon pri la minaco kiun estigas la militara-industria komplekso. Plia dissendo okazos hodiau (16an, je la 15a 15). Ghi estas spektebla en la franca kaj la germana. Anglalingvanoj povas multon kompreni pro tio ke plejparto el la multaj intervjuoj kaj intervenoj estas en la angla (tradukado chu parola chu surekrana en FR kaj DE). Por reagi, sed nur tre mallonge (Ne pli ol 300 signoj kaj spacoj!), plenigi unue <http://faq.arte.fr/faq/contact/index_f.cfm>

kaj daurigi poste che <http://faq.arte.fr/faq/contact/program_f.cfm>.

Alvoko el Japanio

Karaj esperantistoj, Raporto mezvoja por "kurso de Esperanto"

en la mezlernejo en Ou~me, Tokio. Ja venis 23 Eh^o-retmesagxoj de alilandanaj esperantistoj kaj 51 karto por kuragxigi lernantojn de japanaj esperantistoj. Lernestro kaj oficistoj surprizigxadas multajn kartojn kun varmegaj vortoj al la lernantoj.

Ankaux restas unu klaso en la 21a. Mi finraportos, kiam mi finigxos la fruktodonantan kurson.

(Sano J.)

p.s.

Mia amikiono KITAGAWA Ikuko deziras kuragxmesagxojn de vi por lernantoj en super-mezlernejo. Per alia sendo mi anoncos al vi detalon.

Antauxdanke,

Sano J.

===

Karaj esperantistoj,

Mia amikiono KITAGAWA Ikuko deziras kuragxmesagxojn de vi por lernantoj en super-mezlernejo. Per alia sendo mi

anoncos al vi detalon.

Antauxdanke,

Sano J.

//////////

Saluton!

Mi estas instruistino de la angla en la super-mezlernejo en Yokohama(UK-urbo en 2007) Japanio.

Mi ankaux instruas Esperanton en la kadro de lerno-objekto 'gxenerala', kie lernantoj povas elekti diversajn temojn.

Unu el elekteleblaj programoj estas Esperanto en mia lernejo.

Cxifoje mi havos unutagan kurson por 4 lernantoj en la 11a de Marto.

Ili estas 16-jara knaboj, Iliaj nomoj estas Takuya, Kouji, Masaya kaj Tomoyuki. La unua tri knaboj apartenas al la klubo de basbalo, kaj la lasta apartenas al futbalo-klubo.

Ili cxiuj estas gajaj, amuzaj kaj interesaj.
Ili cxiutage demandas al mi esperantajn vortojn, cxar ili scias, ke mi parolas Esperanton. (dufoje en cxiu jaro, mi okazigas Esperanto-kursojn, kaj kelkaj klasanoj jam partprenis en Esperanto-kurso.)
Ekzemple, kiel oni diras 'sidigxu' aux 'silentu' en Esperanto? Kaj ili amuze kaj sxerce imitas mian prononcon kaj memoras kelkajn vortojn kiel ludo.
En la 11a de Marto matene (3 horojn) mi havos kurson por ili.
Cxu vi bonvolus sendi al ili mallongajn mesagxojn kun simplaj frazoj? Almenaŭ via nomo, lando, urbo estas necesaj. Krome mi petas la frazon 'Mi amas ion'. Kaj skribu vian agxon kaj sekson, se tio ne gxenus vin. (Certe ili gxojos, se ili ricevos mesagxojn de samgeneracianoj!)

Mia retadreso de lernejo estas

kitagawa-ikuko@pen-kanagawa.ed.jp

Limdato estas la 9a de Marto.

Se vi povas sendi al ni posxtkartojn, ankaŭ tio estas ege bonvenaj.
Lerneja adreso estas:

Shirosato Koko
(Koko signifas super-mezlernejon en la japana)
Esperanto-Klaso 364-1 sanmai-cho,
Kanagawa-ku, Yokohama 221-0862 Japanio

Antauxdankegon!
Ikuko KITAGAWA

Plia atuto por diskonigo de esperanto

Komunikajho :

APSIKE 1997 (Asocio Por la Sociala Integrigho Kaj por Esperanto) informas vin, ke post kelkaj tagoj en la librovendejoj, la superbazaroj kaj la autovoj-butikoj disponeblos inter la gvidlibraro far AEDIS, Esperanto, la plejgravajho (numero 169).

Alloge prezentita tiu ok-pagha gvid-libro estas la unua de kvaropo. Ghi vendighos kontraŭ 3 euroj 05. Ghin verkis Zohra MRAIHY kaj Thierry SALADIN. La venonta gvid-libro (Konversacio) teorie estos presata post kelkaj semajnoj.

Koncerne la sekvantajn gvid-librojn, la eldonisto decidis mem lai la vendokvanto de la unuaj du.

Ni esperas, ke la publiko akceptos ghin favore, kaj chefe ke la francaj esperantistoj profitos ghin ne nur por varbi, sed ankaŭ por uzi ghin kaj reklami.

Tiurilate, ĉar APSIKE estas la aŭtoro, la respondeculoj de libroservoj turnu sin rekte al ni por profiti de rabato en la kazo de mendo almenaŭ 20-ekzemplera.

Kontaktu nin al la ĉi-suba adreso :

<> Réinsertion et Espéranto
26 rue Enclos Fermaud
34000 MONTPELLIER
Telefono : 04.67.91.01.96 Fakso : 04.67.92.75.44
Posh-telefono : 06.66.46.77.07
[<apsike1997@yahoo.fr>](mailto:apsike1997@yahoo.fr)
Hejm-paĝaro : <http://apsike1997.free.fr>

**L'Europe a une monnaie unique, l'€uro
Il lui faut une langue commune, l'Espéranto**

**Europo havas ununuran valuton, €uron
Ghi bezonas komunan lingvon, Esperanton**

Informoj pri publikado de albanaj poemoj en Serbio

From: Borisa Milicevic <esp@EUnet.yu>

Ismail Kadare (1936)

VERKITE 31-AN DE DECEMBRO

Cion prosperan mi deziras al vi hodiaŭ.

Al vi karaj.

Al vi bonaj.

Al montoj oldecon cxastan,

Al kampoj kaj sxafoj - fekundecon,

Al fumtuboj - fumon nigran,

Al patrinoj - lakton blankan,
Al sxoseoj - bruon de l' idaro,
Al falintoj - trankvilon.

Esperantigis Nikola

Rasic

Migjeni (Milosh Gjergj Nikola)

(Albanio, Shkodra 1911 - Italio 1938).

Migjeni (Migeni) estas la plej elstara albana poeto en la periodo inter la du mondmilitoj. Li postlasis la la poemkolekton "Liberaj versoj" kaj kelkajn prozajojn, kiuj signifis turnoverkojn en la tiutempa albana literaturo, lau la poeteca alvokigo kaj la socialaj temoj, kaj inspiris plurajn verkistojn en la tridekaj jaroj.

ANTAUPAROLO DE ANTAUPAROLOJ

Tagon post tag' la dioj subiras

kaj iliaj formoj glitas

lau jaroj kaj jarcentoj.

Kiu estas dio kaj kiu - homo, neniun nun scias,

en menso de l'homaro dio kauras ciam.

Tempiojn siajn li perfingre premas

en signo de pentado,

kaj en kolero tondrolaute krias:

Ho, kion, kion, mi kreis?

- Kaj homo ne scias

cu dio estas lia ido

au li estas parenc' de dio.

Sed li vidas ke estas vane

imagi idolon

kiu ne vokrespondas.

Kiu estas dio kaj kiu - homo, neniun nun scias.

Alvenis tempo

kiam homoj interkonsentis

konstrui la Babelturon -

kaj al turpinto, al pinto de tronpintoj

supreniros la homo

kaj de tie ekkrios:

Dio: Kieas vi?

Esperantigis: Borisa Milicevic

Ismail Kadare

(Albanio, Elbasan 1936).

Unu el la plej konataj kaj la plej aprecataj autoroj de Albanio.

Poemkolektoj:

"Junecaj inspiroj" (1954); "Kial pensas
ci-montaroj?";
"Motivoj kun la suno".

Rakontoj kaj raportajoj:

"La suda urbo" (1967).

Romanoj:

"Generalo de la morta armeo" (1963);
"Nupto" (1968); "Fortikajo" (1970); "Vintro de
ega soleco" (1973); "Novembro de unu cefurbo" (1975);
"Kroniko sur stono".

Liaj romanoj estis tradukitaj en plurajn lingvojn.

POEZIO

Poezio,

La vojon al mi kiel vi trovis?

Patrino mia albanan bone ne konas,

Leterojn, kiel Aragono, skribas senpunte kaj senkome,

La patro al aliaj maroj forvagus juna,

Sed venis vi

Pasante stratojn de mia urbo stonoza,

Frapetis timeme ce la pordo de la trietaga

Numero 16.

Multajn aferojn en la vivo mi ekamis kaj foramis

Por multaj aspiroj mi estis malfermita urb',

Sed denove,

Kiel la knabo malfrue revenanta hejmen,

Laca kaj skuita de vagado tra la nokt',

Tiel ankau mi, laca konstante,

Post ciu amo revenas al vi.

Kaj vi,

Sen ajna malamemo kontrau perfidanto

Buklas mian hararon karese,

Haltejo mia lasta,

Poezio.

Esperantigis Nikola Rasic'

Alvoko

La Amazonia Arbarego estas en granda dang'ero!

Karaj,

La Brazila Kongreso estas voc'donante por projekto kiu reduktus la Amazonian arbaregon je 50 % de ties nuna surfaco.

Sufic'as minuto por tralegi c'i tiun alvokon, sed mi petas vin surmeti ankau' vian nomon en la liston malsupre.

Unue, jem kelkaj faktoj:

la Amazonia arbarego respondecas pri 20 % de oksigeno enspirebla en nia Tero,

30 % de la tutgloba trinkebla akvo entenas en la Amazonia baseno,

60% de la medikamentoj kontrau' kancero uzataj hodiau' derivas de herboj troveblaj nur en la Amazonia baseno.

La surfaco malarbarigenda estas kvaroblo de Portugalio kaj g'i uzeblig'os c'efe por agrikulturo kaj pas'tejoj. La tuta ligno vendotos kiel krudmaterialon en internaciajn merkatojn per multnaciaj grandegaj kompanioj. La vero estas ke la grundo de Amazonia arbarego estas senutila ekster ties arbaro mem. La g'ia kvalito estas acideca kaj la regionon trafas konstantaj diluvoj.

Nuntempe pli ol 160 000 km² da malarbarigita tero je la sama celo estas forlasita kaj transformig'anta en dezerton, kio signifas ke la propono envorte sekvas mallongtempajn interesojn de kelkiuj, sed longtempajn interesojn de neniu ajn.

Mi petas vin kopii la tutan tekston kiel apartan ret-mesag'on, aldoni vian nomon en la liston malsupre kaj resendi tion al kiu ajn via geamiko. Se vi estas la 400 –a persono signinta, bv sendi kopion ankau' al fsaviola@openlink.com.br .

(Ne faru "forward" per g'i c'ar tio entenus multe da <, > signoj kio malkurag'igus la sendontojn).

Dankon pro via helpo:

Sekvas la nomlisto:

Bardhyl Selimi, instruisto de ametamtiko, Tirana Albanio

Etleva Buka, instruistino de h'emio, Tirana Albanio

Laureta Omeri, instruistino de biologio, Tirana Albanio

Natasha Nauni, h'emia ing'enerino, Tirana Albanio

Thoma Dhroso, ing'enero, Tirana Albanio

Sadete Bici, ekonomiistino, Tirana Albanio

Teksto en la albana

Të mbrojmë pyjet e Amazonës

Thirrje

Kongresi brazilian ka për të votuar tani për një projekt që do ta pakësojë pyllin e Amazonës në masën 50 %. Ju lutem kushtojini një minutë sa vijon, por vendoseni edhe emrin tuaj në fund të listës që po ju dërgojmë.

Së pari, ja disa fakte:

Pylli amazonian i shiut përgjigjet për prodhimin e 20 % të oksigjenit që thithim ne në Tokë.,

30 % të ujit të pijshëm përmbahet në basenin e Amazonës,

60 % të ilaçeve që luftojnë kancerin e kanë prejardhjen nga bimët që gjenden vetëm në pyllin e shiut të Amazonës.

Sipërfaqja që do shpyllëzohet është sa katërfishi i sipërfaqes së Portugalisë dhe do përdoret kryesisht për bujqësi dhe kullota për bagëtinë. I tërë druri do shitet në tregjet ndërkombëtare në formën e lëndës së parë, nga kompanitë e mëdha ndërkombëtare. E vërteta është se trualli në pyllin Amazonian është i padobishëm pa pyllin vetë. Cilësia e tij është tepër acide dhe rajoni është pre e përmbytjeve të vazhdueshme.

Deri sot rreth 160 000 km² të shpyllëzuara për të njëjtin qëllim janë braktisur dhe po shndërrohen në shkretëtira, që do të thotë se ky propozim është me interesa afatshkurtëra për disa dhe me interesa afatgjata për askënd.

Ju lutem kopjoni tërë tekstin dhe formoni një e-mail të ri, vendosni emrin tuaj në listën më poshtë dhe dërgojani cilitdo mikut tuaj tani.

(Mos e bëni atë forward, sepse do dalin shumë kllapa <, > që i shkurajonë njerëzit për dërgesën)

Në se jeni personi i 400 që firmosni, ju lutem dërgoni një kopje te fsaviolo@openlink.com.br Ju faleminderit për ndihmën.

Komuniko de APSIKE1997

Ghia glubendo-projekto progresas. Tiu projekto, pripensita ekde la komenco por europ-skala disvastigado, konsistas en la gluado che la veturiloj de la jena mesagho : EUROPO HAVAS UNUNURAN VALUTON, EURON GHI BEZONAS KOMUNAN LINGVON, ESPÉRANTON Necesas ja ekkonscii, ke tiun sloganon elpensis ne hazardo. Tute male, ghi rezultas el grunda sperto akirita de la asocio APSIKE1997 kune kun sinsekva cerbumado far la tuta administra konsilio dum kelkaj monatoj en 2002 por faciligi ekkonscion che la homoj koncerne la necesecon de komuna lingvo en Europo. Ja komuna lingvo kaj ne ununura. Tiu slogano ankau ebligas kunmeti unu che la alia la vortojn komuna lingvo kaj la vorton esperanto.

Ni memorigas unu fojon plian — ja certe tio estas fakto — ke pli ol 70% el nia junularo malpli-ol-30-jara tute ne scias, ke esperanto estas lingvo. Tiu informo kaj ties konsekvenco, nome, ekkonsciigho pri lingva temo che la gejunuloj kaj la plej aghaj estos tutcerte la unua etapo por atingi, kion ni chiuuj devus deziri, t.e. la naskighon de premgrupo. Unu premgrupo interesighanta pri lingvaj problemoj kaj apoganta sin sur popola bazo kies forto estos tro impona, ol ke la politikistoj en Europo rigardus tiun temon senvalora, t.e. la neceseco de komuna lingvo europa. Sed necesas agadi komence

por ke la vorto esperanto estu videbla. Tiucele, tiu slogano estis jam tradukita kaj disvastigata en la landojn de la eura areo :(angla, finna, franca, germana, hispana, itala kaj nederlanda). Ekde nun ghi disponeblas ankaŭ en la jenaj lingvoj : chehha, kataluna, kroata, estona, flandra, greka, hungara, latva, litova, pola, portugala, rumana, slovakia, slovena. Aliaj versioj estas presotaj (alzacaj, euska, bulgara, dana, norvega, okcitana kaj sveda). Por la kongresanoj de Bulonjo, tiu ĉi memgluebla bendo (en la franca) vendighos en la libro-servo de SAT-Amikaro. Koncerne la aliajn versiojn, bonvolu kontakti Klaudian DEMONGEOT (KN 401).
 *Ankaŭ magnetaj modeloj disponeblas.

From: Majstro [Majstro1@mail.ru]

Subject: Estu prosperulo!

Kara samideano,

Ci tiu mesaĝo NE estas spamo kaj NE estas komerca propono. Ĝi estas efektive avantaĝa afero. Se vi interesig'as pri salajro en Interreto, do vizitu la sekvan paĝon: www.PROSPERULO.da.ru Vi ne devos serĉi adresojn de klientoj, ne devos okupig'i pri amasa dissendaĵo!!! Pri ĉio okupig'os niaj fakuloj! Ĉiuj detaloj estas en la paĝo:www.PROSPERULO.da.ru La paĝo estas en la sekvaj lingvoj: angla, germana, franca, rusa, hispana. Vizitu nin - kaj vi ne bedaŭros!!! Vi estos vera ric'ulo!!!

El diplomlaboraĵoj de niaj gestudentoj

(Edi Kena, bakalau'rig'is en la jaro 2003)

Faŭno: la besta mondo de Albanio

La geografia pozicio de Albanio, la multvarieco de la geografiaj pejzaĝoj, la herba ric'eco, la dispecigita reliefo kaj la ric'eco de la internaj kaj marbordaj akvoj estas difinintaj ankaŭ ric'an kaj multvarian bestan mondon.

La surtera besta mondo konsistas el mamuloj (insektomang'uloj, viandomang'uloj, herbomang'uloj, birdoj, reptiloj ka.)

El insektomang'ulaj mamuloj sin distingas la erinaco, trovig'anta en la montetaj zonoj kaj marbordaj kampoj ĝis la zono de kverko; la erinaco kaj la nokta vesperto log'antaj en grandaj kolonioj en la diversaj grotoj kaj kavegoj.

El viandomang'uloj sin distingas : lupo, vulpo, s'akalo, mustelo, trovig'antaj en kampa kaj monteta zonoj, en la zono de kverko kaj de fago, ankaŭ aliaj log'antaj en pli altaj zonoj; la bruna urso, vivanta en la densaj arbaroj de kverko, fago kaj pino; la sovag'a kato vivanta en altaj arbaroj; la mustelmuso vivanta en grotoj kaj kavegoj.

La herbomang'uloj en Albanio estas multnombraj kaj multvariaj. La kapreolo kiu vivas plie en la zono de arbustaj'oj de arbuto en Suda Albanio, sed trovig'anta ankaŭ en la zono de kverko kaj fago; la sovag'a kapro trovig'anta en la zono de alpinaj pas'tejoj en

kelkaj altaj montoj; sovag'a porko disvastigita aparte en la zono de kverko kaj fago; sovag'a leporo, kuniklo vivanta aparte en la du etag'oj de la herbaro ka.

Ric'a kaj interesa estas la mondo de birdoj konsistanta el c'irkau' 350 mil specoj , eternaj kaj vagantaj , vivantaj surtere kaj surakve. Inter la surteraj birdoj , sin distingas la rabistaj birdoj (la monta aglo, sokolo, falko) kaj ne rabistaj birdoj (pasero , fazano, skolopo ka)

La enakva besta mondo konsistas el birdoj, reptiloj kaj fis'oj

Inter la birdoj kiuj vivas enakve sin distingaj la diversaj specoj de ansoj, kelkaj vagantaj birdoj (cikonio, akvaj koketoj, anseroj kaj ansoj, pelikano ka). En la laguno de Karavasta kaj en la lago de Malgranda Prespo vivas kolonio de de pelikanoj formante naturan miraklan monumenton.

En la marbordaj akvoj vivas multaj specoj de fis'oj je granda ekonomia graveco kiel : anc'ovo, mugilo, lebrako , ks.

En la dolc'aj akvoj vivas truto, korano, kaj belus'ko (malgranda korano) en Pogradec sin distingantaj pro ilia bongusta viando, la karmo , angilo kaj mulataj aliaj specoj. Preter ili , en la akvaj bestoj inkluzivig'as ankaŭ kelkaj mamuloj malmultaj kiel delfinoj, vidro (c'e la bordoj de la riveroj) ka.

Lagoj de Albanio

En Albanio estas 274 naturaj lagoj kiuj estas diversaj je vidpunkto de surfaco kaj origino. La entuta surfaco de la akvoj de la lagoj de Albanio atingas 461 km². Rilate la hipsometrio (la alteco super la marnivelo) ili etendig'as de la lago de Burint kiu kus'as sur la marnivelo g'is malgranda glac'era lago en la monto de Gramoz ke alteco el 2360 m super la marnivelo.

Lago de Shkoder

G'ia plej malgranda surfaco estas 368 km² el kiuj 149 km² troviĝ'as ene de niaj s'tataj landlimoj. La longeco estas 48 km dum la larg'eco 28 km. G'i estas la plej granda lago ne nur en Albanio sed en la tuta Balkana duoninsulo. Estas g'i malprofunda lago (la averag'a profundeco atingas 7-10 m dum la maksimuma 44 m).

La lago havas tektonika-karstan originon. G'iaj bordoj longas 57 km kaj en g'i vivas kelkaj specoj de birdoj kiel : milaria-kalandra, fulisha-atra-limosa-limosa, sterna - hirundo.

La laga pejzag'o estas fascina por la turismaj aktivecoj. La bordoj de la lago havas diversajn karakterojn. Tiel la orienta bordo estas je tipo marc'eja , dum la okcidenta bordo estas rokeca kaj loke-loke kruta. C'e la piedoj de Tarabosh apud la bordoj de la lago troviĝ'as du pitoreskaj vilag'oj, Shiroka kaj Zogaj.

Shiroka menciitas en skribaj fontoj ekde XV jarcento. La log'ejoj en g'i estas tipaj de Shkoder-a arkitekturo kun la vizag'o al la lago. Malsupre de la vilag'o troviĝ'as la plag'o. La temperaturoj super 20 °C restas dum la tuta somero kaj la unua duono de la aŭtuno. En la plag'o estas 250-560 suntagoj jare. Krom la plag'o menciindas ankaŭ la remado kun karakterizaj boatoj kaj la fis'kaptado. La akvoj de la lago de Shkoder estas ric'aj je fis'o kiel karmo, mugilo ka. Rilate la birdoj oni povas diri ke vivas c'irkaŭ 281 specoj. La plej grava rivero enfluanta en la lagon de Shkoder estas Morac'a, nordokcidente, ekster la landlimo de Albanio. En Albanion enfluas kelkaj torentoj samkiel multaj karstaj akvofontoj (la okulo de Shegan). El la lago de Shkoder eliras la rivero de Buna. La akvoj de la lago de Shkoder , pro la inerta materialo alportata de multaj torentoj en g'in enfluantaj kaj la granda evoluig'o de la vivestaj'oj, g'enerale estas malhelaj. G'i sin distingas pro varma akvo satig'inta je oksigeno . Tial g'i estas ric'a je multaj vivestaj'oj , aparte fis'oj. Kiel tia g'i estas unu el la c'efaj regionoj de fis'kaptado en Albanio.

Shkoder

Shkoder estas tre interesa urbo, kun kastelo konstruita dum romia okupado ene de kiu en III-II jarcentoj antaŭ Kristo, ekzistis unu el la plej malnovaj urboj de Eŭropo.

En III jarcento antaŭ Kristo Shkoder farig'is la c'efa urbo de la ilira s'tato de ardianoj. La kastelo de Rozafa troviĝ'as sur strategia punkto sur monteto, malsupre de kiu kunig'as du riveroj Buna kaj Drini. Tiuj du riveroj elfluas de du grandaj lagoj de Balkanio , respektive lago de Shkoder kaj lago de Ohrid.

Dum III jarcento antaŭ Kristo la ilira reg'ino Teuta tie c'i havis sian fortreson. la militoj iliraj- romiaj 228-219 antaŭ Kristo estis venkitaj de romianoj , tamen Shkoder

estis okupita de romianoj nur en la jaro 168 antaŭ Kristo. Poste ĝi transpasis sub Bizanca regado ĝis kiam ĝi farig'is la c'efurbo de fe'udula familio de Balshaj en la jaro 1350.

Je 1356 jaro venecianoj estis okupintaj la kastelon de rozafa ĝis kiam en la jaro 1479 ĝi estis kaptita de Mehmet pasha . Turkoj okazigis kelkaj sieg'oj de la kastelo kaj la albanoj rezistis longe kaj heroece . Menciindaj ke dum la unua sieg'o turkoj peris 14 000 soldatoj kaj dum la dua sieg'o 30 000.

Krom la kastelo estas ankau' aliaj lokoj interesaj, kiel ekzemple la Ponto de Mes XVII-XIX jarcentoj), la kirko de Shen Gjergj (jaro 1290),c'e la bordo de Buna., la kirko de Shurdhak el XI jarcento, la kirko de Shen Meri en Danje el XV jarcento kaj aliaj.

Alia aparteco de la urbo estas ankau' la duetag'aj domoj tradiciaj kun balkono kaj g'ardeno c'irkau'itaj de altaj muroj je historia kaj kultura intereso.

La muzeo de popola kulturo estas same alia vizintaj'o, kie reflektig'as la artismaj kapablecoj de albana popolo por gravuro la lignon. ceramiko, vitroellaborado, popolaj kostumoj ks.

Shkoder alig'is al Albanio post ĝia okupado de serboj kaj montenegranoj en la jaro 1913 kaj farig'is unu el la c'efaj centroj de la milito kontraŭ la f'as'ista okupado. Hodiaŭ ĝi estas unu el la pitoreskaj urboj de Albanio, akvig'anta de la lago samnoma, je 10 km for de Adriatika maro kaj oriente c'irkau'ita de Alpoj kun krutig'intaj pintoj.

Lago de Ohrid. La distrikto de Pogradec

Pogradec estas turisma urbo trovig'anta en la suda parto de la lago de Ohrid, 140 km sudoriente de Tirana. Trovig'anta je 700 m super la marnivelo kun saniga klimato ĝi g'uas raran belecon.

La distrikto de Pogradec etendig'as en la regiono de abismoj kaj intermontaj kampoj de Sudorienta Albanio. La distrikto envorte havas surfacon je 725 km². La centro de la distrikto estas Pogradec, konstruita en la sudorienta bordo de la lago de Ohrid. Pogradec trovig'as apud la landlima punkto de Qafe Thane kaj la albanaj urboj de Makedonio: Struga kaj Ohrid. Pogradec trovig'as same la vojo Egnatia. kie oni projektis konstrui au'tos'oseon. Elirante en la lagon de Ohrid Pogradec havas bonajn eblecojn por la disvolvig'ado de la blua turismo (lago) kaj aliaj eblecojn sube traktotaj.

La lago de Ohrid

La lago de Ohrid estas lago je tektonika origino. Lokita en la intermonta kampo de Pogradecje alteco je 700 m super la marnivelo, la lago havas surfacon el 362.6 km², okupante la duan lokon en Albanio rilate la grandecon, same en la tuta Balkanio. La longeco de la bordoj de la lago estas 35-40 km dum la larg'eco 15-20 km . la bordoj de la lago estas g'enerale rektaj sen grandaj golfoj.

La lago de Ohrid nutrig'as de subakvaj fontoj alvenantaj de la lago de Prespa, trovig'anta en la alteco je 100 m pli ol la lago de Ohrid. El la lago de Ohrid elfluas la rivero de Nigra Drini , dum en ĝi enfluas la torento de Ĉerrava. Rilate la profundecon el 287 m en ĝia maksimumo tiu lago konistigas la plej profundan lagon en Balkanio. La akvoj de la lago sin distingas pro alta travidebleco, je 22m . Sed la poluado povas damag'i ankau' tiun karakterizaj'on.

Respubliko de Albanio posedas 30 km da laga bordolinio. La tau'gaj zonoj por turismo kaj konstruado estas de la hotelo "Turismo" de Pogradec g'is la vilag'o Tushemisht, je 6 km longeco. Tamen ankau' la bordo de Pogradec g'is la vilag'o Lin (do entuta lagolinio) estas tau'ga por konstruado de hoteloj kaj turismecaj vilag'oj. Rilate la evoluon de la lago oni povas diri ke g'i estas iom komplika. La kavego sur kiu estas al akvoj de la lago estas malnova. La kavoj de la lago emas malaltig'i sekve de la cedado. Atestaj'o pri tio estas la formig'o de la duoninsulo de Lin, kiu antau'e estis insulo.

La lago de Ohrid konservas en g'iaj akvoj tre malnovan formon. G'i enhavas 19 specoj el kiuj 10 estas endemiaj. Tiuvidpunkte la lago estas konsiderata kiel natura monumento, pro fakto ke g'i estas relitoza. En la akvoj de la lago vivas la fis'o Koran kaj belus'ko la ununuraj enmondo, same oni povas diri por la spong'o de Ohrid kaj kelkaj specoj de butakoj.

Preter la blua laga turismo la distrikto de Pogradec ofertas ankau' aliajn eblecojn. Tiel je 5 km for sude de Pogradec trovig'as la turisma punkto de drilon (Volorek) kiu aktuale havas tri restoracioj je kapacito 170 sidlokoj. La distrikto de Pogradec havas same eblecojn por la disvolvig'o de verda turismo en la kas'tana arbaro je apudeco de la vilag'o Bishnice, ka. G'i havas eblecojn por la disvolvig'ado de la fis'kaptado kaj c'asado. Tiu lasta okazas de au'gusto g'is marto en la zono c'irkau' la lago kaj c'irkau' la monah'ejo de Shen Marena. Rilate la flau'ra resurso kaj ligna kovraj'o la distrikto de Pogradec posedas entute 28370 ha da arbara surfaco kiu konistigas 39 % de la surfaco de la distrikto au' 3 % de la arbara surfaco de respubliko. El tiuj, 6710 ha estas protektitaj arbaroj kiujn oni devas gardi severe. Ludas ralon ankau' la foliarbaroj kun surfaco je 25 600 ha el kiuj 8780 ha estas fagarbaroj. La surfaco de pinarbaroj estas 2110 ha.

La klimataj indikiloj

La konsiderinda alteco super la marnivelo de pogradec kaj de la tuta distrikto konic'igas tie fres'an klimaton, mildan en somero kaj malvarman en vintro, neg'ofalojn, kiuj en kelkaj zonoj kiel en Mokra kau'zas ankau' vojblokig'on dumvintre.. menciante la averag'an komencan temeperaturon dum 30 a de junio je 20 şC kiu finig'as je 29 a de au'gusto tiel dau'rigante 60 tagoj. La maskimala temperaturo en pogradec estas notita 36.6 şC. La alia ekstermo, por komencig'o de frosto, mencias la daton 25 an de novembro g'is 24 a de marto. La absolutaj minimalaj temperaturoj tiuperiode estas -12.8şC. La averag'a jara temperaturo estas 12şC. Rilate la kvanton de sunumado por julio en pogradec, Tushemisht kaj la suda parto de la lago g'i estas 325 horoj, dum por la plejparto de la lagolinio, por Lin kaj Mokra, la kvanto estas 300 horoj. Por la malvarma monato, januaro por Pogradec la kvanto estas 100 horoj, dum por la norda linio de la lago, Lin kaj Mokra la kvanto estas 75 horoj. La zono c'irkau' la lago ricevas tutan jaron 2400 horoj da sunradioj.

Rilate la pluvofaloj la jara averag'a kvanto estas por Pogradec 765 mm dum la maksimumo 24 hora estas por Pogradec 77 mm. Rilate la aliaj indikiloj, ekz. por la vento por Pogradec la kvieteco de la vento en januaro estas 44 % dum en julio estas 51.7 %. Kutime la ventoj havas direkton de nordo al sudo, tamen estas ankau' lokaj ventoj kiel ekz. la vento de lenie je direkto sudokcidenta. La temperaturo de la akvoj de la lago dum somero havas la valorojn 20-24şC. La klimato havas pozitivajn efikojn por hipertnikoj, por tiuj suferantaj pro kormalsano kaj tiuj kiuj havas nervajn maltrankvilig'ojn.

Pri la ekologia situacio

Konsiderante la lagon kaj ties karakteron, en la kondic'oj kiam la regeneraciigajn eblecoj estas sufiĉe malpliaj ol en la maro , oni devas zorgi por rigore protekti kaj gardi g'in. G'is nun fonto de poluado estas la mals'arg'ig'o de la nigraj akvoj de la urbo de Pogradec. Sed pli gravaj problemoj estas naskig'intaj de industriaj poluaj'oj alvenintaj de la zono de Rug'a S'tono (Guri i Kuq) kiuj damag'as la afu'non kaj estas malaltigante la travideblecon de la lago. Tiuj problemoj devas kosniderato serioze kaj postulas certajn studojn por doni klarajn prognozojn.

Pri la urbo de Pogradec, regionon envorte kaj arkeologiaj ric'aj'oj

La regiono de Pogradec estis log'ata de la ilira gento de enkelejoj. Je la fino de VII jarcento antaŭ Kristo enkelejoj malfortig'is kaj la donitaj'oj aperigas la genton de desaretoj. La kastelo de la urbo de Pogradec komencis log'ati je V jarcento antaŭ Kristo. En la distrikto de Pogradec estas kelkaj bazilikoj en Lin, Tushemisht kaj Pogradec. Estas malkovritaj kelkaj monumentecaj tomboj en malsupra Selce. Estas malkovritaj kelkaj log'lokoj en Lin, Verdove, geshtenjas, ka. En la vilag'o Lin estas malkovritaj mozaikoj tre malnovaj.. La urbo de Pogradec havas hodiaŭ log'antaron je 20 000 homoj. Pogradec estas ekspluatita ekde pratempe por turismaj celoj. Tiel la gepatroj de imperiestro Justiniano feriadis en la vilag'o Lin. En pli postaj periodoj, konkrete dum la komencig'o de XX jarcento multaj familioj el aliaj urboj kiel Elbasan, Korçe, kaj Tirana pasigis ilian feriojn c'e la lago de Ohrid. Ankaŭ hodiaŭ la familia turismo ludas gravan rolon en Pogradec. Interne de la distrikto trovig'as la profunda areo de Mokra kiu konatig'as pro g'ia notinda elmigrado.

La lago de Butrint

Estas g'i saleca lago je surfaco el 16 km, kaj profundeco maksimume 21 m, kio estas ankaŭ la plej granda profundeco de la lagunoj en Albanio.

La lago de Butrint fakte estas laguno sed je tektonika origino. Pro tio g'i estas relative profunda. G'i ligig'as kun la maro per kanalo c'irkau' 3.6 km longa.

La okcidentaj bordoj estas kovritaj de natura herbaro. La norda bordo havas herbaron je tipo de mars'oj (marc'eja), dum la nororientaj bordoj estas kultivataj.

La lago servis kaj servas kiel kultivejo de kraboj . Tie trovig'as same mugilo, kaj aliaj fis'oj.

La teritorio de la lago de Butrint estas frekeventata de akvaj birdoj, inter kiuj menciindas: Andea Cinarea, Efretta, Alba, Ardeola Rradollifs ka.

La lago de Butrint pro g'ia pozicio akiras gravecon je vidpunkto turismeca.

Tiel en sudo tie trovig'as la ruinaĵoj de la antikva urbo Butrint protektataj nuntempe de Unesco. Samtiel, apud g'i estas Ksamil, unu el la plej belaj lokoj de nia marbordo . Tiuspekte la lago de Butrint trovig'as kaj konistigas komplekson naturan kaj historian por la turismo.

La c'efaj aktivecoj kiujn oni povas arang'i en la lago estas la navigado per velaj boatoj, c'ar la diversaj ventoj estas tre favoreblaj por tiu speco de sporto. Dum la bordoj c'e g'i estas tre favoraj por konstrui la golfkampoj.

Edi Kena

Ni dankas

Ni dankas tutkore s-inon Agnes Geelen el Antwerpen, Belgi pro malava donacaj'o, ekzemplero de PIV malnova eldono destinota al kelkiu aktivulo de nia sekcio.

Humoraj'oj

La butiko

C'e la butiko de la arbaro arig'is multaj bestoj atendante la malfermig'on de la butiko. La kuniklo tentis eniri la unua sed la urso forpus'is lin sovag'e malantau'en. Tio okazis plurfoje. Finfine la kuniklo diris: nu, bone, mi ne malfermos hodiau' la butikon!- kaj foriris...

La kondamnito

Iu kondamnito estis permesita saluti hejme sian edzinon antaŭ ol lin venigu c'e la es'afodon. Alveninte hejmen, akompanite de g'endarmoj, li sciigis al la edzino ke li baldau' foriros al la es'afodo c'ar la pas'ao estis kondamninta lin al morto. Au'dinte tion, la edzino diris: nu, bone, iru sed ne forgesu alporti al mi revenonte novajn pantoflojn!..

La robo de junedzino

-Kial oni vestas la junedzinojn per blanka robo?

-C'ar la blanka simbolas la felic'econ..

-Aha, mi komprenis! Tial oni vestas la junedzinojn per nigra kostumo!..

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

Albana proverbo: Vendu c'evalon kaj eduku filon

Nr 59 junio 2005

Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio

Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl, sekretario); +355 4 363360 (Rita, kasistino)

Rete: pistolia@yahoo.com, apistoli@aol.com (Vasil Pistoli);
selimibardhyl@yahoo.com, bardhylselimi79@hotmail.com (Bardhyl Selimi);
adoci@gmx.de (Artur Doçi); shhasani@albmail.com (Shaban Hasani);
motto@bwc.org (Martha Otto); fiorialbtours@yahoo.com (Fjoralba Sadiku);
asokoli@bkursimeve.com.al Nehat Sokoli; beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj);

matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi);
sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti);
mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri);
dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com ;
egli_b@wp.pl (Egli Brati) ; eltonzaimi78@yahoo.com (Elton Zaimi);
agimperaj@yahoo.it ; tcobani@yahoo.com (Tonin Çobani)

Retpag'o : <http://www.esperantio.tk>

You can access the group's web features using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/>

You can access the group's Management page using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage>

Enhavo

Klerigado: ekzamensesio

Studumo: klopodoj por ekvivalentigi la diplomojn

Financoj: Kotizoj por 2005

Internacia agado: AlpAdria Konferenco

Propagando: Claude Piron, Henri Masson

Albanio en Esperantio: publikaj'oj

Rendevuoj: Kun Verduloj albanaj

Prelegoj: Xhuma Çupa

Fabeloj: La plej granda s'telisto

Poemoj: Ni pioniras la pacon

Humoro

Ekzamensesio

Je 7an de majo 2005, oni okazigis la duan ekzamensesion por c'i tiu jaro de Esperanto, en la Tutnacia hotelumada kaj turisma Mezlernejo Tirane. Membroj de ekzamenkomisio estis: Frau'fino Matilda Sokoli, Ing. Shaban Hasani kaj Bardhyl Selimi. Jen rezultoj:

Argita Balla	10	Jorida Nuhija	5
Doris Hekali	9	Klaudia Taraj	9
Eleda Hallvaxhiu	9	Migena Memajdini	9
Florian Alimadhi	8	Mirela Biba	8
Herion Limaj	6	Rosela Spahija	9

Rita Permeti, sekretario de Instituto

Studumo

La egalvalorig'o de studentaj diplomoj

Kiel sciite kelkdekoj da niaj gestudentoj jam bakalau'rig'is c'e la klerigejoj e AIS en Bydgoszcz (Pollando). Tutnature ili volas ekvivalentigi siajn diplomojn akiritaj tie kaj signitaj de profesorj de AIS. Ni petis s-ron Quednau, respondeculo pri studumo c'e AIS dendi oficalan dokumenton de AIS per kiu ni povis konvinki c'i tieajn instancoj edukajn pri la egalvaloro de diplomoj. Sed profesoro Quednau respondis negative, pli g'uste li sugestis ke tion faru s-ro Frank la prezidanto de Akademio. La samon deziras ankaŭ la gvidantoj de klerigejo mem en pollando. Ni esperu ke finfine la afero solvig'os pozitive, kio instigos pliajn albanajn studi c'e la klerigejoj de AIS.

Magistrig'o

Ĉi septembre en karlovo okazos la kuranta sesio de AIS ekzamenoj kaj kursoj. Almenau' kvar niaj gestudentoj bezonas partopreni tiun sesion. Ili estas Matilda Sokoli, Fjoralba Ceno (Sadiku), Egli Brati kaj Anri Subashi.

Informis Nehat Sokoli

Financoj

Pagis la kotizon

Gjergji Gusho 500 L 12 aprilo 2005

Bardhyl Selimi 200 L, maje 2005

Nehat Sokoli, la kasisto

Internacia agado

AlpAdria Konferenco, Trieste 20-21.07.2005

Kiel anoncite antaŭe (numero 58) okazis en Trieste la kuranta AlpAdria Konferenco je c'eftemo: "Adriatika Maro-renkontig'ejo de lingvoj kaj kulturoj diversaj"

Partoprenis per prelegoj du albanoj, nome s-ino Xhuma Ĉupa (Dj'uma Ĉupa) kaj s-ro Bardhyl Selimi. La temoj estis respektive "Albana Eposo pri Bravuloj kaj ties interrilatoj al Helena kaj Slava Eposoj", kaj "La etno-psikologiaj kaj etno -kulturaj karakterizaj'oj de albanoj".

La unua prelego aperas komplete en tiu c'i numero (vidu)

La Konferencon partoprenis pli ol dudekoj da esperantistoj el Italio, Slovenio, Albanio, Kroatio, Hungario. Prelegis same s-ro Radenko Milos'evic' (Kroatio) je temo "Kunvivo

adriatika de la Latina kaj Glagolica”, s-ro Carlo Minnaja (Italio) je temo “Lingvo, libroj kaj protokoloj en la teritorio de Venecio”, s-ro Janez Jug (Slovenio) je temo “La slovena lingvo-de la unua manuskripto g’is Eu’ropa Unio”, Elena Zerpini (Italio) je temo Barcolana, reg’ino de regatoj en Adriatika kaj mediteranea maroj”.

La laboroj de Konferenco dau’ris je agrabla esperantista etoso. La 22an de majo grupo de partoprenintoj ekskursis en c’irkau’ejoj de Trieste. La organizantoj, estraro de Triesta Esperantista Asocio (Edvige Ackermann, Elda kaj Pino, Elio kaj Elena ka) faris lau’dindan laboron kaj faciligis c’ion al la gastoj.

Raportis

Xhuma Ĉupa

Konferenco en Rumanio

Alvenis invitilo por esperantistoj de distrikto de Korçe de Asocio de Esperanto de Cluj-Napoca Rumanio. Tie okazos internacia simpozio je c’eftemo: “Esperanto, vojo de interkomunikig’o kaj internacia kompreno”. La simpozio okazos de 29-31 julio 2005. Ŝ-ro Gjergji Gusho, nia sekciano el pogradec el prefektejo de Korçe, pretis kompili prelegon kaj sendi g’in rete al Julia Sigmond , prezidanto, c’ar li ne povas vojaĝ’i kaj krome obstaklas multaj burokrataj’oj .

Dankante la organizantojn de la simpozio kunlabore kun la urbodomo de Cluj Napoca, ni au’guras plenan sukceson.

Ing. Shaban Hasani

Propagando

Anglalingvanoj pagu por la angligo

(Kelkaj ideoj el la parolado de Claude Piron)

En parolado eldirita la 27an de marto en Bulonjo-che-Mar* dum la celebrado de la centjara datreveno de la unua tutmonda kongreso de Esperanto, kiu okazis en 1905 tiuurbe, s-ro Claude Piron, iama tradukisto en UN kaj Monda Organizo pri Sano, iama profesoro che Gheneva Universitato, aŭtoro de la libro "Le défi des langues – Du gâchis au bon sens" [« La defio de la lingvoj – El fusha mastrumado al sana prudento »] (Parizo : L’Harmattan, 1994), prezentis proponon, kiu sensacie efikis. Emfazante la konsiderindajn avantaĝojn, kiujn anglalingvanoj tiras el la mondskala situacio de la angla kaj la enorman financan pezon, kiun instrui tiun lingvon trudas al la impostpagantoj de pli ol 200 landoj, li proponis, ke la anglalingvaj Shtatoj financu, eĉ se nur parte, la instruadon de la angla en la resto de la mondo. La horoj, kiujn milionoj da neanglalingvaj junuloj dedichas al la lernado de la angla, disponeblas al iliaj angle parolantaj samaghaloj por perfektigi sin en scienco kaj tekniko : tie kushas peko kontraŭ la reguloj de konkurenco kaj kontraŭ la principo akceli egalecon de ŝancoj por chiuj. Krome, el la monrimedoj investitaj en tiun lingvan trejnadon finfine rezultas, por la aliaj landoj, nur malsupera pozicio en chia intershangho kaj chia traktado kun anglalingvaj personoj. En la novliberalisma socio, en kiu ni vivas, por ghui avantaĝon oni devas pagi. Britio enkasigas chiujare 700 milionojn da pundoj el la « lingvolernaj restadoj » tiulande aranghitaj, kaj la prezidanto de British Council ne hezitis deklari : « Nia lingvo enspezigas al ni pli multe ol la nafto de la Norda Maro ». Estus juste, ke anglalingvaj impostpagantoj, al kiuj estas ŝparitaj, nur pro ghustaloka naskigho, la mensaj kaj monaj investoj trudataj al la cetero de la mondo, kontribuu al la financado de la fortostreĉoj farataj de chiuj aliaj popoloj por povi renkonti ilin sur lingva tereno. Chu tio ne estas bonvena adapto de la principo « Tiu pagas, kiu poluas » ? Tiu chi provokema propono ne malhelpas ghian aŭtoron rekomendi alternativon pli justan, pli ŝparigan kaj pli rapide efektivegeblan, kiun li povis testi kaj kompari kun aliaj paliativaj solvoj dum sia kariero de internacia plurlingva funkciulo : la Internacia Lingvo Esperanto.

Tiu chi esperantlingva parolado de Claude Piron estas nun legebla che :
http://satamikarohm.free.fr/article.php3?id_article=637

Reago de Henri Masson al la brazila revuo “Veja”

Jen kelkaj faktoj facile kontroleblaj:

1. Esperanto okupas la 12an lokon inter 162 lingvoj pro la nombro de artikoloj en la multlingva enciklopedio “Wikipedia”. Statistikoj aperas c'e <http://en.wikipedia.org/wiki/Wikipedia>: multilingual statistics
2. Radiostacioj kun transkontinenta auskultantaro regule uzas esperanton en siaj programoj: Pola Radio Internacia, China Radio Internacia, Vatikana Radio, Radio Roma ka. Listo de radisostacioj, kun frekvencoj kaj horaroj, aperas c'e <http://www.osiek.org/aera>
3. Pli kaj pli da libroj pritraktas la lingvan problemon kaj prikonsideras Esperanton. Per libro titolita “English- Only Europe?”, en kiu li prikonsideras ankaŭ Esperanton, denaska anglalingvano, profesoro Robert Phillipson (jam aŭtoro de “Linguistic Imperialism”, Oxford University Press, 1992), kurag'e levas la demandon pri kiu plejmulte da eu'ropanoj kaj teranoj estas senkonsciaj.
4. Ankaŭ sur la kampo de la literaturo, Esperanto plue ric'ig'as, kiel atestas ttt-ejoj en Usono. <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html> , Rusio <http://www.sezonoj.itgo.com/Ind-rusn.htm> , Svedio <http://esperanto.nu/elibrejo>
5. Esperanto notinde kreskas ankaŭ sur la arta tereno de la kanzono kaj muziko. Tio konstatebla per vizito en la ttt-ejo de la muzikeldonejo Vinilkosmo: <http://www.ninilkosmo.com> . Ankaŭ brazilaj kantistoj kaj grupoj adoptis Esperanton.
6. Esperanto frue montriĝis tau'ga por sciencaj inters'ang'oj. Jam en 1906 fondiĝis Internacia Asocio de Sciencistaj Esperantistoj (ISAE), kies tria prezidento estis la angla Nobelpremiito Joseph J. Thomson. Ĝi estas nun la c'efa laborlingvo de la Internacia Akademio de Sciencoj de San marino <http://www.ais-sanmarino.org/> kiu havas en sia sino la Nobelpremiiton 1994 pri ekonomio D-ro Reinard Selten.
7. Esperanto estas unu el la lingvoj elekteblaj por uzi diversajn liberajn programojn kaj ankaŭ la retserc'ilojn Google www.google.com/intl/eo/ au DMOZ <http://dmoz.org/World?Esperanto>
8. La s'losilvorto “esperanto” liveras en impona kvanto ttt-adresojn en rilato kun la Internacia Lingvo. Estas multe da malkovroj fareblaj pri Esperanto kaj multe da malkovroj per Esperanto
9. Brazilo staras unuarange (g'is kiam?) inter la landoj kiuj havas plej multe da t.n. “Azamenhof-Esperanto-Objektoj” (ZEOj: stratoj, placoj, monumentoj, ktp) dedic'itaj al D-ro Zamenhof kaj esperanto kun 170. Sekvas Francio kun 163 kaj pollando kun 144.
10. La nombro de infanoj kies gepatra lingvo estas esperanto kreskas tra la mondo <http://www.helsinki.fi/~jslindst/denask-1.html> . La unua internacia geedzig'o okazis jam en 1899 en turku (Finnlando) inter scedo kaj finnino, kies nura komuna lingvo estis Esperanto.

Antaŭ cent jaroj

(El la prelego de Claude Piron publikigita sur Esperanto majo 2005)

En kongreso de Bulonjo Zamenhof salutparolis kiel jene: *Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn.(...) Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri g'i kaj 9niaj) vortoj ne flugos telegrafe al c'iuuj urboj (,,,) de la mondo. (...). Sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj , sonoj tre mallau'taj, ne au'deblaj por c'iu animo sentema: (..) la sonoj de io granda, kiu nun naskig'as. Kaj iom mpli poste li diris: En nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj (senprivilegiaj), neniu humilig'as, neniu sin g'enas, (.0, ni c'iuuj estas plene egalrajtaj; ni c'iuuj sentas nin kile membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio. Kaj la unuan fojon en la historio de la homaro ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud la alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj (..) kiuj premas as si reciproke la manojn (...) sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone la gravecon de la hodiau'a tago, c'ar hodiau', inter la gastamaj muroj de Bulonjo c'e Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.*

Min ege ompresis fakto, pri kiu mi legis en Unesko-dokumento. Antau' longe, afrika tribestro, kiun oni provis konvinki, ke utilas kapabli skribi kaj legi, rifuzis tion kredi. Oni do proponis al li ekspeimenton. Li diru ion, ion ajn, al iu, kiu notos liajn parolojn, kaj la paperon ono portos al alia vilag'o, kaj li akompanos tiujn, kiuj portos g'in. En tiu vilag'o estos iu, kiu ne c'eestis, kiam li parolis, kaj kiu do ne au'dis liajn vortojn, sed kiu scipovas legi. Tiun oni petos legi la tekston sur la papero. La tribestro konsentis. Kaj kiam la grupo alvenis al la alia vilag'o, kaj iu tie lau'tlegis, kion li diktis antau'e, li estis ege mirigita. Iu, kiu estis for, kiam li parolis, kapablis ekzakte rediri liajn vortojn. Nekredeble! Vere mirakla afero!

Estas fakto ke la invento de skribado havis impresajn konsekvencojn. Grandan parton de nia komforto, de nia plezuro, de niaj scioj, de niaj g'oj, de nia sano ni s'uldas al la fakto, ke skribo ekzistas. Se skribo ne ekzistus, ni ne estus tiuj, kiuj ni estas. Tial oni povas diri, ke la momento, kiam unuafoje transdonig'is ideoj au' informoj skribe, estis s'losila momento en la historio de la homaro, ec' se neniu scias , kie kaj kiam g'i okazis. Miaopinie , ankau' la momento, kiam interkomprenig'is unuafoje homoj el dudek landoj sen interpretistoj, kaj sen tio, ke iu devus paroli la lingvon de alia popolo, estis s'losila momento en la historio de la homaro. Kaj tiu eksterordinara momento okazis c'i tie en Bulonjo en 1905

Albanio en Esperantio

Dolc'aj'oj maldolc'aj

Antau' nelonge la urbestro de Romo, Walter Veltroni, decidis starigi s'tatan muzeon de dolc'aj'oj g'uste en la domo-muzeo de Skanderbeg, la nacia heroo de Albanio, c'e la placo Albania, proksima al la koloseo-amfiteatro.

En 1461 la papo invitis Skanderbeg al Romo post sukcesa rezistado kontrau' otomanaj armeoj, kiuj minacis okcident-eu'ropan civilizacion. La papo nomis Skanderbeg "atleto de kristanismo". Honore al la albano italoj starigis Skanderbeg-monumenton kaj nomis la domon kie tranoktis la heroo, "Palaco de Skanderbeg".

Sed la urbestro ordonis, ke la domo transformig'u al muzeo de dolc'aj'oj de Italio. Vere maldigna ago. Albanoj, log'antaj en Italio, kaj ec' naskig'intaj tie (ekde la 15 jarcento en Italio fug'is centmiloj da albanoj), vigele protestis kaj postulis nuligon de decido nejusta. G'uste tiu urbestro jaron antau'e intencis surskribi sur la statuon de patrino Tereza, albandevana virino, la vortojn "Filino de makedonio", c'ar s'i estis naskita en Skopje, urbo tiam log'ata c'efe de albanoj.

Bardhyl Selimi

C'erpita el MONATO, marto 2005

Rendevuo kun albanaj verduloj

13 majo 2005

Hodiau' mi ricevis mesag'on de Davida Pertena, sekretario de Verdula Partio, per kiu s'i invitis min en rendevuo kun la prezidanto de partio, s-ro Edlir Petani (tel 069 210 7535). Antau'e mi estas inters'ang'inte mesag'ojn kun Davida, instigite de Manfred Westermayer, germana esperantisto, samtempe membro de verdulaj partioj de Eu'ropo. Mi ec' estas sendinta al s'i la lernokurson de Esperanto.

Ambau' ili volis starigi pli fortan kunlaboron kun albanaj esperantistoj, esperante akiri eventuale ankaŭ ties voc'ojn por sia partio..

Mi demandis Edlir pri la c'efaj punktoj de la programo de sia partio. Tiaj estis: protekto de medio je ajna kondic'o; paco kaj kontrau'stareco de c'iu milito; protekto de religiaj rajtoj, ec' de sektoj ne agnoskataj de leg'o; protekto de specifaj kulturoj en diversaj areoj; libereco de sekso inkluzive samseksulojn; the kontrau'stareco al globalizado.

Aldone li diris ke sia partio estas malferminta jam retpag'on www.tegjelberit.com

Mi rakontis ilin pri esperantistoj en Albanio kaj iliaj komunaj punktoj kun la verdula partio. Mi promesis ke mi faros plejeblon por konatigi verdulan partion en la medioj de esperantistoj ene kaj eksterlande. Same mi ofertis al ili gvidadon de lernokurso de Esperanto au'tune kun la gejunuloj de verdula partio.

Kiel Davida, same Edlir, estas mem junaj homoj je profesio de agronomo, do proksima al ekologiaj problemoj.

Bardhyl Selimi

Prelegoj

Magistro Xhuma Çupa (Ĝuma Ĉupa) –instruistino de la beletro en Tutnacia Hotelumada kaj Turisma Mezlernejo en Tirana Albanio

AlpAdria Konferenco, Trieste 21an de majo 2005

**LA EPOSO DE BRAVULOJ- ATESTAĴO PRI LA EKZISTO DE LA KULTURO
KAJ ARTO DE LA ALBANA POPOLO KAJ TIES PRAECO EN LA BALKANA
DUONINSULO**

Enkonduko

Honorindaj gesinjoroj!

Unue mi dankas vin por la ebleco kiun vi donis al mi partopreni ĉi tiun Konferencon en la lingvo Esperanto, lingvo de paco kaj amikeco inter popoloj.

La Eposo pri Bravuloj estas forta atestaĵo pri la ekzisto de la kulturo kaj popola arto albana, popolo el plej malnovaj en Balkanio.

Arto estas iasence la vera patrio de la homo, aparte la popola arto. Kiam mi diras, arto mi subkomprenas la vivon kun ĉiuj ties ĝojoj kaj skuoj. Ĉe homo estas ja ĉio; eĉ ĝojlarmeto aŭ malĝojlarmeto. Ĉiuj ni renkontiĝas inter tiuj ambaŭ larmetoj. Ĉiuj ni havas komunan sorton de kiu ni ne povas eskapi. La granda vera popola literaturo unuigas la popolojn.

Estas ja tempo ke la balkana popola literaturo unuecigu la popolojn ĝin fondintaj, ĉar ni havas ja multon por eldiri unu al la alia.

La popoloj kiom grandaj kaj potencaj ili estu, danke al ties kulturo, tiom pli multe proksimiĝas al la aŭroro de la homaro.

Estas ja tempo ke la popoloj de Balkanio, tiel kiel la infanoj, eniru manenmane en la diinan ludon de la amo, paco kaj arto.

Samkiel la eposoj estas kunlaborintaj dum jarcentoj, la popoloj devas konekzisti enpace hodiaŭ.

Ni balkanianoj apartenas ne nur la la mondo de malamoj, militoj kaj malamikecoj sed multe pli al la mondo de la granda, potenca arto, al la mondo de spiritaj aventuroj de la homoj. El Balkanio ja ekiris la muzoj kiuj disvastiĝis kaj elokupis la homaron. Priparolante pri eposo de albanoj estas maleble ne menciante ankaŭ la aliajn eposojn, tiun grekan, aŭ slavajn, kiuj konsistigas kune veran mozaikaĵon de la popolaj eŭropaj kulturoj, interkomunikiĝinte unu kun la alia.

La vorto Balkanio, laŭ mi, ne devas vekti la imagon de sangumaj, senĉesaj kaj sovaĝaj militoj ampleksintaj ofte ankaŭ la tutan Eŭropon, ĉar Balkanio estas ankaŭ alia: ĝi estas ja ĉielpeco tre malvasta sub kiu vivas malgrandaj, fakte ia mozaikaĵo je popoloj, nacioj, parolantaj praaĵn lingvojn, tre praaĵn, alvenantaj kiel bruiga murmuro el la historiaj kaj antaŭhistoriaj tempoj. Mi klopodos per tiu ĉi prelego evidentigi ke tiuj popoloj kaj lingvoj estas renkontitaj ie, renkontiĝas ankoraŭ. Estas kunvivintaj, estas transpasintaj unu al la alia. Balkanio estas ja lulilo kiun lulas diina mano. En tiu lulilo kreskis la heroecaj eposoj. Tial ne estas honorinda por kelkiu esploristo nei tiun miraklan trezoron de la popoloj kiuj, danke al konekzistado, scipovis prikanti la kanzonojn de la Ciklo pri Bravuloj unu de la alia en la propra lingvo. Mi haltos plie en la eposo de albanoj, ne nur pro fakto ke mi apartenas al la albana popolo, estante fieraj je tio, sed precipe ĉar mi konas ĝin pli bone. Mi prezentos faktojn pri ties ekzisto ankoraŭ ĝis hodiaŭaj tagoj. La pliaĝuloj prikantas la versojn de la eposo ankoraŭ hodiaŭ! Tiujn versoj ili ja ne estas lernintaj pere de libroj sed nur danke al la orala transdono.

Nun ni klarigu kelkaj nociojn.

Eposo konsistas el la tuto de epikaj verkaĵoj de kelkiu popolo kie oni rakontas pri grandaj historiaj eventoj aŭ pri faroj kaj bravecoj de ties legendecaj herooj. Ni parolas pri popola eposo, heroeca eposo, bravula eposo.

Epiko estas unu el tri beletraj ĵanroj prezentanta okazintaĵojn kaj heroecajn kaj glorecajn verkojn de popolo aŭ unuopulo.

La albana eposo enhavas elementojn de la albana mitologio, kio atestas pri ĝia praeco. Tiaj mitologiaj elementoj estas **Zano-j, Oro-**

j, la Tera Belulino, Floĉko-j (similaj al sirenoj grekaj), kuĉedro (monstro), ŝtojzovalo-j, dragono, Divo kc. Ni ekpliku kelkaj el ili kaj poste pridiskutu pri la tuta eposo.

Zano estas figuro el popolaj albanaj kredaĵoj, imagita je formo de junulino je rara ĉarmeco. Ĝi estas konsiderata kiel muzo (inspirigilo) de la albanaj montoj ĉar ŝi loĝis en la montogorĝoj de Norda Albanio. Ĉiu monto ja havis sian Zano-n. Ŝi estis diina estaĵo tre brava kaj samtempe tre sovaĝa. La Zanoj kantis dumnokte ĉe la akvofontoj, ili dancis kaj ludis, kolektis florojn kaj sin banis nude. Sed Zano povis kondamni kelkiun enŝtonigante tiun kiu aŭdacis ekrigardi al ŝi kiam ŝi banis sin. Ŝi amis la albanajn bravulojn kaj helpis al ili dummilite, samkiel Ateno helpis al Diomedo kaj Odiseo en la greka eposo. La forta kulto de Zano en Albanio kaj en la tuta Balkana Duoninsulo el antikvaj tempoj igas nin konkludi ke temas pri loka diino antaŭgreka. Je figureca senco Zano signifas belan knabinon.

Ora, estas same figuro el la albana mitologio imagebla foje kiel serpenton, foje kiel virinon. Ŝi estis bonfarema, ĉar ŝi lumigis la menson de la homoj kaj instruis al ili arton por kuraci la malsanojn. Ŝi gardis la homon, la hejmon, la genton aŭ tribon. En la eposo, preter mitologaj figuroj ni havas ankaŭ la legendecajn figurojn, epikajn heroojn kiel Mujo, Halilo, Omero, Krajlo, Ĝerĝ Elez Alia kaj Mara Bajlozo ks. La albana eposo estas kreita kiel liton dum militoj kontraŭ slavojn unuflanke kaj kontraŭ transmaraj malamikoj je figuro de Bajlozo.

La okcidenta danĝero ĉiam estis ligita al la orienta danĝero. Krajloj kaj Harambaŝoj (Impostpostulantoj) samkiel ŝkjaoj (slavoj) en la eposo reprezentas la kontraŭstarantajn slavajn figurojn al la popolaj albanaj herooj kiel Mujo, Halil, dum mara bajlozo kontraŭstariĝas al Ĝerĝ Elez Alia. La Bajlozo reprezentis la malamikon alveninta de maro.

La maro estas konsistiganto de geografio de eposo. Tiaj regionoj kiel tiu de Novaj Kotoroj, La Gorĝo de Kotor, Venecio ka, prononciĝas sufiĉe klare en la rapsodioj.

La nordokcidenta areo Lezhe (Lej)- Shkoder, Ulqin –Kotor estas ja la marborda areo Shkoder –Vlore aŭ Jutbine- Vlore. Tiaj loknomoj kiel “La kastelo de Shkoder”, ties Bazaro, Buna, La fiŝkaptistaj Dajlanoj, la Kampo de Spahioj, la Kampo de Bushat, la Kampo de Vlora, memevidentigas ke ni troviĝas ja en tipa marborda medio. Tial ankaŭ la personaĝoj apartenas al tiu medio kaj al urba vivstilo tre praa rilatita al tiu medio.

La loko de la albana eposo en monda literaturo

La albana eposo okupas sian lokon en la kompleksa de la monda epiko kaj meritas altiri la atenton de la ĝenerala, eŭropeca kaj balkania folkloristiko, ĉar ĝi estas ja produktaĵo de la kontinueco kelkmiljara iliro-albana en regiono kie interkruĉiĝis kulturoj kaj diversaj civilizoj, de nordo kaj de sudo.

Portante en si ankaŭ la influojn de elementoj de tiuj kulturoj ne misformiĝante kaj ne perdante sian originalecon, nia eposo estas grava por solvi multajn enigmojn kaj problemojn de epiko, ne nur de la popoloj de Balkanio sed eĉ pli vaste.

Ĝia studo gravas ankaŭ ĉar ĝi estas unu el plej praaj eposoj kiu daŭris ĝis hodiaŭ kaj ne estas kondukita nur per fiksitaĵoj en libroj tekstoj, sed per la tradicia aŭtentika folkloreca meĥanismo, per la orala transdonado. Ĝi originalas ne nur kompare al la eposoj je tipo klasika kiel Mahanharata, Ramajana, Iliado, Odiseo ka, al la eŭropecaj feŭdaj cikloj je formo de irlandaj kaj skandinaviaj sagaoj, anglosaksa poemaro pri Beovulfo kc, sed ankaŭ al la cikloj de nomadaj loĝantaroj turko-mongolaj kiel eposoj de Alpamiŝo, Manas, Ĝangar kaj cikloj de malfrua feŭdismo kiel armena ciklo pri David Sasun, rusaj bilinoj, kanzonoj pri Rolando kaj Sidi kc.

La albana eposo estas unu el malmultaj eposoj portanta aŭtentikajn popolajn valoraĵojn, savitaj de beletrisma ellaborado laŭ modeloj de la kultivita arto aŭ de kreiva mano de aŭtoroj kaj verkistoj, profesiaj poetoj.

La albana kaj greka eposoj

Se ni komparas la albanan eposon al tiu greka, preter distingo ni trovas multajn komunajn flankojn.

El temoj kaj motivoj ĉeestantaj en al albana epiko sufiĉas memori pri tiuj renkontataj en la greka tragedio kaj epiko, kiel murdo de patrino, la tributo je homoferajoj liverenda al Kuĉedro (Monstro), la eco de la homkorpo por esti ne trafebla escepte de iu punkto (la maldekstra subbrako de Mujo, samkiel la kalkano de Akilo), la patrina lakto kiel kuracilon je reala aŭ magia efiko, kuracado de Mujo helpe de Zanoj.

Zanoj kaj Oroj estas mitologiaj estaĵoj korespondantaj (probable antaŭenintaj) al la protektantaj diinoj de la greka Olimpo kun kiuj ili havas komunajn- kaj ĉi tio pezas pli ol ia hipotetika antaŭeco- la simbolojn kaj la nomojn, kiel Zana kaj Diana, proksimaj je nomo kaj simbolo de kaprino kaj cervo; dum Oro estas identigita al la diino Fortuna kaj fojfoje prezentiĝas kiel nokto favoranta miraklojn.

Por daŭrigi pluen, ni ekrigardu kelkajn juraj kaj moralajn instituciojn. Ĉe Agamemnono de Homero ni estas en la periodo kiam Bazileuso ne decidas arbitrarece, la primitiva demokratio

ankoraŭ plene floriĝis. La militistaj gvidantoj devenis el elito kaj heredis tiun postenon, nature, pravigante tion per militaj faroj. En la eposo pri bravuloj ĉe albanoj la gvidanto okupas sian honoran lokon danke al propra kapableco kaj devenas kutime el popolo. Lia aŭtoritateco baziĝas sur braveco kaj honorado laŭ kanunaj normoj, kiuj estas ja tiuj de la Kanuno de Montoj. (originala trezoro albana-jura kaj mora buŝa kodo)

La pozicio de virino estas alia interesa indikilo. La honorinda pozicio, precipe de virino-patrino en la albana eposo, pli ol ia elemento de matriarkato, ŝajnas al ni ke ĝi kondiĉitas de la devo por eduki civitanece la junan generacion. Ni ne trovas tian pozicion honorindan, des pli kiam temas pri virino en militista agado en la Homera eposo. Pri la aprezita pozicio de virinoj en nia eposo atestas ankaŭ la figuro de Zanoj. Ĉi tiuj figuroj devenintaj el la popola kredo, kune kun aliaj elementoj portas la stampon de pagana praeco.

En la homera eposo la mondo de olimpaj dioj estis en krizo, kio atestas la krizon de malnovaj juraj kaj moralaj institucioj tie, prezentas la klasikan sistemon monoteisman teologo-filozofian. Tiu tipo ne troveblas en la albana eposo, ĉar tiu monoteisma sistemo eniris pli malfrue. Rilate supre diritan, estas konvena akcenti ankaŭ la rolon de la mitologia elemento en la totala konceptiĝo ideoartisma kaj figureca en ambaŭ eposoj.

En la homera eposo la mondo de Zanoj konsistigas supran etaĝon en la galereo de personaĝoj. La olimpaj dioj kutime difinas per sia diina volo la sorton de herooj. En la eposo de bravuloj la rolo de Zano estas limigita kaj kutime la sorto de heroo decidiĝas de la volo de li mem.

La studoj emfazas ke komuna en ambaŭ kazoj estas ke la pasioj de mitologia estaĵoj interplektiĝas kaj miksiĝas kun tiuj de homoj en la albana eposo. Tio okazas ankaŭ en la homera eposo, eĉ je nesolvebla maniero, je difinibleco jam akcentita.

En la komparaj ekrigardoj pri ambaŭ eposoj ĝis hodiaŭ ŝajnas al ni ke oni pliatentis pri influo aŭ proksimeco de la mitologiaj elementoj de kelkaj ĉefaj personaĝoj aŭ apartaj aĉaĵoj. Sed mi opinias ke oni devas profundigi en la karakterizoj de herooj, en kelkaj moroj kaj figurecaj kaj ideaj konceptiĝoj, eĉ en similaj esprimaĵoj kaj preskaŭ samaj. Ĉi tie ni ne forgesas eĉ momenton la koncernajn apartecojn etno-psikologiajn. Tiuj koincidoj venas : pro fazoj de ekonomio-socia evoluo, kio kondukas al la similaj pensformoj; pro efiko de komuna klimato de najbareco kaj natura influo samkiel pro ebleco profiti de tria vivfonto komuna, praeca.

Kunfrontiĝo de figuroj ĉe herooj de eposoj: Mujo kaj Ĝerĝ, Akilo kaj Odiseo, atestas pri la stampo de heroeca epoko kaj kulturaj herooj ĝenerale. La mortigo de Kuĉedro aŭ la terkultivado, venko

kontraŭ kolosaj naturaj kaj sociaj malamikaj fortoj personigitaj kaj mitologiitaj alportas ĝuste tiun spiriton. La soifo por heroecaj faroj kaj por gloreco okulfrapas ĉe Akilo kaj ĉe Mujo. Sed la militista impeto de Mujo akompanatas ankaŭ de evidenta prudenteco. Ĉe tiu flanko li rememorigas nin pro Odiseo, heroo atestanta pri transpaso de kulto de forto al la kulto de rezono. Ankaŭ pli videble la mision de la morala mendo en la albana eposo enkarnigas la figuro de la patrino.

En ambaŭ eposoj la herooj dum duelo ofertas unu al la alia la eblecon ke la alia pafu la unua, atestante tiamaniere superecon je braveco. La herooj estas kaptitaj de militema pasio kaj la devosento al la patrio kaj familio. Ni rememoru pri Hektoro, pri Mujo. Ili ja scias la atendantan danĝeron, tamen ili ne retiriĝas. Ili malamegas la kontraŭulon, sed tamen estas realismaj en la estimado de ties kapableco. Ili deziras eviti la vanan sangofluon, tamen ne kompromisas kontraŭ al la idealo kaj moralo protektata de ili. Jen la mesaĝo pri la vivo en libero de bravuloj:

Ni estas pretigante glavon kaj plugon

Kaj estas enirante en terojn por ekplugi

(legendeca epiko Vol II Tirana 1965 p.169). Tia mesaĝo ĉeestas ankaŭ en la homera eposo.

En ambaŭ eposoj la deziro por enpaca kunvivado maltrankviliĝas ofte pro milito: Mujo la morgaŭon de lia nuptotago, eniras la batalon kontraŭ malamiko. Tio rememorigas nin unuflanke Ago Ymer-n kiu “nur unu nokton kunrestis kun sia edzino” kaj aliflanke, la bravulon Mujo Ipodamanti de Homero kiu “apenaŭ enlitiĝis kun sia junedzino/ kiam ricevis la novaĵon ke argoj/ estis atakinta Troja-n” (Iliado Tirane 1979 p.186).

En la albana eposo “ne estas ja pli dolĉe morti ol enmilito falu” (p.307). Dum ĉe Iliado Hektoro konfesas ke “feliĉa estas tiu mortanta defendante la patrion” (p.271).

La **Beso** (unika albana karakterizaĵo morala-proksima al la donita parolo) konsistigas la dramecan kaj tragediecan nodon de multaj albanaj baladoj. Kaj rapsodioj. Perfide sieĝitas ofte la Bravulo kaj fine li kondamnas la perfidecon terurmaniere. Ankaŭ ĉe Homero la Beso aprezo kiel valora virto. Hektoro esprimas sian bedaŭron ke “La kruela Zeuso ne stampigis /la beson” kiu estiĝis inter trojanoj kaj grekoj (Iliado p.117). Dum Odiseo akuzas Polifemon ĉar tiu ĉi akceptas la gaston, poste formanĝas lin” (Odiseo Tirana 1976, p.137).

En la albana eposo la moro de Beso ne povas apartiĝi de tiu de gastamo, tiom kiom eĉ la luno nokte “okazis esti okupita/ ĉar havas kelkiun por konduki” (citita volumo, p.77). Do, ĝi ne lumigas por ke la malamiko ne povu distingi ion. Por albano la morto alvenas eĉ tiam kiam “vi ne havas panon por la gasto”.(same tie p.85). Por amiko kaj anstataŭ lin albano en eposo eliras en la duelon altrudita al tiu amiko. Dum en la homera eposo ni

trovas tutajn scenojn je akcepto kaj kondukoj de la amikoj kaj la aserton ke “Kiam fremdulo malbone traktiĝas en via hejmo/vi mem makuliĝas je honto porĉiame” (Odieso p 283).

Kontraŭ Egisto mortiginta Agamemnonon je pano enbuŝe (Odesio) ni havas la sintenon de la reĝo Prete, al kiu “ŝajnis grava sangumado mortigi je pano enbuŝe” la bravan kaj noblan Belerofont. (Iliado p.103)

La plej forta ligo de amikeco okulfrapas ĉe la moro de kvazaŭfratiĝo kiu en Balkanio estas ekzistinta antaŭ la alvenego de slavoj. Post la mortigo de Patroklo, Akilo deklaras: “Mi volas ekiri por kapti ie ajn Hektoron/ la kruelan sangumanton mortiginta mian kvazaŭfraton” (Iliado p.328). Trinkinte lakton ĉe Zanoj, Mujo kvazaŭfratiĝas kun ili. Kaj fakte la kvazaŭfrato estas la homo plej trovebla por la Bravulo en danĝero.

En ambaŭ eposoj ni trovas la honorigon por la batalanto kaj por la armilo. Sangumaj bataloj disvolviĝas ĉe Iliado por la kadavro kaj la armiloj de la batalinto. Mujo ne povas koncepti ke lia armilo ekfalu en la manojn de la malamiko. La humiligo de la tombo de bravulo fare de kontraŭulo estas unu el la plej grandaj ofendoj. Dum la deziro de batalanto por ke oni ne malbeligu lian vizaĝon, kiel tiel oni insistas ankaŭ ĉe Iliado por Hektoro, esprimas krom la honorigon, ankaŭ la emon al la beleco de la heroo, la senton de la beleco.

En ambaŭ eposoj ni trovas ankaŭ la mortploron bruan ĉirkaŭ la kadavro de batalinto, samkiel la proverbecan stoicismon de la albana bravulo.

Valoraj ideoj troveblas por la unuiĝo, por sinapogo sur propraj fortoj. La disigulo Dezdar estas unu el la plej malamitaj vizaĝoj de la albana eposo. La kverelo inter du fratoj alportas tiom pezaj damaĝoj por la bravula bando. Frato al frato kaj albano al albano ne povas deklari militon, diras Mujo al Halilo. (Homo senskrupula, kanajlo./ estas tiu avidanta militon inter fratoj” laŭvoĉas Nestoro ĉe Iliado (p.145). Kaj “Eĉ malfortuloj fariĝas/fortajn virojn kiam ili unuiĝas” (same tie p.224).

Mujo atingas ĝis la aserto ke “Kulpon Dio je vi ne havas” (Legendeca epiko p 72), dum Hektoro stariĝas kontraŭ superstiĉojn, asertante ke “nur unu estas plej bona aŭguro:/militi ĉiam por la defendo de la patrio” (Iliado p 211)

La deziro por daŭrigi kaj plialtigi la militeman animon fare de juna generacio okulfrapas same evidente. Halilo pretas entrepreni agojn por kiuj sperta Mujo devas pripensadi. Kiam oni enprizonigas grave lin, la bravulo kredas ke la filo alvenos iutage por lin liberigi. Akilo en la mondo de Hadeso konsoliĝas sole per la faroj de sia filo postlasinta. Dum Hektoro deziras ke oni diru pri lia filo “ li fariĝis ja pli brava ol la patro”. (Iliado p112).

En ambaŭ eposoj ni trovas la scenon de malheliĝo de la batalkampo al la herooj, fare de nekompreneblaj fortoj. Samtiel ni trovas la adoradon por la lumo kaj por la suno. Mujo “tuj al la suno sin turnis/ kaj helpen petis de li”. (Legendeca epiko p 469).

Sed li estas ravita de lumo radiata de Zanoj. Dum en la homera eposo la figuro de diino de lumo aŭ de ties filo aperas multfoje. En ambaŭ kazoj oni sentas la aspiron al la lumo.

Ankaŭ en la albanaj rapsodioj ni trovas la motivojn renkontitaj ĉe la poemo Odiseo kaj ĉe la aliaj popoloj: “tiu de filo ekirinta por ke li trovu la patron, la motivo de rekonatiĝo danke al iu aparta signo, tiu de blinduliĝo kaj tiu de mortigo de monstroj..de sorĉantaj sirenoj..”

Estas parolite pri la forrabado de junedzinoj kaj estas komparite tiu de Heleno kaj tiu de Ajkuna, aldonante la saman fakton ke la “forrabado okazas dum la malĉeesto de iliaj edzoj”.

Diversaj ekzercoj, ludoj per ĉevaloj, matĉoj je fortenco kaj militista kapableco plenumas la batalantoj en ambaŭ eposoj. Tiuj aktivecoj eniras kelkfoje kiel rimedoj por solvi la konfliktojn kaj transpasi la malfacilajn kaj komplikajn statojn. Ĉe Odieso estas la provo de mirindaj kapablecoj de la heroo kiam li traigas la sagon tra vico da ringoj samtempe. Ankaŭ en la albana eposo la junulo “eliris por rompi la signon tra nukso/tra ringocirklo”.

Eblas trovi ekzemploj similaj ankaŭ komparante la aŭtentikajn grekajn kanzonojn.

Tiaj similaĵoj kaj koincidoj, la honorigo por la altaj virtoj homaj kaj naciaj samkiel por aliaj elementoj renkontitaj dise en la tuteco de ambaŭ eposoj, atestas pri la praeco de du poetikaj ĉefverkoj kaj pri kunekzistado en pratempo en la Balkana duoninsulo de ambaŭ niaj popoloj najbaraj, de kreivaj kapablecoj kaj progresivaj aspiroj iliaj.

La albana kaj slava eposoj

La albana eposo havas renkontajn punktojn kaj distingojn ankaŭ kun la slava eposo, pro fakto ke la popoloj ilin kreintaj estis najbaroj ekde la tempo de alvenego de slavo en Balkanion.

Mujo kaj Halilo en la albana epiko okupas la ĉefan lokon kaj estas enkarniĝo de la virtoj de la tribo kaj entuta nacio. Ili portas surŝultre la gravan pezon de interluktoj de niaj nordaj montaranoj kontraŭ atencoj fremdaj, por defendi la teron, riĉaĵojn kaj propran honoron. Iliaj faroj okazas en ia fabela mondo, plenplena je fantastaj elementoj-, je denseco kaj dimensioj de faroj de pagana mitologio.

En la slavaj epikaj kanzonoj Mujo kaj Halilo okupas duagradan lokon. Ili ne kreas memstaran ciklon kaj iliaj agoj estas erigitaj kaj disigitaj en diversaj kanzonoj. Alie estas kun la figuro de Krileviĉ Marko, formanta memstaran ciklon en la serba epiko kaj respondanta al la nia epika ciklo de Mujo, Halilo, Omero je ties centro. Alie ol nia epiko en tiu slava Mujo kaj Halilo prezentiĝas kiel dependulojn de Sultano kaj plejofte kiel turkojn (“Krileviĉ Marko kaj Halil Aga”).

En la bosnia kanzono “Bogdan Lutica kaj la fratino” Mujo prezentiĝas senvisaĝigita, timema kaj fiula, ofendanta homojn ligitaj per ĉenoj kiel Bogdano kaj serĉas orgojlecon mortigante homon mane kaj piede katenita.

En la serba kanzono “Marko Krileviĉ kaj Halil Aga”, Halilo estas timegulo, kiu petas Markon kiu venkis en la duelo ke li savu lin la

vivon, eĉ se tiucele Halilo devas fordoni sian riĉaĵon kaj edzinon, laŭkondiĉe. Pli poste, Kraleviĉ enamikiĝis kaj kvazaŭfratiĝis al Halilo: “ Kune ili gardis la terojn de Sultano/ ambaŭ militis kontraŭ malamikojn/ kaj propulsis ilin trans la limojn”. Estas jam historie konate ke Kraleviĉ Marko fariĝis dependulon de Sultano, sed Halilo kaj Mujo, eĉ legendecaj kiel oni prezentas ilin en la eposo, neniam eniris en la Sultana servo. Poste, ne estas ja en la naturo de albano fordoni la edzinon al aliulo, kiel dirite en la slava kanzono (des pli, tio ne prezentiĝas en la kanzonoj niaj epikaj). Ni ne konsideru tion, ian senvizaĝigon de la herooj de nia epiko sed ia pritrakto **sui generis** notanta tranĉitajn distinglimojn inter nia kaj slava eposoj.

En niaj epikaj kanzonoj la kontraŭuloj ne prezentiĝas je ecoj humiligaj. En la albana kanzono “Ĉeto Baŝo Mujo kaj Kraleviĉ Marko”, proksima al la serba varianto “Marko Kraleviĉ kaj Halil Aga”, Kraleviĉ Marko estas donita tiom potenca kiom Mujo kaj Halilo. Ĉi tiuj per iliaj kriegoj skuigas la kverkujon kaj faligas ĝin, ruligas la ŝtonegojn sur la altmontaro. Sed ankaŭ Kraleviĉ Marko per ties kriego “Estas ruliginta la ŝtonegojn sur la altmontaro”.

En la albana kanzono “Mujo kaj Zanoj”, al kiu respondas pli malpli la serba kanzono “Marko Kraleviĉ kaj Zanoj” ni trovas esencajn distingojn je mondkoncepta karaktero, vivmaniero, stadio de la socia evoluo, mondon kaj pensmanieron tute diversan ol tiu en la serba varianto. En nia varianto ni vidas elementojn de pagana mitologio: fido al supernaturaj fortoj de Zanoj; vidas la ekonomian evoluon: la kaproj kaj ĝenerale, la brutaron kiel solan fonton de la vivado por niaj montaranoj (rememoru la kaprokornojn kie ja staris la forto de Zanoj).

En la slava varianto “Marko Kraleviĉ kaj Zanoj” tiu ĉi orgojlante kiel ĉevaliro fierulo, diras al sia amiko Miloŝ : “Ne timu de Zanoj ĝis mi estas plu viva”. Des pli Marko frapas per madzo (klabo) kaj grave vundas unu el Zanoj-n. Dume Mujo en la albana varianto konsilas al kamaradoj ke ne nur Zanoj-n , sed ankaŭ la kaprojn, sanktaj al li, ili ne audacu frapi, alie neniu revenos viva en Jutbinon.

Alia situacio atestanta ke la ĉeesto de Zanoj en la serba varianto ne estas io organika kaj ne elfluas de logiko de elvolvado de subjekto, do ne estas mondkoncepta konvinko, sed plia ornamaĵo kaj motivo por demonstri la superecon de Kraleviĉ Marko en ties tuta aktiveco de orgojlulo, estas la subiĝo de Zana al la volo de Kraleviĉo. Ŝi eĉ konsilas sian amikinojn ke ili ne ĉasu la bravuloj ĝis Marko Kraleviĉ restos viva. La orgojleco kaj prepotenco de Kraleviĉ estas io pli ol individueca psikologio.

Tute alie estas la afero en la interrilatoj de bravuloj al Zanoj. Ili vivas preskaŭ en la samaj medioj. Ili havas reciprokan amikecon kaj respekton, la samajn vivrimedojn kaj agnoskas la forton unu al la alia. Tio parolas ne nur pri pagana kulto, sed ankaŭ pri la fido de bravuloj je siaj propraj fortoj. (la forkapto de kaproj kaj senigo de Zanoj je vivadfonto). La mitologia elemento pagana en la albana varianto rileviĝas ne nur per firma memfido je la potenco de Zanoj, sed ankaŭ danke al la mirinda priskribo apokaliptika de la naturaj fenomenoj, ĉirkaŭantaj la “maldolĉajn” Zanojn, tutpotencaj kaj timigaj. Kiam Zanoj

eliras por bari la vojon al la junedzinaj akompanantoj kaj por glaciigi kaj enŝtonigi ilin, kaŝa venteto knalas en la fagujo kaj la montopintoj skuiĝas terure.

Ankaŭ en la kanzono “Nupto de Halilo” ni trovas mitologiajn mediojn paganajn kaj patriarkalajn, Zanojn kaj Orojn kiuj protektas kaj konsilas Halilon kiel li devas agi. En tiu kanzono la subjekto elvolviĝas en medio ĉefe montara je unu funkcia elirejo el tiu medio. La slavaj variantoj pri la nupto de Halilo divergas je multaj aspektoj en la kanzono “Nupto de Halilo”. En ili ne estas unika linio de subjekto, la situacioj miksiĝas kaj medioj plej diversaj (urbo, monto, kampo), la ago pasas de Prilepo al Trnovo de Bulgario, la pagana elemento greftiĝas kun tiu baroka romantika de la dalmata marbordo, je unu konfesia supereco kristana mezepoka.

En unu el tiuj variantoj unu personaĝo diras:”Mi timas neniun krom Dion/ nek al Zano naviganta/ Mi ne kredas al sorĉoj/ nur al Dio, granda Dio.”

El supre limigita nombro de ekzemploj por kompari nian kaj slavan epikon evidentiĝas la esenca diferenco inter ambaŭ eposoj. Ili ja estas naskiĝintaj en diversaj medioj , en diversaj tempoperiodoj, ili havas propran historion kaj iliajn distingajn direktojn de kreiĝo.

La historia kaj geografia lokiĝo de la poetika mondo de la ciklo de bravuloj

La geografia lokiĝo

La kanzonoj pri bravuloj etendiĝas sur certa teritorio, troviĝanta trans la rivero Drin. En tiu surtera etendiĝo: Granda Montaro, La Montaro de Gjakova, ĉirkaŭaĵoj de Shkodra, Dukagjin, Kukes, Kosovo ka konsistigas la aŭtentikan regionon de la ciklo pri bravuloj.

Ĝis malfrue, en nia folkloristiko oni aperigis la opinion ke en la malsupraj partoj de la Nordorienta Albanio, nome en Diber, Mat, Lezhe kaj Kruje, la kanzonoj pri bravuloj ekzistas nur kiel geografian etendiĝon, kiel ian disvastiĝon kaj ne kiel aŭtentikan regionon. Tamen, surbaze de la esploroj niaj, estas trovite en Mat tri kanzonoj tipaj pri bravuloj, nome “Arnaut Osmani”, “Iam estis patrino kun tri filoj”, kaj “Juna Brahim Keta”, kiujn ni aligos ĉi tien kune kun respektivaj notoj. Krome, ni estas trovintaj ankaŭ postrestaĵojn de ceteraj kanzonoj, buŝdiraĵojn dispecigitajn pri Oroj kaj Zanoj (Arbaraj Muzoj kaj Diinoj), pri Mujo kaj Halil. En la regiono de Mat konserviĝas ankaŭ restaĵoj de Lahuto (popola antikva muzikilo). La kanzono de “Juna Brahim Keta” troviĝas, kiel asertite de esploristoj jam, ankaŭ en Librazhd, Diber, Montaro de Tirana, Kruja, kaj Lezha. Tiuj ĉi kanzonoj kune kun “Arnaut Osmani”, “Iam estis patrino kun tri filoj”, kaj restaĵoj de aliaj kanzonoj konstaebblas ĝuste en eksaj urbetoj de la regiono de Mat, kiel estas Petralba (Blanka Ŝtono), Bruĉ, Ferr Shkopet, Xiber kaj aliaj vilaĝoj, kiel Lis, Shelli, Patin, Plani i Bardhe (Blanka Plan), kc.

Mat, antaŭ XV jarcento, komencante ekde la Ilira periodo, posedis urbetojn kaj kastelojn kiuj, kiel tion akcentas la esploristoj, havis duoblan karakteron, kiel ekonomiajn-administrajn kaj defendajn centrojn. La loaĝantaro de ĉi tiuj urbetoj, surbaze de dokumentoj disponeblaj, faris intensan ekonomian vivon kunlabore kun la malsupra parto de la nordorienta, centra kaj marborda Albanio, sufiĉe pli multe ol kun la nordaj partoj, kio atestiĝas ankaŭ danke al novaj malkovroj de pontoj kaj vojoj servintaj por interligoj. Tion atestas ankaŭ la geografia pozicio okupata hodiaŭ de Mat.

El la supre dirite ni povas konkludi ke la kanzonoj pri bravuloj trovitaj en tiu regiono, ne povas esti ia radiiĝo alvenanta de tiuj randoj el malfruaj tempoj, sed aperaĵo apartenanta al la periodoj antaŭ XV jarcento, konjekte al la ekzisto de urbetoj kaj kasteloj, samtiel

kiel al la mem vivo de la eposo. Troveblas ankaŭ pecoj de legendoj rilatitaj ĝuste al la centroj, kasteloj, pontoj el pratempo. Kontinuecon de tiuj ĉi legendoj estas tiuj ligitaj al Skanderbeg.

Do, eposo estas trovita ne nur en Altmontaro de Nordo, sed ankaŭ en la malsupraj partoj de Nordorienta Albanio. La eposo estas ja tutnacia albana kulturo. Tiu ĉi alta kulturo, senfina riĉeco je esprimiloj, je universeca konceptiĝo de la mondo kaj de la homa vivo signifas esti havinta nepre praan heredan bazon de civitana radiantanta popola kulturo. Tio estas, ĉi tiu poetika universo ne estas kreita simple de paŝtistaj montaranoj, sed de loĝantaro kies kultura bazo estis tre pratempa kaj rilatiĝis al kulturaj grandaj kaj malgrandaj centroj.

Translokiĝo de la enlanda loĝantaro de urbaj centroj al altmontaro estiĝis pro defendaj motivoj kontraŭ diversajn atakojn de malamikoj. Albanoj, establiĝinte en tiuj regionojn, alportis kun ili ankaŭ ambaŭ la materian kaj poetikan kulturojn. Ĉi tie troviĝas ja la radikoj de tiu majesta kaj brilanta stilo kiu revigas nin kaj enpensigas pri same pratempa kaj moderna kultura heredaĵo .

Historio

Nuntempe oni ja estas certaj ke la eposo pritraktas okazintaĵojn el la periodo de transpaso de la genta socio en feŭdan ŝtatan ordon. La popolaj rapsodoj estas reflektintaj en iliaj kanzonoj la klopodojn faritaj de nia popolo, libera kamparanaro de Nordo por eskapi la fremdajn agresiojn kaj feŭdajn altrudojn. En tiu ĉi eposo speguliĝas la rezistado de etna popolo, dum pli ol dek jarcentoj. Ni ne povas malkovri la estetikajn valoroj, sociajn majestajn idealojn kaj aliajn aspektojn de la eposo disde apartaj periodoj kaj historiaj eventoj kiuj postlasis siajn spurojn en ĝi.

Nia eposo rakontas pri la militoj kontraŭ la slavajn alvenegoj. Kiel sciite, tiuj militoj okazis dum du periodoj:

La unua, dum jarcentoj VI- X (ses streko dek), en la tempo de unua slava alvenego

La dua dum jarcentoj XI-XIV (naŭ streko dekkvar) , en la tempo de okupacioj de Nemaĵoj.

Inter ambaŭ militoj estis la bulgara alvenego. La memoroj pri tiuj periodoj estas provizintaj vastan materion por la popola rapsodo por prikanti la rezistadon kaj heroecon de albanoj. Sciigende ke en tiu periodo, en la albana regiono loĝas la iliraj gentoj. La slavaj alvenegoj renkontiĝis en la limoj de la albanaj teroj kion jam pruvas la fakto ke tie ili haltis pro forta rezistado. Tiuj eventoj kaŭzis skuojn kaj tragediojn en la vivon de iliraj gentoj.

Ekirinte de la ĝenerala materio enhavata en la eposo, ni diras ke nia eposo apartenas al la antaŭosmana periodo.

Krom la arberesha faktoro, tion pruvas ankaŭ la enhavo de la kanzonoj koncernantaj je “mondkonceptaj elementoj paganaj, mitologiaj konceptoj prezentantaj la raporton de la homo al la naturaj fortoj, temojn kaj subjektojn interplektitajn kun fantastaj estaĵoj, heroecon de la geedziĝoj, konkurojn por forpreni la junedzinon kiel pruvaĵojn de la vira forto aŭ de ties reprezentanto ka., kiuj rilatiĝas al la etapoj de historia- tipologia evoluo de la eposo ĝenerale. La morto kaj renaskiĝo de la herooj, la motivoj de metamorfismo, de aliĝo de la homo al arbo, floro aŭ birdo apartenas al pratempo antaŭosmana. Kiel

vidite, nia legendeca eposo naskiĝis kaj kreskigis sian staturon ene de ĉi tiuj historiaj koordinatoj.

Por kompreni estetikajn aspektojn kaj la realaĵon esprimata de ili ni devas rigardi la eposon en ties dialektikon de evoluiĝo. Ĉi tiu ciklo pri bravuloj nepre ne havis nuntempan formon ekde la komenco. Postaj tempoj lasis sur ĝin iliajn spurojn. La okupacio fare de osmanoj kaŭzis alian skuegon al la albanoj. La jarcenta distanco de la eventoj, ekde la ilira periodo ĝis la V (kvina) jarcento kaj pli poste ĝis la osmana okupacio, nepre nebuligis la aferon, sed ni koncentriĝos nur en la fundamentan bazon de la ciklo.

La historiaj-sociaj kondiĉoj en kiuj estas formita ĝi kaj la geografia etendiĝo en la tutan Nordan kaj Nordorientan Albanion inkluzive de la regiono de Mati, kontraŭstarigas la pretendojn de antialbanaj esploristoj, aparte de tiuj slavo-serbaj, kiuj neniigas la praecon kaj la etnecon de ĉi tiu monumenteca verkego de la albana popolo.

Rilate la kategoriojn de la majesteco, tragikeco kaj similaj ni prezentas ĉi subajn ĉefajn argumentoj:

- a) La iliro-albana regiono estas ja la loko kie fondiĝis la ciklo pri bravuloj. Ĉi tiu regiono de tempo al tempo kuntiriĝis pro la slavaj alvenegoj, sed ĝi ĉiam konsistis el popolo posedanta altan kulturon kaj arton.
- b) La ciklo pri bravuloj kiel vivan organismon estas ŝanĝiĝinta ene de dek jarcentoj kaj estas ligita al la sortoj de la nacio, esprimas ties rezistemon, aspirojn kaj farojn
- c) La iliro-albana loĝantaro postlasis al la venontaj generacioj kiel mesaĵon, la legendecan epikon, ĉi tiun grandan poetikan kompleksan.

Konkludo

La ciklo pri bravuloj de albanoj similas al aliaj eposoj de popoloj heredintaj kulturon kaj arton je monumentecaj valoroj. La esploroj kaj argumentoj pruvas jam ke temas pri granda artverko de unu el plej malnovaj popoloj de Balkanio.

Tiu eposo, dum longa tempo, kiel spiritan produktaĵon, estas plenuminta grandan mision por la albana popolo en tempoperiodoj tre dramecaj por ĝi mem.

Bedaŭrinde, oni ne sufiĉe atentis pri ĝi samkiel tio okazis ja por la tuta popola literaturo, fare de niaj enlandaj esploristoj. Pasintece, malofte aperis kelkiu klopodinta por kolekti kaj sistemigi ĝin. Sekve de tio, okazis ia rugiĝo je senco de originaleco. Pli poste, tiu eposo altiris la atenton de esploristoj pro fakto ke ĝi estas ne nur albana fenomeno sed eĉ tutmonda.

Ekirinte de la albana mondo, historio, lingvo kaj popola kulturo, reflektitaj en la eposo, tiuj esploristoj estas eksplicitaj tra ĝi balkanajn kaj eŭropecajn aĵojn. Ĝis hodiaŭ oni estas prilumigintaj diversajn problemojn koncerne al la ties praeco, genezo, enhavo, strukturo, valoroj kaj etneco. Menciindas la studlaboroj de enlandaj esploristoj: Bernardin Balaj, Eqerem Çabej, Ernest Koliqi, Qemal Haxhihasani, Alfred Uçi, Demush Shala, Zihni Sako, Ismail kadare, Anton Çeta, Aleks Buda. Inter la fremduloj menciindas Prof. Maksimilian Lamberz.

Sintezo de la atingoj de la studoj plej gravaj tiukampe estas la Simpozio je ĉeftemo “La Albana Heroeca Epiko” okazinta pli ol dudek jarojn antaŭe (20-22.10.1983).

Mi opinias ke ne tro da atento oni dediĉis same al la problemo de malkovro de la estetikaj valoroj de la Ciklo pri Bravuloj. Temas pri tiaj kategorioj kiaj ja estas la majesteco, sublimeco, mirakleco, tragikeco, komikeco, beleco, fienco, malbeleco kaj literatura figurado, per kiuj estas ili esprimitaj. Ne neglegtante aliajn problemojn, mi opinias ke ankaŭ tio koncernas la albanan eposon. Pristudante kaj konante pli profunde la eposon kiel artan kaj kulturan verkaĵojn de pratempa popolo, ni antaŭenigos niajn stud esplorojn prikonsiderante la eposon ne kiel ion jarcente forgesitan kaj fermitan.

La albana eposo enviciĝas kune kun la plej belaj eposoj de la aliaj popoloj. Per ĝia temara kaj motivara riĉeco, ĝia kultura vasteco, universaj homecaj pritraktoj, rilatoj al la pratempa mitologia mondo kaj proksimeco al la Homera eposo, la albana eposo kontribuas en la esploron de la ĝenerala kulturo de la diversaj popoloj kaj en la fekondiĝon de universala kulturo ĝis nuntempo.

Trafoliumante la albanan eposon, ni sentas en ĉiu ties verso, en ties artisma korpo la subpremon kaj malhelpon al diversaj regantoj, la gajajn kaj tristajn momentojn, la projekciadon de la estonteco. Kie ajn, la eposo aperas antaŭ ni tiom proksime al la spirito de la popolo, tiom forte ligita al ties suferoj kaj ĝojoj, ties entuziasmo kaj atingoj en la vivo, tiom multe rilatigita al la simboloj de la viveca kaj mora tradicio. Ĉio dirite estas ja artisma realaĵo donita tra mirinda literatura figuracio.

La literatura figuracio de la ciklo de bravuloj estas interesa. Ĝi estas doninta al eposo majestan aspekton. La interna poezio akirita danke al tiu figuracio igas la legendecajn kanzonojn pli sentenhavaj ankoraŭ hodiaŭ. Tiu figuracio estas interplektita kompleksmaniere. La komplekseco de la esprimiloj estas doninta la artismajn valoraĵojn de la majesteco, tragikeco, fienco, malbeleco, komikeco, ks.

La albana eposo ankoraŭ hodiaŭ elradias internan fajron. Tralegate, ĝi ekbruligas vian animon per mirindaĵoj enhavantaj, perturbas viajn perceptaĵojn kaj igas vin ekavidi la heroojn pro iliaj profundaj homecaj virtoj portantaj en si mem. Tio estas akirita plejofte per hiperboloj ĝis la ekstremoj de la fantazio de la rapsodo.

Envere nia eposo ne estas produktaĵo de profesiaj verkistoj, tamen tio neniom domaĝas ties artisman valoron. En la rapsodioj de bravuloj ni povas trovi ĉiujn specojn de figurecaj kaj poeziaj esprimoj portantaj grandajn estetikajn valorojn, selektitan leksikon kaj originalan poetikan sintakson.

La poetika lingvaĵo estas rimedo apartenanta al la homoj je kreativaj emoj, tamen ĝi facile kompreneblas ĉar ĝi havas sian logikon. La klareco de la literatura figuracio de la ciklo de bravuloj, konformiĝas al la nivelo de kulturo de aŭskultanto. Preter la simpleco en la eposo okulfrapas ankaŭ la transporto de estetikaj valoroj per metaforoj kaj simboloj postulantaj de vi iom da pripensado por ilin elkompreni.

Tiu ĉi eposo estas artisma kreaĵo apogita sur antaŭa tradicio aparenanta al la pratempa mitologia mondo. Tio estigis pli da eblecojn por ke la albana eposo estu imagebla produkto, ekhavu poetikan strukturon starigita surbaze de aparta artisma stilo kaj sur sistemo de figuroj kaj artismaj esprimoj. Kiel tia, ĝi portas en sia esenco la perfektan modelon de estetikaj valoroj de majesteco, beleco, tragikeco, fienco, malbeleco, komikeco ks, konforme al la konceptiĝo kiun la homo havis tiutempe pri la realaĵo.

La eposo estas vera universo de la vivo de albanoj dum pli ol dek jarcentoj, sed tiu universo estas donita al ni tra artisma plasteco kaj figureco.

Ni ekrigardu tion tra simplaj ekzemploj, senanalize. Jen la kanzono “La geedziĝo de Halil”. En la lastaj momentoj de lia vivo, kondamnita de krajlo (reĝo), Halil ekkantas:

Neniu la filon ja komprenis
Li estas kantante en la lingvaĵo de la antaŭenintoj
Do, la lasta tago jam alvenis por mi,
La suno estas kovrita , same la montopintoj,
Kie estas, do, via parolo, Suno?
Kie estas via parolo, Zano ?
Ĉu envere tio estas la Donita Parolo via?
Ĉu vi respondos al mi, Suno?
Danke al tiu lumo, flagranta surfrunte,
Lastan deziron mi estas lasanta vin
La deziron por la lasta fojo:
Traserĉu la montaron de roko al roko
Traserĉu la ombroripozejojn kie ajn ili estu
Ekbruligu la ostojn tutrande
Forprenu la dormon al la Zanoj enmonte,
Salutu grandan Zanon je mia nomo
Diru al ŝi: Halil nun finiĝis!

Per tiaj pasaĵoj en la eposo ni povas koncepti la filozofian penson de nia popolo dum certa tempoperiodo. Ni ekkonas bone ties etno-psikologion kaj maralo-estetikon, kion ja agnoskis kiel belan kaj kion ĝi forĵetis kiel malbelan, kion ĝi starigis kiel majestan kaj kion ĝi konsideris kiel fiaĵon.

Bibliografio

I. Akademio de Sciencoj de Albanio

Problemoj de la albana folkloro Vol I, II, III Tirana 1983
La historia epiko Vol I Tirana 1983
La legendeca epiko Vol I Tirana 1966
La legendeca epiko vol II Tirana 1983
La albana folkloro vol I Tirana 1982
La albana folkloro vol II Tirana 1984

II Aŭtoroj diversaj albanaj

Agolli Dritero, Vivo en la beletro Tirana 1974
Ali Aliu, Esploreroj – studoj kritikaj Tirana 1990
Fatos Arapi, La poetika figuro en la popolaj poezioj Tirana 1978
Fatos Arapi, Pratempej kanzonoj albanaj Tirana 1986
Eqerem Ĉabej, Kelkaj figuroj de la popolaj j'uroj Prishtina 1974
Anton Zako Ĉajupi, Literaturaj verkoj vol 1,2,3 Tirana 1970
Jeronim de Rada, vol 1, 2, 3 Tirana 1987

III Fremdaj aŭtoroj

Abraham P.Despe; R. Manuel D., Historie litteraie de la France vol IV(1), vol IV (2) Paris 1972, 1973,1974
Aristotel , Poetiko Tirana 1961

Bjelinskij, Kritikaj artikoloj Tirana 1977

Brecht Bertold , Foks Finkelshtajn, Kritikaj studoj Tirana 1982

Elyar P. ; Man T ; Kalvine F ; Cvajk S.; Qemal Y.; Heminguej E.; Lorca

Eseoj kaj aliaj verkoj Tirana 1986

Favre I , Lumieres et romantisme Paris 1980

Ilustraĵoj

Bravulaj kantoj

Floriano , la Franko

Komento:

Tiu ĉi balado okupas gravan lokon en la albana eposo. La origino de ĝi apartenas al la antaŭturka periodo kaj havas vastan etentiĝon en la tuta Albanio. La balado envorte ekzistas en ses variantoj (kvazaŭfratiniĝoj) en Albanio mem kaj du tiaj estas trovitaj ĉe arbreŝoj de Italio. En ĉiuj ties albanaj variantoj la balado elvolviĝas ĉirkaŭ vetkondiĉo starigita de du kontraŭuloj rilate la ir-revenon de Vlora al Shkoder dum unusola tago..

Ambaŭ bienuloj babilante aŭ drinkante, estas lasinte kiel hostaĝon siajn edzinon kaj gefilojn, same siajn ĉevalojn kune kun ties ekipaĵoj, kaj vortpostvorte ili estas aldoninta al la unuaj same la agrojn kaj paŝtejojn, laborejojn kaj boatojn.

La balado inkluzivita en la Ciklo pri Bravuloj estas iel aparta disde la aliaj, ne nur rilate ties personaĝojn, protagonistojn je nomoj Lule Franko kaj Ago Turko, kiuj estas ja fremduloj instalitaj en la albanaj teroj ne havante ion komunan al la ceteraj bravuloj kiel Mujo, Halilo, Ĝerĝ Elez Alia, Zuko Bajraktaro ka. Ĉar la albanaj bravuloj neniam ne lasis kiel hostaĝon sian edzinon, gefilojn, honoron, domon kaj genton.

Verŝajne, Lule Franko reprezentas la okcidentan feŭdalismon dum Ago Turko reprezentas tiun orientan. Kontraŭ ilin ni vidas Ajkon, reprezentanta la albanan virinon, feŭdisma kaj patriarkala.

Ŝi estas fratino de Zuko Bajraktaro, kaj Zanoj protektantaj posedas la samon mondkoncepton kiel Ajko mem. Lule Franko Kaj Ago Turko, ĉu kiel saraĉenon, ĉu kiel aŭtentikan turkon, venigita tien ĉi de okcidentuloj aŭ bizantoj, aŭ alveninta mem en niajn marbordojn kaj instalita en sarajaojn (palacojn), adaptita en la kanzono al la turkoj alvenintaj pli poste, estas konsentintaj unu al la alia ĝis iugrade kaj distancas multe de la albana morkodo.

Ambaŭ ili "ludas" sur feŭdaj bazoj: hostaĝas sian ĉevalon kune kun selo, junedzinon kune kun filon, eĉ la riĉaĵon , jen unu, jen la alia. Kaj tio ĉeestas en ĉiuj albanaj variantoj, ties spuroj trovas ankaŭ en la arbreŝaj variantoj.

Estas emfazenda ke la popola albana rapsodo estas fiksinta en sia kanzono du mondojn, tiun albanan, donita per Ajko, nevino de Mujo, filino de Zuko Bajraktaro, edzinigita al Lule Franko kiu sin turnas al Zanoj petante ties helpon kaj la fremdan mondon feŭdisman, Lule Frankon kaj Ago Turkon, kiuj ne hezitas hostaĝi siajn junedzinojn kaj filojn, same siajn ĉevalojn kun selojn.

Sendepende de la origino de protagonistoj partoprenantaj en la balado, tiu lasta estas kreaĵo de la albana grundo, verŝajne ĝi estas praa kreaĵo bazita sur urbana tereno, kio pruvas ankaŭ la malnovecon de la balado. Lule Franko, tiu albanigita nomo, verŝajne estas alveninta de maro kiel bajlozon (monstron) trovante ĉi tie la alian bajlozon instalitan en la urbon de Shkoder, strebante forpreni al ili la posedaĵojn per iu ĉevalira vetkondiĉo..

Tiuj ambaŭ grandbienuloj deziras defii grave unu la alian samkiel tiu bajlozo de Ĝerĝ Elez Alia, por pereigi unu la alian per iu ĉevalira vetkondiĉo. Dum la tuta kanzono, ni komprenas ke ĝi ne estas ja luita sed kreita sur la albana tereno.

Tion oni pruvas ankaŭ per la figuro de Zano kiu venas helpi al Ajko, edzino de Lule Franko, samtempe nevino de Mujo, kiam interalie Zano diras al Ajko:

Detale la okazintaj'on de sia edzo

Tio multe emociis la Grandan
Zana-n

Kiu metante manon sur la
blankan brakon;

Diris: Ni faros ion por ci Ajko,
Estante ci la nevino de Mujo.

155 Kaj la fratino de Zuko la bravulo
C'ar ni gogojn neniam estas
helpintaj,

C'ar ili fiksan log'ejon ne
posedas.

Luantoj de c'evaloj kreis ilin Dio,
Ili ne estas lojalaj kun la alian

160 Ili salutas : " Bonan tagon je
herbo!"

Konstruas vojojn kaj s'oseojn,
Konstruas domojn kaj serajlojn
Mi diris ne prenu por edzo ,
latinon.

je luktado ili ne estas kurag'aj,

165 Dueli batalkampe rifuzas
Ili ne estas komparindaj al
bravuloj.

Inter bravuloj ili c'iam hontig'as.
La plej lerta el ili estas nur
pas'tisto.

Sed ci estas la nevino de Mujo.

170 Ni helpos kaj protektos cin.
Tagon, mi donis promeson al Dio
Kie ajn Zuko , trovi por ci
promesiton,

Helpi cin kiel kiel mian
fratinon."

" Au'du min ci monta Zana!"

175 Estas dirinta la junedzino,
" Bedau'rinde iom troigas ci
fratino.

Kie oni ordonas nin, ni
gefianc'ig'as

Kie oni ordonas nin, ni
geedzig'as.

Dio s'arg'is por tio la patron kaj
la fraton.

180 Je senelira situacio mi estas.

Pli bone s'tonigu min ol hontig'i

S'tonigu min Zana, mi cin petas.

Pli bone, ol hontigi Gjeto Basho

Mujo-n

Pli bone ol hontigi mian fraton

Zuko-n.

185 Pri tio nenio okazos al ci

Se vi en printempo havos alian
noktuon

Kiu flugante de branc'o al branc'o
kantas.

Noktuo mi farig'u , sed ilin mi ne
hontigu.

Grandan doloron Zana-j sentas:

190 Morgau' vespere antau'
sunkus'ig'o

Lule -n sana ni alportos tie c'i.

Nun konduku min en bestejon.

Kiam tie ili estas enirintaj,

La lunaj radioj estis penetrintaj,

195 Kiel suno lumigante la bestejon,

La c'evalon ili trovis larmante,

Ili trovis g'in hufskrapante,

Tutan forag'on je larmoj banita.

La vino , la akvo tere renversitaj.

200 Rapide la c'evalo palpebrumas

Kaj vice Zana-jn g'in observas

Milde je iliaj korpoj frotante sin,

Grandan kompaton por g'i havas

Zana-j.

La tri al g'i proksimig'is:

205 " Kial tiel agi nia c'evalo?"

Per manoj g'ian kolhararon
karesas;

Per montaj herboj g'ian korpon
frotas.

Elkaresas akurate la
genutendenojn

La genuostojn kaj la skapolojn.

210 Ili elkaresante , la c'evalo
henante

G'ia hau'to plezure tremetas,

Tiam Granda Zana estas dirine :

" Dum cia trotado ire kaj revene,
C'ie ajn je vojo mi kondukos cin.
215 Mi flugante aeren, ci kurante
teren."

Sana Lule-n ni revenigos hejmen.
Post tiuj vortoj Zana-j malaperis.
Altmontare la taga lumo
ekaperis.

Tiam la edzino , Lule-n vekis.

220 La bravulo provizas sin per
armiloj.

Akurate vestas la magjarajn
vestoj.

Diras Lule : " Mi song'is
pasintnokte

La song'o al mi s'ajnas
bonau'gura.

Zana-j en bestejo la c'evalon
elkareisis.

La samajn pasaĝojn ni havas ankaŭ ĉe arbrea varianto, kio plue pravas ke albanoj estas kreintaj ĝin pli frue ol la turka periodo.

Ajko neniam sentis sin pli malkonforte kaj la rapsodo elvolvas tiun ideon tre bele, ĝuste laŭ animo de Kanuno:

"La viro havas kiel devon gardi la honoron de sia edzino"-diras Ĝeĉov kolektinta kaj komentinta la Kanunon de Leke Dukaĝin-sed Lule Franko kaj Ago Turko hostaĝis siajn edzinojn kaj filojn. Ajko diras per la buŝo de rapsodo "Mi ne havas kelkiun al kiu mi lamentu" ĉar la Kanuno klare diras ke "la honoro je formo de monpuno ne ekzistas" kaj "la forprenita honoro neniam pardoneblas".

La kontrasto estas evidenta. La rapsodo estas eldirinta ĉion diskrete. La granda kontrasto inter la albana mondo kaj tiu fremda estas donita je spirito de mondkoncepto de Ajko. Ŝi invitas helpi "Zanon" figuro de albana mitologio kaj neniam sian edzon, ĉar li estas perfidinta ŝin, estas vendinta ŝin kune kun la filo al la turko, estas hostaĝinta ŝin kune kun la filo.

Kiel reprezentanton de la albana mondo, de moroj kaj kutimoj de sia lando, Ajko leviĝas ĉiumomente de la popola rapsodo, ĉar ŝi faras kion ajn eblan por gardi tiujn morojn. Ŝi sin turnas eĉ al la ĉevalo por helpo dirante:

"Ne faru el mi servistinon de turko/

kaj la edzon el la urbo forpelu/

la hejman honoron konservu"

La kontraŭstarecon al la albanaj moroj kaj kutimoj ni vidas ankaŭ en la sceno kiam Turko tentas eniri en la hejmon de Ajko. Tiu lasta konscienca pri graveco de tiu malrespekto al la moroj albanaj sin turnas al li per jenaj vortoj:

"Al neniuj ni povas diri ke li mortis/

ankoraŭ ne aŭdinte ties mortploron entombigante"

Aŭ ŝi diras "Malrapide Turko!" aŭ ŝi petas de li Beson "unu horon atendi mi petas vin".

Sed Turko ne scias ke la hejmo perforte malfermita, laŭ Kanuno havas monpunon poste. La kontraŭecoj en la kanzonoj estas tre interesaj. Surface okulfrapas tiuj inter ambaŭ fremdaj feŭduloj dezirantaj pereigi unu la alian vetkondiĉante unu la aliajn per pezaj hostaĝoj neniam aŭditaj ĉe albanoj.

En la kanzono oni renkontas alian momenton de kontraŭeco, tiun inter moroj kaj kutimoj albanaj unuflanke kaj fremduloj aliflanke. En la kanzono dominantas ĉiam Ajko. Kvankam estas virino helpata de albana Zano je la nomo de Kanuno, ŝi kontrolas la severajn konfliktojn kaj konservas la honoron, Beson, genton, sin mem, filon kaj ĉion.

La kontrasto inter protagonistoj eksplodos kiam revenas Luli, trovonta en de la korto de sia hejmo Ago Turkon kaj kiu per kolera impeto klopodos lin mortigi. Sed Ajko, scianta

ke ankaŭ tiu ago kontraŭas al la moroj, respondas per dek versoj kiuj eĥas ĝuste kiel komenton de neskribita juro (Kanuno).

" Pro cia vivo, la manon haltigu sinjoro!

Nun li troviĝas interne de nia pordo.

Li genufleksiĝis kaj petis pardonon.

Pli bone tenu lin kiel servutulon,

Ol postlasi al cia filo honton.

335 Se au'dos iam Gjeto Basho Mujo

Ke ni lin mortigis en interno de la korto

Kiam timigite li genufleksiĝis,

Kun nia filo li vive nin bruligos.

La turko estas mortigata , ne bus'leg'aro.

Luli haltas kaj la rapsodo aprezas lian geston. " Al Gjeto Basho Mujo mi donacas lin."

La paragrafo de Kanuno kompletiĝas, okazas la divorco, oni donas la komenton kaj deklaras la decidon: la turko mortiĝas sed ne Kanuno, samkiel oni tion starigis antaŭ la maljunularo kaj ricevus de ĝi la decidon.

En tiu pratempo Kanuno solvis la konfliktojn envere, dum hodiaŭ li postrestis kiel io anakronikan.

La rapsodo dum la tuta kanzono staras ĉe flanko de Ajko, Zano, ĉevalo kaj neniam ĉe flanko de Luli, aŭ Turko, kvankam ili ja estas ties ĉefaj protagonistoj. La balado estas ja albana balado, kreita sur la albana tereno, ĉar ĉiuj ties konfliktoj solveblas laŭ albana Kanuno.

1 Felic'aj ni , por vi klara Dio!
Ni ne estas , Dio estas kreinta
nin!

Estis estintoj, tre antikvatempe.
Turko kaj kristano , ambau'
bravuloj.

5 La turko estis nomita Ago Agao
La nomo de l'kristano estis Lule
Franga

En urbo Shkodra ili vetbatalis
Bela tago , Agho, estas okazinta
C'u ni vetludu per batalc'evaloj?

10 "Jes! Ni vetludu per
batalc'evaloj!

Sed mi havas nigrulan pli bonan
ol cian

Nenie estas eble trovi tian
Kie ajn , sur la teron la suno
radias!

Estas dirinte Luli Gogo , la
Latino"

15 " Mi posedas tiun blankan
c'evalon!

Nenie estas eble, Ago, trovi tian.
Nek c'e la turkoj , nek c'e la
kristanoj.

Escepte se tian havas Gjeto
Basho Muji

Je unu tago g'i alportas min.
20 De tie c'i , g'is Vlona kaj revene!

Tre ofenda s'ajnis al turko la
respondo:

" C'u ci scias kiel ni agu, Lule
Franga?

C'ar la vorto la vorton neniam
luktvenkas,

Sed la lanco la lancon , la glavo
la glavon.

25 Se ci povas je unu tago alveni
Vlonan

Kaj je sama tago reveni
Shkodran

Mi liveros al ci mian edzinon kun
la filo
 Ankau' la nigran c'evalon kun la
selo
 Kaj ankau' mian havaj'on kun
serajloj.
30 Estu ciaz miaj butikoj kaj fis'ejoj"
 Al Frango la vejno s'velig'is sur
la frunto
 Kiel side li estis, levig'is sur
genuoj :
 " Donu al mi honoran vorton ,
Ago Turko!
 C'ar pro tiu promeso ke al ci mi
donas,
35 Je unu tago mi iras kaj revenas
 Se mi ne revenas de Vlona ree al
Shkodra
 Estu ciaz mia edzino kun la filo
 Ankau' la serajloj kaj la fis'ejoj
 G'is la lasta limo de miaj herbejoj
40 Estu cia la blanka c'evalo kun la
selo
 Min tenu, dumviva , kiel servisto
 Kaj s'arg'u min kiel s'argbesto."
 "Jes , mi akorde pri tio estas!
 Diris al Lule , Ago Agao la
turko.
45 Sed al Latino neniom mi kredas..
 C'ar vi Gogoj c'iam fidrompas.
 Ni tuj voku du skribistojn
 Por ke neni u malkonfesu la
dirojn.
 Ili c'izu sur vivan s'tonon nian
akordon.
50 Ni momente inters'ang'u la
garantiaj'ojn"
 Kiel diris la bravuloj , tiel
efektivig'is.
 Kiam Lule alvenis en sian
serajlon
 Granda angoro korodas lian
koron.
 Li ne salutas , nek parolas al
neniu
55 Sed li , kiel serpento fajfadas.

 Per sia bastono la fajreron frapas.
 El lia kapo fumstrioj eliras.
 Lia edzino proksimig'as kaj
demandas:
 " Pro Dio , Lule, kio okazis al ci?
60 Nenion ancorau' ci diris al la filo.
 Nur ci observas la ardaĵ'ojn de la
fajro.
 Malfelic'ego al ci estas okazinta.
 Estas okazinta au' estas okazonta
 C'ar neniam mi cin vidis tiel
c'agreninta.
65 C'u bravulo cin estas defiinta,
 Au' estas mortinta kora amiko?"
 Tiel Lule al s'i estas respondinta:
 " Al mi kara amiko ne mortis,
 Bajlozo ne defii min batalkampe,
70 Sed kverelante mi vetis kun Ago,
 Bedau'rinde mi faris eraregon.
 Mi timas ke nek la tombo min
akceptos.
 Mi liveris cin al turko, kun la
filo.
 Mi liveris la c'evalon kun la selo.
75 Ankau' la havaj'on kaj la
serajlojn
 Kaj la butikojn kun fis'ejojn,
 Kaj mi mem kiel garantiaj'o mi
lasis,
 Ve! Servi al la turko kiel
servisto,
 Se mi ne kunligas Vlonan kun
Shkodra
80 De au'roro al au'roro , iri kaj
reveni,
 Fojon diris al mi Gjeto Basho
Mujo
 " Je duelo de lingvo en bravula
kompanio,
 Diru al si: Lingvo gardu al mi la
kapon!"
 Kaj jen mia lingvo , ruinigis min
.
85 Vere Mujo sian c'evalon
pruntedonis,

Sedflugilojn g'i ne havas por flugi.

Lia edzino estis de nobla familio:
"Estu bonau'gura , mia kara edzo!

Pri tiu afero ci neniom c'agrenig'u!"

90 Ree Lule estas dirinta al s'i:
" Se mi ne povas iri kaj reveni
De Shkodra al Vlona kaj de Vlona al Shkodra

Dum unu tago de au'roro al au'roro,

C'ion la turko prenos al mi."
95 Estas dirinta la edzino al li :
" Se ci estos bons'anca kiel c'iam,
Kaj se havos la c'evalon kian nun

ci por la turko neniom havu zorgon,

Morgau' , vespere lian havaj'on ci prenos.

100 Kaj la butikojn kaj la fis'ejojn,
Kiel servistino al mi donos lian edzinon."

La respondo multe kontentigis Lule-n.

S'i surtabligas kaj panon pecigas.
Je porcelana taso portas al li akvon.

105 Je ora taso portas al li vinon,
Kiam Lule estas irinta dormi,
Jen kion faris lia junedzino,
Iris c'e la c'evalo por g'in mang'igi,

110 Anstatau' akvo donas al g'i vinon,
Sed miras multe la virino,
C'ar la c'evalo nek mang'as , nek trinkas,

G'i kolere skuas sian kapon,
Per la unuaj piedoj hufskrapas la teron,

115 Kaj g'iaj okuloj dau're ploras,
Ajkunon g'i rigardas dolore,
Frotas g'ian kapon sur s'ian bruston,

Pere la okulharoj parolas al la virino,

Tiam la edzino tre maltrankvilig'is.

120 Sed s'i havas ancorau' ion fari,
La nevino de Gjeto Basho Mujo.
Kiam je firmamento aperis la luno,

S'i estas irinta en kioskon de la turo,

Kaj lau'te Zana-jn alvokas:
125 " Au'du min, vi montaj Zana-j.

Kaj vi tutaj 'Shtojzorreshta'
Kiuj log'as je proksimaj pintoj
Se vi havas okulojn por vidi,
Se vi havas orelojn por au'di:

130 Neniun mi estis en pli ac'a situacio.

Morgau' vespere prenos min sklavinon.

Netigi la plankojn de la keloj.
Al la turko lumigilon teni per dentoj,

En bestejo kiel sklavino tremante min.

135 Kiun! la nevinon de Gjeto Basho Mujo!

Kiun! la fratino de Zuko , la standardisto.

Pli nigra malfelic'aj'o ne estas okazebla!

Neniun mi havas por diri mian plendon..

Nek al patrino kiu portis min
140 Nek al Glora Dio kiu kreis min."

Jen alvenis tri Zana-j severaj.
Kiel rabaj birdoj flugas en la c'ielon.

" Pri kio ci plendas , Dio cin fulmu!

La Granda Zana estas kriinta al s'i:

145 Cin kaj Zukon estis c'irkau'intaj la slavo

Ci lavis la lanpelerinojn plenaj je sango

La lanpelerinojn de Mujo kaj
Halilo

Kaj tiel neniam ci mizerig'is."
Al Zana-j rakontis la junedzino
150 Detale la okazintaj'on de sia edzo
Tio multe emociis la Grandan
Zana-n

Kiu metante manon sur la
blankan brakon;

Diris: Ni faros ion por ci Ajko,
Estante ci la nevino de Mujo.
155 Kaj la fratino de Zuko la bravulo
C'ar ni gogojn neniam estas
helpintaj,

C'ar ili fiksan log'ejon ne
posedas.

Luantoj de c'evaloj kreis ilin Dio,
Ili ne estas lojalaj kun la alian
160 Ili salutas : " Bonan tagon je
herbo!"

Konstruas vojojn kaj s'oseojn,
Konstruas domojn kaj serajlojn
Mi diris ne prenu por edzo ,
latinon.

je luktado ili ne estas kurag'aj,
165 Dueli batalkampe rifuzas
Ili ne estas komparindaj al
bravuloj.

Inter bravuloj ili c'iam hontig'as.
La plej lerta el ili estas nur
pas'tisto.

Sed ci estas la nevino de Mujo.
170 Ni helpos kaj protektos cin.

Tagon, mi donis promeson al Dio
Kie ajn Zuko , trovi por ci
promesiton,
Helpi cin kiel kiel mian
fratinon."

" Au'du min ci monta Zana!"
175 Estas dirinta la junedzino,
" Bedau'rinde iom troigas ci
fratino.

Kie oni ordonas nin, ni
gefianc'ig'as

Kie oni ordonas nin, ni
geedzig'as.

Dio s'arg'is por tio la patron kaj
la fraton.

180 Je senelira situacio mi estas.
Pli bone s'tonigu min ol hontig'i
S'tonigu min Zana, mi cin petas.
Pli bone, ol hontigi Gjeto Basho

Mujo-n
Pli bone ol hontigi mian fraton
Zuko-n.

185 Pri tio nenio okazos al ci
Se vi en printempo havos alian
noktuon
Kiu flugante de branc'o al branc'o
kantas.

Noktuo mi farig'u , sed ilin mi ne
hontigu.

Grandan doloron Zana-j sentas:
190 Morgau' vespere antau'
sunkus'ig'o

Lule -n sana ni alportos tie c'i.
Nun konduku min en bestejon.
Kiam tie ili estas enirintaj,
La lunaj radioj estis penetrintaj,
195 Kiel suno lumigante la bestejon,
La c'evalon ili trovis larmante,
Ili trovis g'in hufskrapante,
Tutan forag'on je larmoj banita.
La vino , la akvo tere renversitaj.

200 Rapide la c'evalo palpebrumas
Kaj vice Zana-jn g'in observas
Milde je iliaj korpoj frotante sin,
Grandan kompaton por g'i havas
Zana-j.

La tri al g'i proksimig'is:
205 " Kial tiel agi nia c'evalo?"
Per manoj g'ian kolhararon
karesas;
Per montaj herboj g'ian korpon
frotas.

Elkaresas akurate la
genutendenojn

La genuostojn kaj la skapolojn.
210 Ili elkaresante , la c'evalo
henante

G'ia hau'to plezure tremetas,
Tiam Granda Zana estas dirine :

" Dum cia trotado ire kaj revene,
C'ie ajn je vojo mi kondukos cin.
215 Mi flugante aeren, ci kurante
teren."

Sana Lule-n ni revenigos hejmen.
Post tiuj vortoj Zana-j malaperis.
Altmontare la taga lumo
ekaperis.

Tiam la edzino , Lule-n vekis.
220 La bravulo provizas sin per
armiloj.

Akurate vestas la magjarajn
vestoj.

Diras Lule : " Mi song'is
pasintnokte

La song'o al mi s'ajnas
bonau'gura.

Zana-j en bestejo la c'evalon
elkarexis.

225 Per montaj herboj frotante g'in
Kaj dirante al g'i : 'Ni flugigos
cin

Kiel birdo super la kamparo.
Du foje neniu povas vidi cin."
Al li nenion diris la virino.

230 Enbrakige Lule prenis la infanon
Adiau'dirante al la junedzino
" Bonan vojag'on!" -respondis la
virino

Tiom rapide ekkuregigas la
c'evalon.

Kiu g'i , je densa nebulo , baldau'
volvig'as.

235 Kiam c'e bordo de rivero alvenas,
La fluon li trapasas per unu
svingo,

Kiam je fonto haltigas la
c'evalon,

Trinki akvon la rajdbesto rifuzas.
" Glora Dio!" diras la homamaso.

240 Kiu trapasis tiel niajn urbojn?
Kiu trapasis tiel niajn vilag'ojn?
C'u estis la transmara bajlozo,
C'u la drako de l' altmontaro estis

Kiu rapide la hidron postsekvis
245 Jen c'ie Zana estas apud li,

Kaj neniu lin vidas du foje.
Tamen Lule Zana-n neniam
vidis.

Kiam li je ebenaj'o de Vlonan
alvenis.

Kaj antau' si la urbon estas
vidinta.

250 Pas'tiston , kun s'afinoj , li
demandis:

" Bontrovon je herbo!" - estas
dirinta

" Bonvenon , Lule Frango!"- li
respondis.

" Mi ne estas tiu , kiun vi diras.

C'u ci ne vidas min vestita
lau'magjare,

255 Kaj lau'magjare la selon kaj la
bridon?"

Tuj al li rebatis la pas'tisto:

"Alia la pelerino , alia Lule
Frango.

Koni cin estas tre facile.
C'ar alia kiel ci ne estas trovebla.

260 Nek la bajlozo havas tian
c'evalon,

Lau'goge ci havas la ves'ton.

Au' hodiau' la suno ne lumigas la
teron.

Au'ci ne estas alia ol Lule
Frango!

Au'dante tion , Lule estas
rideginta.

265 " Pas'tisto , c'u baldau'
vesperig'os?"

Kion ci diras! rebatis la s'afisto.

Vidu la sunon! Antau' la subiro

G'i havas ancorau' tri ulnojn.

Nek tagmezo estas ancorau'!"

270 Multe g'ojigin Lule-n la
respondo.

En pos'on de la ves'to enigis la
manon.

Kaj plenmanon da rupioj donas
al pas'tisto.

Tagmeze li alvenis en Vlonan.

Urg'e li vokas ;a estraron de la urbo.

275 Rakontante al ili la veton kun la turko.

Demandante ke ili stampu atestaj'on.

Kaj ili per sep stampoj stampis g'in.

Tiam Lule ekkomencas la returnon.

Kion faris Ago Agao , la turko?

280 Ne atendis ke subiru la suno,
Sed supreniris je kreneloj de fortikaj'o,

Kaj rigardas g'is malproksime la ebenaj'on,

Sed okule li vidas nenion.

Pri tiu afero estas felic'a la turko :

285 " Pro Glora Dio , li atingos la urbon,

Nur kiam tri foje subiros la suno!"

C'e la edzino de Lule , li estas irinta.

Kaj urg'e c'e la pordo estas dirinta :

" Malfermu la bestojn, mi enigu la c'evalon,

290 Kaj c'i nokte mi cin faros turkinon,

Ci, de Gjeto Basho Nujo la nevino,

Se ci estus geedzig'inta je mia filo,

C'inokte tio al ci ne estus okazinta."

Brave la virino estas respondinta:

295 Al neniu Ago , diru,ci mortis

Antau' ol li estis enterigita

C'ar tiu mug'ado kiun ni au'dig'as

C'ar tiuj montoj kiuj eh'as,

Anoncas ke Lule estas venonta!"

300 Kaj kristanino li faros cian virinon!

Tre enuita respondis la turko:

"Ho! Tiu c'i ne estas Gjeto Basho Mujo,

Kiun c'ie Zana-j estas pretaj por li,

Kiun c'ie la c'ieloj gardas lin.

305 Sed li estas Lule Gogo , la Latino."

Kaj supreniras je la s'tuparo.

Tiam el la roko Zana krias:

" Kien iras , ci Ago, la turko?

Tiu kiu estas la niulo,

310 Je nomo de Dio li povas fari c'ion,

Tuj post Zana la c'evalo henas,

Sur g'i Lule kantante venas.

Vidu kiel tiam agis la turko.

Meze de la korto li genufleksig'as.

315 Surgenue li atendas Lule-n.

Kolerite Lule estas dirinta al li:

" Pro Dio , hodiau' mine pardonas cin.

C'i ci rememoras la vortojn de la vetbatalo?

" Kiam subiros la pas'tista stelo,

320 Je ektagig'o , ni komencu la rajdadon,

Tutan tagon mi okuladis por cin vidi,

Kaj surtere kaj en c'ielon,

Sed nenie mi cin renkontis,

Pro Glora Dio, mian hejmon,

325 Kiel turko mi ne malpurigas,

Sed nun mi volas cin pecigi,

Kaj la turkon j'eti al la hundoj,

Tuj la glavon li estas elingiginta,

Tuj lia edzino estas interveninta.

330 " Pro cia vivo, la manon haltigu sinjoro!

Nun li trovig'as interne de nia pordo.

Li genufleksig'is kaj petis pardonon.

Pli bone tenu lin kiel servutulon,

Ol postlasi al cia filo honton.

335 Se au'dos iam Gjeto Basho Mujo

Ke ni lin mortigis en interno de
la korto

Kiam timigite li genufleksig'is,
Kun nia filo li vive nin bruligos.

La turko estas mortigata , ne
bus'leg'aro.

340 Tion bone Lule retenis sin:

" Al Gjeto Basho Mujo mi
donacas lin.

C'arkondukiston kun c'aro mi lin
faros."

Tuj preta estas tiu monta Zana:

" Felic'a kiu havas edzinon de
nobla familio,

C'ar s'i au' diras sian vorton , au'
oferas la filon."

Enesperantigis Zef Mjeda

Anoncoj

Kultura Esperanto Festivalo 16-23.7.2005 en helsinki, Finnlando

Interesa programo prezentig'os dum c'i tiu supre menciita festivalo:

Literaturo, muziko, teatro, komiksoj. Partoprenos multaj artistoj, verkistoj, kantistoj.

Pliaj informoj: www.esperanto.fi/kef2005 au' hamalainen.riitta@kolumbus.fi

Fabeloj

Albana fabelo en c'eha kaj esperanto versioj

Noto: Antau' nelonge s-ro Ĵdenek Hisel el Brno (Ĉehio) alskribis interesan petleteron, kie li sciigis pri fabelo albana rakontita albane de s-ro Marko S'antoja al c'eho Jan Urban Jarnik en la jaro 1878. Poste Milos' Lukas' g'in enesperantigis, g'i estis publikigota poste en "Esperantisto slovaka", jaro 1972, n-ro ½ p 7/8

Jen la Esperanto versio

La plej granda s'telisto

Iun s'ipestron navigantan surmare trafis malbona vetero kaj tre forta s'tormo, tiel ke li estis en dang'ero de drono. La s'ipestro preg'as al Mahometo, preg'as al la Sankta Nikolao kaj al tre multaj aliaj kaj faris promeson doni kvincent orajn meg'idojn se okazus, ke li savig'us el la mara dang'ero kaj eskapus surteren:

"La monon mi donos al homo, kiu estus la plej malric'a en tiu urbo", sed la maro, la s'tormo kaj la ondofrapegado ankoraŭ plifortig'is!- La s'ipestro preg'as denove kaj diras: "Ho, Sinjoro, savu min el tiu c'i dang'ero, c'ar, se mi estos savita, la monon, kiun mi promesis doni al homo, kiu estus la plej malric'a en la koncerna urbo, al li mi ne donos, sed mi donos g'in al tiu, kiu estus tiuloke la plej granda s'telisto."

Apenau' li findiris la vortojn, la maro ekkus'is.

Eliris la s'ipestro surteren, post kiam la maro trankvilig'is, kaj enpas'is la urbon; li venas en kafejon kaj demandas:

"Kiu estas c'i-loke s'telisto la plej granda?"- En la kafejo sidis kvar viroj, kaj unu el ili diras: "Tiu c'i estas s'telisto pli granda ol c'iuaj ceteraj."

Tiam la s'ipestro elpos'igis la monon por doni al li kvincent meg'idiojn, sed la s'telisto ne prenis ilin kaj diras:

"Estas alia, pli granda ol mi."

Li avizas: "Iru en tiun kafejon!"-la nomon li indikas/ "kaj tie vi trovos la s'teliston la plej grandan".

Iras la s'ipestro en la kafejon kaj demandas: "Kiu estas la s'telisto la plej granda?"

Kaj s'telisto ekstaras kaj respondas:

"Estas mi, kion vi deziras?"- La s'ipestro prezentas al li la monon, kiel li faris la promeson, kaj rakontas al li la surmaran okazintaj'on. Respondas al li la s'telisto:

"Mi ne havas la rajton pri tiu c'i mono, sed havas la rajton alia s'telisto, kiu estas pli granda ol mi."

-La s'ipestro demandas:

"Kiu estas la alia, la pli granda?"

- Diras al li la s'telisto:

“La c'efa kaj la plej granda el c'iuuj s'telistoj estas la jug'isto.”

Iras tiu al la jug'isto, kaj la jug'isto salutas lin kaj ekstaras por honori la s'ipestron kaj faras al li multajn riverencojn, kaj la s'ipestro sin sidigas kaj sidas sur tapis'o. Sed al la s'ipestro s'ajnas ofendo diri al la jug'isto:

-“Vi estas s'telisto la plej granda”.

Li sidas, sidas, ne malfermas la bus'on por ekparoli. La jug'isto demandas:

“Kion vi havas, ke vi ne parolas?”

Respondas la s'ipestro:

-“Estas ja por mi honto paroli.”

La jug'isto diras al li:

-“Parolu, parolu, c'ar tie c'i estas ja la domo de honto, kaj ne estas honto paroli.”- Tiam ekparolas la s'ipestro kaj rakontas la historion okazintan surmare kaj diras al li:

-“Tiun c'i monon mi promesis doni al tiu viro, kiu estus s'telisto la plej granda c'i-loke” kaj diras al li la s'ipestro:

“Apenau' mi els'ipig'is surteren, mi demandas jen tiun, jen alian: -Kiu estas la s'telisto la plej granda en tiu c'i urbo”, kaj oni diris al mi, ke s'telisto al c'iuuj la plej granda estas la jug'isto”

Sed la jug'isto diras al li:

-“Mi tiun c'i monon efektive prenos, sed tiel c'i, c'i-maniere mi ne prenos g'in.”

Diras la jug'isto al la s'ipestro:

-“Estas necese, ke vi ac'etu ion de mi, ne ne povas tiun c'i monon preni”

La s'ipestro diras al la jug'isto:

-“Kion mi de vi ac'etus?”

La jug'isto diras al li:

-“Mi vendos ja al vi la neg'on de mia domo, kiu estas c'irkau'neg'ita kaj havas neg'oplenan tegmenton, por la kvincent meg'idioj, kaj tiukaze mi havos monon justan kaj akceptos la monon rajte”.

Kaj la s'ipestro kontentig'is. Skribis la s'ipestro dokumenton:

-“Mi kapitano ac'etis de la jug'isto la tutan neg'on, kiun li havas en sia domo por kvincent meg'idioj.”

Tiam la jug'isto kiel efektive tre granda s'telisto prenis de la s'ipestro la monon, kaj la s'ipestro eliris el la domo de la jug'isto kun g'ojo, dirante al si mem:

-“Jen kia felic'o, ke mi liberigis min de la s'uldo!”

Poste li iris en la kafejon por diri:

-“Mi donis al la jug'isto la monon”m sed antaŭ ol li finis la vortojn, la jug'isto sendas du gardistojn por alvoki la s'ipestron. La s'ipestro ekmiris: “Kion do postulas de mi la jug'isto?”

Iras la s'ipestro rapide al la jug'isto. La jug'isto al li diras:

-“Ĉu vi do ac'etis de mi la neg'on?”

La s'ipestro diras:

-“Jes!”

-“Kial vi ne prenis vian aj'on?”

La s'ipestro respondas:

-“Por kio mi neg'on bezonus?”

La jug'isto diras al li:

-“Vi la neg’on ac’etis, kaj ne sendis laboristojn, por ke ili g’in prenu; vi pagos dudek meg’idiojn de monpuno, kaj, se vi ne igos elporti g’in hodiau’, mi metos vin en la kanceron.”

Devis do la kompatinda s’ipestro pagi ancorau’ dudek meg’idiojn da monpuno kaj rapide sendi laboristojn kaj forigi la tutan neg’on el lia domo.

Tiam la s’ipestro diris al si mem:

-“Ne, c’i tiu estis efektive la s’telisto la plej granda ne en tiu c’i urbo, sed en la tuta mondo!”

Poemoj

Poemo albana el la jaro 1951 tradukita en Esperanton Dhimiter Pilika

Ni pioniras la pacon

Rejmond’, fratino,
Anri Marten, kamarado,
Mis’el Boten, ho frato,
Vian fruntan mi kisu!

Vi hodiau’ revivigas al mi Qemalon
Vi min rememorigis pri Zoja
Ŝ’ajnis al mi, ke en via mezo mi vidas,
Kunmars’i Grec’on kun mia Midhi!

Vin mi au’dis
Al la tribunalo malkas’e deklari:
“Ni por la paco
Staras kaj staros konstante.
Ec’ se tio kostus al ni la vivon!

Mi sentis, kiel en mi
Dekoblig’as
Mia konvinko pri la venk’
Kaj mia koro
De fortega malamo plenig’is
Kontrau’ la g’endarmoj, la naziistoj de la
hierau’o,
Kontrau’ la hodiau’ a malamiko,
Kontrau’ tiu, kiu kondamnis
Kristaĝon kaj Margaritan,
La legendecan Fuc’ik,
Olegon kun ties kamaradoj,
Glezon de l’ Akropolo,
Nazimon Hikmet, la flamvortan.

Vian ekzekutiston mi ekkonis, fratoj!
Li estas, kiu pereigis Sakkon kaj
Vandzettin,
Li, kiu forprenis niajn Gorkij kaj Kirov,
Li, kiu murdis Miladinon kaj generalon
Arso,
La sama, kiu sorc’as
Novajn
Minsk, Lidjice, Borova, Oradur kaj..
Novajn Seoul!
Lia nomo estas skribita sur lia frunto:
Fas’ismo!

Vi kamaradoj el Francio (la patrolando)
de l’Komuno,
Ne sole al mi vi parolis c’i-vespere:
Al la centmilionoj da pacdefendantoj
En la kvar mondfankojn,
Vi alvokon vian direktis.

Al la milito,
Kiun preparas la reg’oj de la dolaro,
Same kiel vi al la trajno plena de tankoj,
Ho Rejmon’
Ĉiuj kune
Halt!
Ni diros:
Sub la vorto de Stalin
La multbranc’ajn radikojn

De la hombuc'ejo, kie ajn ili troviĝ'as,
Unu post alia ni els'iregos,
Por ke en la estonteco
En la mondo c'ie
De malg'ojo kaj aflikto,
De malsato kaj ekspluatado
Ec' nomo ne postrestu!

(El la albana kun helpo de la c'eha traduko, kiun kune kun la au'toro faris Adolf Kropupa:
Milos' Lukas'
Publikigita albane en "Letersia jone" n-ro 6 1951)

Fabelo albana kaj fregmento el Ciklo pri Bravuloj enesperantigitaj respektive de Klea Luli kaj Zef Mjeda (tiu lasta estis Honora Membro de UEA)

La reg'o kaj la maljunulo

Foje reg'o eliris por promeni kaj vidis maljunulon kiu plugis la kampon. La reg'o estis tre sag'a kaj afabla kun c'iu. Li haltas por interparoli kun la maljunulo kaj diras al li :

- Bonan laboron , ci pluganto !
- Estu felic'a , ci terreganto!
- Kiel ci estas kun la foraj ?
- Ili estas tre proksimigitaj.
- Kiel estas la stato de la densaj ?
- Ili tre maldensig'is.
- La rapidaj estas ancorau' aktivaj ? C'u ci sin apogas je du au' tri ?
- Je tri kaj pene.
- Se mi sendas al ci du s'afovirojn , c'u ci scios tondi ilin?
- Jes , se ili venu!

Miris la reg'o kiel li tre bone respondis , al c'iu liaj demandoj , kaj iris al la sag'uloj de lia reg'olando. Li rakontis al ili kio okazis al li samtage kun la maljunulo kaj postulis de ili nepre sciigi lin kion volis diri la maljunulo.

Ili pensis kaj alipensis sed vane . Neniu el ili sciis diveni. Por ne hontig'i antau' la reg'o , du el ili iris por demandi la maljunulon.

- Ni cin petas - ili diris al la maljunulo- rakontu al ni kion ci volis diri al la reg'o , kiam li interparolis kun ci?
- Jes , - rediris la maljunulo- mi diros c'ion al vi , sed antau'e elmonujigu po cent oraj liretoj.

Ne povante agi alie , devigite, ili nombris po unue g'is la lasta orlireto.

" La reg'o diris al mi : Bonan laboron ci terpluganto , c'ar mi plugis la agron kaj mi rediris al li : " estu felic'a ci terreganto" , c'ar li estas nia reg'o. " Kiel ci estas ja la foraj ? - li demandis min , volante esti sciigata de mi pri la stato de miaj okuloj kaj mi rediris: " Ja ili estas tre proksimigitaj", c'ar nun mi maljunulig'is kaj ne nur mi ne vidas malproksimen, sed ankau' proksime mi ne distingas bone. Poste li demandis pri miaj dentoj kiujn mi posedas je la bus'o. Tiel ankau' pri la piedoj kiuj iam estis tre lertaj , c'u mi starus sur du au' tri kaj pene"Kial mi ankau' apogante min je bastono mi pas'as pene.La maljunulo ne alparolis.

Iris la du sag'uloj al la reg'o- kaj diris al li tiel kaj tiel volis diri la maljunulo.

- Iu- rediris la reg'o - sciigis vin pri tio, c'ar vi ne kapablis diveni.
- Jes! - diris ili al li.- Ni demandis la maljunulon kiu interparolis kun via mos'to.
- C'u li postulis ion pri tio?
- Jes , iom da ormonoj. Po cent oraj liretoj.
- Sendu alvoki la maljunulon- diris la reg'o.

Venis la maljunulo kaj la reg'o donacis al li centon da orliretoj dirante ;
Grave , mia maljunulo, ci sciis tre bone buci la du s'afovirojn kiujn mi sendis al ci
Klea Luli, Shkoder

Humoro

Viro en entrepreno kun multaj nvirinoj kutimis preparoli ofte malc'astajn vortojn. Virinoj decidis ke j'us li komencu diri tiaj'ojn ili ekstaru kaj foriru de la c'ambro. Iutage la viro komencis diri: s'ipo plenplene de prostituinoj pretas ekveturi al Ameriko..
La virinoj ekstaris kaj sin turnis al la elirejo. Tiumomente, la viro dau'ris: Haltu, haltu, la s'ipo ekiros morgau'..

De kiam oni aldonis al la virinaj s'uoj la kalkanumojn?
De tiam kiam la viroj kisis ilin surfrunte..

Kiuj estas la plej felic'aj homoj?
La plej felic'aj homoj estas edzinigitaj virinoj kaj la junaj frau'loj.

Ĉu la mono alportas felic'on?
Ne, g'i malfermas la vojojn por trovi g'in.

Oni demandis iun filmstelion de Holivudo:
Ĉu vi jam memoras pri via unua kiso?
Ne, mi ne memoras ja ec' la mian unuan edzon!

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

Albana proverbo: La braveco post la milito kaj la sag'eco post la kunveno ne plu valoras (Shkodër)

Nr 60 au'gusto 2005

Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio
Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)

Rete: pistolia@yahoo.com , apistoli@aol.com (Vasil Pistoli);
selimibardhyl@yahoo.com, bardhylselimi79@hotmail.com (Bardhyl Selimi);
adoci@gmx.de (Artur Doçi) ; shhasani@albmail.com (Shaban Hasani);
motto@bwc.org (Martha Otto) ; fiorialbtours@yahoo.com (Fjoralba Sadiku);

asokoli@bkursimeve.com.al Nehat Sokoli; beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ;
matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi);
sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti);
mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri);
dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com ;
egli_b@wp.pl (Egli Brati) ; eltonzaimi78@yahoo.com (Elton Zaimi);
agimperaj@yahoo.it ; tcobani@yahoo.com (Tonin Çobani)

Retpag'o : <http://www.esperantio.tk>

You can access the group's web features using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/>

You can access the group's Management page using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage>

Enhavo

Ni kaj ILEI

Letero al estraro de ILEI

Ni kaj UEA

Rimarkoj pri la jarlibro 2005

Gazetara komuniko

Reago

Studado

Korespondo kun Boj' idar Leonov kaj Quednau

Esperanto si mjet mäsimi i gjuhëve

El la leteroj

Letero el Lituanio

Letero el Au'starlio

Letero el Nederlando

Anoncoj

Aroma Jalto 2006

Itala Kongreso de Esperanto

Pedagogiaj tagoj en Germanio

Propagando por Esperanto

Dek argumentoj kontraŭ kaj por Esperanto

El parolado de Claude Piron (dau' rigo)

Artikoloj

Artikolo en Skotlanda esperantisto

Novaj'o en la revuo "Esperanto" , julio-au'gusto 05

Prelegoj

“Arumanoj kaj Vlahoj en Albanio”

(Prelego en la Konferenco je ĉeftemo “Esperanto, vojo de interkomunikig’o kaj internacia kompreno”, Cluj-Napoca, Rumanio, 29/07-31/07/05)

“Etno-psikologiaj kaj kulturaj karakterizaj’oj de albanoj”

(Prelego en AlpAdria Konferenco, Triesto 21/05/2005)

Humoro

Albanaj anekdotoj

Al Centra Oficejo de UEA

Al la koncernato

Karaj, mi salutas vin elkore el Albanio.

Antau’ du tagoj mi bone ricevis la jarlibron 2005. Dankon!

Permesu min fari kelkajn rimarkojn rilate c’i eldonon, fakte parte ripetite c’ar pluraj monatojn antau’e mi antau’skribis vin rilate ilin. Alie ol alijare, CO ne petis de ni c’i jare skribe la korektojn en la donitaj’oj. Kial do?

Mi petas vin trakti serioze la c’i subajn rimarkojn, por ke oni aldonu, plig’ustigu kaj g’isdatigu ilin en viaj registroj de UEA.

- Unue, sur pag’o 59, oni mencias “Albanan Unuig’on de Esperanto-Junularo”. Tie estas s’ang’ita la faknumero; nun estas ++355 4 22 50 53, (ne 234 339)
- Due, sur pag’o 99, bv forstreki mian (Bardhyl Selimi) malnovan retadreson selimib@albmail.com kiu ne plu validas ekde marto 2005 kaj noti la novajn kiel supre. (vidu). Same aldonu la retadresojn de aliaj delegitoj de Tirana:

Tonin Ĉobani: tcobani@yahoo.com Adreso lia ne plu estas tio notita tie, bv forstreki g’in. Almenau’ notu lian novan laborejon : Komiteti Kombetar i Radio televizioneve, hotel Drini, Tirane Albanio) tel portebla ++355 692246822, tel fiksa ++355 4 233370

Rita Permeti: d.permeti@amc.al

Por la delegito de Shkoder, Saimir Beqiraj ekzistas retadreso kiel jene: beqirajs@hotmail.com , lia laborejo havas adreson : Fakulteti i Shkencave Natyrore, katedra e biologjise, bul Zog I, Tirana Albanio

- Krome mi kelkfoje proponis je la nomo de nia Instituto ke oni difinu novan delegiton por Pogradec (urbo je 20000 log’antoj oriente de la lando) nome s-ron Gjergji Gusho kies donitaj’oj estas : strato “Bul.Deshmoret e Pojskes” domo “Pallatet e reja” urbo “Pogradec”, Lando Albanio, tel fiksa ++355 832 2326, retadreso : arbibasho@yahoo.it
- Trie, sur pag’o 281, apud la lingvonomo “albana “ oni notas “Albanio, Serbio kaj Montenegro”. Krome, oni nepre devas aldoni : Kosovo (regiono kie log’as almenau’ du milionoj da albanoj, au’ 93 %), Makedonio, (lando kie log’as unu miliono da albanoj kaj kie la albana jam estas oficialigita), Grekio (kie log’as en siaj teroj kelkcentmiloj da etnaj albanoj, krom pli ol 700 000 albanaj rifug’intoj en la tuta lando, nur en Ateno 400 000, au’ la dua urbego en Balkanio post Tirana je la plej granda nombro de albanoj log’antaj tie). Mi menciis nur teritoriojn kie albanoj log’as en siaj propraj teroj! En Serbio kaj Montenegro ne inkluzivitas

Kosovo, kiu strebas nun al sendependeco, sed aliaj vastaj regionoj apud Nis'o kaj suda Serbio (Pres'evo, Sandj'ak ka) kaj en suda Montenegro kun kelkcentmiloj da etnaj albanoj.

Dankante vin pro via bonkomprenemo, mi esperas ricevi baldau' konfirmon de vi pri supre dirite.

Agrablan laboron al vi c'iuuj.

Via altestime Bardhyl Selimi
Delegito de Tirana
Sekretario de la Albana Esperanto-Instituto

Respondo

Roy MacCoy roy@luna.nl 13/07/2005

..Mi ne memoras ilin, kaj suspektas ke mi simple ne ricevis ilin. Vi sendis al uea@inter.nl kaj neniu plusendis al mi. S-ro Peraj devis ricevinta formularon pri Albana Esperanto-Ligo sed s'ajnas ke g'i ne estis printita au' sendita...mi faris c'iuajn s'ang'ojn lau'konsentite.

Al koncernatoj

Je sciig'o al s-ro Radojica, Sjoerd, Jozef

Karaj, salutante vin sincere, mi bondeziras sukcesan Konferencon en Litovio. Bedau'rinde, nek mi, nek alia nia albana sekciano ne povas partopreni ankaŭ c'i sesion, pro financaj kaj vizaj malfacilaj'oj (ne ekzistas en Tirana litovia konsulejo). Krome, ekde longe nia sekcio ne ricevas IPR au' kelkiu alian informaj'on pri la agado de ILEI. Kial? Unue, pro fakto ke nia sekcio ne povis elteni la pagon de la membreco. Due, pro ia neglekto fare de Radojica au' kelkiu alia en la estraro de ILEI. Povas influi ankaŭ la fakto ke s-ro Vasil Pistoli, nia sekciestro, aktuale log'as c'e alia sia filo en Nov Jorko. Antau'e ni korespondis kaj kontaktis akurate. Nun ne. Mi esperu ke en la kuranta kunveno de ILEI en Litovio oni rekonsideros nian peton por ricevi almenau' kvin ekzemplerojn de IPR (inkluzive de la c'iuaj ceteraj numeroj de la jarfino 2004 kaj la jaro 2005). Espereble, vi informos nin pri la novaj decidoj akceptotaj en la konferenco. Bv noti mian novan retadreson kiel supre. (Vidu). La malnova ne plu validas ekde marto 2005.

Dum c'i lernojaro c'e ni dau'ris la lernokursojn, kiuj kronig'is per du ekzamensesioj: unu februafe 2005 kaj la dua mafe 2005, kie akiris la diplomon pri la elementa nivelo de E. 17 gelernantoj. Ni dau'rigis nian laboron sur propaganda kampo, nia Bulteno aperis regule c'iun duan monaton, niaj sekcianoj partoprenis internacian arang'on AlpAdria en Trieste kie ili prelegis pri Albanio, nia Instituto eldonis novan lernolibron por albanoj novembre 2004 je 1000 ekzempleroj (kvin ekzempleroj estas jam c'e la libroservo de UEA), plue du aliajn librojn albanlingve. Ni certigis ankaŭ c'ifoje, danke al samideano nederlanda Jacques Tuinder, almenau' 60 ekzemplerojn de la lernolibro brajle por albanoj, por la gelernantoj de la blindulejo en Tirana. Pluraj niaj gestudentoj dau'rigis studadon c'e la klerigejoj de AIS en Pollando kaj Bulgario kaj baldau' ili akiras bakalau'recon au' magistrecon tie.

Ni planas por la nova lernojaro pli ampleksan instruadon de Esperanto en la lernejoj interkonsentote kun la c'i tieaj superaj edukaj organoj. Nu, tiom por hodiau'. Agrablan kaj fruktodonan laboron al c'iuuj vi!

**Via altestime
Bardhyl Selimi
Sekretario de la Albana Esperanto-Instituto**

Respondo de Atilio Orellana Royas

17an de julio 2005

Dankon pro via salumesag'o al la konferenco. NI lau'legos g'in dum la malfermo. En la estraro ni priparolos la eblecon aligi albanojn pere de nia koleghelpa Kaso kaj espereble tio sukcesos baldau'. Amikajn salutojn senda sal vi,

Atilio

Reago

De 9-15 julio 2005, okazis la anoncita antau'e Konferenco de OSIEK en Rafina , Grekio, je c'eftemo **“La Bizanca Kulturo”**.

Nia membro Bardhyl Selimi deziris partopreni g'in per prelego je temo “Albanoj dum la Bizanca Imperio”, sed la grekaj organizantoj, lau' s-ino Madeleine de Zilah, ne volis tion. Des pli, la grekaj prelegantoj rezignus de ilia partopreno se c'eestus la albana delegito. Kial do? Lau' s-ino Mantha Christou , la albana delegito “estas ofendinta grekojn je ties patriotaj sentoj iukaze”, ne montrante kie precize. Stranga afero! Nun ni ekscias kiuj estas tiuj grekaj prelegantoj. Jen iliaj nomoj:

Mantha Christou kiu prelegis ‘ Kristanismo en la bizanca imperio”

Alekos Frangias kiu prelegis “La monah'ejo Sankta Katerino en Sinajo”

Angelos Tsirimokos kiu prelegis “La greka lingvo dum la bizancaj tempoj”

Polyxeni Zarkada kiu prelegis “Bizancaj preg'ejoj en Grekio”

Mi konfesas sincere ke mi persone renkontis almenau' s-inon Mantha kaj s-ron Angelos en Trieste en la jaro 1998 kaj havis agrablajn interparoloj kun ili ec' vespermang'is kune en la c'irkau'aj'oj de Trieste. Ĉu miaj artikoletoj en Monato revuo estis ofendemaj por grekoj? Mi pensas ke tute ne! Ĉu vi samopinas? Dankon!

Bardhyl Selimi

Gazetara komuniko de UEA

Pli ol 2000 esperantistoj el 60 landoj iros c'i jare al la 90a-UK en Litovio. Ĉi jare pasis 100 jarojn post la unua internacia UK en Boulogne sur Mer. La UK okazis c'iuware escepte la du mondmilitoj. La lingvo Esperanto strebas al interkultura komunikado. Dum 100 jaroj la UK partoprenis pli ol 165 000 esperantistoj el tuta mondo. Pasintjare la UK estis en Ĉinio kaj venonjare okazos en Italio. La kongreso estas granda manifesto de esperantlingva kulturo.. Pli detale vi povas eklerni de delegito el via lando au' iu alia koncernulo ene de vialanda esperanto organizaj'o.. au' rekte sur http://www.uea.org/kongresoj/uk_2005.html

AIS kaj Ni

Al prof. Quednau

Germanio

quednau@wzw.tum.de

Estimata profesoro,

Unue, mi multe dankas vin pro via konstanta intereso al nia sekcio kaj al mi persone.

Mia deziro, same kiel tiu de esperantistoj estas ke IL disvastig'u kiom eble plej rapide kaj sukcese. C'irilate helpas ankaŭ la edukaj programoj, ne laste ankaŭ la klerigejo de AIS en Bydgoszcz kaj alilande. Ni esperu ke ankaŭ en Albanio kreig'u kondic'oj por tion fari digne kaj efike.

Dume mi g'ojas ke dekoj da albanaj gejunuloj jam finstudis c'e via Akademio, bakalau'rig'intis kaj ec' magistrig'is.

Sed, kiel okazas kutime en landoj de la Tria au' Kvara Mondo, la diplomoj akiritaj eksterlande apenau' agnoskatas rapide kaj facile de la koncernaj instancoj. Mirinde, Pollando estas jam ano de EU, tamen nia Minitrejo de Klerig'o kaj Edukado ankoraŭ ne pretas agnoski ties diplomojn, des pli tiujn akiritaj c'e privataj lernejoj kia tiu en Bydgoszcz, estrata de gesinjoroj Grzebowski.

Por solvi tiun problemon akurate kaj stabile mi sugestas kaj petas de vi:

Sendi al mi oficialan dokumenton signita kaj stampita de vi je la nomo de Senato de AIS kie oni eksplicite deklaras germanlingve kaj Esperante ke AIS estas jure agnoskita Scienca Institucio aganta internaciskale kaj je sidejo en San Marino, ke g'ia klerigejo STUDUMO en Pollando estas same jura eduka institucio agnoskita de Ministrejo au' kelkiu s'tata aŭtoritato pollanda (numero kaj dato de la decido koncerna), ke la diplomoj de bakalau'ro au' magistro estas egalvaloraj al tiuj de universitatoj en la landoj de EU agnoskataj de la koncernaj registaroj ktp.

Tiu dokumento enalbanigita de mi estos forta argumento por la Direktorio pri Fremdlandaj Aferoj de nia Ministrejo pri Edukado en Tirana por agnoski la diplomojn de niaj studentoj akiritaj c'e vi. Sekve, ili povus pretendi por iu laborposteno enlande samkiel iliaj sampatrujanoj finstudintaj enlande au' en la aliaj fremdaj institucioj.

Nelaste, tio estus forta argumento kaj instigilo kaj motivo por varbi pliajn studentojn niajn al la klerigejoj de AIS.

Atendante vian afablan respondon, mi salutas vin ankoraŭ sincere.

Via altestime Bardhyl

Sekretario de la Albana esperanto-Instituto

Noto: Pri tiu temo mi preparolis kun s-ro Carlo Minnaja, dum la sesioj de AlpAdria Konferenco en Trieste, je 20-22an de majo 2005. Li promesis fari ion estonte..

Al samideano Bozhidar Leonov, Karlovo

Saluton, amiko. Ĉu vi bonfartas mem, kaj viaj hejmuloj? Ĉu vi jam eltenas la forpason de viaj karaj homoj?

Mi ankoraŭ foje kondolencas vin kaj aprezas vian fortan volon al la laboro.

Kara Bozhidar, kelkaj studentoj en Albanio interesig'as plustudi en Karlovo c'e universitato kie vi presidas. Ili nature bezonas kelkajn sciindaj'ojn:

Kioma estas la prezo por la studado?

Kioma estas la kosto por akomodig'o en universiatta internulejo, se eble?
Kiaj dokumentoj estas necesaj por alig'i al universitato?
Kiaj fakoj estas frekventeblaj tie de niaj studentoj (c'u ankaŭ turismo)?
Kiom estas la dau'ro de la studoj por bakalau'rig'o kaj magistrig'o c'e vi?
Kiaj estas la problemoj de ekvivalentig'o de diplomoj de via universitato al aliaj (inkluzive Albanion, eventuale)?

Se vi respondas al miaj supraj demandoj mi estos tre dankema, des pli ke tiamaniere ni povos instigi niajn gestudentojn al esperantistig'o.

**Ankorau' dankon,
via fidele Bardhyl**

Respondo:

Je 22an de junio 2005

Kara amiko, mi dankas al vi por via letero kaj Bulteno 59. Kun intereso mi tralegis g'in kaj mi admiras de via kapablo verki tiel bone redaktitan bultenon abunda kun interesaj informoj de la E-agado, sciencaj kaj literaturaj verkoj. Kun intereso mi tralegis la artikolon "La eposo de bravuloj".

...Mi tre g'ojus se vi kaj miaj albanaj amikoj povus partopreni SUS-n en karlovo. Mi petas vin sendi al mi la necesajn informojn por siatempa preparo de la invitiloj, necesaj por la vizoj- nomo, adreso, naskig'tago kaj naskig'loko.

La studprogramo de nia universitato estas kreita surbaze de la oficiala akceptita en nia lando studadprogramo por la studentoj kiuj studas la fakon "turismiko". La profesoroj kiuj prelegas kaj gvidas ekzercojn kun niaj studentoj estas la habilititaj profesoroj de la s'tata universitato en urbo Burgas kun kiu universitato ni havas subskribitan kontrakton kaj surbaze de tiu kontrakto c'iu studento kiu finas c'e ni la 3-jaran studadon rajtas dau'rigi en la s'tata universitato en Burgas kaj ricevi oficialan s'tatan diplomon por bakalau'ro kaj magistro, diplomo agnoskita eb c'iu lando kun kiu Bulgario havas kontrakton por ambau'flanka agnosko de diplomoj. Mi opinias ke inter la ministerioj de edukado en Albanio kaj bulgario estas tia interkonsento. Surbaze de la bulgara leg'o edukado en Bulgario estas 3 gradoj de la supereca klereco:

Post la fino de 3 -jara studado (6 semestroj) la studentoj akiras la diplomon por la unua grado "fakulo" kaj poste studante ancorau' 3 semestrojn- "bakalau'ro kaj ancorau' 3 semestrojn - magistro.

Ni donas la eblecon, se la studento diligente lernas kaj sukcesas preni c'iujn devigajn ekzamenojn fini la unuan gradon anstataŭ por 6 semestroj fari tion por 4-5 semestroj s'parante unu jaron de sia studado.

Krom tio, tiuj studentoj kiuj deziras akiri diplomojn de AIS havas eblecon defendi bakalau'an ekzamenon kaj defendi diplolaboron post la 3-jara studado.

Do, vi mem povus konstati, ke c'e ni la studado estas tre serioza kaj la studentoj fine povas ricevi s'tatan diplomon agnoskita en diversaj landoj kun kiuj Bulgario oficiale havas interkonsenton.

La jara studadkotizo estas 400 eu'roj. Nia deziro estas ke vi fondu filion de nia universitato en Albanio kaj parte la lecionoj estu en Tirana. Tiamaniere niaj geamikoj albanaj povus s'pari monon de sia log'ad kaj nutrad elspezoj se ili konstante log'us en Karlovo. Pri tio mi interkonsentos aparte.

Por nia albanaj amikoj ni certigos la log'adon en nia studenta komuna log'ejo. La nutradkostoj en nia lando estas malaltaj.

Baza dokumento por alig'o al nia universitato estas la diplomo por finita meza klerigo-lernejo. Se la studentoj havas universitatan diplomon, ni komparos la studitajn stuadfakojn kaj se ili estas similaj la studentoj povus studi pli mallonge s'arante semestrojn.

Baza studadfakio en nia universitato estas turismiko. Aldone ni donas la eblecojn studi ankaŭ pri ekologio, gvidado de firmaoj, internacia patentaj juro, interlingvistiko k.a.

Amike via **Boj'idar Leonov**

La Gazeto 15 qershor 2005 faqe 16-17

El la leteroj:

Vera Payne vpayne@cygnus.uwa.edu.au

03/06/2005

Ankorau'foje mi treege dankas vin pro via gazeto, kaj speciale pro tio, ke vi ancorau' memoras min.

Ĉi-foje mi volas mencii du apartajn fadenojn. Unue, lastan jaron mia edzo kaj mi pasigis tri mirindajn semajnojn en Kroatio, dum kiu tempo ni ankaŭ vizitis (sed nur dum unu tago) la regionon c'irkau' kaj la urbon Kotor. Belega! Do, tiu artikolo trafas min. Due, Claude Piron estas unu el miaj herooj en la Esperanto mondo: li estis unu el miaj instruistoj kiam mi vizitis San Franciscan en 1983, dum la Somersesioj en la Ŝtata Universitato tie. (En 1987 mi mem instruis tie). ..Varmkore via Vera kaj refoje dankon

Jacques Tuinder 11/05/2005

....Bona ideo estis viziti familion de Anjeze (edzino de la forpasinta Zef Mjeda en Shkoder), kvankam la iom seniluziigaj rezultoj ne estis lau' via espero. ..

(Rilate la manuskriptojn de Zef Mjeda) c'u tiou David Luka, kiu ne estas esperantisto, kapablas lingve kaj teknike kvalite prizorgi la eldonajn laborojn de Mjeda verkaro? Ĉu mia impresoj g'ustas, ke la parencaro *pro paranojaj pensoj kaj strangaj antau'jug'oj* ne plene fidas vin?

Nota: temas pri esperantaj tradukaj'oj de Zef Mjeda, nome, tuta serio de eposo de bravuloj, fabeloj ktp, same grand avortaro itala, albana – esperanta, kiuj kus'as en la bretoj ancorau' ne vidante la eldonlumon..

Korespondo

Audrone Maksimaityte

(Giedre Maksimaityte giedremax@yahoo.com)

16/05/2005

(Responde al nia letero)

..Mi ne havas praktikon en instruado de Esperanto, sed mi tutan vivon instruis litivan kaj germanan lingvojn en la lernejo por blinduloj, havas ion metodon. Nun mi estas

pensiulino, tamen c'iam estas tre okupita. Sed mi unufoje semajne iradas al lernejo por blindaj kaj malfortkapablaj gelernantoj kaj instruas Esperanton, malmulte teorio, pli multe kantado, ludoj, legado de facilaj tekstoj, interparolado. Bedau'rinde miaj gelernantoj estas tre okupitaj en diversaj rondetoj kaj ne tre kapablaj. Ili partoprenos la internacian kongreson de blindaj esperantistoj en Vilnius la 31an de julio- 6a de au'gusto.

Kelkaj rondetanoj dezirus korespondi, kompreneble kun mia helpo. Viktorija, lernantino de 8a klaso, malfortvidanta, havas retadreson qvikamilu@yahoo.com , Barbora Silkinyte, lernantino de 6a klaso dezirus korespondi brajle kun Blerian au' Denisa, adreso : Skroblu 17-45 03202 Vilnius Litovio. Ŝi atendas letereton, se tiaj junulinoj skribas brajle.

Amike **Audrone**

Anoncoj

- Ukrainaj esperantistoj invitas vin viziti la plej prestig'an kuraclokon de Ukrainio, krimean urbon Jaltan. Tie okazos la tradicia lingva festivalo "Aroma Jalto 2006" je 29/04- 09/05/2006. La prezoj estas allogaj. La alig'kotizoj estas preparentaj g'is 1a de marto 2006. Sendu ilin al adreso : UA-01133 Kijiv-133 p.k.35 tel 044 285 17 01

Rete volodimir_h@yahoo.com www.aromajalta.by.ru

La albana diasporo konsistas el kelkmilionoj da loĝantaj, unue, en la respublikoj de la eksa Jugoslavio (Serbio, Bosnio, Kroatio, Slovenio), en Turkio (kvankam la turka ŝtato ne agnoskas minoritatojn), Grekio (menciindas ke nur en Ateno vivas almenaŭ 400 000 albanoj aŭ 8 % de ties loĝantaro), Italio, Okcidenta Eŭropo, Usono, Kanadio, Aŭstralio, aliaj landoj de Balkanio kaj eĉ en Argentino kaj Ukrainio.

La origino de albanoj

La nomo “albanoj” kaj “arber” aperas en VIII jarcento, kiam fondiĝis la tiel nomata “Ŝtato de Arber” ie en la nuna Meza Albanio. Sed la origino de albanoj, laŭ unu tezo, estas ĉe iliroj, granda popolo antikva, loĝanta sur la tuta okcidenta Balkanio, ekde Danubo ĝis Adriatika kaj Jonia maroj, ekde suda Bavario ĝis la Golfo de Ambrakio. Alia tezo asertas ke albanoj devenas rekte de pelazgoj, la aŭtoktona popolo de Eŭropo, kies lingvo formis poste la sanskritan, la malnovgrekan, la latinan, la slavan kaj ĝermanan lingvojn. Pruvaĵoj por tio, laŭ franca lingvisto Robert d’ Angely, estas la fakto ke plejmultaj epitaĵoj el antikvaj civilizoj eŭropaj estas deĉifritaj jam danke al la albana lingvo. Alia albandevena aŭtoro Aristidh Kola, verkis kelkajn librojn por pruvi ke la greka devenas de la praa albana kaj la pelazga estas ja la unua lingvo biblia, la lingvo de Dioj, parolita de homoj almenaŭ en nia malnova kontinento. La fama albana verkisto Ismail Kadare, atentigas ke la albana lingvo, pli ol la albanoj mem altiras nuntempe grandan interesiĝon, fare de fremdaj esploristoj ĝuste pro ties praeco, kiel probable la plej malnova lingvo ne nur en Balkanio.

Vico da argumentoj estas jam konvinkinta la lingvistojn ke la albana popolo kaj ties lingvo devenas de praaj iliroj. Tiel la nacia nomo “Albania” devenas de la vorto “Albanoi” indikinta iliran genton menciita de geografo Ptolemeo de Aleksandrio ĉirkaŭ la jaro 150 post Kristo; la teroj de tiama Albanoi havis sian centron en Albanopoli, ie inter Durres kaj Kruja, la koro de nuntempa Albanio

Dum pratempo, en Balkanio vivis kvar diversaj popoloj parolintaj siajn lingvojn: grekoj sude, makedonoj centre, trakoj oriente kaj iliroj okcidente. Hodiaŭ la albana parolatas en tiuj regionoj kie iam parolatis la ilira; tiuj malmultaj lingvaj elementoj konatiĝintaj kiel vortoj de la ilira povas eksplikati nur per la albana kaj ne per la aliaj lingvoj; lingva komparo inter la albana, la greka kaj la latina pruvas ke la albana, kiel lingvon estis jam formita pli frue ol la aliaj malnovaj lingvoj; la arkeologiaj donitaĵoj atestas pri kultura kontinueco de iliroj al la albanoj. La kontinuaj rilatoj kun popoloj kaj aliaj lingvoj estas postlasintaj siajn spurojn en la vortaro de la albana. Kvankam estas luitaj fremdaj vortoj el la greka, latina, slava kaj turka, la albana estas konservinta sian memstarecon kie lingvon, kies gramatika sistemo estas restinta praktike neŝanĝita; la lingvistoj evidentigas multajn teknikajn similaĵojn inter la iliraj kaj albanaj vortoj ; la luaĵoj el la greka kaj latina en la albanan spegulas la politikan kaj kulturen premon sur la iliraj regionoj.

La studoj montras ke la albana estas evoluinta el la ilira kiel memstara lingvo iam inter IV kaj VI jc post Kristo. Tial la grekaj kaj la latinaj luaĵoj ne devas esti penetrinta rekte al la albana, sed antaŭe en la iliran kaj de tie al la albana. La iliraj toponimoj, la malnovaj iliraj nomumoj de la urboj, riveroj kaj montoj estas konservitaj en la nuntempa

albana lingvo kaj nur en la albana . Estas jam trovitaj pli ol 300 tiaj nomoj kiel Shkodra, Drini, Tomorri menciataj de pratempaj grekaj kaj romiaj geografoj kaj historiistoj. La reguloj de la historia fonetiko eksplikas la transirojn de Scupi al Shkupi, Scodra al Shkodra, Lissus al Lezha, Durrachium al Durres, Drinus al Drin, Mathis al Mat.

La propraj iliraj nomoj daŭre uzatas en la nuntempa albana, kiel ekz. Agron, Teuta, Bardhyl. Prof . Mahir Domi estas identiginta 800 tiajn nomojn. La diversaj terminoj por la faŭno en la albana lingvo atestas ke tiu c'i popolo estas vivinta laŭlonge de la marbordo en la samaj regionoj samkiel la iamaj iliroj. En la albana lingvo estas ankaŭ aliaj vortoj, kiujn la grekaj kaj romiaj verkistoj estas difinintaj kiel el la ilira tempo. Iliroj per iliaj kutimoj kaj moroj, muziko, vestoj karakterizaj kaj aparte per ilia lingvo estas transvivinta en siaj regionoj, kvankam jam kontraigitaj laŭlonge de la okcidenta marbordo de Balkana Duoninsulo. Ĉar ne ekzistas ia atestaĵo aŭ signo de pereco, asimiliĝo aŭ translokiĝo de ili, ne restis io alia ol akcepti ilian kontinuecon senĉesan historian. Ne estas dubinde ke hodiaŭaj albanoj estas rektaj posteuloj de iliroj, kiuj iam en la tempo de praaj gerkoj kaj romianoj estas vivintaj en la samaj hodiaŭaj albanaj regionoj.

La etna unueco de albanoj

Albanoj formas , malgraŭ la diferencoj, (oni distingas kvar etnogrupojn: gegoj, toskoj, lapoj kaj ĉamoj) unu etnan-kulturan historian unuecon, sekvita de geografia unueco. Ekzemple la albana log'ejo tradicie estas havinta unuan funkcion defendon kaj ne komforton, la formon de la nobelturo. Estas ja en la individueca naturo de albano ke samtiel kiel iliaj praavoj iliraj kaj aliaj popoloj indogermanaj praaj kiel ekzemple germanoj, log'is en ununura izolita hejmo. Tio kiam la familio plikreskiĝas, pligrandiĝas, plilarĝiĝas per kortoj, fariĝas genta kvartalo kaj laste tuta genta vilaĝo. Sur la kampo de kostumoj malgraŭ la multvarieco ni rimarkas ke la blanka koloro estas la nacia koloro de la albana vesto. Aparte la blanka ĉapo estas tio kiu malgraŭ la diferencoj de la formoj sekvantaj de gento (Kosovo, Dibro, Meza Albanio, Myzeqe, Laberio, ks) distingas la albanon en la tuta Balkanio. La koloro devenas de la blanka lano de ŝafaro, per kiu la paŝtista loĝantaro teksas mem siajn vestojn. Samtiel, aperas la samaj objektoj de la materia kulturo, ilaro kaj ujaro.

La ekstera aspekto de albanoj estas difinita de dinarika raso, kiu ampleksas ankaŭ serbokroatajn kaj grekajn partojn. Sed albano jen li altstatura, jem malaltstatura, jen je blanka aŭ profunda komplekseco, je lia konduto, esprimaĵo de vizaĝo, rigardo de okulo sin distingas ĝenerale klare de aliaj ĉirkaŭantaj popoloj.

Edit Durham, anglino vizitinta Albanion komence de XX jc kaj esplorinta sufiĉe bone balkaniojn, priskribas tiamaniere albanojn:

Estas du tipoj de albanoj, malhelaj kaj blondharaj. La blondhara estas pli kutima, kiom mi konstatis tion en la suda parto de la lando. La karakteriza homo portas nazon kiel tiu de Dante, je klinita pinto, mallarĝa en la ponteto kaj muldita; brovo tre distingita kiu komencig'as rekta kaj turniĝas kliniĝante ĝis la osto de la okula kavaĵo ; la makzelo estas longa kaj ĝi descendas malsupren laŭ regula linio kaj finiĝas al firma mentono fendita surpinte. La kranio malposte estas ebena kvazaŭ oni detranĉis de ĝi pecon kaj larĝas ĝis apud la orelo, tiu plie c'e la blondharulo, kiu portas foje hararon kafkoloran kaj ofte flavan (linkoloran kaj okulojn grizkoloran). Laŭstature li estas alta (ne tiom kiom la montenegrano), ne tro dika, je lumboj maldikaj kaj malfermeblaj. La malhela tipo kiu proksime de Peja kaj en Gucio estas tre malhela, estas ĝenerale je

kranio longa, sed kutime malaltstatura. La akcentado de lokaj diversecoj devenas de genta sistemo kaj manko de komunikado.

Ami Boue diras ke se albano posedas fizikajn ecojn de svisoj kaj tirolanoj, se li estas kiel ili, senlaca marŝanto surpiede, kiu per fusilo surŝultre supreniras kaj malsupreniras samkiel la kapro en la montogorĝoj, ĉe li estas unuigintaj la vigleco kaj lerteco kun detaloj kaj eksterordinara prezenco de de la menso.

Albanoj estas la popolo de la rapidaj kaj akraj respondoj, "par excellence". La natura orgojleco de albano esprimiĝas eĉ en plej mallongaj liaj vortoj, en la gestoj, en la facila irado pri kiu mi povas diri iel teatra. Ĉe li la kuraĝo estas io denaska. Se ili civilizigiĝus certe ili fariĝus ne svisoj de Oriento, sed fajnaj francoj, tio estas unu el tiuj popoloj kiuj super c'ion aprecas okupitecon. La vivo kun danĝeroj estas tiom forte ilia elemento kiom la malfeliĉaĵoj dummilite apenaŭ pezas por ili.

J.Ph. Fallmerayer konsideras Albanion kiel landon de forta volo kaj kurta menso. Sed tio ne estas la ununura kontrasto entenata ĉe la karaktero de la albana popolo. Iam drameca vejno trapasigas tiun ĉi karakteron de albano kiu estas al kutimiĝinta plie agi abrupte ol resti pensante. La drameca karaktero ĉeestas ankaŭ en la albana historio kun ĝiaj ĉefaj figuroj. Herbert Louis diras ke ĉiu albano agas laŭ lia propra kapo. Kiu ajn el ili, ĉu saĝa c'ŭ stulteca disponas pri konsiderinda decidpotenco kaj estas lerninta riski en siaj agoj jen bonhavan jen sangon. Tiel en malfacila situacio ĉiu partoprenanto, sendepende de la granda aŭ malgranda juĝpotenco montras mirindan grandecon, ĉar kiuj ajn kapablas ricevi fortan iniciativon. Kurte, ne estas indiferenta amaso.

La spirito de la albana popolo estas tute realisma kaj koncernanta tiun ĉi mondon. Konforme al tio lia agado estas elvolviĝinta surkampe de administrado kaj militado. La spirita esenco de albano estas sindetenado. Tio eksplikatas per hereditaj ecoj kaj per la fermita kaj severa naturo de la lando. Li estas prudenta je paroloj kaj laboro. Obstineco estas alia karakterizaĵo rimarkebla ĉe iliroj, rimarkeblas ankaŭ en la albanaj kolonioj hodiaŭ. W. Briquet difinas la karakteron de albano fiera kaj senbremsa, honesta, amika al la vero.

Familio estas tre grava por albano, ĉu por vilaĝano, ĉu por civitano. Tio estas por la montarano la gento kaj granda familio, por civitano estas familio. Tio estas la vivocelo de kiu ajn strebanta al honoro kaj bonfarto de liaj hejmluloj. La deziro por migrado kaj la nostalgio por la tero kuniĝas ĉe albano mirindmaniere. La respekto al la moroj kaj kutimoj estas eksterordinare granda. La forto de rezisto de la albana lingvo atestas pri la konservativa karaktero de albano. Multaj moroj de la naskiĝo, geedziĝo kaj morto, kalendaro de festotagoj de la jaro, superstiĉoj kaj mitologiaj figuroj, netuŝebleco de la virinoj kaj etuloj, aparta sinteno al la amiko kaj malamiko estas kelkaj el la spuroj kaj aspektoj de tiuj ĉi komunaj moroj de albanoj.

Historio de Albanio estas ja historio de personeco. Ni memorigas la adoron pri Skanderbeg ks.

La religia skismo en Albanio neniam estis profunda. Kvankam Albanio estas lando kie la religiaj kvereloj inter la Eklezio de Oriento kaj Okcidento estis tre akraj, same veras ke la fremdaj religiaj influoj estas erodigintaj iom post iom la teritoriojn en la albanaj randoj, sed ne estas detruintaj la unuecon de la albana nacio. La ekzisto de multaj komunaj moroj antaŭkristanaj kaj kristanaj ĉe ĉiuj socitavoloj de la popolo kaj en ĉiuj regionoj estas helpinta, senvole, por konservado de tiu unueco. La konscienco de gento kaj la nacia

sento estis ĉiamfoje pli fortaj. En decidigaj momentoj la apartaj religiaj interesoj estas flankelasitaj antaŭ la komunaj naciaj interesoj.

Geografiaj kaj historiaj kondiĉoj

La reliefo de Albanio estas ĉefe montara, je alteco averaĝa duoble de tiu de Eŭropo, kun longa marbordlinio kaj sufiĉe varia klimato, de tiu subtropika al tiu kontinenteca. La agrokampoj estas abundaj en Kosovo, Makedonio, dum la plantacioj de agrumoj kaj olivarboj riĉaj precipe en Suda Albanio kaj Norda Grekio. Albanio kaj Kosovo posedas senfinajn subterajn riĉaĵojn, je mineraloj de kupro, kromio, fero, aluminio ks.

En tiaj naturaj kondiĉoj kreskis la etna albano dum jarcentoj

Ekde la romia okupacio (II jarcento A. K.) albanoj suferis preskaŭ tutan tempon la fremdan jugon, tio estas 2000 jarojn! Liberaj albanoj estis nur mallongan periodon dum XV kaj XX jc., se temas nur pri la sendependa albana ŝtato. Tamen certaj regionoj ĉefe montaraj, en norda Albanio kaj aliloke sukcesis konservi sian liberecon pro geografiaj kondiĉoj. Tiel, vasta regiono de Mirdita (albana pura esprimaĵo signifanta "Bonan tagon") plurestis libera, kio ekplikas ne nur la fakton ke ĝia loĝantaro estas entute kristana-katolika, sed ankaŭ ke en ĝi mankas ĝenerale fremdaj loknomoj.

Kiel ajn la longaj kaj kruelaj okupacioj fremdaj influis notinde en la vivmanieron, konduton, karakteron ka de la albanoj. Sufiĉas menciigi la fortan influon de otomana imperio en la moroj, arkitekturo, kuirarto, etnografio ks en ĉiuj partoj de la Etna Albanio (teritorioj kie oni parolas la albanan). Manko de la propra ŝtato instigis ian emon al anarĥismo kaj malrespekto de la leĝo, ian pragmatismon, adaptiĝon al la fremda reĝimo, al emoj servi al fremduloj eksterpatrie eĉ fidele kaj skrupule. Ankaŭ la amasa islamiĝo de albanoj estis rimedo por eskapi la pezajn ŝtatimpostojn altruditaj ĉefe de otomana reĝimo por kristanaj civitanoj, kaj por certigi al si pli dignan vivnivelon enposteniĝinte en la armeon kaj ŝtatan administracion.

Samtiel la malfacilaj vivkondiĉoj en la regionoj montaraj kie la agrokampoj estis tre limigitaj kaj mankis necesaj investaĵoj por malfermi laborpostenojn kaj prosperigi la landon, instigis albanojn fuĝi eksterpatrien kaj sin labori por la aliaj, same al rabado kaj ŝtelado. Tio estas tiom vera kiom ĝis malpli ol unu jarcenton antaŭe oni konsideris digna junedzo tiuj junulon kiu kapablis forŝteli de aliuloj plej multe.

La loĝantoj de la profundaj montaraj regionoj havis severan karakteron kaj aspekton, estis silentaj, individuismaj, samkile mem la medio ĉirkaŭe.

Nature, karaktero de la homo estas io dinamika, en evolu, ŝanĝiĝanta kune kun la tempo, kune kun la sociaj kaj materiaj interrilatoj kaj kondiĉoj. Gravan rolon ludas ankaŭ la kleriĝo kaj kulturo, la ideoj dominantan certan epokon.

Tiel, ni konstatas notindajn diferencojn inter la tiel nomata tradicia kaj moderna albano.

Oni ĉiam pli rare renkotas hodiaŭ la tradician albanon ne nur je ties ekstera aspekto (vestoj, konduto, ks) sed precipe je ties interna spirita animo kaj moralo.

Tamen fremdaj esploristoj konstatas ke albanoj estas konservintaj relative pli multe da ecoj el iamaj antaŭenintoj, ecoj kiujn la monda beletro elĉerpas el antikveco.

Tradicia albano

Faik Konica- verkisto, eksambasadoro de la Albana Reĝlando en Usono inter du mondmilitoj estas skribinta:

La plej granda ofendo por la albanoj estas konsideri ilin malfidelaj. Pluraj kazoj de sangoverŝoj ekis pro tia akuzo. En Grekio la plej granda ofendo estas nomi grekon “ignorulo”, “malklerulo”. Do, la idealo de niaj sudaj najbaroj estas la saĝeco dum la nia estas forta karaktero.

- Popola proverbo albana eldiras ke “Albano bruligas la litkovrilon pro unu cimo”, kio signifas ke albano estas malpacienca kaj temerara.
- Alia regulo de la bonkonduito eldiras: La pardonita kapo ne detranĉitas” kio signifas ke la militkaptitoj ne mortigatas. La bizanca historiisto Nikifor Gregoras diras ke “albanoj ne mortigas nek ensklavigas siajn militkaptitojn”.
- Ekzistas alia regulo konata tutmonde kaj pruvita en la vivo: ĉe albanoj “la virino estas netuŝebla”. Eĉ en la kazo de sangovenĝo, ankaŭ dum la severaj bataloj- The oni neniam pafis kontraŭ la virinojn. Kiam kelkiu sentas minacon de sangovenĝo fare de aliulo-, okazas ke li kunvojaĝas sekure je la akompano de virino, kvankam tia ago konsideratas malvireco. Eĉ la vojrabistoj respektas tiun regulon. Je la komenco de XX jarcento, la preso raportis pri eksterordinaraĵo: la vojrabistoj haltigis trajnon Pariz—Istanbulo ie en Trakio. Oni ordonis ĉiujn virojn eltrajniĝi. Poste oni forrabis ĉion valoran al la viroj. Dumtempe oni ne tuŝis iun virinon, kontraŭe la kapo de rab-bando de fojo al fojo petis pardonon al la virinoj pro tia ĝeno kaŭzita al ili.. Oni komprenis la naciecon de la rabistoj danke al la vortoj elparolitaj de ili.
- Ĉiuj turkaj historiistoj parolas pri obstineco de albanoj. Krome, ili opinias ke albanoj estas echfrenozuloj. “Li havas albanan vejnon”- eldiras iu el turkaj esprimaĵoj. Anekdoto: Iu bulgaro estis enmetante najlon en la muron frapante ĝin per sia propra kapo. Post iom da sekundoj la najlo ne lu progresis. Mirigite la bulgaro iris trans la muron por kontroli la aferon. Je lia miro albano estis malhelpante tion per sia propra kapo...
- Alia eco de albanoj laŭturkoj estas ilia granda avido je mono. Pro mono albanoj pretas entrepreni eĉ la plej danĝerajn aventurojn. Oni demandis albanon : Ĉu vi deziras iri al la infero?—Albano respondis per demando: Kiom da mono oni pagas tie? Anekdoto: Antaŭ la oficialulo de dungado sin prezentis kvar albanoj respektive el Shkoder, Vlora, Korĉa kaj Tirana. Post kiam ili certiĝis ke estas ankoraŭ vakaj laborpostenoj, ili demandis sinsekve. Shkoderano: Ĉu estas ankoraŭ virinoj en la laborejo? Vlorano: Kia posteno estas je mia dispono? Korĉano: Kiom da mono oni pagos? Tiranano: Ĉu la laboloko estas apud mia hejmo? En Kosovo cirkulas la esprimaĵo: Oni povas enspezi en Prishtina, elspezi en Prizereno kaj morti en Gjakovo.
- Grekoj parolas pri “albana kapo” je la senco ke ĝi estas ankoraŭ sovaĝa kaj diras ke “Dio ne estas albano” je la senco ke albano estas malkompatema.
- Italoj uzas la esprimadon Far l’ Albanese, kio signifas ihnorecon
- The Dum francoj diras “fiera kiel albano” (fier comme un Albanais)
- Uiljam Martin Lik (William M. Leake, Angla pentristo, jaro 1804) skribas ke albanoj estas ĝenerale pli malriĉaj ol turkoj, pli prudentaj, pli paciencaj kaj stoikaj, suferantaj ekde infanaĝo. Sed turkoj karakteriĝas je pigreco kaj orgojleco, grekoj estaas perdintaj sian viglecon pro la kontinua premo kaj povreco, dum albanoj sin distingas pro ilia senlca aktiveco. Ili jam kaptis ĉiun dominantan vojpunkton. Al miaj demandoj pri topografio ili respondas sagace kaj precize, kaj

plej bona rekompenco por ili estas la permeso por ekrigardi per mia angulmezurilo. Estas tre granda diferenco inter la konduto de albanoj kaj otomanoj

- Por Hobhauz (jaro 1813), amiko de Bajrono, nomita poste kiel lordo Brauton, evidentigas ke la nacia sento de albanoj estas esenca karakterizaĵo ilia. Kiam oni demandas aliajn naciojn en diversaj partoj de Turkio “kio vi estas?” la respondo estas “mi estas turko”, “mi estas kristano”, dum la loĝantoj de Albanio respondas “mi estas albano”.
- Zhylien de la Gravjerë (1876) estas dirinta ke “la nacieco unuigas albanojn pli multe ol ilin dividas la religia aparteneco.
- La perfideco apenaŭ troveblas inter albanoj- aldonas Hobhauz.
- Bajrono donas kelkaj interesajn rimarkojn pri albanoj kaj skotaj montaranoj: Ambaŭ ili similas unu al la alia pro la vestoj, staturado kaj vivmaniero. Ankaŭ iliaj montoj similas al tiuj de kaledonio, sed havas pli mildan klimaton. Ilia fustanelo (karakteriza popolvesto), kvankam blankkolora, diferencas de kilto, alta kaj vigla staturado, elparolo je sonoj de la kelta kaj iliaj pezaj kutimoj, ĉio tio memorigas min pri Morveno.
- Edvin Piërz (Edwin Pears, 1912) diras: la kvin karakterizaĵoj de albanoj estas ja : nobleco, ĝentileco, sendependeco, toleremo kaj fideleco.
- Dr Herbert Luis (Herbert Louis, 1927), germano diras ke en Albanio ne troveblas indiferentaj masoj, tio estas la albanoj ne povas subiĝi.
- Albanoj aprezas la sperton. Tial ili diras “Kiam egipto fariĝis paŝao, la unua ago lia estis la pendigo de sia patro”
- Alia apartaĵo de albanoj estas ilia ĝenerala abomeno al la kondamno. La mortkondamno konsideratas io terura. Neniu albano deziras roli kiel ekzekutisto. La polico apenaŭ trovas tiulojn inter egiptoj, kiuj plenumas la taskon tute neprofesie, plilongigante la suferadojn al la mortkondamnito. Aparte albanoj malamas la mortkondamnoj pro politiaj kialoj. Laŭ la Kanuno la kondamnoj inkluzivis: monpunon, la forbruligon de la hejmo de kulpanto, la forpelo disde la regiono sed neniel la enprizoniĝo, nek la mortkondamno. Tio eksplikas do kial tiel longe daŭris enlande la sangovenĝo. Interesa koncepto ĉe albanoj estas ke la kondamnito, post kiam li estas kvintinta je lia kulpado, ne plu konsideratas ekskulpanto.
- Albanoj ne toleras la mallaŭdojn. Laŭ iu diraĵo oni ekscias ke estas pli bone “Mortigi kelkiun, anstataŭ mallaŭdi lin”. Anekdoto : en la juĝejo dum otomana tempo la prokuratoro alparolis al la akuzito per vorto “kornulo” kio signifas ke lia edzino estas malhonesta. La ofendita albano ne respondis samvorte , nur diris ke la prokuratoro estas almenaŭ malbravulo. La postan tagon ekvidinte en la halon sian bofraton , la akuzito sciigis lin pri la eldiraĵo de la prokuratoro. Post kelkaj tagoj oni trovis la prokuratoron mortigitan per kuglo surfrunte.
- Ĉe albanoj apenaŭ ekzistas ia sento de idealismo. Multaj mortas pro banalaj kialoj sed apenaŭ aŭdeblis ke kelkiu mortis pro alta idealo.
- Gastamo ĉe albanoj estas fabeleca. Ĝenerale albanoj estas iom timemaj antaŭ la fremduloj sed kiam ĉi lastaj eniras iliajn hejmojn ili tute transformiĝas,

sendepende de fakto ĉu ili estas riĉaj aŭ malriĉaj. En la Kanuno oni deklaras ke “la hejmo de albano estas ja hejmo de Dio kaj la gasto”, kio signifas ke la gasto egalrangas kiel Dio por albanoj!

- Severa honesteco ĉe albanoj esprimiĝas unuavice per la morala unika kategorio de Besa, donita parolo, kiu estas sankta kaj ne bezonas skriban garantion. “Ĉu vi kredas al tiu?- diris Henri N. Breilsford (1906) al bulgara episkopo en Makedonio.-Li ja estas albano, aŭ ne –respondis la episkopo slava, agnoskinte la honestecon de albanoj kvankam slavoj historie travivis grandan malamikecon kun albanoj.
- Alia virtuo de albanoj estas ilia profunda sindediĉo al geptaroj kaj al familio. Ĉi lasta okupas ĉe albanoj la lokon de la ŝtato.
- Tipa albana virino estas tiu kiu ege amas sian hejmon kaj serenajn ĉirkaŭaĵojn, kaj sindediĉo al la maljuniĝintaj tradicioj.
- Albanoj estas servintaj kiel al la fremdaj ŝtatoj kaj riĉuloj, nelaste kiel militdungitoj en la kortegoj de reĝoj de Francio, Hispanio, Sankra Romia Imperio, Venecio kiel lasante notindajn spurojn. Estis tempo kiam la nomo “albano”, asociiĝis per la nomo “marrabisto”. Servantes rakontas ke lia forrabisto en Alĝerio estis ja albana marrabisto Arnaut Mami.
- La plimulto de albanoj plurestis libera, ĉar la “servutuleco kaj sklaveco estis neimageblaj al ili”. Sekve en la hommerkatoj de Turkio apenaŭ troveblis iu albana, ĉar estis neeble ordoni al ili, eĉ estis danĝere havi sklavon albanan.

Jacques Bourcart

Jaro 1921 “Vojaĝo al Malnova Albanio”

Ni admiras la virecon kaj insistecon de bulgaroj, honestecon de la turkaj kamparanoj, la kuraĝon kaj bonecon de la serbaj vilaĝanoj; ni povas aprezi tiun humilan obeemon, malviglan subiĝon de la makedona taglaboristo, restinta ekde la turka tempo. Tamen ĉer neniun el la popolojn de Balkanio ni renkontas tiajn virecajn virtuojn kiaj ja ili estas rimarkeblaj ĉe albanoj. La albana kamparano aŭ montarano, kun kiu mi vivis kaj manĝis, en kies hejmo mi tranoktis, aspektas kiel granda sinjoro kompare al liaj balkanaj najbaroj. Konservante kaj demonstrante kiam ajn afablan ĝentilecon kaj tian memprudenton, kiun envidus eĉ la arabaj gentoj plej noblaj, albano montras grandan moralan dolĉecon kaj veran fierecon de batalanto. Mi miris kiam foje mi rimarkis kiom bone interkompreniĝis unu al la alia albanoj kaj francoj. Tio estas komprenebla ĉar la menso de albano posedas naturon tute okcidentan, estas tre vigla kaj scivolema, dum ilia karaktero estas diskreta, pura kaj gaja, ĉiam preta ekfidi kaj ekligi amikecon. Ĉe albanoj ne rimarkeblas tiu kaŝeco kiu distancigas nin, eŭropanojn, disde multaj popoloj de Oriento.

Kelkaj albanaj popolaj proverboj

Honora morto estas ja ora kovrilo (Shkodër)

Ne estas surdulo pli surda ol la homo kiu ne volas aŭdi. (Sudo)

Lin oni ne permesas eniri la vilaĝon, li pretendas svati la pastran filinon. (Sudo)

Oni volas vendi poreon al la poreovendisto. (Elbasan)

Oni kondukas vin al kvardek akvofontoj kaj ne lasas vin trinki. (Kosovo)

Envers'i salon en alies mang'aj'on (Gjirokaŝtër)
 Kara je branoj , malkara je faruno. (Gjirokaŝtër)
 Preterlasi la c'ambrojn kun ŝterko kaj balai la korton (Sudo)
 Ne vendas ja la anguleto kiom vendas la kalvulo.
 Ne edukita homo similas al ne ellaborita ligno (Sudo)
 La okuloj estas por vidi, la menso por dividi (Sudo)
La maron s'veligas la ondo, la viron levigas la parolo (Nordo)
 La parolo estas oraj'o kiam oni penas g'in bone kaj parolas g'uste.(Shkodër)
La vira parolo, fusilo c'e la muro. (Shkodër)
 Maldigna parolo, pli peza ol la kuglo (Dibër)
La lango estas glavo je du klingoj (Shkodër)
 La salon envers'u limigite, la parolon mezuru per pesilo (Lushnjë)
 Kiu silenti ne kapablas, tiu ec' paroli ne scipovas. (Sudo)
 La infanon vartu, sed la maljunulon ne forlasu (Arbres'oj)
 La fadeno devas simili al la s'tofo (Dibër)
 La bonan parolvorton kie ajn vi trovas g'in ricevu (Shkodër)
 La malg'oĵon de la vespero postlasu por morgaŭ' (Shkodër)
 Karbardaj'tenilon de alies ne farig'u (Sudo)
 Ne farig'u malavarulo per la alies monujo (Lushnjë)
 Ne s'ajnigu vin al iu gravulo, ne s'ajnigu vin al iu havulo(Sudo)
 La vojon forlasu, de amikoj ne disig'u. (Lushnjë)
 Vinarbon ekmaturig'anta kaj figon j'us elc'erpig'anta neniam mang'u (Sudo)
Vendu la c'evalon kaj lernigu la filon (Kosovo)
 La kulpo estas orfulo, neniu ties mastro aperis jam (Elbasan)
 Ec' peltaj'on la kulpo farig'u, neniu vestas g'in (Elbasan)
 La justa parolo estas maldolc'a (Shkodër)
 Prijug'u min, poste mortigu min (Sudo)
 La ric'ulo donas el sia restaj'o, la malric'ulo donas el sia koro (Elbasan)
Pli bone havi amikon ol bienon (Kosovë)
 Bona amiko estas pordo de paradizo (Sudo)
 La azeno ne lamas pro la oreloj (Elbasan)
 Ne pravigas la s'arg'o la vojag'koston (Sudo)
Pli bone esti unu tago falkon ol cent jaroj buteon (Nordo)
 La hundoj boju sed la karavano antaŭ'enmars'u. (Sudo)
 La aglo flugas alten sed sian neston g'i starigas surtere (Labërio)
 La birdo en la kag'o kantas pro malg'oĵo (Shkodër)
La albano au' toŝtas kun vi au' militas kontraŭ' vin (Sudo)

La albano promesinte la parolon, pretas ec' sian filon buc'i. (Sudo)
Hejmo de albano estas ja hejmo de amiko kaj de migranto (Nordo)
 La albano pretas sin senkapigi sed la donitan parolon ne rompigiu (Nordo)
 La albano ne lasas sin malveng'i kaj la s'uldon senkvitigi. (Nordo)
 Frumatene la pordon malfermu c'ar la hejmo plenig'as je sorto (Shkoder)
 Oni ne lau'das la floron sed la abelon por la mielo (Laberia)
 Senlaboreco estas ja la patrino de fieco (Sudo)
 Se la farmisto timus pro la vermoj en la agrokampo li neniam semus (Sarande)

La herbon per falc'ilo kaj la kverkon per hakilo (Lushnjë)
La maron oni ne povas transpasi surpiede (Shkodër)
J'us kiam la hakilo trovis sian tenilon, la arbaro ekterurig'is (Sudo)
Oni ne survojig'as sen bastono kaj lanjako (Sudo)
Iom post iom la bovido farig'as virbovo (Elbasan)
Herberon post herbero, farig'as pajlostako (Tiranë)
S'tonon post s'tono farig'as muro (Elbasan)
La viro ne naskig'as je lipharoj (Sudo)

Oni diras al li jen la lupu, li demandas kie estas la spuro (Sudo)
Malsag'ulo j'etas s'tonon en la akvon kaj 40 sag'uloj ne povas g'in elakvigi.
(Shkodër)

Grandaj scioj estas en mallongaj vortoj (Shkodër)
Pli bone posedi pli da menso ol s'afoj (Shkodër)
Prijug'as la menso , ne la ag'o (Sudo)
Kiam eraras la sag'ulo, ekmiras la stultulo (Kosovo)
Kiu estas mezurinta sin , estas ja mezurinta la tutan mondon (Sudo)
La somera pluvo estas kiel la novedzina plorado (Shkodër)

Tion kion mang'as la bus'o, montras la vizag'o (Labërio)
La pordo de prizono malfermig'as dum la pordo de la tombo ne (Shkodër)
Mang'u lauvole sed vestu vin kiel la aliaj. (Sudo)
Kiam vi perdas la esperon , vi perdas la vivon (Sudo)
Pli bone resti en domo malgranda kie oni ridas, ol en granda domo kie oni ploras
(Elbasan)

Pli bone esti sanulo ol reg'o (Shkodër)
Ne demandu kiel li mortis, sed kiel li vivis (Sudo)
Ric'a estas tiu hejmo kies dommastrino estas sag'a (Sudo)
La infano havas grandan spiriton kaj malgrandan korpon (Shkodër)
Ne rigardu c'e la virino la nazon sed la laboron (Kosovo)
Vi havas patrinon, do vi havas la mondon (Tiranë)
Kiu geedzig'is kaj ne g'ojig'is (Sudo)
Kiu forgesis gepatrajn bonojn neniam ric'ig'is (Sudo)
Pli bona estas la manfrapo de patrino ol la mankareso de kvazau'patrino (Shkodër)
Kreski infanon kaj starigi g'in estas tutegale kiel elfosi puton per kudrilo
(Shkodër)

Por ac'eti varon hastu, dum por edzig'u pripensu (Sudo)
Kreskinte gefilon , konstruante kastelon. (Elbasan)
La lastan deziron (testamenton) ec' la tero ne solvas (Shkodër)
La donita parolo de la viro estas tiom peza kiom la s'tono (Nordo)
La donita parolo de la homo estas la s'losilo de la honoro (Nordo)
La virbovon oni ligas c'e kornoj, la homon oni ligas per paroloj (Sudo)
La muro movig'as, sed la viro ne (Sudo)
La oron oni ekprovas en la fajro, la amiko elprovig'as dum dang'era situacio
(Shkodër)

Malamiko en la hejmo estas samkiel serpento en la brusto (Kosovo)

Kiu iras nevokite, revenas ne kondukite (Shkodër)
Kiu iras seninvitite, trovas la tablon ne surtabligite. (Arbres'oj)
Pli bone estas sag'a malamiko ol stultula amiko (Shkodër)
Bona amiko honorigas vian hejmon (Sudo)
Malnovan amikon oni ne devas forlasi (Sudo)
Amiko estas kiel mielo, dum la najbaro kiel la salo (Shkodër)
La amiko estas frato sen parto en la divido de heredaj'o (Elbasan)
La veran amikon oni ne povas ac'eti per mono (Sudo)
Al la amiko vi plendu, dum al la malamiko vi lau'du vin (Shkodër)
La malnovajn amikon ne forgesu, c'ar la novajn vi trovos kie ajn (Lushnjë)
Dum seka vetero oni konas la bonan akvofonton, dum la amikon oni konas en
malfacila situacio (Shkodër)
Kiu elfosas la alies tombon, falas men en g'in (Kosovo)
Rigardu min per unu okulo kaj mi rigardos vin per miaj ambau' okuloj (Nordo)
Kiom da homojn razas la barbiro, sed neniu diras ke li estas lia bofamiliano.
(Lushnjë)

Kiu vagabondas kun lamuloj ankau' li lamos. (Sudo)
Kiu postsekvos la cimono en la sterkon alvenos (Sudo)
Kia estas via mastro tia estos via metio (Elbasan)
Estas facile fortranc'i la hvoston de la mortigita lupo (Shkodër)
Pli multe scias la suferinto ol la lerninto (Sudo)
Du kukurbojn oni ne povas teni subbrake (Sudo)
La vilag'o aperinta ne bezonas vojqvidiston (Kosovo)
Nova vilag'o, novaj moroj (Sudo)
Monto al monto ne renkontig'as, sed la homoj jes (Sudo)
En la grandan vitejon iru kun malgranda korbo (Nordo)
Ne estas oro c'io brilanta (Nordo)
Ellarmiginte la okuloj vidas pli klare (Sudo)
La lupoj povas s'ang'i sian hararon sed ne la malvirton (Shkodër)
Estu envia sed diru la pravon (Elbasan)
Parolinte la veron, vi estigas kvardek malamikojn (Elbasan)
Pli malvasta vivovojo estas la verovojo. (Sudo)
Oni ne povas kas'i la sunon per kribrilo (Sudo)
Staru malrekte sed parolu prave (Sudo)
Pro kudrilo kaj fadeno, eluzig'is tuta mantelo (Sudo)
Etendu la krurojn tiom kiom longa estas la vatkovrilo (Kosovo)
La bravulon mortigu sed ne mallau'du (Kosovo)
La braveco post la milito kaj la sag'eco post la kunveno ne plu valoras (Shkodër)
La fortulo estas tia ec antau' la Dio (Kosovo)
Kiu kaptis la lupon c'irkau' ties gorg'o li ne povas timi pro hundoj (Sudo)

Moderna albano

Kompreneble la karaktero de homo, samkiel aliaj ties ecoj ne estas io statika, sed dinamika. Novaj tempoj , novaj moroj. Albanoj nuntempe çiam malpli similas al tiuj

tradiciaj. Aparte tio veras post keldek jaroj da totalisma komunsima reĝimo (1944-1990). Kiel sciite, tiu reĝimo baziĝis sur certaj principoj el kiuj plej gravaj jenas:

Unupartia politika sistemo: Komunista partio staris super ĉion, tioe estas super la patrion, familion, individon, religion. La oficiala propagando impertinente semis la ideojn pri proleta diktaturo, kiel la plej vasta kaj la nura vera demokratio, estis malpermesite kiu ajn alia libera opinio, politika alternativo. Religio estis malamikeca ideologio, ia venenaĵo, kontraŭ kiu oni devas batali senkomplete. Kiam falis partio, ekskuis kaj ekfalas ankaŭ la aliaj valoroj.

La kulto de partigvidanto: ne plu estis alia kulto kiel nacia afero, familia aŭ amika honoro, donita parolo, gastamo, ktp.

La klasbatalo: oni konsideras pli valoran la klaskamaradon ol propran amikon, hejmulon, parencon, sampatrujanon. Ne hazarde la preso informis fojfoje pri vizitoj de “kosovanaĵoj” kaj “ĉinaj fratoj” en ĉefurbo. Kiu ajn protektis en sia hejmo “la malamikojn” de partio kaj ŝtato kulpiĝis kaj kondamniĝis. Tiel oni malvolorigis tiujn idealojn tradicie adorataj kaj respektataj de albanoj.

Kiam albanoj fuĝis eksterlanden post la jaro 1990, ili aperis antaŭ la fremduloj aliigite kaj tute strange kompare al ilia iama tradicia fizionomio. Ŝtelado, krimeco, prostituado, homtrafikado, drografikado kaj aliaj perversaĵoj praktikataj de parto de albanaj rifuĝintoj en Italio, Grekio kaj alilande prezentis al publika opinio alian tablon de nia popolo. Tio ege bedaŭrindigis nin. Tiaj abomenindaj agoj evidentiĝis ankaŭ enlande, precipe dum la maloportuna jaro 1997.

La naskiĝo kaj disvastiĝo enlanden de la tiel nomataj fifamaj lumonaj kompanioj en la jaroj 1994-1997, atestas pri ia naiveco tutnacia de albanoj kiuj fidis je ŝtato kaj liveris al tiuj kompanioj tutan sian ŝparmonon.

Manko de alta nivelo de civitana konscio ĉe albanoj pruviĝas dum la balotaj kampanjoj. Anastataŭ partopreni amase kaj serioze la balotadon por ke elektu la plej bonajn kandidatojn, albanoj preferas resti hejme aŭ simple voĉdoni laŭ partiaj preferoj.

Ankoraŭ albanoj ne komprenas la politikan batalon kiel rimedon por progresigi la ekonomion, la kulturon, por plialtigi la vivnivelon. La politikajn kointraŭlojn oni konsideras kiel veraj malamikoj, pensmaniero el la pasintaj jaroj de la totalisma ŝtato.

Tamen, la historie formiĝintaj etno-kulturaj karakterizaĵoj de la popolo ne povas renversiĝi tiom rapide ene de keldekjaroj. Albanoj, plimulte demonstris siajn brilajn ecojn, ekzemple dum la jaroj 1991-1992, kiam centmiloj da ili partoprenis amase en la potencaj manifestacioj por renversi la komunisman reĝimon kaj starigi pluralisman sistemon, dum la Kosova milito en la jaro 1999 por elteni la rifuĝintan lavangon de niaj sampatrujanoj perforte forpeltitaj de siaj propraj teroj, dum sekvantaj jaroj kiam, albanoj en Makedonio militis kaj laboris por stabila kaj justa komuna ŝtato tie, kiam albanoj en Kosovo pacince kaj civitanece partoprenas la kampanjon por realigi la postulatajn standardojn tie antaŭ ol oni difinos la statuson de la regiono, kiam la politika situacio en Albanio pliboniĝas kaj la problemoj rilate la diversajn trafikojn plimildiĝas.

Certe albanoj daŭre sin prezentos en kaj ekster siaj teroj kiel posteuloj de brava kaj kulturriĉa popolo en ĉi tiu parto de nia kontinento.

Aldonaĵoj

Artikoloj apartaj pri Kanuno- antikva tradicia leĝaro de albanoj; pri la albana lingvo; pri problemo de Ĉamerio; pri vojaĝimpresoj de kelkaj eminentuloj kaj ĵurnalistoj fremdaj en Albanion dum diversaj tempoperiodoj ka.

Bibliografio

1 Robert Carver

La eldonejo John Murray (publishers), 1998. titolo "Accursed Mountains" (La Malbenita Altmontaro". Reeldono de la eldonejo Flamingo 1999.

2 Aristidh P. Kola:

Arvanitasit dhe prejardhja e grekëve, vështrim historik-folklorik-politik-gjuhësor, (Arvanitoj kaj la deveno de grekoj, historia-folkloro-politika-lingva trarigardo), Tiranë 2002

3 Prof. H.H. Robert d'Angely

Enigma...e prejardhjes së racës dhe të gjuhës së pellazgëve, Ariasve, Hititëve, Helenëve, Etruskëve, Grekëve ose Shqiptarëve etj...është zgjidhur
(Enigmo de la deveno de raso kaj lingvi de pelazgoj, ariasoj, hititoj, helenoj, etruskoj, grekoj au' albanoj ka estas jam solvita) Tiranë, shtëpia botuese (eldonejo) "Toena", 1998

4 Ismail Kadare

Eskili- ky humbës i madh (ESKILO-GRANDA PERDINTO)

5 Jacques Bourcart

(Jaro 1921) Viti 1921

Udhëtim nëpër Shqipërinë e vjetër (Vojag'o al malnova Albanio)

6 "Albania- a patrimony of europeans values" Tirana 2000

7 Stephen Schwartz: Kosovo, background to a WAR"

Libraria (Librovendejo) "Adrion" books@adrionltd.com tel ++355 4 240 018

8`Miranda Vickers, James Pettifer, "Albania- from anarchy to a Balkan Identity", 4500 L

9 Dr. Oakley- Hill, "An Englishmen in Albania", 4000 L

10 Harry Hodgkinson, "Skanderbeg", 3300 L

11 Paulin Kola, "The search of Greter Albania", 3200 L

12 Stephanie Seli Wandner- Sievers, Fischer edition, "Myth and hystory", 3200 L

13 Edith Durham, "High Albania- a victorian traveller's Balkan odyssey", 3000 L

14 Bernd I.Fischer, "Albania at war 1939-1945", 5000 L

15 Edith Durham, "Albania and the albanians- selected articles and letters 1903-1942", 3200 L

16 "Albania- a patrimony of european values", (guide of albanian history and cultural heritage), 20 \$

17 "Icons of Butrint", 4800 L

- 18 “Albania through art”, 4900 L
- 19 “Ikonat bizantine dhe pas bizantine në Shqipëri”, (Bizancaj kaj postbizancaj ikonoj en Albanio), 3400 L
- 20 “Albania folk costumes”, vol I-II-III , 3 X 4500 L
- 21 “Vendbanime dhe banesa popullore shqiptare” (Log’lokoj kaj log’ejoj albanaj” Tirana 2000, 800 L
- 22 “Albania”- guide, 2500 L
- 23 “Welcome to Albania”, 1000 L
- 24 “Albania- guide to it’s material treasures”, 2000 L
- 25 “Albania- the Bradt travel guide”, 4000 L
- 26 “Il Kanun”- Le basi morali e giuridichi della societa albanese”, 2300 L
- 27 “Le Kanun de Lekë Dukagjin”, 1800 L
- 28 “Der Kanun”, 1800 L
- 29 “Gjuha shqipe për të huajt dhe shqiptarët jashtë atdheut” , (La Albana lingvo por fremduloj kaj albanoj ekster la patrio), 1500 L
- 30 Mihallaq Shuti**, “Proverba krahasuese, Proverbi comparati, Comparative proverbs, 15 euros
- 31 “Shqipëria arkeologjike”, (Arkeologia Albanio), 3500 L
- 32 Ferid Hudhri**, “Shqipëria nëpërmjet arkitekturës” (Albania tra arkitekturo), 3900 L
- 33 Greg Campbell**, “The road to Kosovo- a Balkan Diary”, 3200 L

Libraria (Librovendejo) “Adrion” books@adrionltd.com tel ++355 4 240 018

Miranda Vickers, James Pettifer, “Albania- from anarchy to a Balkan Identity”, 4500 L

Dr. Oakley- Hill, “An Englishmen in Albania”, 4000 L

Harry Hodgkinson, “Skanderbeg”, 3300 L

Paulin Kola, “The search of Greter Albania”, 3200 L

Stephanie Seli Wandner- Sievers, Fischer edition, “Myth and hystory”, 3200 L

Edith Durham, “High Albania- a victorian traveller’s Balkan odyssey”, 3000 L

Bernd I.Fischer, “Albania at war 1939-1945”, 5000 L

Edith Durham, “Albania and the albanians- selected articles and letters 1903-1942”, 3200 L

“Albania- a patrimony of european values”, (guide of albanian history and cultural heritage), 20 \$

“Icons of Butrint”, 4800 L

“Albania through art”, 4900 L

“Ikonat bizantine dhe pas bizantine në Shqipëri”, (Bizancaj kaj postbizancaj ikonoj en Albanio), 3400 L

“Albania folk costumes”, vol I-II-III , 3 X 4500 L

“Vendbanime dhe banesa popullore shqiptare” (Log’lokoj kaj log’ejoj albanaj” Tirana 2000, 800 L

“Albania”- guide, 2500 L

“Welcome to Albania”, 1000 L

“Albania- guide to it’s material treasures”, 2000 L
“Albania- the Bradt travel guide”, 4000 L
“Il Kanun”- Le basi morali e giuridichi della societa albanese”, 2300 L
“Le Kanun de Lekë Dukagjin”, 1800 L
“Der Kanun”, 1800 L
“Gjuha shqipe për të huajt dhe shqiptarët jashtë atdheut” , (La Albana lingvo por fremduloj kaj albanoj ekster la patrio), 1500 L
Mihallaq Shuti, “Proverba krahasuese, Proverbi comparati, Comparative proverbs, 15 euros
“Shqipëria arkeologjike”, (Arkeologia Albanio), 3500 L
Ferid Hudhri, “Shqipëria nëpërmjet arkitekturës” (Albania tra arkitekturo), 3900 L
Greg Campbell, “The road to Kosovo- a Balkan Diary”, 3200 L

Ilustraĵoj je fotoj

Humoro

La ŝtonepoko

Paĉjo, kio estas la ŝtonepoko?

- Tio estas ka tempoperiodo kiam la homoj faris ĉion el ŝtono.
- Ĉu ankaŭ la televidilojn?
-

La patro

Iu knabeto demandis sian patrinon:

- Panjo, ĉu veras ke ĉiu infano devas havi patron?
- Jes, tio estas vero.
- Kial do en nia familio estas kvar infanoj kaj nur unu patro?

La hundo

La patrino demandas sian fileton:

- Kial vi estas tiom multe malsekigita?
- Mi ludis kun Tito kiel hundojn.
- Mi ne komprenis vin.
- Nu, mi estis la arbo..
-

La infanoj

Iu knabeto estis duŝante kune kun knabineto.

- Vidu tiun ĉi kiun mi havas kaj vi ne havas.
- Fu! Tio estas nenio! Mia panjo jam diris al mi ke kreskiĝonte, mi havos sufiĉe multe da tiaj!

Postkapaj okuloj

La malgranda Redi estis rigardanta atente sian patrinon je ĉiuj flankoj. Tio tedis ŝin, tial ŝi demandis la filon:

- Kial vi rigardadas min tiel multe?
- Mi volas konvinkiĝi ke la patro pravas.
- Kial do, kion diris li?
- Li diras ĉiamfoje al la servistino: "Ni devas esti tre atentaj, kara mia, ĉar mia edzino havas okulojn eĉ malantaŭ ka kapo!"

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

Albana proverbo: La braveco post la milito kaj la sag'eco post la kunveno ne plu valoras (Shkodër)

Nr 60 au'gusto 2005

Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio
Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)

Rete: pistolia@yahoo.com , apistoli@aol.com (Vasil Pistoli);
selimibardhyl@yahoo.com, bardhylselimi79@hotmail.com (Bardhyl Selimi);
adoci@gmx.de (Artur Doçi) ; shhasani@albmail.com (Shaban Hasani);
motto@bwc.org (Martha Otto) ; fiorialbtours@yahoo.com (Fjoralba Sadiku);
asokoli@bkursimeve.com.al Nehat Sokoli; beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ;
matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi);
sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti);
mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri);
dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com ;
egli_b@wp.pl (Egli Brati) ; eltonzaimi78@yahoo.com (Elton Zaimi);
agimperaj@yahoo.it ; tcobani@yahoo.com (Tonin Çobani)

Retpag'o : <http://www.esperantio.tk>

You can access the group's web features using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/>

You can access the group's Management page using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage>

Enhavo

Ni kaj ILEI

Letero al estraro de ILEI

Ni kaj UEA

Rimarkoj pri la jarlibro 2005

Gazetara komuniko

Reago

Studado

Korespondo kun Boj'idar Leonov kaj Quednau

Esperanto si mjet mäsimi i gjuhëve

El la leteroj

Letero el Lituanio

Letero el Au'starlio

Letero el Nederlando

Anoncoj

Aroma Jalto 2006

Itala Kongreso de Esperanto

Pedagogiaj tagoj en Germanio

Propagando por Esperanto

Dek argumentoj kontraŭ kaj por Esperanto

El parolado de Claude Piron (dau'rigo)

Artikoloj

Artikolo en Skotlanda esperantisto

Novaj'o en la revuo "Esperanto", julio-au'gusto 05

Prelegoj

"Arumanoj kaj Vlahoj en Albanio"

(Prelego en la Konferenco je ĉeftemo "Esperanto, vojo de interkomunikig'o kaj internacia kompreno", Cluj-Napoca, Rumanio, 29/07-31/07/05)

"Etno-psikologiaj kaj kulturaj karakterizaj'oj de albanoj"

(Prelego en AlpAdria Konferenco, Triesto 21/05/2005)

Humoro

Albanaj anekdotoj

Al Centra Oficejo de UEA

Al la koncernato

Karaj, mi salutas vin elkore el Albanio.

Antau' du tagoj mi bone ricevis la jarlibron 2005. Dankon!

Permesu min fari kelkajn rimarkojn rilate c'i eldonon, fakte parte ripetite c'ar pluraj monatojn antau'e mi antau'skribis vin rilate ilin. Alie ol alijare, CO ne petis de ni c'i jare skribe la korektojn en la donitaj'oj. Kial do?

Mi petas vin trakti serioze la c'i subajn rimarkojn, por ke oni aldonu, plig'ustigu kaj g'isdatigu ilin en viaj registroj de UEA.

- Unue, sur pag'o 59, oni mencias "Albanan Unuig'on de Esperanto-Junularo". Tie estas s'ang'ita la faksnumero; nun estas ++355 4 22 50 53, (ne 234 339)
- Due, sur pag'o 99, bv forstreki mian (Bardhyl Selimi) malnovan retadreson selimib@albmail.com kiu ne plu validas ekde marto 2005 kaj noti la novajn kiel supre. (vidu). Same aldonu la retadresojn de aliaj delegitoj de Tirana:

Tonin Çobani: tcobani@yahoo.com Adreso lia ne plu estas tio notita tie, bv forstreki g'in. Almenau' notu lian novan laborejon : Komiteti Kombetar i Radio televizioneve, hotel Drini, Tirane Albanio) tel portebla ++355 692246822, tel fiksa ++355 4 233370

Rita Permeti: d.permeti@amc.al

Por la delegito de Shkoder, Saimir Beqiraj ekzistas retadreso kiel jene: beqirajs@hotmail.com , lia laborejo havas adreson : Fakulteti i Shkencave Natyrore, katedra e biologjise, bul Zog I, Tirana Albanio

- Krome mi kelkfoje proponis je la nomo de nia Instituto ke oni difinu novan delegiton por Pogradec (urbo je 20000 log'antoj oriente de la lando) nome s-ron Gjergji Gusho kies donitaj'oj estas : strato "Bul.Deshmoret e Pojskes" domo "Pallatet e reja" urbo "Pogradec", Lando Albanio, tel fiksa ++355 832 2326, retadreso : arbibasho@yahoo.it
- Trie, sur pag'o 281, apud la lingvonomo "albana" oni notas "Albanio, Serbio kaj Montenegro". Krome, oni nepre devas aldoni : Kosovo (regiono kie log'as almenau' du milionoj da albanoj, au' 93 %), Makedonio, (lando kie log'as unu miliono da albanoj kaj kie la albana jam estas oficialigita), Grekio (kie log'as en siaj teroj kelkcentmiloj da etnaj albanoj, krom pli ol 700 000 albanaj rifug'intoj en la tuta lando, nur en Ateno 400 000, au' la dua urbego en Balkanio post Tirana je la plej granda nombro de albanoj log'antaj tie). Mi menciis nur teritoriojn kie albanoj log'as en siaj propraj teroj! En Serbio kaj Montenegro ne inkluzivitas Kosovo, kiu strebas nun al sendependeco, sed aliaj vastaj regionoj apud Nis'o kaj suda Serbio (Pres'evo, Sandj'ak ka) kaj en suda Montenegro kun kelkcentmiloj da etnaj albanoj.

Dankante vin pro via bonkomprenemo, mi esperas ricevi baldau' konfirmon de vi pri supre dirite.

Agrablan laboron al vi c'iuuj.

Via altestime Bardhyl Selimi
Delegito de Tirana
Sekretario de la Albana Esperanto-Instituto

Respondo

Roy MacCoy roy@luna.nl 13/07/2005

..Mi ne memoras ilin, kaj suspektas ke mi simple ne ricevis ilin. Vi sendis al uea@inter.nl kaj neniuj plusendis al mi. S-ro Peraj devis ricevinta formularon pri Albana Esperanto-

Ligo sed s'ajnas ke g'i ne estis printita au' sendita...mi faris c'iujn s'ang'ojn lau'konsentite.

Al koncernatoj

Je sciig'o al s-ro Radojica, Sjoerd, Jozef

Karaj, salutante vin sincere, mi bondeziras sukcesan Konferencon en Litovio. Bedau'rinde, nek mi, nek alia nia albana sekciano ne povas partopreni ankaŭ c'i sesion, pro financaj kaj vizaj malfacilaj'oj (ne ekzistas en Tirana litovia konsulejo). Krome, ekde longe nia sekcio ne ricevas IPR au' kelkiu alian informaj'on pri la agado de ILEI. Kial? Unue, pro fakto ke nia sekcio ne povis elteni la pagon de la membreco. Due, pro ia neglekto fare de Radojica au' kelkiu alia en la estraro de ILEI. Povas influi ankaŭ la fakto ke s-ro Vasil Pistoli, nia sekciestro, aktuale log'as c'e alia sia filo en Nov Jorko. Antau'e ni korespondis kaj kontaktis akurate. Nun ne. Mi esperu ke en la kuranta kunveno de ILEI en Litovio oni rekonsideros nian peton por ricevi almenau' kvin ekzemplerojn de IPR (inkluzive de la c'iuaj ceteraj numeroj de la jarfino 2004 kaj la jaro 2005). Espereble, vi informos nin pri la novaj decidoj akceptotaj en la konferenco. Bv noti mian novan retadreson kiel supre. (Vidu). La malnova ne plu validas ekde marto 2005.

Dum c'i lernojaro c'e ni dau'ris la lernokursojn, kiuj kronig'is per du ekzamensesioj: unu februarie 2005 kaj la dua majo 2005, kie akiris la diplomon pri la elementa nivelo de E. 17 gelernantoj. Ni dau'rigis nian laboron sur propaganda kampo, nia Bulteno aperis regule c'iun duan monaton, niaj sekcianoj partoprenis internacian arang'on AlpAdria en Trieste kie ili prelegis pri Albanio, nia Instituto eldonis novan lernolibron por albanoj novembre 2004 je 1000 ekzempleroj (kvin ekzempleroj estas jam c'e la libroservo de UEA), plue du aliajn librojn albanlingve. Ni certigis ankaŭ c'ifoje, danke al samideano nederlanda Jacques Tuinder, almenau' 60 ekzemplerojn de la lernolibro brajle por albanoj, por la gelernantoj de la blindulejo en Tirana. Pluraj niaj gestudentoj dau'rigis studadon c'e la klerigejoj de AIS en Pollando kaj Bulgario kaj baldau' ili akiras bakalau'recon au' magistrecon tie.

Ni planas por la nova lernojaro pli ampleksan instruadon de Esperanto en la lernejoj interkonsentote kun la c'i tieaj superaj edukaj organoj. Nu, tiom por hodiau'. Agrablan kaj fruktodonan laboron al c'iuaj vi!

Via altestime

Bardhyl Selimi

Sekretario de la Albana Esperanto-Instituto

Respondo de Atilio Orellana Royas

17an de julio 2005

Dankon pro via salumesag'o al la konferenco. NI lau'legos g'in dum la malfermo. En la estraro ni preparolos la eblecon aligi albanojn pere de nia koleghelpa Kaso kaj espereble tio sukcesos baldau'. Amikajn salutojn senda sal vi,

Atilio

Reago

De 9-15 julio 2005, okazis la anoncita antaŭe Konferenco de OSIEK en Rafina , Grekio, je c'eftemo **“La Bizanca Kulturo”**.

Nia membro Bardhyl Selimi deziris partopreni g'in per prelego je temo “Albanoj dum la Bizanca Imperio”, sed la grekaj organizantoj, laŭ s-ino Madeleine de Zilah, ne volis tion. Des pli, la grekaj prelegantoj rezignus de ilia partopreno se c'eestus la albana delegito. Kial do? Laŭ s-ino Mantha Christou , la albana delegito “estas ofendinta grekojn je ties patriotaj sentoj iukaze”, ne montrante kie precize. Stranga afero! Nun ni ekscias kiuj estas tiuj grekaj prelegantoj. Jen iliaj nomoj:

Mantha Christou kiu prelegis ‘ Kristanismo en la bizanca imperio”

Alekos Frangias kiu prelegis “La monah'ejo Sankta Katerino en Sinajo”

Angelos Tsirimokos kiu prelegis “La greka lingvo dum la bizancaj tempoj”

Polyxeni Zarkada kiu prelegis “Bizancaj preg'ejoj en Grekio”

Mi konfesas sincere ke mi persone renkontis almenau' s-inon Mantha kaj s-ron Angelos en Trieste en la jaro 1998 kaj havis agrablajn interparoloj kun ili ec' vespermang'is kune en la c'irkau'aj'oj de Trieste. Ĉu miaj artikoletoj en Monato revuo estis ofendemaj por grekoj? Mi pensas ke tute ne! Ĉu vi samopinas? Dankon!

Bardhyl Selimi

Gazetara komuniko de UEA

1. Kelkvorte pri minoritatoj en Albanio Albanio apartenas al tiuj raraj landoj, almenaŭ en la malnova kontinento, kiuj çirkaŭatas de teritorioj loĝataj kompakte de albanaj etnuloj. Nome, de parto de Montenegro (Tuz, Plave, Gucio, Tivar, Ulcinj, kc); de Kosovo, de Okcidenta Makedonio (Struge, Gostivar, Tetove, Diber aŭ Debar, Manastir aŭ Bitol kc) kaj Norda Grekio (Çamerio kaj aliaj regionoj, Arto, Prevezo, Igumenico, Kosturo, kc). Tio atestas ke minoritatoj, ĝenerale, ne reprezentas aŭtoktonan loĝantaron en Albanio mem.

Cetere, la minoritatoj formiĝis historie plejofte en la regionoj lime al la najbaraj ŝtatoj pro diversaj kialoj. Unu kialo povas esti je ekonomia karaktero: grupoj el unu etno migras pli facile al najbara ŝtato por trovi tie pli bonajn vivkondiçojn. Dua kialo povas esti la politikstrategio de registaroj de okupantaj ŝtatoj aŭ imperioj kiuj volas silentigi la popolamasoj per ilia disloĝigado en teritoriojn okupitajn, kie vivas diversaj etnoj kaj popoloj. Trie, parto de loĝantaro fuĝas ekster sian patrion pro persekutado kaj teroro fare de enlandaj kaj fremdaj regantoj. Kaj tiel plu. Verdire, oni ankoraŭ ne havas precizan difinon de malplimulto kaj minoritatoj. En la granda vortaro Albana -Albana, eldonita en la jaro 1985, oni difinas la minoritaton tiel: " nacia malplimulto kiu log'as en alia lando aŭ ŝtato", do oni ne distingas la nacimalplimulton de minoritato. En PIV oni simple egaligas ĝin al malplimulto. Dum en la Oksforda Vortaro (Oxford Advanced Learner's Dictionary of Current English), oni diras ke “minoritato estas malgranda racia, religia kc grupo en iu komunumo, nacio kc”.

Je kiu kazo oni povas paroli pri malplimulto kaj je kiu kazo pri minoritato? Kiu estas ties çefa karakterizaĵo? La nombro? La lingvo? La praeco? La kompakteco de loĝado

? **La** ekonomia stato? **La** kultura nivelo? Ekzemple, se oni parolas pri romaoj **en** Albanio, pro ilia praeco kaj delonga integreco **en la** albana popolo, oni apenaŭ povas distingi ilin disde **la** albanaj puraj etnuloj, ĉar ili parolas hejme **la** albanan kaj aspektas je ekstere kiel albanoj. Same, vlahoj aŭ arumanoj kiuj amase geedziĝas al albanoj kaj parolas hejme **la** albanan. Grekoj kiuj konsistigas **la** plej grandan grupon nealbanan (aŭ 3% de **la** tuta loĝantaro el pli malpli 3.5 milionoj, dum 2% ĉiuj aliaj nealbanaj grupoj), loĝas ankaŭ **en** siaj vilaĝoj sude kaj sudokcidente de **la** lando, sed ankaŭ dise **en** ĉiuj distriktoj.

Nur post **la** jaro 1990, oni povis libere sin esprimi pri sia nacieco kaj organiziĝi **en** asocioj sur etnecaj bazoj. Antaŭ 12 jaroj, unu deputito **en la** albana parlamento proponis leĝon pri nacieco laŭ kiu " **la** nacieco estas tio kion deklaras libervole ĉiu civitano". Tion kontraŭstaris **la** plejmulto de deputitoj kiel ne justa, ĉar pro, ni diru, ekonomiaj kialoj, pluraj homoj fuĝintaj el Albanio al Grekio post **la** jaro 1990, sin deklaris grekaj por ke ili facile trovu laborpostenon kaj **la** polico greka ne ĝenu ilin. Multaj el ili eĉ ŝanĝis siajn islamajn nomojn al grekortodoksaj, tiucele. **La** nacieco, verŝajne, estas io heredita de generacio al generacio kaj grava karakterizaĵo por ĝi estas, sendube, **la** lingvo. Greko ne povas fariĝi aŭtomate albano kaj inverse. **En** Albanio, laŭ oficialaj statistikoj, oni nombras ĉirkaŭ 100 000 lokajn grekojn (laŭ censo de **la** jaro 1979- estis 49307 grekoj el entute 54687 nealbanoj), alvenintaj **en** Albanion pli ol ducent jaroj antaŭe, pro ekonomiaj kialoj, kutime kiel taglaboristoj ĉe **la** lokajn bienulojn. **La** asocio "OMONIA" de grekaj etnuloj enlande kaj aliaj grekorientigitaj informiloj plurfoje kontraŭis tiun nombron, asertante ke fakte **en** Albanio vivas du aŭ pluoble da grekoj. Sed, se oni prikonsideras, ekzemple, **la** partoprenadon **en la** ĝeneralaj balotoj, rezultigis ke Partio pri **la** Homrajtoj, kiu, supozite, reprezentas grekojn kaj aliajn malplimultojn **en** Albanio, apenaŭ sukcesas akiri pli ol 2 % da voĉoj **en la** albana parlamento. Ĝenerale, estas jam konate ke albanoj konsistigas sian ŝtaton pli malpli homogenece (ĉirkaŭ 95 %), kunvivante, ekde jarcentoj, enpace kaj kunlabore kun alietnuloj. Oni ne konas, ĝis nun, kazojn de ia genocido aŭ diskriminaciado fare de popolo kaj registaro albana kontraŭ alietnulojn.

Aliflanke, **la** anoj de malplimultoj kaj minoritatoj (grekoj, arumanoj, makedonoj, romaoj, montenegranoj, bosnianoj kaj serboj) okupis ĉiamtempe dignan pozicion **en la** socio, fariĝis politikistoj, eminentuloj de beletro kaj kulturo, dividis kun **la** albanoj ĉiajn feliĉaĵojn kaj malfeliĉaĵojn. Ili servis envere kiel amikecpontoj inter albanoj kaj najbaraj popoloj.

La popolaj danc- kaj kant- grupoj de minoritatoj partoprenis regule **la** tutlandajn folklorfestivalojn kaj pliriĉigis tiujn festivalojn, per sia kontribuo buŝa kaj koreografia, same per kostumoj. Antaŭ nelonge, okazis **en** Tirane tutlanda festivalo de infanoj de minoritatoj. Estis **en** ĝi tiom da bunta muziko, danco kaj mesaĝoj por paco kaj amikeco.

Ne nur **la** simplaj albanaj popolanoj, sed ankaŭ diversaj registaroj, reĝaj, komunismaj aŭ demokratiaj, ne entreprenis ian malamikan kampanjon kontraŭ minoritatojn. Tio pruviĝis eĉ dum malfacilaj periodoj trapasitaj **en** nia historio. Ekzemple, post **la** unua Mondmilito, **la** greka registaro entreprenis perfortan etnopurigadon de certaj teritorioj **en** Ĉamerio kaj aliaj regionoj loĝataj kompakte de albanaj etnuloj **en** Norda Grekio, aliĝintaj al **la** greka ŝtato post **la** jaro 1913, laŭ **la** decidoj de **Konferenco** de

Ambasadoroj en Londono. Keldekmiloj da albanoj estis ekzilitaj en Anatolion de Turkio , interŝange kun tieaj grekoj. Stariĝis voĉoj en Albanio por entrepreni reciprokecan politikon en Albanio rilate la grekojn loĝantajn tie, sed la tiamaj registaroj ekde la jaro 1920, inkluzive ankaŭ tiun de la reĝo Ahmet Zog la Unua rifuzis reagi tiamaniere. Dum la totalisma reĝimo komunisma, la regionoj loĝataj de grekoj ĝuis ian relativan prosperon ekonomian, apogate de la ŝtato, kompreneble pro politikaj celoj, dum post la jaro 1990, kiam estis aprobita la nova leĝo pri privatigo de la tero, ĉiuj grekaj kaj alietnulaĵoj familioj profitis senpagan teron ĉirkaŭ sia hejmo, delonge kulturita de ili mem, kvankam tiu tero jarcente apartenis al albanaj eksbienuloj. Tia precedento ankoraŭ ne okazis, ni diru , en la Suda Italio kun nia minoritato albana tie, loĝanta tie ekde la XV jarcento! Ni esperu ke la minoritatoj pluservu kiel amikecpontoj ankaŭ en Albanio! En la prefektejo de Korĉë inkluziviĝas la distriktoj : Korĉë, Pogradec, Devoll, Kolonjë. En tiuj ĉi distriktoj lo ĝh 2. Arumanoj en Albanio

Arumanoj en Albanio havas duoblan devenon : parto el ili formiĝis enlande dum la alia devenas de certa regiono de Rumanio. Unua grupo La unua parto rilatas al la fama ĉefvojo romia "Via Egnatia" trapasinta la teritorion de Albanio de okcidento al oriento. Ĉe ties strategiaj punktoj oni establis romiajn gardistarojn por defendi la vojon tre grava por la kontrolado de la profundaj regionoj de Imperio en la Balkana Duoninsulo. "Via Egnatia" disdividiĝis en kelkaj flankajn branĉojn, kiuj ebligis la komunkiĝon kun la profundaj areoj de tiu vasta regiono kia ja estis Balkanio kaj Imperio ĝenerale. En tiuj vojrandoj oni establis ne nur gardistarojn sed ankaŭ koloniantojn je romia deveno. Ankaŭ parto de loka loĝantaro ekkonsistigis la homan komunumon de tiuj novaj loĝlokoj. Tiu lasta, sekve, romiiĝis je lingva aspekto. Do la Arumana estas ia balkana dialekto de la malnova Latina. Ĝis antaŭ la invado otomana de Albanio, oni opinias ke ekzistis pli da tiaj loĝlokoj, transformiĝintaj en vilaĝojn kie estis parolata la Arumana. Post kiam Albanio estis okupita de turkoj, per islamigo de la loĝantaro, aparte en la areoj kamparaj kaj malaltaj, parto de tiuj loĝlokoj probable "albaniĝis" perdinte sian unuan lingvon arumanan.

Nur en la profundaj montaraj vilaĝoj tio ne okazis kaj tiuj loĝlokoj sukcesis eskapi de turka jugo konservante la kristanan eklezion kaj la arumanan lingvon. En la distrikto de Pogradec, en la regiono de Mokra, pasis iam branĉo de Via Egnatia, komenciĝinta de Mokra, malsupre je la limo kun la distrikto de Librazhd. La spuroj de tiu vojo vidiĝas jam en la vilaĝo Golik. Poste, la vojo supreniras sekvante la lipojn de la rivero Shkumbin. Apud la vilaĝo Golik, ĉe la rivero, troviĝas la postrestaĵoj de kelkaj pontoj malnovaj per kiu oni transpasis la riveron. La vojo preterpasis la vilaĝojn: Vërri, Proptisht, Slabinjë, eliras apud la vilaĝo Shpellë , kie oni trovis fragmenton de la praa vojo, pavimita per grandaj ŝtonoj, poste ĝi sin direktas al la vilaĝo LLëngë, apud kiu troviĝas malnova ponto, trapasas la vilaĝon Niçë kaj poste irigas vin al Voskopojë. La vila oĵ LLëngë kaj Niçë loĝatas de arumanoj. Grabovo apartenas al distrikto de Librazhd.

La ekzisto de arumanaj vilaĝoj estas ja plia atestaĵo pri tiu "Via Egnatia" en tiu areo. La loĝantoj de tiuj ĉi vilaĝoj historie havis malvastajn rilatojn kun la loĝantoj de Voskopojo, kies parto de loĝantaro estis ja la arumana. Postrestis, ĝis nuntempo, ankaŭ kelkaj loknomoj latindevenaj kiel ekz.: Fëngovë kaj Fëngë, devenantaj de la vorto "koto"; Bishnicë devenanta de "boseo" (arbaro); Laktesh de "lactum" (lakto); Shpellë de "Speleo" (groto); Niçë de "noce" (nukso). La loĝlokoj kiel Voskopojo, Niço, Llëngo, troviĝantaj en la profundaj areoj kaj eskapante la premon de la turka okupado, dum jarcentoj XVII-XVIII konis grandan disvolviĝon ekonomian kaj kulturen. Kune kun la tiutempaj grandaj loĝataj centroj kiel Berato, Elbasano, Shkoder, ankaŭ Voskopojo ege prosperis atingante dum XVIII jc 25 000 loĝantoj. Tiutempe, Voskopojo havis 26 preĝejojn, disponis pri propra presejo kaj altlernejo, aŭ tiel nomitan Akademion de Voskopojo. Tiu urbo estis la dua, laŭvice, pro sia graveco, en la Otomana Imperio, tuj post Istanbulo. Ankaŭ Llëngo, tiutempe, konis grandan ekonomian prosperiĝon danke al la butikoj, laborejoj, metiistoj kaj multnombraj komercistoj kaj loĝantaron je 10 miloj da homoj. Sed la detruo de Voskopojo je 1769 (pro grandega incendio) jaro influis ankaŭ la ekonomion de Llëngo, kiun trafis notinda falo. Parto de tiu loĝantaro foriris al la aliaj landoj.

La vilaĝoj Llëngo, Niço kaj Grabovo estigis geedziĝrilatojn inter si, tiel la arumana transvivis ĝis hodiaŭ en tiuj vilaĝoj, sed nun je pli malmultenombra loĝantaro. Parto el familioj descendis en Pogradeco-n kaj en la aliajn urbojn integriĝante en ties vivon, sed geedziĝante kun albanaj familioj, perdante tiamaniere, de generacio al generacio, sian arumanan lingvon, aparte la nova generacio, kiu jam naskiĝis, kreskis kaj sekvis la albanlingvajn lernejojn. La lernejoj jam malfermitaj en tiuj vilaĝoj ĉiam disvolvis la lecionojn en la albana lingvo, ĉar ne ekzistis skriba arumana lingvo. Nur en la urbo de Korço dum la jaroj 20-30 de XX jc estis malfermita lernejo por la arumanaj familioj kie oni disvolvis la lecionojn en la arumana, subvenciate de la rumana ŝtato kiu ĉiam estis interesata por la arumana malplimulto en Albanio.. Tia intereso kreskis aparte post la jaro 1990, ebligante al pluraj arumanaj junaj devenantoj akiri stipendion por plustudi en Rumanio. (Inter ĉi lastaj du ĝemelulinoj je familia nomo Ikonomi, esperantistinoj, jam estas diplomitaj pri juro en universitato de Cluj-Napoca)

La arumana loĝantaro, kiu loĝis apud la ekonomie evoluintaj urboj kaj loĝlokoj estis ĉiam interesata por la plialtiĝo de sia nivelo kultura kaj klera, tial ĝi sekvis ĉiam la altlernejojn kaj universitaton neniam sentante ian diskriminaciecon aŭ persekutecon fare de albana loĝantaro, nek dum la totalisma reĝimo, nek dum la reĝtempa periodo, des malpli hodiaŭ en la plurisma albana socio. Multaj estas tiuj el arumana loĝantaro kiuj poste okupis altajn postenojn en la registaro centra aŭ loka, kaj fariĝis eminentuloj en la aferisma sfero.

Dua

grupo

Alia grupo arumana, ne havante rilatojn kun la unua grupo, estas tiel nomataj vlahoj, loĝantaro ĉiam sin okupante per bestbredado kaj ĉiam moviĝanta de loko al loko. Oni opinias ke ĝi devenas de certa regiono en Rumanio, de Vlahio. Ekde la tempo de Otomana Imperio, vlahoj vagadis tra la tuta Balkanio kune kun siaj

ŝafaroj , paŝtigante ilin dum somero en la profundaj areoj montaraj kaj dum vintro en la malaltaj areoj ĉe marbordo, kie la klimato estis pli milda. Vlahoj neniam posedis ian difinan loĝlokon, sed ili loĝis en kabanoj provizoraj. Parto de tiu loĝantaro troviĝas hodiaŭ en Grekio, restinta ekde la tempo de la Otomana Imperio, dum alia parto restis en Albanio. Ambaŭ grupojn interligas nur la simileco sed ne la sameco de lingvo. La unua lingvaĵo estas ja ia dialekto de la Latina de Balkanio. Post la jaroj 60, tiu parto de la loĝantaro establiĝis finfine en apartaj vilaĝoj, ĉar en la tuta lando la agrikulturo kolektiviĝis, aŭ en urboj sin okupante per diversaj ekonomiaj laboroj.

En la distrikto de Korçë li establiĝis en la vilaĝoj Drenovo kaj Boboŝtiko, ĉar granda parto de la loĝantaro en tiuj vilaĝoj jam foriris al la urbo. Sed la plejparto de vlahoj enloĝiĝis en la regiono de Myzeqe. Ankaŭ vlahoj ĝuadis tuttempe egalrajtojn samkiel albanoj. Ili rajtis voĉdoni, edukiĝi en la albana lingvo, aparte post kiam ili definitive establiĝis en iliaj rezidejoj. Hodiaŭ ankaŭ vlahoj jam integriĝis komplete en la socian vivon de la lando ne sentante ian ajn diskriminaciecon kaj estas egalaj kiel ĉiuj aliaj civitanoj de Albanio.

3. La albana komunumo en Rumanio
En Rumanio vivis notinda nombro de albanoj je formo de ties diasporo. Ili estis tre gravaj por la albana nacio aparte dum la Otomana Jugo kiam enlande estis malpermesite eĉ paroli albanlingve. Nia komunumo en Rumanio ludis grandan rolon por vekti la nacian konscion de albanoj per siaj ĵurnaloj, libroj kc. Je 1881 albanoj loĝintaj en Buĥaresto kaj ĉirkaŭ ĝi, okazigis patriotismajn kunvenojn. Dum en la jaro 1884 ili fondis la asocion “Drita” (Lumo) kaj ekeldonis monatan periodikaĵon, samtitolan. Tiu ĉi estis la unua periodikaĵo en la albana enhavanta valorajn kulturajn, beletrajn kaj didaktikajn artikolojn. Post tri monatoj, ili ŝanĝis la ties nomon al “Dituria (Scio). Je 1888, ili fondis la eldonejon “Dituria” por eldoni albanajn librojn kaj ekeldonis semajnan periodikaĵon “Shqiptari” (Albano).

En Rumanio dum pluraj jarcentoj regis albanoj (Gjika, Duka, Suci kc). La unua prezidento estis Jani Gjika. Elena Gjika (1829-1888), rumana princino, estis patriota antaŭeninto de la distingita asocio de Buĥaresto kaj fiera pro sia albana origino el distrikto de Permet. Ŝi estis produktiva verkisto pri la temoj politikaj, religiaj, kulturaj kaj sociaj; ŝiaj skriboj portis ĉiam la pseŭdonimon Dora d’Istria. Je 1886 ŝi publikigis en kvar lingvoj- albane, france, itale kaj greke sian distingitan folkloran verkon, titolita “Kombësia Shqiptare” (Albana Nacieco), laŭ la popolaj kanzonoj. Per tiu verko kaj aliaj biografiaj resumoj kaj popolaj kanzonoj, ŝi elvolvis la jarcentan militon de sia popolo kontraŭ osmanan okupadon. En la letero skribita al la arbresa (alvanoj fuĝintaj en Italion en XV jc) poeto Jeronimo De Rada, subtenante la ideon de “ĝenerala revolucio” ŝi diras: “Se en Albanio eksplodas ĝenerala ribelo marte (1886) mi havas rezonon kredi ke Garibaldi favorigas ĝin materie kaj morale. Ni havas 15 000 ĝis 20 000 bonajn 15 frankaj fusilojn, kiujn ni povas ekspedi ĵus kiam ni estos sciigote”.

4. Porpaca klubo

Antaŭ nelonge, (decembro 2004) okazis interesa renkontiĝo internacia [en](#) Skopje (Makedonio). Temis pri balkanaj porpacaj kluboj fonditaj [en](#) ĉiuj landoj de [la](#) duoninsulo. [La](#) albana teamo el 40 personoj atingis [la](#) makedonian ĉefurbon je 17an de decembro 2004 kaj posttagmeze ĉeestis [la](#) kunvenon kaj koncerton akompanantan ĝin. Estis [en](#) [la](#) kunveno reprezentantoj ankaŭ el Grekio, Bulgario, Serbio kaj Montenegro, Rumanio, Bosnio kaj Hercegovino, Turkio, Kroatio, kaj kompreneble el Makedonio. [La](#) celo de tiuj kluboj estis plifortiĝo de amikeco interregiona per reciproka kultura interkonatiĝo, interŝanĝoj, por ke neniam plu okazu tiuj tragikaj eventoj de [la](#) lasta jardeko de XX jc. Tiun tagon oni disdonis al [la](#) partoprenantoj ankaŭ na unuan numeron de nova revuo je angla titolo "Balkan's Review" (nur [la](#) titolo estis [en](#) [la](#) angla, ĉar [la](#) tuta enhavo estis [en](#) [la](#) makedona!). [La](#) revuo entenis informaĵojn pri ĉiuj landoj de nia duoninsulo, verkitaj de diversaj ties etnuloj. Oni kantis ankaŭ [la](#) Balkanan Himnon sed ..[en](#) [la](#) Angla. Ĉiuj aliaj salutparoloj estis [en](#) [la](#) makedona. Certe ne estis facile traduki ilin [en](#) [la](#) alian komune kompreneblan lingvon! Nur fine tri geknaboj legis komunan saluton de infanoj respektive [en](#) [la](#) makedona, angla kaj albana. Mankis alilandaj infanoj (grekaj, rumanaj kc) por ke [la](#) saluton oni legu ankaŭ [en](#) alies lingvojn. Jen problemo: Balkanio, ne tro granda duoninsulo loĝatas de popoloj parolantaj tiom multe da lingvoj kaj dialektoj! Ĉu [la](#) Angla taŭgus kiel interregionan komprenigilon? Eĉ por tiu malgranda respubliko, kies ĉefaj popoloj estas makedonaj kaj albanaj etnuloj. Kial ne Esperanto?

Konkludo

[En](#) [la](#) erao de demokratiigo oni povas pli libere kaj facile protekti [la](#) homrajtojn ĝenerale kaj [la](#) etnajn rajtojn aparte. Tiucele, ankaŭ ĉe ni, stari ĝis asocioj kaj fondusoj apoge al malplimulto. Ili helpas al pli profunda konatiĝo de [la](#) stato kaj pliboniĝo de [la](#) vivkondiĉoj de [la](#) aliaj nealbanaj etnuloj [en](#) [la](#) lando. Kompreneble, tion ili povas sukcese realigi se oni ignoras [la](#) malican intervenon de certaj ŝovinismaj cirkloj [en](#) [la](#) najbaraj landoj, kaj se mem [la](#) albana ŝtato per siaj leĝoj kaj konduto helpas al [la](#) paca kaj amikeca kunvivado de ĉiuj siaj civitanoj.

• Bardhyl Selimi

"ETNO-KULTURAJ KARAKTERIZAĴOJ DE ALBANOJ"
(prelego en AlbAdria Konferenco en Triesto 21/05/2005)

Enkonduko

Albanoj estas ankoraŭ popolo malmulte konata ne nur al la fremda publika opinio de la regiono nia eŭropeca, sed eĉ al la ties najbaroj. Tion kaŭzis la fakto ke ili mem malmulte skribis pri si fremdlingve, kompare al la najbaroj slavaj, grekaj aŭ italaj, sed ankaŭ pro fakto ke dum pli ol 2000 jaroj ili suferis jugon fare de la plej potencaj imperioj, nome tiuj romia, bizanca, serbo kaj bulgaro-slavaj, otomana, kaj, post la Dua Mondmilito, de la totalisma komunisma reĝimo, pro ties politiko de ekstrema memizoliĝo.

Albanoj revekis la intereson de eŭropanoj dum la XV jarcento, kiam gvidite de ilia nacia heroo Skanderbeg, ili rezistadis 25 jarojn al la plej potenca tiutempa armeo otomana, savante tiel sian patrion kaj kontribuante samtempe al la saviĝo de la eŭropeca civilizacio. Tio estas tiom vera, ke Papo tiutempe nomis Skanderbeg “Atleton de Kristanismo” kaj pretis organizi tuteŭropan militistan kampanjon kontraŭ otomanojn sub la gvido de Skandebeg mem. Bedaŭrinde, vojaĝinte ĝis la Adriatika marhaveno de Ravena en Italio, Papo mortis kaj la kampanjo suspendiĝis.

Same, albanoj atentigis Eŭropon dum la XX jarcento per iliaj sinsekvaj grandaj ribeloj kontraŭ Altan Pordegon (legu: Otomana Imperio), devigante Sultanon Hamid la Dua deklari la Konstitucion (la jaro 1908).

Tamen, la grandaj ribeloj en la jaro 1010-1012 certigis al albanoj nur la sendependiĝon nur de la duono de iliaj teritorioj kaj popolanoj, fondinte la Albanan Respublikon kaj poste la Albanan Reĝlandon. Ambaŭ mondmilitoj alportis nur detruojn ankaŭ en la albanajn terojn kaj ne plenumis iliajn grandajn esperojn por la nacia reunuiĝo. Kontraŭe, eĉ la albanoj de la Popola Respubliko de Albanio ĝuis nur la plej kruelan komunisman reĝimon en la Orienta Eŭropo, almenaŭ ĝis la jaro 1990.

La jaro 1961 notis eventon eksterordinaran en la internaciaj rilatoj tiutempe: Albanio fakte sin disiĝis de la Militista Traktato de Varsovio. Estis tio ia granda ŝanco por ĝi rekuniĝi al la Okcidenta Eŭropo, kies parto ĝi tradicie jam estis kaj prosperi almenaŭ same kiel la najbaraj Italio kaj Grekio. Sovetianoj perdis tiam la plej grandan militistan marbazon de Vlora en suda Albanio kiu kontrolis la Kanalon de Otranto kaj tiel eĉ la tutan Mediteraneon, minacante serioze unuavice Italion. Sed la komunismaj gvidantoj rezignis je tio kaj tuj enamikiĝis al ĉinaj komunistoj de Maŭ Ze Dong, ĉar ili ne volis perdi sian ŝtatpotencon. La samo okazis en la jaro 1978, post kiam Albanio fakte disiĝis ankaŭ de la Popola Respubliko de Ĉinio. Sekvis ĉifoje periodo dekdujara de ekstrema memizoliĝo kaj atŭtarhio kiu ruinigis la enlandan ekonomion, ĉar la reĝimo entreprenis politikon de plia militaristiĝo de la tuta vivo de la lando kaj popolo, elspezante ĉion por “defendi la patrion kontraŭ kiu ajn atako fare de unuopa aŭ koalicio de imperiismaj ŝtatoj”. La popolo paŭperiĝis kaj la ekonomio falis ĝis neimageblaj niveloj. Tio antaŭkondiĉigis la disfalon de la reĝimo mem, kio komenciĝis per amasa elokupo fare de civiluloj de la fremdaj ambasadorejoj okcidentaj en Tirana somere 1990 kaj poste per ekfuĝo same amase per ŝipoj kaj surtere al la najbaraj Italio kaj Grekio precipe. Ĉio tio biblia granda eliro de albanoj estas ankoraŭ freŝa en la memoro de eŭropanoj kiuj sekvis ĝin pere de TV. Ili ĉiuj miris pro tiaj kompatindaj homamasoj ĉar amaskomunikiloj albanaj kaj la preso fremdlinge de la reĝimo komunisma dum multaj jaroj pompe laŭdis sin kaj reprezentis al la okuloj de la fremdaj legantoj kaj spektantoj Albanion kiel “floriĝantan ĝardenon de la Balkana Duoninsulo”.

Post faligo de la monumento de la lasta komunista diktatoro en Eŭropo, Enver Hoxha, februare 20, 1991, la lando pluiris al la liberaj balotoj kaj marte 1992 establiĝis la unua plurisma demokratia registaro.

Sed printempe 1997, denove eŭropanoj havis la okazon sekvi strangajn vidaĵojn de Albanio kaj ties loĝantoj. Temis pri puĉo komunisma kiu profituzis pro la seniluziiĝo de la popolo perdinte sian ŝparmonon, eĉ siajn hejmon, en la fifamaj lumonaj kompanioj kaj instigis ĝin al armita ribeliĝo kiu reenpostenigis iamajn komunistojn, nuntempajn socialistojn, en la ŝtatpotenco. La maloportuna jaro 1997 plurestos en la memoro de albanoj kiel malbonega sonĝo dum kiu ĉio reiris al la nivelo nul, la ŝtato pereis, la prezoj

kaptis la ĉielon, la vivo fariĝis la malplej sekura. Eŭropo intervenis venigante enlanden 6500 soldatojn por certigi normalajn balotojn de junio 1997.

Alia evento grand-dimensia estis la milito en Kosovo dum la jaroj 1998-1999. Printempe 1999, pro serboŝtata terorismo de la registaro de Miloŝeviĉ, Kosovon forlasis devige ĉirkaŭ miliono da etnaj albanoj, kies plejparto eniris Albanion kie ĝi trovis rifuĝejon kaj gastamon de sampatrujanoj. Denove la korŝiraj eventoj de tiuj tagoj altiris la atenton kaj la zorgon de eŭropanoj kaj ties registaroj kiuj grandanime helpis per ĉio por plimilidigi la suferaĵojn de mizeruloj – rifuĝintoj. La bonkoreco kaj gastamo de albanoj aperis okulfrape. Por komparo, estus samegale kvazaŭ italoj akceptus ene de kelkaj tagoj ĉirkaŭ 15-20 milionoj de rifuĝintoj en sian landon! La urbo de Kukes, poste nomata kiel “la ĉefurbo de rifuĝintoj”, gastigis ĉiun tagon 120 000 rifuĝintoj kiam mem ĝi enhavis ne pli ol 18 000 loĝantoj!

Kiel tio povus okazi, kiam, kiel sciite, Albanio estas la plej malriĉa lando de nia kontinento? Certe tion oni povus ekkompreni se oni ekkonus iom el la historio de albanoj kiel nacion kaj etnon.

Albanoj posedas multajn riĉaĵojn spiritajn. Menciindaj estas ilia folkloro, entenanta interalie la faman Eposon antikvan konservatan ĝis hodiaŭ; same la etnografio, popolaj kostumoj, dancoj kaj kantoj aŭtentikaj, glora historio, la Kanuno, probable plej antikva Jura Kodo, entenanta ne skribitajn leĝoj regulintaj dum jarcentoj ilian vivon, en la kondiĉoj de gremda jugo, mem la albana lingvo, probable la plej malnova en nia kontinento.

Kie loĝas albanoj

Albanoj loĝas unue en ilia sendependa ŝtato Respubliko de Albanio, je nombro ĉirkaŭ 3.5 milionoj, kaj teritorio ĉ. 29 000 km² ; due en Kosovo, (ĉ.93 %), je nombro pli ol 2 milionoj kaj teritorio ĉ. 11 000 km² ; trie en Makedonio, kompakte en ties suda kaj okcidenta partoj, teritorio ĉ. 8000 km² , je nombro apenaŭ milionon (menciindas ke Skopje, nuntempa ĉefurbo enhavas pli ol 200 000 etnaj albanoj) ; en Montengro, suda kaj marborda parto, je nombro almenaŭ 100 000 (menciindas la urboj preskaŭ pure albanaj kiel Ulqin, Tuz, Tivar, ks) ; en Serbio, suda parto, je nombro ĉ. pli ol 100 000 (Regiono de Preŝevo) ; en Bosnio, Sandĵak (Novi Pazar); en norda Grekio, ĉirkaŭ la landlimo kun Albanio, precipe en regiono nomata Ĉamerio, je nombro almenaŭ 100 000 (de la golfo de Ambrakio ĝis Folorino). Ĉi supre, temas pri albanoj loĝantaj en siaj propraj teroj hereditaj de iliaj antaŭenintoj dum jarcentoj.

La albana diasporo konsistas el kelkmilonoj da loĝantoj, unue, en la respublikoj de la eksa Jugoslavio (Serbio, Bosnio, Kroatio, Slovenio), en Turkio (kvankam la turka ŝtato ne agnoskas minoritatojn), Grekio (menciindas ke nur en Ateno vivas almenaŭ 400 000 albanoj aŭ 8 % de ties loĝantaro), Italio, Okcidenta Eŭropo, Usono, Kanadio, Aŭstralio, aliaj landoj de Balkanio kaj eĉ en Argentino kaj Ukrainio.

La origino de albanoj

La nomo “albanoj” kaj “arber” aperas en VIII jarcento, kiam fondiĝis la tiel nomata “Ŝtato de Arber” ie en la nuna Meza Albanio. Sed la origino de albanoj, laŭ unu tezo, estas ĉe iliroj, granda popolo antikva, loĝanta sur la tuta okcidenta Balkanio, ekde Danubo ĝis Adriatika kaj Jonia maroj, ekde suda Bavario ĝis la Golfo de Ambrakio. Alia tezo asertas ke albanoj devenas rekte de pelazgoj, la aŭtoktona popolo de Eŭropo, kies lingvo formis

poste la sanskritan, la malnovgrekan, la latinan, la slavan kaj ĝermanan lingvojn. Pruvaĵoj por tio, laŭ franca lingvisto Robert d' Angely, estas la fakto ke plejmultaj epitafoj el antikvaj civilizoj eŭropaj estas deĉifritaj jam danke al la albana lingvo. Alia albandevena aŭtoro Aristidh Kola, verkis kelkajn librojn por pruvi ke la greka devenas de la praa albana kaj la pelazga estas ja la unua lingvo biblia, la lingvo de Dioj, parolita de homoj almenaŭ en nia malnova kontinento. La fama albana verkisto Ismail Kadare, atentigas ke la albana lingvo, pli ol la albanoj mem altiras nuntempe grandan interesiĝon, fare de fremdaj esploristoj ĝuste pro ties praeco, kiel probable la plej malnova lingvo ne nur en Balkanio.

Vico da argumentoj estas jam konvinkinta la lingvistojn ke la albana popolo kaj ties lingvo devenas de praaĵ iliroj. Tiel la nacia nomo "Albania" devenas de la vorto "Albanoi" indikinta iliran genton menciita de geografo Ptolemeo de Aleksandrio ĉirkaŭ la jaro 150 post Kristo; la teroj de tiama Albanoi havis sian centron en Albanopoli, ie inter Durres kaj Kruja, la koro de nuntempa Albanio

Dum pratempo, en Balkanio vivis kvar diversaj popoloj parolintaj siajn lingvojn: grekoj sude, makedonoj centre, trakoj oriente kaj iliroj okcidente. Hodiaŭ la albana parolatas en tiuj regionoj kie iam parolatis la ilira; tiuj malmultaj lingvaj elementoj konatiĝintaj kiel vortoj de la ilira povas eksplikati nur per la albana kaj ne per la aliaj lingvoj; lingva komparo inter la albana, la greka kaj la latina pruvas ke la albana, kiel lingvon estis jam formita pli frue ol la aliaj malnovaj lingvoj; la arkeologiaj donitaĵoj atestas pri kultura kontinueco de iliroj al la albanoj. La kontinuaj rilatoj kun popoloj kaj aliaj lingvoj estas postlasintaj siajn spurojn en la vortaro de la albana. Kvankam estas luitaj fremdaj vortoj el la greka, latina, slava kaj turka, la albana estas konservinta sian memstarecon kie lingvon, kies gramatika sistemo estas restinta praktike neŝanĝita; la lingvistoj evidentigas multajn teknikajn similaĵojn inter la iliraj kaj albanaj vortoj; la luaĵoj el la greka kaj latina en la albanan spegulas la politikan kaj kulturan premon sur la iliraj regionoj.

La studoj montras ke la albana estas evoluinta el la ilira kiel memstaran lingvon iam inter IV kaj VI jc post Kristo. Tial la grekaj kaj la latinaj luaĵoj ne devas esti penetrinta rekte al la albana, sed antaŭe en la iliran kaj de tie al la albana. La iliraj toponimoj, la malnovaj iliraj nomumoj de la urboj, riveroj kaj montoj estas konservitaj en la nuntempa albana lingvo kaj nur en la albana. Estas jam trovitaj pli ol 300 tiaj nomoj kiel Shkodra, Drini, Tomorri menciataj de pratempaj grekaj kaj romiaj geografoj kaj historiistoj. La reguloj de la historia fonetiko eksplikas la transirojn de Scupi al Shkupi, Scodra al Shkodra, Lissus al Lezha, Durrachium al Durres, Drinus al Drin, Mathis al Mat.

La propraj iliraj nomoj daŭre uzatas en la nuntempa albana, kiel ekz. Agron, Teuta, Bardhyl. Prof. Mahir Domi estas identiginta 800 tiajn nomojn. La diversaj terminoj por la faŭno en la albana lingvo atestas ke tiu ĉi popolo estas vivinta laŭlonge de la marbordo en la samaj regionoj samkiel la iamaj iliroj. En la albana lingvo estas ankaŭ aliaj vortoj, kiujn la grekaj kaj romiaj verkistoj estas difinintaj kiel el la ilira tempo. Iliroj per iliaj kutimoj kaj moroj, muziko, vestoj karakterizaj kaj aparte per ilia lingvo estas transvivinta en siaj regionoj, kvankam jam kontrahigitaj laŭlonge de la okcidenta marbordo de Balkana Duoninsulo. Ĉar ne ekzistas ia atestaĵo aŭ signo de pereco, asimiliĝo aŭ translokiĝo de ili, ne restis io alia ol akcepti ilian kontinuecon senĉesan historian. Ne estas dubinde ke hodiaŭaj albanoj estas rektaj posteuloj de iliroj, kiuj iam en la tempo de praaĵ gerkoj kaj romianoj estas vivintaj en la samaj hodiaŭaj albanaj regionoj.

La etna unueco de albanoj

Albanoj formas , malgrau' la diferencoj, (oni distingas kvar etnogrupojn: gegoj, toskoj, lapoj kaj ĉamoj) unu etnan-kulturan historian unuecon, sekvita de geografia unueco. Ekzemple la albana log'ejo tradicie estas havinta unuan funkcion defendon kaj ne komforton, la formon de la nobelturo. Estas ja en la individueca naturo de albano ke samtiel kiel iliaj praavoj iliraj kaj aliaj popoloj indogermanaj praaj kiel ekzemple germanoj, log'is en ununura izolita hejmo. Tio kiam la familio plikreskiĝas, pligrandiĝas, plilarĝiĝas per kortoj, fariĝas genta kvartalo kaj laste tuta genta vilaĝo. Sur la kampo de kostumoj malgraŭ la multvarieco ni rimarkas ke la blanka koloro estas la nacia koloro de la albana vesto. Aparte la blanka ĉapo estas tio kiu malgraŭ la diferencoj de la formoj sekvantaj de gento (Kosovo, Dibro, Meza Albanio, Myzeqe, Laberio, ks) distingas la albanon en la tuta Balkanio. La koloro devenas de la blanka lano de ŝafaro, per kiu la paŝtista loĝantaro teksas mem siajn vestojn. Samtiel, aperas la samaj objektoj de la materia kulturo, ilaro kaj ujaro.

La ekstera aspekto de albanoj estas difinita de dinarika raso, kiu ampleksas ankaŭ serbokroatajn kaj grekajn partojn. Sed albano jen li altstatura, jen malaltstatura, jen je blanka aŭ profunda komplekseco, je lia konduto, esprimaĵo de vizaĝo, rigardo de okulo sin distingas ĝenerale klare de aliaj ĉirkaŭantaj popoloj.

Edit Durham, angliano vizitinta Albanion komence de XX jc kaj esplorinta sufiĉe bone balkanianojn, priskribas tiamaniere albanojn:

Estas du tipoj de albanoj, malhelaj kaj blondharaj. La blondhara estas pli kutima, kiom mi konstatis tion en la suda parto de la lando. La karakteriza homo portas nazon kiel tiu de Dante, je klinita pinto, mallarĝa en la ponteto kaj muldita; brovo tre distingita kiu komencig'as rekta kaj turniĝas kliniĝante ĝis la osto de la okula kavaĵo ; la makzelo estas longa kaj ĝi descendas malsupren laŭ regula linio kaj finiĝas al firma mentono fendita surpinte. La kranio malposte estas ebena kvazaŭ oni detranĉis de ĝi pecon kaj larĝas ĝis apud la orelo, tiu plie c'e la blondharulo, kiu portas foje hararon kafkoloran kaj ofte flavan (linkoloran kaj okulojn grizkoloran). Laŭstature li estas alta (ne tiom kiom la montenegrano), ne tro dika, je lumboj maldikaj kaj malfermeblaj. La malhela tipo kiu proksime de Peja kaj en Gucio estas tre malhela, estas ĝenerale je kranio longa, sed kutime malaltstatura. La akcentado de lokaj diversecoj devenas de genta sistemo kaj manko de komunikado.

Ami Boue diras ke se albano posedas fizikajn ecojn de svisoj kaj tirolanoj, se li estas kiel ili, senlaca marŝanto surpiede, kiu per fusilo surŝultre supreniras kaj malsupreniras samkiel la kapro en la montogorĝoj, ĉe li estas unuiĝintaj la vigleco kaj lerteco kun detaloj kaj eksterordinara prezenco de de la menso.

Albanoj estas la popolo de la rapidaj kaj akraj respondoj, "par excellence". La natura orgojleco de albano esprimiĝas eĉ en plej mallongaj liaj vortoj , en la gestoj, en la facila irado pri kiu mi povas diri iel teatreca. Ĉe li la kuraĝo estas io denaska. Se ili civilizigu certe ili fariĝus ne svisoj de Oriento, sed fajnaj francoj, tio estas unu el tiuj popoloj kiuj super c'ion aprecas okupitecon. La vivo kun danĝeroj estas tiom forte ilia elemento kiom la malfeliĉaĵoj dummilite apenaŭ pezas por ili.

J.Ph. Fallmerayer konsideras Albanion kiel landon de forta volo kaj kurta menso. Sed tio ne estas la ununura kontrasto entenata ĉe la karaktero de la albana popolo. Iam drameca vejno trapasigas tiun ĉi karakteron de albano kiu estas alkiutimiĝinta plie agi abrupte ol resti pensante. La drameca karaktero ĉeestas ankaŭ en la albana historio kun ĝiaj ĉefaj

figuroj. Herbert Louis diras ke ĉiu albano agas laŭ lia propra kapo. Kiu ajn el ili, ĉu saĝa c' u stulteca disponas pri konsiderinda decidpotenco kaj estas lerninta riski en siaj agoj jen bonhavyon jen sangon. Tiel en malfacila situacio ĉiu partoprenanto, sendepende de la granda aŭ malgranda juĝpotenco montras mirindan grandecon, ĉar kiuj ajn kapablas ricevi fortan iniciativon. Kurte, ne estas indiferenta amaso.

La spirito de la albana popolo estas tute realisma kaj koncernantan tiun ĉi mondon. Konforme al tio lia agado estas elvolviĝinta surkampe de administrado kaj militado. La spirita esenco de albano estas sindetenado. Tio eksplikatas per hereditaj ecoj kaj per la ferma kaj severa naturo de la lando. Li estas prudenta je paroloj kaj laboro. Obstineco estas alia karakterizaĵo rimarkebla ĉe iliroj, rimarkeblas ankaŭ en la albanaj kolonioj hodiaŭ. W. Briquet difinas la karakteron de albano fiera kaj senbremsa, honesta, amika al la vero.

Familio estas tre grava por albano, ĉu por vilaĝano, ĉu por civitano. Tio estas por la montarano la gento kaj granda familio, por civitano estas familio. Tio estas la vivocelo de kiu ajn strebanta al honoro kaj bonfarto de liaj hejmuloj. La deziro por migrado kaj la nostalgio por la tero kuniĝas ĉe albano mirindmaniere. La respekto al la moroj kaj kutimoj estas eksterordinare granda. La forto de rezisto de la albana lingvo atestas pri la konservativa karaktero de albano. Multaj moroj de la naskiĝo, geedziĝo kaj morto, kalendaro de festotagoj de la jaro, superstiĉoj kaj mitologiaj figuroj, netuŝebleco de la virinoj kaj etuloj, aparta sinteno al la amiko kaj malamiko estas kelkaj el la spuroj kaj aspektoj de tiuj ĉi komunaj moroj de albanoj.

Historio de Albanio estas ja historio de personeco. Ni memorigas la adoron pri Skanderbeg ks.

La religia skismo en Albanio neniam estis profunda. Kvankam Albanio estas lando kie la religiaj kvereloj inter la Eklezio de Oriento kaj Okcidento estis tre akraj, same veras ke la fremdaj religiaj influoj estas erodigintaj iom post iom la teritoriojn en la albanaj randoj, sed ne estas detruintaj la unuecon de la albana nacio. La ekzisto de multaj komunaj moroj antaŭkristanaj kaj kristanaj ĉe ĉiuj socitavoloj de la popolo kaj en ĉiuj regionoj estas helpinta, senvole, por konservado de tiu unueco. La konscienco de gento kaj la nacia sento estis ĉiamfoje pli fortaj. En decidigaj momentoj la apartaj religiaj interesoj estas flankelasitaj antaŭ la komunaj naciaj interesoj.

Geografiaj kaj historiaj kondiĉoj

La reliefo de Albanio estas ĉefe montara, je alteco averaĝa duoble de tiu de Eŭropo, kun longa marbordlinio kaj sufiĉe varia klimato, de tiu subtropika al tiu kontinenteca. La agrokampoj estas abundaj en Kosovo, Makedonio, dum la plantacioj de agrumoj kaj olivarboj riĉaj precipe en Suda Albanio kaj Norda Grekio. Albanio kaj Kosovo posedas senfinajn subterajn riĉaĵoj, je mineraloj de kupro, kromio, fero, aluminio ks.

En tiaj naturaj kondiĉoj kreskis la etna albano dum jarcentoj

Ekde la romia okupacio (II jarcento A. K.) albanoj suferis preskaŭ tutan tempon la fremdan jugon, tio estas 2000 jarojn! Liberaj albanoj estis nur mallongan periodon dum XV kaj XX jc., se temas nur pri la sendependa albana ŝtato. Tamen certaj regionoj ĉefe montaraj, en norda Albanio kaj aliloke sukcesis konservi sian liberecon pro geografiaj kondiĉoj. Tiel, vasta regiono de Mirdita (albana pura esprimaĵo signifanta "Bonan tagon") plurestis libera, kio eksplikas ne nur la fakton ke ĝia loĝantaro estas entute kristana-katolika, sed ankaŭ ke en ĝi mankas ĝenerale fremdaj loknomoj.

Kiel ajn la longaj kaj kruelaj okupacioj fremdaj influis notinde en la vivmanieron, konduton, karakteron ka de la albanoj. Sufiĉas mencii la fortan influan de otomana imperio en la moroj, arkitekturo, kuirarto, etnografio ks en ĉiuj partoj de la Etna Albanio (teritorioj kie oni parolas la albanan). Manko de la propra ŝtato instigis ian emon al anarĥismo kaj malrespekto de la leĝo, ian pragmatismen, adaptiĝon al la fremda reĝimo, al emo servi al fremduloj eksterpatrie eĉ fidele kaj skrupule. Ankaŭ la amasa islamiĝo de albanoj estis rimedo por eskapi la pezajn ŝtatimpostojn altruditaj ĉefe de otomana reĝimo por kristanaj civitanoj, kaj por certigi al si pli dignan vivnivelon enposteniĝinte en la armeon kaj ŝtatan administracion.

Samtiel la malfacilaj vivkondiĉoj en la regionoj montaraj kie la agrokapmpoj estis tre limigitaj kaj mankis necesaj investaĵoj por malfermi laborpostenojn kaj prosperigi la landon, instigis albanojn fuĝi eksterpatrien kaj sin labori por la aliaj, same al rabado kaj ŝtelado. Tio estas tiom vera kiom ĝis malpli ol unu jarcenton antaŭe oni konsideris digna junedzo tiuj junulon kiu kapablis forŝteli de aliuloj plej multe.

La loĝantoj de la profundaj montaraj regionoj havis severan karakteron kaj aspekton, estis silentaj, individuismaj, samkile mem la medio ĉirkaŭe.

Nature, karaktero de la homo estas io dinamika, en evolu, ŝanĝiĝanta kune kun la tempo, kune kun la sociaj kaj materiaj interrilatoj kaj kondiĉoj. Gravan rolon ludas ankaŭ la kleriĝo kaj kulturo, la ideoj dominantan certan epokon.

Tiel, ni konstatas notindajn diferencojn inter la tiel nomata tradicia kaj moderna albanoj.

Oni ĉiam pli rare renkotas hodiaŭ la tradician albanon ne nur je ties ekstera aspekto (vestoj, konduto, ks) sed precipe je ties interna spirita animo kaj moralo.

Tamen fremdaj esploristoj konstatas ke albanoj estas konservintaj relative pli multe da ecoj el iamaj antaŭenintoj, ecoj kiujn la monda beletro elĉerpas el antikveco.

Tradicia albanoj

Faik Konica- verkisto, eksambasadoro de la Albana Reĝlando en Usono inter du mondmilitoj estas skribinta:

La plej granda ofendo por la albanoj estas konsideri ilin malfidelaj. Pluraj kazoj de sangoverŝoj ekis pro tia akuzo. En Grekio la plej granda ofendo estas nomi grekon “ignorulo”, “malklerulo”. Do, la idealo de niaj sudaj najbaroj estas la saĝeco dum la nia estas forta karaktero.

- Popola proverbo albana eldiras ke “Albano bruligas la litkovrilon pro unu cimo”, kio signifas ke albano estas malpacienca kaj temerara.
- Alia regulo de la bonkonduto eldiras: La pardonita kapo ne detranĉitas” kio signifas ke la militkaptitoj ne mortigitas. La bizanca historiisto Nikifor Gregoras diras ke “albanoj ne mortigas nek ensklavigas siajn militkaptitojn”.
- Ekzistas alia regulo konata tutmonde kaj pruvita en la vivo: ĉe albanoj “la virino estas netuŝebla”. Eĉ en la kazo de sangovenĝo, ankaŭ dum la severaj bataloj- The oni neniam pafis kontraŭ la virinojn. Kiam kelkiu sentas minacon de sangovenĝo fare de aliulo-, okazas ke li kunvojaĝas sekure je la akompano de virino, kvankam tia ago konsideratas malvireco. Eĉ la vojrabistoj respektas tiun regulon. Je la komenco de XX jarcento, la preso raportis pri eksterordinaĵo: la vojrabistoj haltigis trajnon Pariz—Istanbulo ie en Trakio. Oni ordonis ĉiujn virojn eltrajniĝi. Poste oni forrabis ĉion valoran al la viroj. Dumtempe oni ne tuŝis iun virinon, kontraŭe la kapo de rab-bando de fojo al fojo petis pardonon al la virinoj pro tia

ĝeno kaŭzita al ili.. Oni komprenis la naciecon de la rabistoj danke al la vortoj elparolitaj de ili.

- Ĉiuj turkaj historiistoj parolas pri obstineco de albanoj. Krome, ili opinias ke albanoj estas echfrenozuloj. “Li havas albanan vejnon”- eldiras iu el turkaj esprimaĵoj. Anekdoto: Iu bulgaro estis enmetante najlon en la muron frapante ĝin per sia propra kapo. Post iom da sekundoj la najlo ne lu progresis. Mirigite la bulgaro iris trans la muron por kontroli la aferon. Je lia miro albano estis malhelpante tion per sia propra kapo...
- Alia eco de albanoj laŭturkoj estas ilia granda avido je mono. Pro mono albanoj pretas entrepreni eĉ la plej danĝerajn aventurojn. Oni demandis albanon : Ĉu vi deziras iri al la infero?—Albano respondis per demando: Kiom da mono oni pagas tie? Anekdoto: Antaŭ la oficialulo de dungado sin prezentis kvar albanoj respektive el Shkoder, Vlora, Korĉa kaj Tirana. Post kiam ili certiĝis ke estas ankoraŭ vakaj laborpostenoj, ili demandis sinsekve. Shkoderano: Ĉu estas ankaŭ virinoj en la laborejo? Vlorano: Kia posteno estas je mia dispono? Korĉano: Kiom da mono oni pagos? Tiranano: Ĉu la laboloko estas apud mia hejmo? En Kosovo cirkulas la esprimaĵo: Oni povas enspezi en Prishtina, elspezi en Prizereno kaj morti en Gjakovo.
- Grekoj parolas pri “albana kapo” je la senco ke ĝi estas ankoraŭ sovaĝa kaj diras ke “Dio ne estas albano” je la senco ke albano estas malkompatema.
- Italoj uzas la esprimaĵon Far l’ Albanese, kio signifas ihnorecon
- The Dum francoj diras “fiera kiel albano” (fier comme un Albanais)
- Uiljam Martin Lik (William M. Leake, Angla pentristo, jaro 1804) skribas ke albanoj estas ĝenerale pli malriĉaj ol turkoj, pli prudentaj, pli paciencaj kaj stoikaj, suferantaj ekde infanaĝo. Sed turkoj karakteriĝas je pigreco kaj orgojleco, grekoj estaas perdintaj sian viklecon pro la kontinua premo kaj povreco, dum albanoj sin distingas pro ilia senlca aktiveco. Ili jam kaptis ĉiun dominantan vojpunkton. Al miaj demandoj pri topografio ili respondas sagace kaj precize, kaj plej bona rekompenco por ili estas la permeso por ekrigardi per mia angulmezurilo. Estas tre granda diferenco inter la konduto de albanoj kaj otomanoj
- Por Hobhauz (jaro 1813), amiko de Bajrono, nomita poste kiel lordo Brauton, evidentigas ke la nacia sento de albanoj estas esenca karakterizaĵo ilia. Kiam oni demandas aliajn naciojn en diversaj partoj de Turkio “kio vi estas?” la respondo estas “ mi estas turko”, “mi estas kristano”, dum la loĝantoj de Albanio respondas “mi estas albano”.
- Zhylien de la Gravjerë (1876) estas dirinta ke “la nacieco unuigas albanojn pli multe ol ilin dividas la religia aparteneco.
- La perfideco apenaŭ troveblas inter albanoj- aldonas Hobhauz.
- Bajrono donas kelkaj interesajn rimarkojn pri albanoj kaj skotaj montaranoj: Ambaŭ ili similas unu al la alia pro la vestoj, staturo kaj vivmaniero. Ankaŭ iliaj montoj similas al tiuj de kaledonio, sed havas pli mildan klimaton. Ilia fustanelo (karakteriza popolvesto), kvankam blankkolora, diference de kilto, alta kaj vigla

staturu, elparolo je sonoj de la kelta kaj iliaj pezaj kutimoj, ĉio tio memorigas min pri Morveno.

- Edvin Piërz (Edwin Pears, 1912) diras: la kvin karakterizaĵoj de albanoj estas ja : nobleco, ĝentileco, sendependeco, toleremo kaj fideleco.
- Dr Herbert Luis (Herbert Louis, 1927), germano diras ke en Albanio ne troveblas indiferentaj masoj, tio estas la albanoj ne povas subiĝi.
- Albanoj aprezas la sperton. Tial ili diras “ Kiam egipto fariĝis paŝao, la unua ago lia estis la pendigo de sia patro”
- Alia apartaĵo de albanoj estas ilia ĝenerala abomeno al la kondamno. La mortkondamno konsideratas io terura. Neniu albano deziras roli kiel ekzekutisto. La polico apenaŭ trovas tiulojn inter egiptoj, kiuj plenumas la taskon tute neprofesie, plilongigante la suferaĵojn al la mortkondamnito. Aparte albanoj malamas la mortkondamnoj pro politiaj kialoj. Laŭ la Kanuno la kondamnoj inkluzivis: monpunon, la forbruligon de la hejmo de kulpanto, la forpelo disde la regiono sed neniel la enprizoniĝo, nek la mortkondamno. Tio eksplikas do kial tiel longe daŭris enlande la sangovenĝo. Interesa koncepto ĉe albanoj estas ke la kondamnito, post kiam li estas kvitinta je lia kulpajo, ne plu konsideratas ekskulpanto.
- Albanoj ne toleras la mallaŭdojn. Laŭ iu diraĵo oni ekscias ke estas pli bone “Mortigi kelkiun, anstataŭ mallaŭdi lin”. Anekdoto : en la juĝejo dum otomana tempo la prokuratoro alparolis al la akuzito per vorto “kornulo” kio signifas ke lia edzino estas malhonesta. La ofendita albano ne respondis samvorte , nur diris ke la prokuratoro estas almenaŭ malbravulo. La postan tagon ekvidinte en la halon sian bofraton , la akuzito sciigis lin pri la eldiraĵo de la prokuratoro. Post kelkaj tagoj oni trovis la prokuratoron mortigitan per kuglo surfrunte.
- Ĉe albanoj apenaŭ ekzistas ia sento de idealismo. Multaj mortas pro banalaj kialoj sed apenaŭ aŭdeblis ke kelkiu mortis pro alta idealo.
- Gastamo ĉe albanoj estas fabeleca. Ĝenerale albanoj estas iom timemaj antaŭ la fremduloj sed kiam ĉi lastaj eniras iliajn hejmojn ili tute transformiĝas, sendepende de fakto ĉu ili estas riĉaj aŭ malriĉaj. En la Kanuno oni deklaras ke “la hejmo de albano estas ja hejmo de Dio kaj la gasto”, kio signifas ke la gasto egalrangas kiel Dio por albanoj!
- Severa honesteco ĉe albanoj esprimiĝas unuavice per la morala unika kategorio de Besa, donita parolo, kiu estas sankta kaj ne bezonas skriban garantion. “Ĉu vi kredas al tiu?- diris Henri N. Breilsford (1906) al bulgara episkopo en Makedonio.-Li ja estas albano, aŭ ne –respondis la episkopo slava, agnoskinte la honestecon de albanoj kvankam slavoj historie travivis grandan malamikecon kun albanoj.
- Alia virtuo de albanoj estas ilia profunda sindediĉo al geptaroj kaj al familio. Ĉi lasta okupas ĉe albanoj la lokon de la ŝtato.
- Tipa albana virino estas tiu kiu ege amas sian hejmon kaj serenajn ĉirkaŭaĵojn, kaj sindediĉo al la maljuniĝintaj tradicioj.
- Albanoj estas servintaj kiel al la fremdaj ŝtatoj kaj riĉuloj, nelaste kiel militdungitoj en la kortegoj de reĝoj de Francio, Hispanio, Sankra Romia Imperio, Venecio ks lasante notindajn spurojn. Estis tempo kiam la nomo

“albano”, asociiĝis per la nomo “marrabisto”. Servantes rakontas ke lia forrabisto en Alĝerio estis ja albana marrabisto Arnaut Mami.

- La plimulto de albanoj plurestis libera, ĉar la “servutuleco kaj sklaveco estis neimageblaj al ili”. Sekve en la hommerkatoj de Turkio apenaŭ troveblis iu albana, ĉar estis neeble ordoni al ili, eĉ estis danĝere havi sklavon albanan.

Jacques Bourcart

Jaro 1921 “Vojaĝo al Malnova Albanio”

Ni admiras la virecon kaj insistecon de bulgaroj, honestecon de la turkaj kamparanoj, la kuraĝon kaj bonecon de la serbaj vilaĝanoj; ni povas aprezi tiun humilan obeemon, malviglan subiĝon de la makedona taglaboristo, restinta ekde la turka tempo. Tamen ĉer neniu el la popoloj de Balkanio ni renkontas tiajn virecajn virtutojn kiaj ja ili estas rimarkeblaj ĉe albanoj. La albana kamparano aŭ montarano, kun kiu mi vivis kaj manĝis, en kies hejmo mi tranoktis, aspektas kiel granda sinjoro kompare al liaj balkanaj najbaroj. Konservante kaj demonstrante kiam ajn afablan ĝentilecon kaj tian memprudenton, kiun enius eĉ la arabaj gentoj plej noblaj, albano montras grandan moralan dolĉecon kaj veran fierecon de batalanto. Mi miris kiam foje mi rimarkis kiom bone interkompreniĝis unu al la alia albanoj kaj francoj. Tio estas komprenebla ĉar la menso de albano posedas naturon tute okcidentan, estas tre vigla kaj scivolema, dum ilia karaktero estas diskreta, pura kaj gaja, ĉiam preta ekfidi kaj ekligi amikecon. Ĉe albanoj ne rimarkeblas tiu kaŝeco kiu distancigas nin, eŭropanojn, disde multaj popoloj de Oriento.

Kelkaj albanaj popolaj proverboj

Honora morto estas ja ora kovrilo (Shkodër)

Ne estas surdulo pli surda ol la homo kiu ne volas au'di. (Sudo)

Lin oni ne permesas eniri la vilag'on, li pretendas svati la pastran filinon. (Sudo)

Oni volas vendi poreon al la poreovendisto. (Elbasan)

Oni kondukas vin al kvardek akvofontoj kaj ne lasas vin trinki. (Kosovo)

Envers'i salon en alies mang'aj'on (Gjirokastër)

Kara je branroj, malkara je faruno. (Gjirokastër)

Preterlasi la c'ambron kun sterko kaj balai la korton (Sudo)

Ne vendas ja la anguleto kiom vendas la kalvulo.

Ne edukita homo similas al ne ellaborita ligno (Sudo)

La okuloj estas por vidi, la menso por dividi (Sudo)

La maron s'veligas la ondo, la viron levigas la parolo (Nordo)

La parolo estas oraj'o kiam oni pesas g'in bone kaj parolas g'uste. (Shkodër)

La vira parolo, fusilo c'e la muro. (Shkodër)

Maldigna parolo, pli peza ol la kuglo (Dibër)

La lango estas glavo je du klingoj (Shkodër)

La salon envers'u limigite, la parolon mezuru per pesilo (Lushnjë)

Kiu silenti ne kapablas, tiu ec' paroli ne scipovas. (Sudo)

La infanon vartu, sed la maljunulon ne forlasu (Arbres'oj)

La fadeno devas simili al la s'tofo (Dibër)

La bonan parolvorton kie ajn vi trovas g'in ricevu (Shkodër)

La malg'ojon de la vespero postlasu por morgau' (Shkodër)
Karbardaj'tenilon de alies ne farig'u (Sudo)
Ne farig'u malavarulo per la alies monujo (Lushnjë)
Ne s'ajniku vin al iu gravulo, ne s'ajniku vin al iu havulo(Sudo)
La vojon forlasu, de amikoj ne disig'u. (Lushnjë)
Vinarbon ekmaturig'anta kaj figon j'us elc'erpig'anta neniam mang'u (Sudo)

Vendu la c'evalon kaj lernigu la filon (Kosovo)

La kulpo estas orfulo, neniŭ ties mastro aperis jam (Elbasan)
Ec' peltaj'on la kulpo farig'u, neniŭ vestas g'in (Elbasan)
La justa parolo estas maldolc'a (Shkodër)
Prijug'u min, poste mortigu min (Sudo)
La ric'ulo donas el sia restaj'o, la malric'ulo donas el sia koro (Elbasan)

Pli bone havi amikon ol bienon (Kosovë)

Bona amiko estas pordo de paradizo (Sudo)
La azeno ne lamas pro la oreloj (Elbasan)
Ne pravigas la s'arg'o la voĵag'koston (Sudo)

Pli bone esti unu tago falkon ol cent jaroj buteon (Nordo)

La hundoj boĵu sed la karavano antaŭ'enmars'u. (Sudo)
La aglo flugas alten sed sian neston g'i starigas surtere (Labërio)
La birdo en la kag'o kantas pro malg'oĵo (Shkodër)

La albano au' tostas kun vi au' militas kontraŭ' vin (Sudo)

La albano promesinte la parolon, pretas ec' sian filon buc'i. (Sudo)

Hejmo de albano estas ja hejmo de amiko kaj de migranto (Nordo)

La albano pretas sin senkapigi sed la donitan parolon ne rompigu (Nordo)
La albano ne lasas sin malveng'i kaj la s'uldon senkvitigi. (Nordo)
Frumatene la pordon malfermu c'ar la hejmo plenig'as je sorto (Shkoder)
Oni ne lau'das la floron sed la abelon por la mielo (Laberia)
Senlaboreco estas ja la patrino de fieco (Sudo)
Se la farmisto timus pro la vermoj en la agrokampo li neniam semus (Sarande)
La herbon per falc'ilo kaj la kverkon per hakilo (Lushnjë)
La maron oni ne povas transpasi surpiede (Shkodër)
J'us kiam la hakilo trovis sian tenilon, la arbaro ekterurig'is (Sudo)
Oni ne survoĵig'as sen bastono kaj lanjako (Sudo)
Iom post iom la bovido farig'as virbovo (Elbasan)
Herberon post herbero, farig'as pajlostako (Tiranë)
S'tonon post s'tono farig'as muro (Elbasan)
La viro ne naskig'as je lipharoj (Sudo)

Oni diras al li jen la lupoj, li demandas kie estas la spuro (Sudo)

Malsag'ulo j'etas s'tonon en la akvon kaj 40 sag'uloj ne povas g'in elakvigi.
(Shkodër)

Grandaj scioj estas en mallongaj vortoj (Shkodër)

Pli bone posedi pli da menso ol s'afoj (Shkodër)

Prijug'as la menso , ne la ag'o (Sudo)

Kiam eraras la sag'ulo, ekmiras la stultulo (Kosovo)

Kiu estas mezurinta sin , estas ja mezurinta la tutan mondon (Sudo)
La somera pluvo estas kiel la novedzina plorado (Shkodër)

Tion kion mang'as la bus'o, montras la vizag'o (Labërio)
La pordo de prizono malfermig'as dum la pordo de la tombo ne (Shkodër)
Mang'u lauvole sed vestu vin kiel la aliaj. (Sudo)
Kiam vi perdas la esperon , vi perdas la vivon (Sudo)
Pli bone resti en domo malgranda kie oni ridas, ol en granda domo kie oni ploras

(Elbasan)

Pli bone esti sanulo ol reg'o (Shkodër)
Ne demandu kiel li mortis, sed kiel li vivis (Sudo)
Ric'a estas tiu hejmo kies dommastrino estas sag'a (Sudo)
La infano havas grandan spiriton kaj malgrandan korpon (Shkodër)
Ne rigardu c'e la virino la nazon sed la laboron (Kosovo)
Vi havas patrinon, do vi havas la mondon (Tiranë)
Kiu geedzig'is kaj ne g'ojig'is (Sudo)
Kiu forgesis gepatrajn bonojn neniam ric'ig'is (Sudo)
Pli bona estas la manfrapo de patrino ol la mankareso de kvazau'patrino (Shkodër)
Kreski infanon kaj starigi g'in estas tutegale kiel elfosi puton per kudrilo

(Shkodër)

Por ac'eti varon hastu, dum por edzig'u pripensu (Sudo)
Kreskinte gefilon , konstruante kastelon. (Elbasan)
La lastan deziron (testamenton) ec' la tero ne solvas (Shkodër)
La donita parolo de la viro estas tiom peza kiom la s'tono (Nordo)
La donita parolo de la homo estas la s'losilo de la honoro (Nordo)
La virbovon oni ligas c'e kornoj, la homon oni ligas per paroloj (Sudo)
La muro movig'as, sed la viro ne (Sudo)
La oron oni ekprovas en la fajro, la amiko elprovig'as dum dang'era situacio

(Shkodër)

Malamiko en la hejmo estas samkiel serpento en la brusto (Kosovo)
Kiu iras nevokite, revenas ne kondukite (Shkodër)
Kiu iras seninvitite, trovas la tablon ne surtabligite. (Arbres'oj)
Pli bone estas sag'a malamiko ol stultula amiko (Shkodër)
Bona amiko honorigas vian hejmon (Sudo)
Malnovan amikon oni ne devas forlasi (Sudo)
Amiko estas kiel mielo, dum la najbaro kiel la salo (Shkodër)
La amiko estas frato sen parto en la divido de heredaj'o (Elbasan)
La veran amikon oni ne povas ac'eti per mono (Sudo)
Al la amiko vi plendu, dum al la malamiko vi lau'du vin (Shkodër)
La malnovajn amikon ne forgesu, c'ar la novajn vi trovos kie ajn (Lushnjë)
Dum seka vetero oni konas la bonan akvofonton, dum la amikon oni konas en

malfacila situacio (Shkodër)

Kiu elfosas la alies tombon, falas men en g'in (Kosovo)
Rigardu min per unu okulo kaj mi rigardos vin per miaj ambau' okuloj (Nordo)
Kiom da homojn razas la barbiro, sed neniu diras ke li estas lia bofamiliano.

(Lushnjë)

Kiu vagabondas kun lamuloj ankau' li lamos. (Sudo)
 Kiu postsekvos la cimon en la sterkon alvenos (Sudo)
 Kia estas via mastro tia estos via metio (Elbasan)
 Estas facile fortranc'i la hvoston de la mortigita lupo (Shkodër)
 Pli multe scias la suferinto ol la lerninto (Sudo)
 Du kukurbojn oni ne povas teni subbrake (Sudo)
La vilag'o aperinta ne bezonas vojqvidiston (Kosovo)
 Nova vilag'o, novaj moroj (Sudo)
 Monto al monto ne renkontig'as, sed la homoj jes (Sudo)
 En la grandan vitejon iru kun malgranda korbo (Nordo)
 Ne estas oro c'io brilanta (Nordo)
 Ellarmiginte la okuloj vidas pli klare (Sudo)
 La lupo povas s'ang'i sian hararon sed ne la malvirton (Shkodër)
Estu envia sed diru la pravon (Elbasan)
 Parolinte la veron, vi estigas kvardek malamikojn (Elbasan)
 Pli malvasta vivovojo estas la verovojo. (Sudo)
 Oni ne povas kas'i la sunon per kribrilo (Sudo)
Staru malrekte sed parolu prave (Sudo)
 Pro kudrilo kaj fadeno, eluzig'is tuta mantelo (Sudo)
 Etendu la krurojn tiom kiom longa estas la vatkovrilo (Kosovo)
La bravulon mortigu sed ne mallau'du (Kosovo)
 La braveco post la milito kaj la sag'eco post la kunveno ne plu valoras (Shkodër)
 La fortulo estas tia ec antau' la Dio (Kosovo)
 Kiu kaptis la lupon c'irkau' ties gorg'o li ne povas timi pro hundoj (Sudo)

Moderna albano

Kompreneble la karaktero de homo, samkiel aliaj ties ecoj ne estas io statika, sed dinamika. Novaj tempoj , novaj moroj. Albanoj nuntempe ĉiam malpli similas al tiuj tradiciaj. Aparte tio veras post kelkdek jaroj da totalisma komunsima reĝimo (1944-1990). Kiel sciite, tiu reĝimo baziĝis sur certaj principoj el kiuj plej gravaj jenas:

Unupartia politika sistemo: Komunista partio staris super ĉion, tie estas super la patrimon, familion, individon, religion. La oficiala propagando impertinente semis la ideojn pri proleta diktaturo, kiel la plej vasta kaj la nura vera demokratio, estis malpermesite kiu ajn alia libera opinio, politika alternativo. Religio estis malamikeca ideologio, ia venenaĵo, kontraŭ kiu oni devas batali senkompate. Kiam falis partio, ekskuis kaj ekfalas ankaŭ la aliaj valoroj.

La kulto de partigvidanto: ne plu estis alia kulto kiel nacia afero, familia aŭ amika honoro, donita parolo, gastamo, ktp.

La klasbatalo: oni konsideras pli valoran la klaskamaradon ol propran amikon, hejmulon, parencon, sampatrujanon. Ne hazarde la preso informis fojfoje pri vizitoj de “kosovanaĵoj” kaj “ĉinaj fratoj” en ĉefurbo. Kiu ajn protektis en sia hejmo “la malamikojn” de partio kaj ŝtato kulpiĝis kaj kondamniĝis. Tiel oni malvolorigis tiujn idealojn tradicie adorataj kaj respektataj de albanoj.

Kiam albanoj fuĝis eksterlanden post la jaro 1990, ili aperis antaŭ la fremduloj aliigite kaj tute strange komapre al ilia iama tradicia fizionomio. Ŝtelado, krimeco, prostituado,

homtrafikado, drogtrafikado kaj aliaj perversaĵoj praktikataj de parto de albanaj rifuĝintoj en Italio, Grekio kaj alilande prezentis al publika opinio alian tablon de nia popolo. Tio ege bedaŭrindigis nin. Tiaj abomenindaj agoj evidentiĝis ankaŭ enlande, precipe dum la maloportuna jaro 1997.

La naskiĝo kaj disvastiĝo enlanden de la tiel nomataj fifamaj lumonaj kompanioj en la jaroj 1994-1997, atestas pri ia naiveco tutnacia de albanoj kiuj fidis je ŝtato kaj liveris al tiuj kompanioj tutan sian ŝparmonon.

Manko de alta nivelo de civitana konscio ĉe albanoj pruviĝas dum la balotaj kampanjoj. Anastataŭ partopreni amase kaj serioze la balotadon por ke elektu la plej bonajn kandidatojn, albanoj preferas resti hejme aŭ simple voĉdoni laŭ partiaj preferoj.

Ankoraŭ albanoj ne komprenas la politikan batalon kiel rimedon por progresigi la ekonomion, la kulturon, por plialtigi la vivnivelon. La politikajn kointraŭlojn oni konsideras kiel veraj malamikoj, pensmaniero el la pasintaj jaroj de la totalisma ŝtato.

Tamen, la historie formiĝintaj etno-kulturaj karakterizaĵoj de la popolo ne povas renversiĝi tiom rapide ene de keldekjaroj. Albanoj, plimulte demonstris siajn brilajn ecojn, ekzemple dum la jaroj 1991-1992, kiam centmiloj da ili partoprenis amase en la potencaj manifestacioj por renversi la komunisman reĝimon kaj starigi pluralisman sistemon, dum la Kosova milito en la jaro 1999 por elteni la rifuĝintan lavangon de niaj sampatrujanoj perforte forpeltitaj de siaj propraj teroj, dum sekvantaj jaroj kiam, albanoj en Makedonio militis kaj laboris por stabila kaj justa komuna ŝtato tie, kiam albanoj en Kosovo pacince kaj civitanece partoprenas la kampanjon por realigi la postulatajn standardojn tie antaŭ ol oni difinos la statuson de la regiono, kiam la politika situacio en Albanio pliboniĝas kaj la problemoj rilate la diversajn trafikojn plimildiĝas.

Certe albanoj daŭre sin prezentos en kaj ekster siaj teroj kiel posteuloj de brava kaj kulturriĉa popolo en ĉi tiu parto de nia kontinento.

Aldonaĵoj

Artikoloj apartaj pri Kanuno- antikva tradicia leĝaro de albanoj; pri la albana lingvo; pri problemoj de Ĉamerio; pri vojaĝimpresoj de kelkaj eminentuloj kaj ĵurnalistoj fremdaj en Albanion dum diversaj tempoperiodoj ka.

Bibliografio

1 Robert Carver

La eldonejo John Murray (publishers), 1998. titolo "Accursed Mountains" (La Malbenita Altmontaro". Reeldono de la eldonejo Flamingo 1999.

3 Aristidh P. Kola:

Arvanitasit dhe prejardhja e grekëve, vështrim historik-folklorik-politik-gjuhësor, (Arvanitoj kaj la deveno de grekoj, historia-folkloro-politika-lingva trarigardo), Tiranë 2002

3 Prof. H.H. Robert d'Angely

Enigma...e prejardhjes së racës dhe të gjuhës së pellazgëve, Ariasve, Hititëve, Helenëve, Etruskëve, Grekëve ose Shqiptarëve etj...është zgjidhur

(Enigmo de la deveno de raso kaj lingvi de pelazgoj, ariaso, hititoj, helenoj, etruskoj, grekoj au' albanoj ka estas jam solvita) Tiranë, shtëpia botuese (eldonejo) "Toena", 1998

4 **Ismail Kadare**

Eskili- ky humbës i madh (ESKILO-GRANDA PERDINTO)

5 **Jacques Bourcart**

(Jaro 1921) Viti 1921

Udhëtim nëpër Shqipërinë e vjetër (Vojag' o al malnova Albanio)

8 "Albania- a patrimony of europeans values" Tirana 2000

9 **Stephen Schwartz:** Kosovo, background to a WAR"

Libraria (Librovendejo) "Adrion" books@adrionltd.com tel ++355 4 240 018

8 **Miranda Vickers, James Pettifer,** "Albania- from anarchy to a Balkan Identity", 4500 L

9 **Dr. Oakley- Hill,** "An Englishmen in Albania", 4000 L

10 **Harry Hodgkinson,** "Skanderbeg", 3300 L

11 **Paulin Kola,** "The search of Greter Albania", 3200 L

12 **Stephanie Seli Wandner- Sievers,** Fischer edition, "Myth and hystory", 3200 L

13 **Edith Durham,** "High Albania- a victorian traveller's Balkan odyssey", 3000 L

14 **Bernd I.Fischer,** "Albania at war 1939-1945", 5000 L

15 **Edith Durham,** "Albania and the albanians- selected articles and letters 1903-1942", 3200 L

16 "Albania- a patrimony of european values", (guide of albanian history and cultural heritage), 20 \$

17 "Icons of Butrint", 4800 L

18 "Albania through art", 4900 L

19 "Ikonat bizantine dhe pas bizantine në Shqipëri", (Bizancaj kaj postbizancaj ikonoj en Albanio), 3400 L

20 "Albania folk costumes", vol I-II-III , 3 X 4500 L

21 "Vendbanime dhe banesa popullore shqiptare" (Log'lokoj kaj log'ejoj albanaj" Tirana 2000, 800 L

22 "Albania"- guide, 2500 L

23 "Welcome to Albania", 1000 L

24 "Albania- guide to it's material treasures", 2000 L

25 "Albania- the Bradt travel guide", 4000 L

26 "Il Kanun"- Le basi morali e giuridichi della societa albanese", 2300 L

27 "Le Kanun de Lekë Dukagjin", 1800 L

28 "Der Kanun", 1800 L

29 "Gjuha shqipe për të huajt dhe shqiptarët jashtë atdheut" , (La Albana lingvo por fremduloj kaj albanoj ekster la patrio), 1500 L

30 **Mihallaq Shuti,** "Proverba krahasuese, Proverbi comparati, Comparative proverbs, 15 euros

31 "Shqipëria arkeologjike", (Arkeologia Albanio), 3500 L

- 32 **Ferid Hudhri**, “Shqipëria nëpërmjet arkitekturës” (Albania tra arkitekturo), 3900 L
33 **Greg Campbell**, “The road to Kosovo- a Balkan Diary”, 3200 L

Libraria (Librovendejo) “Adrion” books@adrionltd.com tel ++355 4 240 018

Miranda Vickers, James Pettifer, “Albania- from anarchy to a Balkan Identity”, 4500 L

Dr. Oakley- Hill, “An Englishmen in Albania”, 4000 L

Harry Hodgkinson, “Skanderbeg”, 3300 L

Paulin Kola, “The search of Greter Albania”, 3200 L

Stephanie Seli Wandner- Sievers, Fischer edition, “Myth and hystory”, 3200 L

Edith Durham, “High Albania- a victorian traveller’s Balkan odyssey”, 3000 L

Bernd I.Fischer, “Albania at war 1939-1945”, 5000 L

Edith Durham, “Albania and the albanians- selected articles and letters 1903-1942”, 3200 L

“Albania- a patrimony of european values”, (guide of albanian history and cultural heritage), 20 \$

“Icons of Butrint”, 4800 L

“Albania through art”, 4900 L

“Ikonat bizantine dhe pas bizantine në Shqipëri”, (Bizancaj kaj postbizancaj ikonoj en Albanio), 3400 L

“Albania folk costumes”, vol I-II-III , 3 X 4500 L

“Vendbanime dhe banesa popullore shqiptare” (Log’lokoj kaj log’ejoj albanaj” Tirana 2000, 800 L

“Albania”- guide, 2500 L

“Welcome to Albania”, 1000 L

“Albania- guide to it’s material treasures”, 2000 L

“Albania- the Bradt travel guide”, 4000 L

“Il Kanun”- Le basi morali e giuridichi della societa albanese”, 2300 L

“Le Kanun de Lekë Dukagjin”, 1800 L

“Der Kanun”, 1800 L

“Gjuha shqipe për të huajt dhe shqiptarët jashtë atdheut” , (La Albana lingvo por fremduloj kaj albanoj ekster la patrio), 1500 L

Mihallaq Shuti, “Proverba krahasuese, Proverbi comparati, Comparative proverbs, 15 euros

“Shqipëria arkeologjike”, (Arkeologia Albanio), 3500 L

Ferid Hudhri, “Shqipëria nëpërmjet arkitekturës” (Albania tra arkitekturo), 3900 L

Greg Campbell, “The road to Kosovo- a Balkan Diary”, 3200 L

Ilustrafoj je fotoj

Humoro

La ŝtonepoko

Paĉjo, kio estas la ŝtonepoko?

- Tio estas ka tempoperiodo kiam la homoj faris ĉion el ŝtono.
- Ĉu ankaŭ la televidilojn?
-

La patro

Iu knabeto demandis sian patrinon:

- Panjo, ĉu veras ke ĉiu infano devas havi patron?
- Jes, tio estas vero.
- Kial do en nia familio estas kvar infanoj kaj nur unu patro?

La hundo

La patrino demandas sian fileton:

- Kial vi estas tiom multe malsekigita?
- Mi ludis kun Tito kiel hundojn.
- Mi ne komprenis vin.
- Nu, mi estis la arbo..
-

La infanoj

Iu knabeto estis duŝante kune kun knabineto.

- Vidu tiun ĉi kiun mi havas kaj vi ne havas.
- Fu! Tio estas nenio! Mia panjo jam diris al mi ke kreskiĝonte, mi havos sufiĉe multe da tiaj!

Postkapaj okuloj

La malgranda Redi estis rigardanta atente sian patrinon je ĉiuj flankoj. Tio tedis ŝin, tial ŝi demandis la filon:

- Kial vi rigardadas min tiel multe?
- Mi volas konvinkiĝi ke la patro pravas.
- Kial do, kion diris li?
- Li diras ĉiamfoje al la servistino: “Ni devas esti tre atentaj, kara mia, ĉar mia edzino havas okulojn eĉ malantaŭ ka kapo!”